

The Australian Esperantist

(Successor to *La Suda Kruco* and *La Rondo*)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: Mrs. M. Chaldecott, 16 Grosvenor Road, Lindfield, N.S.W. 2070

Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

No. 114 (194)

MELBURNO

Jan.-Feb. 1973

ESPERANTO AND PEACE

To anyone preparing for a debate or a talk the following may be suggestive:

"The adoption of a common auxiliary tongue will not automatically bring world peace; nations fight because they understand one another too well, and civil wars are tragic proof that men of the same speech may be at each others' throats. But a neutral auxiliary language is an indication that men are ready at last for that mutual consideration which is the first condition of peace . . . the cause of war is the thirst for supremacy . . . adoption of an international language would imply that we renounce overlordship." "The France of Tomorrow" (1942): Dr. Albert Guerard.

"An international language of itself cannot bring the age-old calamity of war to an end, and it is a dangerous error to think that it can do so. We cannot hope to reach a remedy for the language obstacles to international co-operation on a democratic footing while predatory finance-capital, intrigues of arms manufacturers and the vested interest of a rentier class in the misery of colonial peoples continue to stifle the impulse to a world-wide enterprise for the commonwealth of mankind. No language reform can abolish war while social agencies far more powerful than mere linguistic misunderstandings furnish fresh occasion for it. What intelligent language planning can do is to forge an instrument for human collaboration on a planetary scale when social institutions propitious to international strife no longer thwart the constructive

task of planning health, leisure and plenty for all." — Dr. Fred Bodmer: "Loom of Language" (1944), p. 511.

The causes of war are (1) economic; There will be no peace until our planet has become an economic unity. (2) psychological. This factor is accessory. There could have been no war in 1914 had not the whole of Europe been whipped into a bloodthirsty frenzy by press, church and school . . . Under these influences outstanding pacifists and internationalists readily volunteered for battle". (Translated gist of what E. Lanti wrote: "Vortoj de Lanti" (1971), p. 158-9).

Elsewhere Lanti affirmed that "an international language will not automatically secure world peace; but there will be no world peace without one".

"VENKO DE ESPERANTO"?

Multaj E-istoj supozas, ke la venko de ilia afero konsistos en tio, ke E-o jam estos fariĝinta la dua lingvo de ĉiu civilizita persono. Laŭ ĝisnuna sperto tiu celo estas malproksima. Ĉu tiu difino de nia celo estas superflue tropretenda? E-o jam atingus sian destinon, se ĝi estus uzata, ne de ĉiuj, tamen de konsiderinda nombro da homoj el kleraj kaj praktikaj tavoloj; kaj se la cetera mondo klare rekonus ĝian rolon kaj valoron. Sufiĉus, ekzemple, se la ĝenerala sinteno pri E-o estus analoga al tiu pri stenografio. Neniu batalas kontraŭ tiu utila uzilo. Male, oni rigardas ĝin lerninda por la plejmulto, sed eble ne por ĉiuj egale bezona.

Se la publiko rigardus la pli-malpli ampleksan, pli-malpli perfektan aplikadon de E-o kiel ion kutiman, kaj se ĝi vidus en preskaŭ ĉiu publika servloko minimume unu personon scipovantan E-on, tio jam estus vera venko. Realisme, tiu estas almenaŭ atingebla venko.

"HOW MANY ESPERANTISTS . . . ?

You've heard it: How many E-ists in the world? A naive question meriting an answer that may bring some sense of reason and reality to the questioner. There is no statistical answer; Conjectures range from T. Jung's 40-50,000 "more or less active" E-ists ("Tri Homoj Flugis al Luno . . ."), through V. Sadler's 100,000 "perfect speakers" and "several millions more or less understanding the language" ("Interlingvistika Informservo, 10-12/72), E. Sonnenfeld's undefined "million" ("Esperanto", 7-8/68), J. C. Wells's same figure ("Esperanto", 1/69), up to Mario Pei's double shot: "about 8 million" (Unesco Courier, 11/63) and "the rosier estimate is 15 millions in a world population of 3 billion" ("Esperanto", 1/69).

The only firm figures are those of the Yearbook of U.E.A.: — 32,000 ("Esperanto", 7-8/72); B.E.A. membership: 1485 ("British E-ist", 3/70) — plus the many thousands of members registered in the organisations of the dozens of countries listed in the U.E.A. Yearbook.

What does one mean by "Esperantists"? They occupy many levels of competency in the language: at one end the fully efficient user, and at the other the adherent who can barely read it.

Answer the question with another: How many persons in Britain — or Australia — who learned French as a second language can use it with any confidence? His query and yours are, of course, unanswerable in terms of factual knowledge.

LANTI KAJ LODEWYCKX.

"Mia espero estas, ke inter la knaboj, kiuj nun lernas nian lingvon, troviĝas geniulo kiu, post kelkaj dekoj da jaroj, produktos ĉefverkon, kiun volos legi en la originalo eĉ kontraŭuloj de artefarita lingvo." — Lanti: "Leteroj", p. 231.

"I do not deny the possibility of Esperanto or another artificial language developing into a literary language. It only requires men of great literary genius using such a language for original production". — Prof. A. Lodewyckx, Dept. of Germanic Languages, Melb. Univ.

Traduko: Mi ne neas la eblecon, ke Esperanto aŭ iu alia artefarita lingvo povos disvolviĝi en literaturan lingvon. Por tio estas necesaj homoj de granda literatura genio, uzantaj tian lingvon en originala verkado.

En 1933 nia redaktoro debatis per plumoj pri Esperanto kiel lingvo literatura. La leteroj aperas en "La Suda Kruco", aŭgusto, septembro, 1933.

(Pri la vorto: artificial, vidu: The A.E. 3/68.)

LIVING AND LEARNING

Earn a living and study in spare time, through an independent correspondence school for senior secondary students which may be set up in the Latrobe Valley this year. Young people would take subjects at Intermediate and Leaving levels while in their full-time jobs. This is the idea of Mr. Ivan Maddern, 65, a former Morwell High School principal, who founded Australia's first "independent" university, through which 70 to 80 people are studying for degrees in arts, science and education by correspondence.

He said: "Young folk are impatient at being kept in full-time study and treated as dependent children . . . they must be allowed to go out into the world and live as they learn". His courses would include English, history, Esperanto, mathematics and possibly other subjects. As with his university, the new school would have no examinations and no failures: students would be assessed on assignments.

The Independent University of Australia reopens in February, when Mr. Maddern hopes to start with 100 students, rising to 150 or 200 in June and September.

"POPOLA FRONTO" (HISPANUJO)

Dum parto de la Hispana interna milito, 1936-39, mi ricevis la gazeton "Popola Fronto" el Valencio: entute 32 numeroj de 1 Aprilo 1937 ĝis la fina en Januaro, 1939. Ilin mi jam transdonis al S-ro I. Maddern, kuratoro de la Biblioteko kaj Muzeo Memoriga al William Drummond.

La numeroj estas tre valoraj bibliografie. De Hispanujo jam venis demandoj pri ili. Dezirante eviti riskon de perdo aŭ diserigo, mi metis ilin sub kuratoran konservadon.

La lasta numero brave spitas al la tre diprema situacio milita en tiu tempo: "Jam venos tagoj pli helaj; tre fiere tiam ni rememoras pri nia digna konduto!" — Red.

AUSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO

OFICIALA INFORMILO

NOVAJ ANOJ:

Pye, S-ro L. Marrickville, NSW
Harrison, S-ro R. B. R., Castle Hill,
NSW

Garrard, F-ino Robyn, Masterton, N.Z.
Bain, S-ro R. M., Cremorne, NSW
May, S-ro H. W., Bathurst, NSW
Edmeades, S-ino A. E., Geebung, QLD.
Williams, F-ino B. T., Bellevue Hill,
NSW

O'Grady, S-ro T. S., Mt. Gravatt, QLD.
Peart, F-ino W., Mosman, NSW
Crane, S-ro D., Mundubbera, QLD.
Jedwab, S-ro L., Brighton, VIC.
Curry, S-ino E. S., Coogee, NSW.

T.G.M.F.

Strickland, S-ino E., Croydon
Park, NSW \$1.50
Rockhampton Esperanto-Societo, \$5.00
Smith, S-ro K. L. G., Balgowlah,
NSW \$15.00

Williams, F-ino B. T., Bellevue
Hill, NSW \$6.00

ANONCOJ:

F-ino R. J. Harris nun loĝas en Port
Moresby (Dept. of Business Develop-
ments) kaj bonvenigus Esperantajn
vizitantojn.

La emblemo sur la novaj kartoj estas
artplena desegnaĵo de nia Victor Bour-
lin, kiun ni dankas kaj gratulas pro
bonega rezulto. — Russ Baxter, sek. 5
jan.

LIBA AU ROSALJA . . . ?

E. Privat en: "Vivo de Zamenhof",
Marjorie Boulton en: "Zamenhof", Z.
Maimon en: "Monda Kulturo", vintro
1966 k.a. nomas la edzinon de Marko
Zamenhof respektive: Rozalja, Rozalia,
Rozalio. A Holzhaus, male, asertas
ĝin: Liba, sur atesto de la naskiĝdoku-
mento de L. L. Zamenhof en "Memor-
libro de la Zamenhofa Jaro" (1960) kaj
atentigas pri represo de la dokumento
en "Esperanto", dec. 1959, p. 203 . . .
"Liba Solemova Sofer = Liba, filino
de Solem, Sofer. Ankaŭ vidu: "Esper-
anto Triumfonta", 19 dec. 1922, kaj
"Doktoro kaj Lingvo Esperanto" (Holz-
haus, 1970).

Kio nome atestas la nomon Rozalja
k.s.- De kie la formo elfontas?

TRADUKA RONDO

The Translation Circle is now limited
to its present members — 30 of them. I
type with carbon-papers four 8's=32
copies. This leaves me one for myself
and one for eventual use. I can accept
new members only as present ones leave.
—F.R.B.

AUSTRALIA KRONIKO

PERTH: La jarkunveno de la E-Ligo
de Okcidenta Aŭstralio okazis 4/12.
Ĉiu oficisto raportis la progreson de
aferoj sub sia kontrolo. La elspezoj
superis la enspezojn je \$20.23. Nia Public
istino, kun nia vigla sekretario, kaptis
ĉian okazon por intervjui ministrojn de
Edukado, lernejestrojn kaj eminentulojn
de Radio, Televido kaj gazetaro.

La nova Estraro: Prez: J. Hawks,
Vic-Prez: S-ino R. McGrath; Sekr. W.
Howard; Kas. O. Loneragon; Ekzamen-
isto: D-ro C. Caldera; Publicisto: S-ino
I. Einihovici (kun helpantoj S-roj
Mappin & Smeets); Bibliotekisto: S-ino
V. Payne; "Nigra Cigno": S-ino E. L.
Palmer.

Ĉar multaj aferoj postulis detalan dis-
kutadon oni tiucele dediĉos tutan
dimanĉon (14/1) al "Seminario"

Nia Zamenhofa Festo 15/12 estis
treege sukcesa. Ĝi okazis en bela, granda
salono de la nova domo de "Commercial
Travellers Association" en la urbcentro.
Ĉeestis 105 personoj (jes, cent kvin!).
La bona rezulto ŝuldiĝis al la fervora
varbado de S-ino I. Einihovici, kiu
senĉese kontaktis malnovajn membrojn,
novajn kaj aspirantajn. Parlamentano
S-ro Malcolm Brice venis kiel repre-
zentanto de la ĉefministro. Ankaŭ
ĉeestis multaj malnovaj anoj, inter ili
David Miller, Rowland Stephens, Nell
Claxton, Edith Willis.

Nia sekretario, S-ro Howard, direktis
la programon, kaj nia prezidanto, S-ro
Hawks, bonvenigis la gastojn. D-ro
Einihovici impresis festparoladis. Por
la gastoj F-ino O. Strempl tradukis
lian paroladon. Eminentaj gastoj parolis
favore pri nia movado. La bongusta
festmanĝo cedis al elstare bona muzika
programo, inkluzive de kantoj en
Esperanto, teatraĵeto kaj programeroj
prezentitaj de S-ino Vera Payne kaj du
filinoj.—G. Pollard (kun aldonoj de R.
McGrath).

MELBOURNE: Hungara migrinto, S-ro
Sandor Polacsek, iama U.E.A. Delegito
el Komlo, kaj gastiginto de Julio Baghy,
salute alparolis 27/11. Parolis S-ino L.
Fridenberg, priskribante flugviziton al
parencoj en Usono. Krom vidindaĵoj
kaj aliaj interesaj pri la vojaĝo, ŝi
informis pri kelkaj malavantagoj, kiuj
embuske atendas vojaĝanton. Arnold
Baldwin, jus reveninta el Eŭropo,
rakontis (4/12) pri vizitoj al diversaj
transmaraj E-Centroj kaj renkontiĝoj
kun E-istoj en Londono, Parizo, Roter-
damo kaj Vieno. En Vieno li inspektis

la famekonantant Internacian E-Muzeon.

La Melburna Zamenhof-Festo okazis je 9/12 en la salono de la Y.M.C.A. Ĉeestis 62 personoj, pli ol en antaŭaj jaroj, inter ili ankaŭ 7 vizitantoj el Morwell. Guplenan programon komencis S-ino M. kaj F-ino M. Sanders per pianludado. Post salutoj de klubaj reprezentantoj Loreta Kelly kaj Mary Malone, el Morwell, ravis per Esperanto-kantado, kiun ili akompanis per gitaro kaj tamburino; kaj samspeca plezuro rezultis el la posta kantado en E-o de la E-grupo de Malvern. La E-Klubo de Orientaj Antaŭurboj prezentis 4 amuzajn skeĉojn, kiuj ne nur instigis ridadon, sed malkaŝis aktoran talenton de pluraj anoj. Kun pardonpeto al Raymond Schwartz pro aktualigo laŭ loka scenejo, I. Heldzingen deklamis "Promesoj de la Kandidato". S-ino kaj F-ino Sanders denove ravis duete bekflutante, antaŭ ol Arnold Baldwin prezentis sian revuon pri al E-agado en Viktorio dum 1972. Li esprimis dankon al kelkaj artistoj per donacetoj. Festparolado de Ivan Maddern, kiu skizis la vivon de Zamenhof kaj faris komparon inter Zamenhof kaj Kristo, celis ĉefe al komencantoj kaj novuloj. Sekvis la himno kaj la kutima manĝeto kun gaja babilado. Ni speciale dankas al la Morwell-anoj, kiuj devis longe veturi Melburnon kaj el kiuj tri kontribuis al la programo.

La Jarfina festeto de la Melburna E-Soc. okazis 11/12. S-ro Munro gvidis konkurson kaj legis la Kristnaskan mesaĝon de Sta. Luko: S-ro Beechey parolis pri sia okjara fideleco al E-o. Arnold Baldwin informis pri internacia kongreso (3 jarojn antaŭ la naskiĝo de E-o) por decidi la nulan meridianon ĉe Greenwich, kiun li mem vizitis antaŭ nelonge. Herbert Koppel legis leteron de Kim Bastin pri kontaktoj kun Finnaj E-istoj.

SYDNEY: Shirley Fanos organizis memorajan vesperon; membroj portis objektojn kaj parolis pri ili. Objektoj variis jam de orbulo ĝis kandelao. Wre Chandler montris gazetojn de lernejoj kie li estis instruisto. Faris ilin lernejoj por interŝanĝo kun alilandaj lernejoj. Laŭoportune li instruis E-on, kaj foje aperis E-aj artikoloj en la gazetoj. Dr. Gordon Payne parolis pri la trovitaj Tutenkamen, sed kompreneble li ne posedas memorajon! Eve Mation havis Japanan vizitanton de bonvolmisia ŝipo; tiu ĉi iomete parolis E-on.

27/11: Ni bonvenigis studenton Laurie Pye, kiu loĝos en Kanbero. Norman Brodie montris lumbildojn: ni vidis Kaburbon de la supro de Monto Tabla, Durbanon, la grandegan familion de Zulus ĉefe — ĉiujn preskau senvestaj. Sekvis bildoj de Lisbono, Rio de Janeiro, Israelo: la Morta Maro, la Plorkria Murego, la Muzeo de la Skribulajoj, la kibucoj en la lando, la Memorajo al J. F. Kennedy, la Altaĵoj de Golan k.m.a. Tiam sekvis bildoj pri lokoj apud Perto.

4/12: Gastparolis S-ion Loraine Price pri Bahaismo, kies idealoj estas similaj al tiuj de E-o. Ĝi favoras la uzadon de internacia helplingvo. Ĉe E-a bankedo en Parizo feb. 1913 Abdul Baha aprobis la vivon de Zamenhof kaj lia lingvo.

(Ankaŭ en Edinburgo 7 jan. 1913 li ordinis Bahaanojn en la Oriento zorge studi E-on. Legu artikolon en "Encik. de E-o". — Red.)

11/12: Ni bonvenigis S-ron Verlinde, bravan blindulon el Nederlando, kiu vizitas Sidnejon denove, post 4 jaroj. Victor Bourlin raportis, ke alvidis liajn lumbildojn en Dubbo preskaŭ 50 personoj, al kiuj li disdonis "verdajn kartojn". En loka ĵurnalo aperis anonco: "Vizito de Mondmarŝanto".

16/12: Sajnas, ke Esperanto-Domo estas konstruita el kaŭĉuko, ĉar 50 divers-klubanoj vizitis ĝin por festi la Zamenhof-Vesperon. Volo Gueltling festparolis, tributante al D-ro Zamenhof kaj emfazante la grandan kaj imponan kontribuon, kiun E-o povas doni al la mondo. Post komuna kantado Margaret Liston prezentis: "Cindrulino kaj la Kristnaskarbo", pantomimon, kiun ŝi mem verkis. La Drama Grupo de Manly E-Society partoprenis en la teatraĵo, kiu ofte eĉ ade ridegis la ĉeestantojn.

MANKAS SEKRETARIO

Fine de 1972 pro privataj kialoj S-ino Lily Goldsmith ekŝiĝis de sekretarieco de la N.S.K.-Federacio. Dankon al ŝi pro fidela servo al la Federacio kaj la movado ĝenerala! La prez-o, Les Scott kaj la direktoroj bonvenigus proponojn de alia Esperantist(in)o. Ĝi estas pagata partotempa ofico, kiun povas plenumi homo sufiĉe bone parolanta E-on kaj almenaŭ iom sciante pri komercaj aferoj. Volonte oni konsiderus ĉiujn proponojn.

Por kontakti la Federacion aŭ paĝi kotizon, skribu aŭ telefonu (977 3338) al Les Scott, 34 Ocean rd., Manly, 2095.

La unua Federacia kunveno por 1973 okazos 30 jan., kiam oni nomos la novan sek-ion kaj la venontan konferencon de la Fed.

FESTIS LA KLUBO MANLY

Societa vespero fine de la Kluba trimastro okazis ĉe la Virina Kroketa Klubhalo en Manly 2 dec. Programestro: "Robbie" Robertson, prez-o de A.E.A. La ĉefa programero: pantomimo, La Kristnaskarbo de Cindrulino, verkita kaj reĝisorita de S-ino Margaret Liston. Geroluloj: Cindrulino — May Baxter; Malbelaj Fratinoj — Isobello; Eunice Graham; Dorabello: "Robbie" Robertson; La Patrino—Thora Richmond; Feino de la Kristnaskarbo — Glenda Brown; Princo Carmeo — Russ Baxter. Cefkanceliero — George Thatcher. Akompanistino, Olive Bleisner. Gardistino de kantado, Marjorie Duncan. Anoj de "Tatts", ekstera amatora grupo, partoprenis.

Ĉe la hejmo de Ruth Carruthers 10 dec. la Klubo Manly denove kunvenis. La kursoj ĉe la vespera kolegio okazos ĉiumarde anstataŭ ĉiujarde. La ŝalma (bambufluta) grupo — Peg Ford-Lewis, Marjorie Duncan, Anne Gash — ludis sezonaĵojn. Vespermanĝon bongustan aranĝis S-ino Ruth Carruthers. Poste "Robbie" montris diapozitivon de la antaŭa pantomima vespero. — Elviess.

GASTPAROLANTOJ BEZONATAJ

Les Scott, kasisto de AEA kaj prez-o N.S.K. Federacio, estas ankaŭ fakdeligito UEA por la Rotaria movado. Li alvokas helpon de gastparolantoj por Rotariaj kaj aliaj grupoj. Se iu povas helpi, tiu kontaktu S-ron Scott, kiu tiam informos la Rotarian movadon k.t.p. pri gastparolantoj haveblaj por klubprogramoj. Tiuj, kiuj jam parolis ĉe iu Rotaria kunveno, bv. informi al li, kiu uzos la novaĵon en la eldono: "Rotary Down Under", presajo ricevata de preskaŭ ĉiu Rotariano en Aŭstralio kaj Nov-Zelando kaj legata ankaŭ de ties familianoj.

BRISBANE: La jaro finiĝis (9/12) ĉe la hejmo de Edna kaj Howard Jullie, kiam 60 personoj festis la naskiĝtagon de D-ro Zamenhof. Estis ĝoja societa vespero. Komenciĝante je la tri pm. ĉiuj kuniĝis per arakida ludo (para aŭ malpara), la gajninto estis Roberta Edmeades. Je la 5-a ni pretiĝis la subĉielan manĝon. Poste okazis programo de amuzajo, dramo, muziko kaj magio. Tre plaĉis ni ke membroj de aliaj kluboj

povis ĉeesti. Rezentantoj venis de Redcliffe, Toowoomba, Sherwood kaj Beenleigh. Ni adiaŭis al Hans Brendel, kiu transloĝiĝos al Nov-Zelando. Erika Gunster tranciĝas la Esperantan kukon, kaj Arthur Bayliss loterie gajnis grandan skatolon de biskvitoj.

La Generala Kunveno okazis en nia klubĉambro 11/12. La Prezidanto Mal Robinson dankis membrojn de la komitato kaj geinstruistojn por ilia kunlaboro dum (1972). La nova Estraro: Prez: Mal Robinson; Vic-Prez: Tom O'Grady; Sekr: S-ino Val Robinson; Kas: S-ino S. Martin; Vic-Sekretarioj: F-inoj B. Allatt & J. Elvidge; Biblioteko: T. O'Grady; Libro-Peranto: S-ino A. Edmeades. S-ino Win Greenhalgh, sekretario de la Kongresa Komitato, parolis pri aranĝoj faritaj ĝis nun.—V. Robinson.

TOOWOOMBA: Ni festis la naskiĝtagon de D-ro Zamenhof en la hejmo de Ges-roj E. J. O'Mara. Ĉeestis 27 personoj el Toowoomba kaj Brisbano. F-ino M. O'Mara gvidis la komunan kantadon kaj la Prezidanto, S-ino L. Buchan, festparoladis.

Landa Kongreso sub Tertremo

La sukcesa 38-a Nov-Zelanda Esperanto-Kongreso okazis en la urbo Masterton (proks. 19,000 loĝantoj) de la 4-a ĝis la 8-a de januaro, 1973. Aliĝis 98 personoj el kiuj 86 partoprenis la kongreson. Inter ili estis du vizitantoj el Aŭstralio: S-ro Arthur Cocking (Manly) kaj F-ino Celia Radcliffe (Okcidenta Aŭstralio). La kondiĉoj en la kongresejo, St. Matthew's Kolegio por Knabinoj, estis bonegaj. Kompreneble, la L. K. K. ne respondecis pro la malkonstruo de halo, kie multaj aranĝoj devus okazi. La suno brilis seninterrompe dum la unuaj kvar tagoj. Krome la Naturo aldonis iom da dramo: proksimume je la 2-a matene, 16/1, Masterton, kun multaj aliaj partoj de la Norda Insulo, estis skuata de sufiĉe forta tertremo, kiu feliĉe ne kaŭzis damaĝon.

Du novaj ideoj: Unue, laŭ ekzemplo de UEA, la diversaj ĉambroj havis nomojn de mortintaj elstaraj E-istoj de Nov-Zelando. Due, ĉe la oficiala malfermo, kie parolis lia urbestra moŝto S-ro T. S. Tankersley, ni kantis la nacian kanton "Dio gardu Nov-Zelandon" anstataŭ "Dio gardu la Reĝinon". La anoj ĝenerale subtenis proponon okazigi "Sud-Pacifikan Kongreson"; almenaŭ 15 indikis, ke ili estus pretaj viziti Aŭstralion en 1976, se ĝi okazus. Prof. C. J. Adcock, komisiito

por la subskriba kampanjo, raportis ke li sendis cirkuleron al ĉiuj parlamentanoj. El 84 nur 15 respondis ĝis nun, kaj el tiuj nur 3 subskribis la formularon subtenantan Esperanton.

Okazis 2 elstaraj prelegoj: Prof. C. J. Adcock, emerita profesoro de psikologio, parolis pri la temo "Vidi estas Kredi". Vidinte lian kolekton da kliŝoj, kiuj montris kiel facile la homa okulo trompiĝas, ni ne volis kredi ion ajn, kiun ni vidas! La hungara E-isto Josef Major, kiu dum multaj jaroj vivas en Nov-Zelando, parolis pri "Esperantologio". Neniu povus paroli kun pli da aŭtoritato pri tiu temo ol nia amiko, kiu siatempe studis ĉe famaj personoj kiel Waringhien, Kalocsay kaj Wuester.

La materialo kaj la parolado estis tiel interesaj, ke oni aranĝis ilian daŭrigan dum horo post la planita horo.

Nur unu grupo prezentis skeĉon por la Drama Konkurso, la junulara grupo EJANZ; por fari veran konkurson ili fakte prezentis du erojn, inter kiuj la juĝanto devis elekti por la premio. Du aliaj grupoj prezentis legitajn teatraĵojn. Diservon (8/1) gvidis S-ro W. Harding, anglikana pastro. Okazis Oratora Konkurso, lingvaj kaj literaturaj sesioj, paroladetoj de kongresanoj kaj Debato inter kvar personoj. La kongreso finiĝis per kabareda vespero, kie diversaj programeroj alternis kun dancoj. — Ralph Dearnley (Wellington).

DUMVIVAJ MEMBROJ DE U.E.A.

Mi ĝojas anonci du pluajn Dumvivajn Membrojn de U.E.A. En oktobro S-ino Doris Sinclair listiĝis, kaj nun mi fieras aldoni la nomojn de S-ro Ralph Harry, nia diplomata samideano, kiu nuntempe estas ambasadoro por Aŭstralio ĉe Okcidenta Germanujo, kaj de S-ro Russ Baxter, nia alte estimata sekretario de nia Aŭstralia Esperanto-Asocio. La ricevo de la revuo "Esperanto" kaj la Jarlibro de U.E.A. estas garantiata por ili dum la cetera vivo. — Ken G. Linton, Cefdelegito.

KABE: ORIGINALA PROZO

Kazimierz Bein ("Kabe") estas konata kiel tradukisto; malmulte li verkis prozoriginale. Interesa do estas lia longa prelego ĉe la Bulonja E-Kongreso 1905. La teksto estas en libreto: "Boulogne 1905: Testo kaj Triumfo", Nro 1, Kolekto: Zamenhof en sia Tempo (Esperantaj Francaj Eldonoj, 11 rue Vergne, Marmande, France). Tiu prelego estas valore havinda.

PEPPLENDJO

Kiam foje skribas mi leteron
Prenas mi helpeme la liberon
Sendi kromlegajojn por amuzo,
Ankaŭ por plezuro kaj plu-uzo.
Faro mia unu homon ne tre plaĉis:—
Al ĝi li grimacis — eble kraĉis:—
"Malnovaj gazetoj, folioj verkaĉaj,
Por mi estas aĵoj ofende malplaĉaj.
Cesu plu-sendon, mi varme pripetas,
Car tiajn rubaĵojn mi nepre forjetas."

Al homo tre klera en fora landeto —
Ja Brito, kaj ankaŭ fameta poeto —
Nesaĝe mi foje fuŝfaris eraron,
Skribinte: "Ĉu uzas vi rimo-vortaron?"
Akre (ne sakre!) respondon li donis:
Nur cerbon la propran li iam bezonis:—
"Mi certe ne havas la aĉan kutimon
Suĉadi el libroj por trovi par-rimon!"

Jen kaj jen amikoj plende grumbas:
"Ĉe pala skrib' mi pro neklaro stumblas.
Rubandon novan fiksas al tajpilo,
Por ke mi legu viajn kun facil'."
Ho karaj, mi komprenas vian splenon.
Tre ofte mi neglektas la bobenon.
Tajpante arde, kun plenstreĉa menso,
Ne havas mi rubandojn en la penso!
—Farbo.
(Anglalingva versio laŭ peto.)

PICKED PARS

Mr. J. Kane, mayor of Edinburgh, is an E-ist. He translated for delegates visiting the Viennese councillors.

In 15 years North Vietnam has issued 57 Esperanto books; four have been translated into Japanese.

A Chinese story for children has been translated into Italian. Name: "Mi volis viziti lernejon" (I wished to attend school).

"Retoriko", by Ivo Lapenna, and "Nepalo malfermas la pordon" (Sekelj) have been translated into Polish from the Esperanto originals.

A 22-page booklet in Esperanto has been issued on Bahá'ism. At Mrs. R. O. Stone, 504 N. Fifth St., Gallup, 8730N, Mexico.

After leaving the Scout Jamboree in Tokio W. Wijmer, head of the Dutch Scouts, journeyed by motor-boat 12,000 miles through Japan and S.W. Asia. In Japan he used only Esperanto.

BUCISTO, VIANDVENDISTO

I am going to the butcher's = Mi iras por aĉeti viandon. Jen la laŭsenca traduko. He spoke to the slaughterman. = Li parolis al la buĉisto. (Viro, kiu metie buĉas.)

ANGLAĴO PARLAMENTANA, p. 261

Nur unu provo ricevita — tiu de nova leganto, S-ro Tom O'Grady, Upper Mt. Gravatt, Q. Jen:

1. Tiel mi opinias — sed nur laŭ mia kompreno de leĝa konsilo.

2. Tio, kion volas kaj estas faranta la registaro, kontinuiĝas antaŭajn okazitaĵojn.

3. La rezultato fariĝos laŭ diligenta ekzameno kaj studo.

4. Cu mi ne rajtas aserti, ke mi estas misprezentita, ĉar la Opoziciestro diris malvere, ke mi misprezentis lin?

A.E.A. EXAMINATIONS

The Examining Commission asks all intending aspirants for diplomas that they refrain from entering prematurely. They should have sound reasons for a confident belief that they can pass both in the Written and the Oral sections. When a candidate fails, both parties feel unhappy.

LAZARO AŬ LUDOVIKO?

La pozicio de liaj baptonomoj varias. Zakreowski, Boulton, Esperanta Enciklopedio, Waringhien, Lapenna, Privat uzis: Lazaro Ludoviko Zamenhof.

Aliaj verkistoj uzis: Ludoviko Lazaro . . . La enskriboj sur memorŝtonoj, ankaŭ ili diferencas. Sur la tomboŝtono: Ludwik. Same sur memortabuloj en Varsovio kaj Białystok; tamen sur tiu en Vieno: Lazar Ludwig . . . Sur lia persona vizitkarto: Dr. Ludwik Samenhof. Pri lia uzo de Z anstataŭ S en postea tempo, vidu: "Nica Lit. Revuo, 1/59, 3/59 kaj "Originala Verkaro", p. 427-8.

Lia nomo ne troviĝas sur la naskiĝ-dokumento en "Memorlibro", sed jen definitiva diro: "Mia plena nomo estas Ludvigo Lazaro (Ljudovik Markovič Z-f): ruslitere. Vidu: O. V. 482.

FILMO PRI AUSTRALIO

"Fakto — Aŭstralio en la 70-aj jaroj", 16-mm kolorfilmo en E-o. La 4-a E-filmo eld. de la Aŭstralia Registara Buroo por Informado; daŭro 20 min. Pruntebla ĉe Inform-ataŝeo, Aŭstralia Ambasado, Bonn. — Laŭ "H. de E."

KORESPONDADO

Kun gejunuloj: Uveges Bela, Szarvas, Szabredsgat ut, 1-3 Hungary.

Nette Buis, Berkenstraat 7, Krommenie; Margo Sminia, Burg Mosselstraat 43, Krommenie, Holland.

Multaj plumamikoj atendas vin ĉe/ Klubo "Unueco", Dorpsrte. 843 Krommenie/Assendelft, Holland.

RECENZOJ

"Printempo en la Aŭtuno": Julio Baghy. Eld. Dansk Esperanto-Forlag, Ingemannsvej 9, DK-8230, Aabyhoj. 116 paĝoj. 15 Danaj Kr.

Enkondukas la rakonton prozopomo al la Printempo jam sin manifestanta en la pasanta Aŭtuno.

Temas pri orfo milita, adoptita de oficiro en bonstata helmon, kaj pri knabino kiel bebo kaŝe forlasita sur ŝtupoj de cirkveturilo. Sentante sian komunan sengepatrecon, ankoraŭ pli forte la getrovitoj sentas reciprokan animsimpaton — finvorite amon unu al la alia. La varmo de printempa karesemo burĝonis en iliaj koroj en tiu tempo, kiam la formortanta aŭtuno triste adiaŭis. Li, Adam, jam studento; ŝi, Eva, cirka nomadino. Jen bazideo ĉirkaŭ kiu ludas la romantika imagemo de la aŭtoro.

Baltazar, la cirka magiisto, kaj Fridolin, la arlekano, tenere prizorgas la junulinon, kiu hazarde venis sub ilian bonfaran kuratorecon — ŝin, la vendistinon de biletoj ĉe tendo-enirejo.

La aŭtoro kun bongusto re-vivas per siaj scenigoj la etoson de sia frutempa kariero aktora kaj per viglevortaj priskriboj kondukas legantojn laŭ la dolĉedolora vojo de l'amo gejunula. Iom filozofiecaj paragrafoj voĉitaj de la mirinde ĉio-scia Baltazar evidencigas fundan precepton pri la misteroj de l'sorto, homa interamo, kaj la vivo mem.

En bonstata studento, kiu staras antaŭ promesplena kariero, pulsas dezirego fari viv-ligon kun cirka vagabondino. Jen la situacio.

Fine legiĝas la lasta paĝo: sub devo al la cirkuloj, Eva veturiĝas aliloken sur la disvaga vojo, promesite reveni — en la Printempo. Cu vere ŝitiron faros? Adam elspiras la lastajn vortojn: "Tiel bela printempo, kiel tiu ĉi en la aŭtuno, venos neniam . . . neniam."

Baghy lertlingve originalas: "la nigra kostumo senkonture unuigis kun la nigra fono" (the costume blended with the black background).

"Liajn okulojn pinĉis la sapŝaumo" (The soap stung his eyes.) Generale lia instinkto uzi kurtajn frazojn estas tiu de E. Privat — trafe, kernece. Iufoje verboj mankas al cetero tutklaraj frazoj; "En tendo loĝi ne bone." "Car buklojn doni ne bone." "Tremanta, vibranta lumo de flagranta kandelo." Alia verkisto esprimus per: Treme vibris lumo . . . "Nur malofte troviĝas esprimo iom enigma, ekz-e: "la vizitantoj donis la anson (?) unu al alia" (16).

La unua eldono aperis en 1931. La represo estas bonvena.

"Infanoj en Torento": Stellan Engholm. 3-a eld. 100 paĝoj. eld. Dansk Esperanto Forlag. 15 Danaj kr.

La aŭtoro uzis la scenejon de regiono de li konata — Sveda kampar-urbo ŝtal-fabrika. Do, regiona romano, kiel principe estas la ĉefaj de Arnold Bennett pri la pez-industria Norda Anglujo. Sed en la Torantaj verkoj oni ne havas la pli dens-pensan imponon de tiuj Britaj literaturajoj, ĉar en ili ne troviĝas la iom komplika intrigo, fina malnodiĝo aŭ frapa klimakso de vere granda plumfaro. "Infanoj . . ." estas samĝenra kun la alia Torenta kroniko, recenzita en The A.E. 11/72. Tekste modifita laŭ neceso, tiu aprezado aplikigas ankaŭ al la nuna libro. Ĝi estas simplastila vortbildaro de epizodetoj en la gejunula vivo, krom kurtaj kvereloj en hejmoj, kie mankas ideala familia harmonio.

La verko komenciĝas per sablejaj ludoj de amikaj gebuboj kaj finiĝas per cerbumado de la samaj animoj antaŭ la problemoj de ilia estonta kariero. Inter la du tempopunktoj, ili inter si, kaj ĉe la gepatroj (iukaze de duba leĝeco), provizas evidencojn en la korjoj de junaj generacioj. Tra la libro enteksiĝis sane morala tono, per la diroj jam de porinfana instruistino ĝis la saĝkonsila uzinlaboristo, ilia amiko.

Priskribe kaj interparole, la lingvaĵo estas perfekte korekta, nepre imitinda por praktikantoj kaj ekzerce leginda por komencantoj.

Plaĉas elipsa uzo de "povas" — t.e. sen sekva infinitivo:— "(La pentraĵoj) ne estas bonaj, sed mi ne povas (subkompreni: fari, pentri) pli bone." Komparu: Lutero, "Ich kann nichts anders" = Mi ne povas alion. Mankas trafaj ekzemploj en la P.I.V.

Noto de recenzinto:

Laŭ Jarlibro U.E.A. 1968, 0.55 Danaj kr. = 7 c. De post tiu jaro la Jarlibro ne provizas tiun liston. Ni konjektas, ke 15 D. kr. nun = ĉ. \$2.50, eble iomete pli.

BONVOLU RIDETI . . .

Instruanto eksplikas al siaj lernantoj: "Ekzemple se vi havas aŭ faras, sekvas akuzativo".

Poste lernanto skribis jenan frazon: "Karlo havas tempon, sed li ne faris la tasko."

"Kial vi ne metis akuzativon ĉe la lasta vorto?" La respondo: "Sed Karlo ja ne faris . . . !"

"La oratoro parolis dum tuta horo".
"Pri kio?"
"Tion li ne diris."

Mezaĝa, etburĝe vestita paciento vizitis psikiatron. Gemis li: "Doktoro, mi suferas neurastenion. Nenio interesas min au min amuzas."

"Do, oni devas restarigi ĉe vi la intereson al la vivo. Ĉu vi ŝatas bonajn manĝaĵojn?"

"Ĉiu manĝaĵo naŭzas min."

"Ĉu vi ŝatas la sporton?"

"Ne. Ĝi lacigas min".

"Do, entreprenu vojaĝon".

"Ho, nur ĉe la penso mem, ke mi devas eniri, ekzemple, tramveturilon, tuj kaptas min deziro min memmortigi."

Subite venis al la kuracisto savanta ideo: "Aŭskultu min, amiko. Lastatempe en la cirko ludas rolon treege komika klaŭno. Li ridigas la publikon ĝis ventrokrevo. Iru tien por lin vidi kaj aŭdi. Oni nomas lin Gibart". (elp. jibar).

La vizaĝo de la paciento plilongiĝis. Li faris mirgrimacon kaj diris melankolie: "Sed tiu Gibart estas mi!"

Pastro disputis kun bienulo. Tiu ĉi fine insulte diris: "Se mi havus idiotan flon, mi igus lin pastro." Rebatis la pastro: "Ja, probable. Tamen evidente via patro ne tiel pensis."

RECENZOTAJ

"Junuloj en Torento": Stellan Engholm. 144 paĝoj. 20 Danaj kr.

"Kit Vivas": Jyette Lyngbirk. 94 paĝoj. 27 Danaj kr. Eldonis ambaŭ: Dansk-Esperanto-Forlag, Ingemannsvej 9, DK-8230 Aabyhoj, Denmark.

LIBRARY COPYING SERVICE

At the Universal Esperanto Association centre in Rotterdam stands the Hodler Library — one of the three largest Esperanto libraries in the world. It has a first-class modern photo-copying machine Rank-Xeros 4000, giving 45 copies a minute. The library is open to all researchers wishing to consult there the vast collection of works old and new.

Copies: format A4: 0.30 guld each. A 200-page book costs only 30 guld.

SPRITA RESPONDO

Kiam Goethe estis 60-jaraĝa, iu demandis: Kiomjara li estas? Li respondis: Trioble dudek-jara.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: Mrs. M. Chaldecott, 16 Grosvenor Road, Lindfield, N.S.W. 2070

Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

No. 115 (195)

MELBURNO

Marto, 1973

PROMENO KUN KNABINETO

Mi jam ne estas nura observanto. Hodiaŭ mi lernis partopreni. Partopreni en la infaneco de mia filo, Petro. Mia filo kaj knabineto, kiun mi ne pripensis dum jaroj, forviŝis la araneajon el forgesita angulo de mia memoro, kaj kondukis min al mirinda vekiĝo. Mi demandis al mi, kiomfoje ili vokis al mi partopreni, kaj mi tute ne aŭdis.

Post lunĉo hodiaŭ, mia sesjara filo restadis ĉe la tablo kun la kapo apogita per la mano, unu saŭcokovrita fingro desegnante cirklojn sur la tablotuko. En liaj okuloj estis meditante necerteco.

"Bona lunĉo, Panjo," li diris.

Momenton li paŭzis, evidente serĉante kuragon, sed, trovinte ĝin, li provis: "Panjo, ĉu hodiaŭ ni povas promeni?"

Mi estis promesinta lin antaŭ du semajnoj — aŭ eble estas tri — ke mi promenos kun li.

"Ne hodiaŭ, mia kara," mi komencis, pensante pri nelavitaj vazoj en la kuireja pelvo kaj nelavitaj vestoj en la lavejo, sed mi rimarkis la finojn de lia buŝo malsupren turniĝi, kaj la defendan pozon de lia korpo, kvazaŭ li dirus: "Mi jam scias la respondon". Subite la dom-taskoj ŝajnis multe malpli gravaj, ol tiu ankoraŭ ne plenumita promeso.

"Ne hodiaŭ," mi ripetis, serĉante rimedon savi la situacion, "almenaŭ ne ĉi momente, ĉar mi devos surmeti la jerzon."

Liaj okuloj ekbrilis, kaj momentojn poste, kaptante lian manon, mi foriris kun li, fermante unu pordon, kaj malfermante alian.

Mi spertis unu dolorigan momenton de dubo, kiam ni trapasis mian tiel

nomitan ĝardenon, tiun baraktantan girlandon de riproĉo, kiu tiel elokvente pledis por iom da sarkado, sed mi hezitis nur momenton, memorigante al mi, ke mi ja promesis al mia filo, kaj tuj mi postkuris lin.

La ĝardeno ŝanĝiĝis al razeno; la razeno ŝanĝiĝis al vepro, kaj la vepro finiĝis ĉe rivereto, kiun ni transiris sur trunko de arbo, zorge ekvilibrante. Petro aŭtomate jetis ŝtonon en la akvon, kaj do, impulsigeme, mi same faris. Tio evidente surprizis lin, ĉar li subridis. Ĝi estis iom kontaĝa subrido, ĉar ĝi infektis ankaŭ min. Mi komencis ĝui ĉi tiun aventuron.

Trans la rivereto ni eniris arbustajaron kaj sekvis paŝon, kiu laŭiris lonicere kovritan, longe forgesitan palisaron. Baldaŭ, malpli ol kvincent metrojn for de nia ĝardeno, mi perdiĝis en landon, kiun mi antaŭe ne vidis. Petro certigis al mi, ke li bone bonas la vojon.

Nia pado fariĝis nur vojeto preskaŭ sufokita per interplekajoj, tiel prezentante al mi timigajn pensojn pri venena hedero. Petro kondukis min al loko, kie falinta arbo frakasis la palisaron, kaj montrante al la loko, li anoncis: "Robo kaj mi vidis urson ĉi tie".

Mia tolerema plenaĝa rideto sendube ŝajne diris: "Ridinde," ĉar abrupte la brilo malaperis el liaj okuloj kaj liaj ŝultroj sinkis, kaj li malrapide paŝis for de mi inter arbustoj blovitaj per la vento.

Blovite per tiu vento de malproksime — ne laŭ mejloj, sed laŭ jaroj — voĉo de knabineto ehis en miaj oreloj: "Paĉjo", ĝi diris, "devas esti indianoj ĉi tie, ĉar mi trovis sagopinton kovritan

per seka sango." Profunda voĉo, varma pro miro, respondis: "Ĉu vere? Ni devas esti singardaj."

Mi tuj postkuris lin kaj penspire mi kriis: "Mi opinias, ke vi pravas, kaj ke vere estas ursoj ĉi tie. Ni devas gardi nin."

La respondo ŝajnis magia, ĉar liaj okuloj denove ekbrilis kaj liaj ŝultroj rektiĝis. Tiuj kelkaj vortoj igis lin senti sin tiel prava kaj tiel grava, kiel la vortoj de mia patro igis min senti antaŭ multaj jaroj.

Nun ni sekvis novan vojon — magian vojon — jam mi ne rimarkis la kreskajojn, jam ne mi timis la venenan heredon. Ĉi tiu sovaĝejo nun povis vere enteni ursojn kaj indianojn, kaj eble ankaŭ piratojn. En nia mirolando ni kuris kaj ridis, ĉiuj tri el ni — patrino, sia filo, kaj knabineto el la pastinto, kiun mi finfine retrovis. Knabeto tiris ĉe mia maniko, kaj knabineto tiris ĉe mia koro, dum ni serĉis ĉe rokoj por kaŝita trezoro, ĉasis papilionoj kaj forsendis kokcinojn al siaj minacitaj infanoj. Ni tri. Ni du. Ni unu.

Guste kiam miaj ostoj pledis por ripozo, Petro haltis kaj sidigis sur ŝtupo. Ĝi estis kaduka ŝtupo, sendube infestita far insektoj, araneoj, kaj multaj altaj rampaĵoj, sed nun mi jam ne timis, kaj, kun malbone kaŝita suspiro, mi sidigis apud li.

"Ĉi tie," li diris, "Robo kaj mi sidas kaj rakontas historiojn. Ĉu la ŝtupo ne estas granda?"

"Jes," mi konfesis, konstatante, ke iun tagon, kiam plenkreskinta, li eble revenos, kaj opinio ĝin malgranda.

Do tie ni sidis, ĉirkaŭitaj far grandegaj arboj, grandegaj floroj, ursoj, indianoj, kaj piratoj.

La posttagmezaj ombroj plilonqigis, do estis jam tempo reveni, sed Petro subite forrapidis, revenante poste kun bukedo da leontodoj. "Mi amas vin, Panjo," li diris, donante la bukedon.

Meritis tiujn vortojn ne la plenkreskinta mi, sed tiu knabineto, kiun ni ambaŭ trovis tiun tagon.

Ni revenis hejmen, ne tri, sed nur du, ĉar ni lasis tiun knabineton sur la ŝtupo en la sovaĝejo. Tie ŝi atendos nin, bone sciante, ke ŝi ne vane atendos, kaj ke ŝi ne devos atendi tro longe. — El la angla tradukis Ken G. Linton.

A.E.A. EXAMINATIONS

We have recently received examination papers from persons who have become irregularly possessed of the test folio. These entries will be ignored by the Commission. Fee (2 dol. Elementary; 3 dol. Advanced) must accompany application to Australian Esper-

anto Assocn., Box 415, Manly, 2095.

ASOCIA FINANCA AFERO

Rilate al la financa raporto, kiu aperas malsupre, mi devas atentigi membrojn al la fakto, ke kvankam la nuntempa financa stato ŝajnas sana, ni ne povas certigi, ke ĝi daŭros tiamaniere dum la tuta jaro, antaŭ la venonta kongreso en Brisbano je la komenco de Januaro.

Dek unu eldonoj de "A.E." aperas ĉiujare, kaj la meza kosto por iu eldono estas proksimume po \$150, kiu sumas \$1650 dum la tuta jaro. Tiu signifas, ke nia nuntempa kreditsaldo estos elspezita jarfine.

Ŝajnas al mi, ke por daŭrigi nian aferon en kutima maniero dum la cetero de ĉi tiu jaro, kun ĝeneralaj elspezoj plus kelke da publikigoj, ni devos petigi subtenantojn por pluj kontribuoj al la Tajni Goldsmith Memoriga Publica Fonduso. Mi kaj la estraro bonvenigos helpon de legantoj en tio.

Mi antaŭdiras, ke en la nuna jaro estos nepre necese plialtigi la kotizon al A.E.A. Mi sugestas, ke neniu pagu 1974-5 kotizojn antaŭ ol la nova kosto estos fiksita. La estraro konsideros la situacion kaj prezentos rekomendon al la okazonta kongreso por aprobo. — Les V. Scott, kasisto A.E.A.

AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO

Financa Informo.

1 Decembro 1971 - 31 Januaro 1973

ENSPEZO.

Kreditsaldo 1/12/71	\$595.25
Kotizoj 1972	1170.50
Antaŭpagitaj 73/74	202.00	1372.50
Profito Melburna Kongreso	640.59
Intereso Banka	40.70
Publicigaj Fondusaj Kontribuoj:			
Reader's Digest			
Ceteraj	399.68
Tajni Goldsmith			
Fonduso	388.40
Generalaj	20.35
Malpli Elspézoj	808.43
			214.25
			594.18
Populara Kurso	762.25
Malpli Elspezoj	542.31
			219.94
Meza kaj Supera Kursoj	263.00	
Elspezoj	22.33
			240.67
Ekzamenoj	44.20
"A.E." Abono	5.40
Diversaĵoj	35.61
Interŝangaj Cekoj	170.05
			\$3959.09

ELSPEZO

"Australian Esperantist"	
Presado kaj Afranko	\$1778.47
Afranko Generala	89.73
Presajoj kaj paperajoj	43.68
Kurtaĝo pro Ĉekoj	14.64
Adresaro	117.02
Kotizoj al U.E.A.	
(Asociaj Membroj)	37.50
Ralph Harry Munkena	
Sporta Fonduso	64.00
Diversajoj	123.10
Interŝanĝaj Ĉekoj	170.05
Kreditsaldo 31/1/73	1520.90
	<hr/>
	\$3959.09

—Les V. Scott, Kasisto A.E.A.

A.E.A. OFICALA INFORMILO NOVAJ ANOJ:

Staggard, S-ro L. R., Wantirna, Vic.
 Heughan S-ino J. G., Chatswood, N.S.W.
 Bannister, S-ro P., E. Ringwood, Vic.
 Whitney S-ino J., Old Toongabbie,
 N.S.W.
 Macias S-ro J. Gove, N.T.
 Jullie F-ino E. M., Fairfield, Qld.
 Pearson, S-ino M., Harbord, N.S.W.
 Dean, F-ino D. F., Tusmore, S.A.
 Burrowes S-ro R. J., Box Hill, Vic.
 Mitchell S-ro G. R., Mt. Larcom, Qld.
 Brown S-ro Wm., Hilton Park, W.A.
 Allatt F-ino B. H., Wilson, Qld.
T.G.M.F.
 Fletcher S-ro V., Wauchope, N.S.W.
 \$3.00.

—Russ Baxter, sek., 2 feb.

A.E.A. LIBROSERVO

La granda pliiĝo de la nombro kaj valoro de libroj ktp. venditaj spegulas multe da merito ĉe Tom Elliott en Sidnejo, kiu zorge, fidele kaj tre sukcese direktis la aferojn de la Libroservo dum 1972. Estas bonege havi kapablan E-iston kun inklino por servi nian movadon. La rezultoj estas mirindaj, kaj ni ĉiuj ŝuldas al li tutkoran dankon.

La sumoj ĉe la nomoj de kluboj montras ties aktivecon. Espereble aliaj kluboj plialtigos intereson pri libroj ktp. inter siaj membroj kaj studentoj. Jen la sumoj elpezitaj dum 1972:—

Canberra \$12.02; Sydney \$308.99; Melbourne \$22.05; Brisbane \$236.69; Perth \$155.67; Manly \$82.04; Rockhampton \$50.17; Redcliffe \$19.15; Sunshine Coast \$73.59; Toowoomba \$89.94; Eastern Suburbs (Melb.) \$29.88; Malvern 19.44; Boronia \$14.26. Aldone: S-ino Ivy Fallu, Melburna Kongreso \$237.59 kaj vendoj el Cefoficejo \$1210.24.

—Les V. Scott, kasisto de A.E.A. 1 feb.

AUSTRALIA KRONIKO

PERTH: Tuttaga Diskut-Kunveno okazis dimanĉon 14/1. La centgrada temperaturo tute ne ĝenis la 18 ge-Esperantistojn kiuj kunvenis en la klimatizita oficejo de nia sekretario Bill Howard. La kunveno komenciĝis je la 10.30 a.t.m. kaj post "piknika lunĉo" daŭris ĝis la 5.30-a.

Unu el la plej gravaj punktoj diskutitaj estis aranĝoj por kurso por komencantoj en la Teknika Kolegio, sub S-ino V. Payne. La proponoj estis: Anonco en gazeto "West Australian", leteroj al Rotariaj Kluboj kaj petskribo al la direktoro de lingvoj (S-ro L. Fox) kuraĝigi almenaŭ unu lingvoinstruiston al partopreno. Aliaj klasoj okazos ankaŭ en la Kolegio de gimnaziaj instruistoj (sub D-ro Caldera) kaj alia klaso ĉiulunde sub F-ino Hunt. D-ro Caldera daŭrigos klason dimanĉmatene por progresintoj.

D-ro Einihovici proponis sian konsultojn ĉe 4 Ventmor Ave, West Perth, por la Lig-Kunvenoj ĉiun duan semajnon. Oni ankaŭ decidis aranĝi amikajn kunvenojn kaj piknikojn.

MELBOURNE: Gratulojn al nia eks-prezidanto, E. McKenzie, kies filo David (39 j.) elektigis, 2-a Dec., al la federacia parlamento por la Laborista Partio en la balot-distrikto "Diamond Valley". Kiel instruisto David instruis Esperanton al geknaboj eksterprograme en la lernejo ĉe Bulleen.

Nova kurso komenciĝis 5/2. Samvespere F. R. Banham legis poemojn anglalingvajn kaj ties E-tradukojn. Norman Collier, UEA-Del. el Bowen, Kvinslando estis nia bonvena gastoj.

OAKLEIGH, Vic: La E-Klubo por Orientaj Antaŭurboj havis sian ĝeneralan kunvenon je 31/1 kaj decidis ŝanĝi sian nomon al "Oakleigh Esperanto-Klubo". La prezidanto, M. Fordham, donis la jaran raporton kaj emfazis la sukcesan prezentadon de teatraĵoj ĉe la E-konferenco en Morwell kaj ĉe la Melburna Zamenhof-Festo. Elektigis nova Estraro: Prez: M. Fordham; Vic-Prez: F-ino A. Hearn, S-ino M. Sanders; Sekr: R. Reed; Vic-Sekr: S-ino I. Fallu; Kasisto: S-ino G. Burmeister. Komitatanoj: S-inoj Gillam kaj E. Reed; T. Pisz.

MALVERN, Vic. Nova Estraro: Prez: C. Lanyon; Sekr: F-ino V. Strachan; Kas: S-ino M. Halliday; Kursgvidanto: S-ino A. Paling. Komencantoj nun kunvenas marde kaj progresintoj jaŭde.

MORWELL, Vic.: Dudek membroj partoprenis nian jarfinan piknikon ĉe Glenmaggie Weir. Dankon al Brian Kelly kaj lia amiko Frank por kontribuo al la sukceso. S-ro F. Mountford, estro de la gimnazio en Trafalgar, invitis S-ron Maddern prelegi pri Esperanto. Preskaŭ 60 studentoj de la Sendependa Universitato lernas E-on per korespondo.

SYDNEY: 22/1: La unuan kunvenon de la Societo en ĉi-jaro ĉeestis 20 personoj, inkluzive kelkajn vizitantojn. Klasoj por studentoj komenciĝis, kaj klasoj por instruistoj komenciĝis en 5/2.

5/2: Kuraĝaj membroj kunvenis en "fornega" temperaturo kaj diskutis i.a. sugeston el Meksikio pri turisma organizo por E-intoj; kunveno de la Federacio de N.S.K. ĉe Kiama en 29/4, kaj la estontecon de Esperanta Domo.

12/2: Generala kunveno: la nova estraro: Prez. Tom Elliott; vicprez-oj Wre Chandler, Shirley Fanos; sek-io Margaret Chaldecott; kasisto David Gould; bibliotekisto Joan Green; programistoj Eve Matasin, Thelma Smith, Gladys Taylor; kaskontrolistoj Volo Guelting, Jack McArdle; raportisto Gerald Browne.

La raporto de la kasisto montris sufiĉe bonan saldon. Dankon al niaj fidelaj oficuloj! Pro novaj ideoj ni fide antaŭvidas progreson en klasoj kaj kunveno dum ĉi-jaro.

MANLY: Nia jarkunveno vigle okazis. Tri kursoj komenciĝis en la Vespera Kolegio de Manly: komencanta, parolada kaj altrada en 6 feb. Por varbi membrojn Marjorie Duncan kaj mi organizis kampanjon en la "Corso", la ĉefa strato en Manly. Multaj ŝajne interesiĝis.

Nova estraro: Prez., Kevin Smith; vicprez-oj, Robbie Robertson kaj Skabeno Preacher; sek., Betty Cleminson; kasisto, George Thatcher; bibliotekistino, Kay Morrison. Ni firme fidas al sukcesa klubjaro en 1973. — Kay Morrison.

SUNSHINE COAST: La unua kunveno de la grupo en Nambour okazis je 5/2. Ĉeestis kelkaj novaj studentoj, kiuj kunvenas nun ĉiulunde en la "Adult Education". Same la grupo en Caloundra kunvenas ĉiujauĉe. Ambaŭ kluboj estas partoj de la Sunbrila Marborda E-Societo. Car la societo etendiĝas ĝis Landsborough, Maroochy kaj Noosa, necesas ke kelkaj grupetoj kunvenas nur monate. — Doris Sinclair.

19th Australian Esperanto Congress 2-9 Jan. 1974 — Brisbane

Mail your Congress Fee to Mrs. S. Martin, 48 Launceston Street, Salisbury, 4107. Fee for AEA members \$6.00, for others \$7.00. Add \$10 deposit for accommodation at International House of Brisbane University. (Enclose stamped addressed envelope for receipt and further Congress information).

Second List of Congress Members:

8. Mrs. I. Fink, Mt. Waverley, Vic.
 9. Mr. J. Matasin, Sydney, NSW
 10. Mrs. E. Matasin, Sydney, NSW
 11. Mr. D. Pollock, Toowoomba, Q'ld.
 12. Mrs. D. Sinclair, Caloundra, Q'ld.
 13. Mr. K. Linton, Melbourne, Vic.
 14. Mr. I. T. Maddern, Morwell, Vic.
 15. Mrs. E. Maddern, Morwell, Vic.
- State Distribution: Q'ld. 7, Vic. 6, N.S.W. 2.

A.E.A. MEMBRO PAROLAS

Charles M. Smith naskiĝis en 1891 (Insulo Jaudo). Detale li skribis pri "krizoj" en sia vivo. Jen resumo:

Je aĝo seĝara li falis en holdon (ŝipkelon) rekte en la abdomenon de kargisto — kio savis lian vivon. Ĉe Bondi en 1913 li preskaŭ dronis en maro. Dum la Unua Milito li kaj la Morto estis proksimuloj. Kiam 40-jaraĝa li komencis adeptiĝi kiel aviadisto (Gipsy Moth). Plurfoje liaj lertaj manovroj evitigis al li morton. Kiam 65-jare li kolapsis sur plankon. Ĉe hospitalo oni diris, ke estas necesa operacio farota de elstare bona hirurgo. Tiu boris tri truojn en la kranion. La hirurgo timis pri postea paralizo korpflanka, sed S-ro Smith bone transvivis la operacion. Jam post 16 jaroj la nursolaj postefikoj estas loka kalveco, sekve ia sento de verta malvarmo en vintro.

Lia unua ofico: bankkomizo je \$40 jare en Brisbano; dum tri jaroj li instruis stenografio Gregg-sisteman ĉe komerca kolegio; du jarojn sekretariis ĉe viandkonservejo en Bowen; tiam laboris ĉe minurbo regione de Cloncurry.

Venis la Unua Milito. Li volis rekrutiĝi en Bowen, sed li estis tro malaltstatura kaj pezis nur 112 funtojn. Poste li sukcesis armeiĝi; estis for de Aŭstralio tri jarojn kaj en Francujo batale servis grandan parton de tiu tempo. Post lia reveno la fer-mina kompanio apud Cloncurry lin re-dungis, sed la prezo de kupro falis, kaj li do iris al Rabaŭlo, restinte tie ok jarojn. Denove en Brisbano, li estis petata reiri al Rabaŭlo, sed li ne konsentis tion fari. Feliĉe! ĉar en la milito de 1939-46 Japanoj enŝipigis multajn el liaj siatempaj kunlaboruloj por veturigi ilin

Japanen. Usona submarŝipo torpedis ĝin, kaj mortis ĉiu homo sur ĝi.

Lia lasta ofico: doganisto ĉe Insulo Jaudou tri jarojn, unu jaron en Maryborough kaj fine en Brisbano. Li emeritiĝis en 1956. Dum la lastaj 5-6 jaroj li perletere sin okupis pri Esperanto. Lia intereso pri "tiu mirinda lingvo" pliiĝis dum la restaĵo de lia vivo.

En aparta skribajo: "Monologo", li filozofie metafizikumas pri la vivo, celo, destino. . . . cerbumante pri tio. Por kio venas homo en la mondon? Li konkludas: homo estas morta korpo (la malbona parto) kaj spirito senmorta (la bona, nobliga). Tiu animo revenos al la fonto de kiu ĝi originis. Moderna "Predikanto" (Biblia), li pesimismas pri la vivo. Pli bone, se oni ne naskiĝus. Sen bona sano, la vivo estas dolora, vana, senutila. La celo de la vivo: konduki nin al morta finiĝo post multe da suferoj.

Pro tera, mara polucio la vivo fine ne povos ekzisti. Tiam la senviva mondo jam iĝos silenta dezerto, atestaĵo pri la malsaĝeco de la homoj. Fine la maro inunde surfundigos tiun timigan monumenton al la vana ekzisto de ni teruloj.

HAVEBLAJ ĈE LIBROSERVO

MI ESTAS PELE: aŭtobiografio de la fama Brazila futbalisto, nun en Australio. 5.50.

PRINTEMPO EN AŬTUNO: J. Baghy N. 100b 1.85.

La esperanta Majstro vivigas en la koro la ekaman de gimnaziano al cirkistino.

KIT VIVAS: J. Lyngbirk/Riisberg N 92b 3-15. Moderna romano pri la elsavo kaj finfine feliĉa edziĝo de juna haŝiŝfumantino.

INFANOJ EN TORENTO: S. Engholm N 100b 1.85.

JUNULOJ EN TORENTO: S. Engholm N 144b 2-35. Nek drinkema patro, "diabla" patrino, senlaboreco, eĉ senpatreco malhelpas ke la kvar fariĝu ĉarmaj ĝejunuloj.

MARY LUPLAU (p. 119, 130 "A.E.")

Fusilo de marko Snider-Enfield, kiun posedis Ned Kelly, estas vendota en nov. 16 en Melburno. Mary Luplau, kiu mortis en Auckland en 1971 aĝe 106, ricevis ĝin de sia amikino Kate Kelly, fratino de Ned. En la 1870-jaroj Mary ofte iris kun Kate por kaŝmeti manĝon por Ned Kelly, kiam li estis serĉata de policanoj.

La aŭkciisto esperas vendi ĝin por iom pli ol \$2000.—"Sun", okt. 4/72.

RECENZOJ

"Kitt Vivas": Jyette Lyngbirk. El la Dana lingvo tradukita de Gudrun Riisberg. 94-paĝoj. Prezo 27 Danaj kr. Eldonis Dansk Esperanto-Forlag, Inge-mannsvej 9, Aabyhøj 8230, Denmark.

Ne granda literaturajo, sed simplastila rakonto en lingvaĵo facilflue ĉiutageca. Tie kaj tie ĝi aparte speguletas la elrigardon de Danino sur la problemojn de drogoj kaj seksmoralo.

Juna Kopenhagano, sin preparante iri al Usono post nelonge, savas el havenakvo junulinon, sinmortigeman drogviktimon. Sciante jam pri ŝia mal-sana spiritostato, li sentas respondecon levi ŝin el la morala marĉo en kiun trenis ŝin haŝiŝfumado. Kiel tion fari? Kun li ŝi vojaĝis al Usono, kun celo aŭte transiri la landon, dum kio li esperas ŝin sukcese kuraci. Tamen, jam ĉe paĝo 83 ŝi ankoraŭ konservas sian droggipon, kaj eĉ ĉe p. 89 li malespere malligas ŝin de promeso forjeti ĝin en la Pacifikon. Ĉu fine li ame ekzorcas el ŝi la detruan kutimon, tion konjektu legantoj.

Dum la Usona odiseado estiĝas en la junulino ia stranga melankolio, manko de kunuleca vigleco, kiu perturbas la junviron. La finaj paĝoj malkovras la kialon de la deprimo.

P.38: Pri alternativoj: ĉu resti en Kopenhago aŭ iri al Usono? Teksto: "Ambaŭ vojoj estis neebleblaj". Tio povus signifi: Nek unu nek la alia vojo estis alirebla. Dubsenca. Prefere eble: Ne eblis iri ambaŭ vojojn samtempe. P.66: Netransitiva uzo de "turni". "Mi ne ŝatus returni al Danlando". 42 "gramofondisko turnadis en mia kapo". P.57: "depresio" estas senutila sinonimo de "deprimo". P. 79: pleonasma: "ĝis kiam ĝi malaperis" (ne Zamenhofa).

"Junuloj en Torento": Stellan Engholm. 144 paĝoj. 15 Danaj kr. (Sama eldonejo.)

Ĉi tiu libro estas la dua parto de "Infanoj en Torento" (unua eldono en 1939), kiun ni recenzis en Nro 114. Por eviti konfuzon ĝi ricevis propran titolon. La du verkojn oni saĝe legas sekvece. La tria parto de la Torent-serio estas "Vivo Vokas", ankaŭ havebla ĉe la eldonejo.

La Sveda aŭtoro mortis en 1960, 60-jara. Aktiva E-into jam de 1927, li teme enteksas en la verkon kelkajn paĝojn pri la lingvo; artifiko publikinforme utila nur ĉe traduko en nacian lingvon.

La legantoj sekvas la sortojn de la maturiĝantaj ĝejunuloj, ilian intereson

politikan, socian pri la mondo en kiu ĉiu el ili devas trovi taŭgan lokon, fruktan medion. Tion Engholm priskribas per belritma stilo, humana realismo kaj sobra idealismo. Liaj hom-figuroj impresas per sia viva aŭtenteco, sed mankas al la rakontoj aparte frajaj elementoj de surprizo kaj streĉateco. Engholm ne estis sensaciisto. Li estis konscienca verkisto, funda scianto kaj evoluiganto de l'pura stilo kaj sinofera dediĉito al la amata lingvo. Li okupas honoran niĉon en nia literatura panteono.

"La Juna Amiko" is a gazette for older children — and, we have found, interesting for adults also, especially those learning Esperanto. All compound words are given hyphens to indicate the roots. 24 pages, 0.20 dol. Among the contributors is Dr. J. Hamvai, 29 Arran Street, Avondale, Auckland 7, who doubtless would arrange for regular delivery from the Hungara E-Asocio, H-1368 Budapest 5 Pf. 193.

"Biblia Revuo", apr.-jun. 1972, 60 paĝoj. Kvaronjare, 6 dol. Usonaj.

Ĉefartikolo: La Tradukado de Hebrea Poezio, de Donald Broadribb. En detala analizo li rimarkas, ke la poezia tradicio Eŭropa distingas klare inter prozo kaj poezio per la sekvantaj rimedoj: mĉtro (speciale ritmo), bazita sur akcentataj silaboj, rimo, aliteracio k.t.p. Ĉiuj tiuj karakterizoj mankas al la Biblia poezio.

La Hebrea poezia lingvo estas eksterordinare riĉa je sinonimoj kaj preskatisinonimoj. Al la Hind-Eŭropaj lingvoj mankas adekvata stoko da sinonimoj kaj antonimoj. Ĉar ili emfazas la ekziston de rimoj en poezio, sed ne de sinonimoj, okcidenta poeto povas ripeti la saman vorton plurfoje en sia poemo sen vekti kritikon. Sed en Hebrea poemo, dufoja apero de la sama vorto (kun escepto de simplaj konjunkcioj, prepozicioj k.c.) en du sinsekvaj linoj aŭ linipartoj estas teknika eraro. Poemoj Hebreaj, kie aperas kvin aŭ ses sinonimoj, estas tute ne maloftaj. Paralelismo en la Biblio ĉiu studanto klare vidas. Ĝi estas ritma figuro — arango de du sinsekvaj frazoj aŭ propozicioj, ekz-e: "aŭskultu la instruon de via patro, kaj ne forjetia la ordonon de via patrinino". Valora kaj instrua studaĵo.

La erudita J. Kohen-Cedek kontribuas pri mistera litero en Hebrea teksto, kaj P. B. Bagatti pri fosoj en Nazaret. Recenzo pri la Charles Strong Trust Lectures en Aŭstralio, fare de D. Broadribb, nete prezentas la enhavon de la presita teksto.

Nro 3, julio-sept. enhavas ĉefartikolojn: Religia Sperto kaj Interpretado

en Judaismo kaj Tibeta Budhismo, fare de R.W. Webb (Melburno), kiu sin peze apogas sur la penso de la filozofo Rudolph Otto ("La Ideo pri la Sankto"). Legantoj trovos en ĝi la vorton "numena" (P.I.V.). "Numeno" estas "tiu mistera forto, miksiata el teruro kaj respekto, altiro kaj forpelo, kiun la sociologoj rigardas kiel karakterizan de la religiaj fenomenoj". Por traduki la Anglajn: fear, awe, dread; the uncanny, weird, spooky, eerie, horrifying, terrifying, hair-raising &c. ni bezonas ankoraŭ pli ol la simplaj: tim', trem', terur', horor' — kaj ja ni disponas taŭgajn vortformojn. C. S. Lewis klarigas la koncepton de la numeno en sia: "The Problem of Pain".

B. Bagatti esploras pri la tombo de la Virgulino en Getsemano, nun riparata. La Sanktaj Skriboj ne sciigas pri ŝia morto. La lasta mencio pri ŝi estas ĉe Agoj 1/14. Tamen iu aŭtoro de la apostola tempo verkis La Agojn de Johano, en kiu li kurte priskribas ŝian enterigon kaj postan ĉieliron. Ekzistas aliaj verkoj apokrifaj.

Libro-recenzoj, gazeta bibliografio kaj tre valora principaro pri la Biblia tradukado estas ceteraj pecoj en la kajero, sinofere prezentata al la teologia mondo.

GRATULON S-RO FLETCHER:

Mr. V. E. Fletcher, Box 68 Wauchope, 2446, read of Esperanto in the "Sydney Telegraph", which reported the Manly Congress. He got in touch with Tom Elliott, who sent him a textbook and an old number of "The A.E." Mr. Fletcher joined the A.E.A. and asked the secretary for all the old numbers of "The A.E." he could send. These were forwarded to a very happy man of 77 years, who "amas la lingvon".

INTERNATIONAL HISTORY TEACHING ?

Author Stefan Zweig, writing in 1932, on the deterioration of international relations, urged that history be taught simultaneously to the new generation in all the schools of Europe, using textbooks written fairly and factually.

A recent TV interview with pupils of Polish and West German schools in Munchen revealed, however, that much misunderstanding and prejudice still rests in their minds. To change this, a commission of 60 West German and Polish experts in this field are together examining books on history and geography now used for teaching, and suggesting fairer and less prejudiced presentation of relations between Poland and West Germany.—Unesco Features, through U.E.A.

LIBERA FORUMO

En "Esperanto" Nro 803, p. 186, aperas premiita rakonto. La aŭtoro havas poezian fantazion, sed lia stilo estas tro komplika, malfaciligas komprenon. Ĉetero, mi kalkulis 15 vortojn al kiuj mankas la sufikso -ec por montri abstraktaĵojn. Sajnas al mi necesa tiu sufikso; alie, eble la francaj revoluciistoj en 1789 kriis: "Liberio, Egalto, Frato!" — Konservemulo.

Amika Piko Pri-rubrika

Iu plendis pri la titolo: Angulo Lingvula (nov-a nro) kiun li nomas "ne tre bela", sugestante anstataŭe: Lingva Angulo. Tio prezentas kolizion de du a-sonoj. Ankaŭ en la sept. kaj okt. nroj ni tion evitis: Loko Lingvemula kaj Lingvemula Loko. Ĉu Angulo Prilingva plaĉos al li?

Ni devas atentigi al li, ke legado de la verkoj de Zamenhof prezentas multajn ul-kunmetaĵojn, kiuj estas "ne tre belaj" laŭ lia lingva sento: ekz-e. -

Sanktulis lin; kompetentula uzado; ĉitieuolo; makulokululo (Levidoj 21/20). Multinfanulino (Londona Esperanta Biblio).

PREZOJ DE LIBROJ

Ne plendu pri la prezoj de E-libroj. En "Time", 18/9/72, estas anoncita: "The Torrents of Spring" (E. Hemingway) 90 paĝoj, 5.95! Mi havas ekzempleron de "Farewell to Arms" (samaŭtoro), eld. Penguins, 1935: 288 paĝoj, por kiu mi pagis ses pencojn. Ĝi estas la dua libro eldonita de tiu kompanio. En 1971 tiu libro kostis 85c. — kompare pli favora akĉeto ol la 90--paĝa menciita.

La Jarlibro de U.E.A. dua parto 1971 enhavas plenan liston de rakontoj, inter kiuj estas pluraj 110-130-paĝaj por nur 50c. — Robo.

Extract from "Cities & Stones", a Traveller's Jugoslavia by Brian W. Aldiss (p. 225).

"Some miles south of Sibenik lies the tiny peninsula of Primošten on which perches the village of the same name And the language most commonly spoken here? Not Croatian, not German, not Italian and certainly not English. But ESPERANTO!

The local camp was founded by Esperantists and, although it was taken away from them, they still arrive in their hundreds from all over the world for hearty get-togethers.

(En la sama libro la aŭtoro mencias ke li plurfoje renkontis Tibor Sekelj, la jugoslavan esploriston. — Percy Holmes (Seymour).

VIRINOJ SUR POSTMARKOJ

Aŭstralio: Damo Nellie Melba, 5-penca 1961. Caroline Chisholm (1808-1887), Bonfarulino en la fruaj tempo Aŭstralio; kurante uzata 7c.

Domeniko honoris vivantajn Aŭstralianojn per Olimpika serio 1957: Betty Cuthbert, 2c.; Shirley Strickland, 17c.

Jamaiko: tri p.m. kun figuro de Carole Joan Crawford ("Fraŭlino de l'Mondo").

Usono: Louisa Alcott 5c., 1940; Clara Barton 3c.; Eleanor Roosevelt (kun proks. 20 aliaj landoj).

Franco: Marie Curie 1938; Sarah Bernhardt 1945; Damo Recamier 12fr., 1950.c Belgujo. Florence Nightingale 1935.

Okc. Germanujo: Elizabeth Fry 1952. Orienta Germanujo: Kathe Kollwitz, Rosa Luxembourg (elstaraj Socialistoj); Svisujo: Johanna Spyri (autorino); Svedujo: Selma Lagerlof (trivalora serio) 1958; Italujo, Rusujo: Eleonora Duse 1958.

En Aŭstralio ne aperas sur p.m. figuro de vivanta homo. La Brita regulo, ke nur la Reĝ(in)o aperu bilde sur p.m. estas escepte modifita per tiu de Shakespere 1965.

SPORTA TERMINARO

En Germana, Esperanto kaj Angla, ĝi estis kompilita de Ralph L. Harry por uzado inter diverslingvaj atletoj.

Po unu paĝo por 21 sportoj, la 28-paĝa broŝuro prezentas la ĉefajn terminojn por ĉiu e lili.

Vortoj ne en la Plena Ilustrita Vortaro: hikorio, piafoj (A. prancing movements), skida (A. skeet), dingio, seto, volejbala, dekatlono, pentatlon.

Futbalulojn interesos la vortoj: arierulo (back); mezulo (centre); avanulo (forward). P.I.V. donas ankaŭ halfo.

REGEDZINO, REGINEDZO

La edzino de reĝo estas reĝedzino, ne reĝino. (Ekz-e Georgo VI kaj Elizabeth Bowes-Lyons). La edzo de reĝino estas reĝinedzo (Ekz-e Elizabeth II kaj la Duko de Edinburgo). Por tiaj paroj ne uzu: gereĝoj. Plena Gramatiko, par. 48, dua eld.

Sajnas esti escepta kazo pri Wilhelmo IV kaj Maria II, kiu kune regadis de 1689 ĝis 1694. Wilhelmo transvivis sian edzinon ĝis 1702. Do, unika okazo, kiam Britujo havis gereĝojn.

TERMOMETRA SKALO

Celsius = Centezimala.

Fahrenheit = Farenhejta. (P.I.V.)

Celsiuso = Celsius; Celsiusa = centigrade (Wells); en la Angla parto ne troviĝas: Celsius. La Fr.-Esp. vortaro de Waringhien donas: centigrado; do 3 vortoj por la sama afero. Kiu el ili ĝeneraligo? Esperinde, "centigrado" pro sia facila prononco.

URBNOMOJ EN P.I.V.

Melburno, Sidnejo, Brisbano, Adelaide; ne troviĝas Perto kaj Hobarto. Sub Darvino: nur la nomo de la sciencisto.

ETOSO ?

Laŭ H. A. de Hoog ("Dia Regno", 4/72) K.R.C. Sturmer proponis la vorton en 1930. De Hoog kritikis ĝin nefavore, nomante ĝin Anglismo. "En filozofiaj sferoj 'ethos' estas termino por tiu alia nocio."

Sturmer proponis ĝin kun senco: la animo de iu loko. Ekz-e, "La paca etoso de tiu hejmo"; "La enviplena etoso en tiu oficejo." Sed en Greka estetiko kaj retoriko "ethos" havas aliajn sencojn.

MEZRIME . .

Dum min infanaĝo stampis: tempo rampis.

Dum mi june, reve agis: tempo vagis.

Dum plenaĝe mi elastis: tempo hastis.

Venis la oldec', lamento: flugis tempo. Baldau ĉion mi forlasos: temp forpasos Savu de l'eterna tristo, kara Kristo! Per tio Julio Varga en "Dia Regno", apr. 1972, tradukis epigrafon sur sonorilo en katedralo de Chester, Britujo.

S-INO AŬ F-INO?

En okazoj de dubo pri la (ne) ezineco, Usona organizo adresas leterojn per "Ms." (= Mrs. aŭ Miss). Per tio ĝi forigas riskon de erara konjekto kun sekva ofendeto.

LINGVA ANGILO

En "Vortoj de Lanti", p. 7, L. Banner skribis: "Mi aŭdis eĉ kelkuijn el ili aserti, ke . . ."

Kial mankas akuzativo (=kelkuijn)? Ĉu Banner skribus ankaŭ: Mi aŭdis la seĝo fali?

EKZERCARO DE ZAMENHOF

En paragrafoj 2 kaj 3 sin trovas la jenaj strangajoj: Packapo, traulo, neulo, heroi. La Ekzercaro aperis en 1894.

PRI KLIMATA VARMECO

La limpunkto komforta ("upper comfort limit") estas 83° Fahr. sub kondiĉoj jene: en oficejo en kiu elektra ventumilo blovas po 100 futoj ĉiuminute kaj la tie laboranta homoj surhavas malpezan somer-veston. Laŭ tio ni komparu:

Darvino 1935 horoj ĉiujare.

Townsville, Rockhampton: 638.

Brisbano, Kalgoorlie: 365.

Adelajdo, Perto: 292.

Melburno: 182½.

Kanbero: 140.

Sidnejo: 109½.

"OOMOTO"

Japana Esperanta gazeto: abono por ses nroj jare: 12 guld. = \$3.20 Aŭstralia. Abonantoj nepre notu! Ken Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield 3162 is the new agent for this gazette. Please send subscriptions to him.

Geknaboj, 13-14-jaraj dez. kor. kaj interŝanĝi bildkartojn.

Peras: L. Schodl, 195 Neuruppin, Rosa Luxemburg Str. 37 G.D.R.

PRESERAROJ

Mi bedaŭras la preseraron pri la nomo de Eve Matasin sur p. 276. Feliĉe preseraroj estas maloftaj en nia A.E. Ankaŭ en profesiaj jurnalaj, gazetoj, oni iufoje rimarkas ilin, krom pli gravaj presuŝaĵoj. Sen helpo, mi mem kontrolas ĉ, 9½ futojn da kompostajo en ĉiu numero, atentante laŭeble pri ĉiu litero. Tion mi faras ordinare en la temposaco de iur kelke da horoj, ĉar en tiu sama taĝo en kiu mi ricevas la prespruvajojn mi urĝe laboras por ekspedi la "modelon" al la presejo per vespera poŝtkolekto.

Kalkulinte la presliniojn en iu numero, oni nomu la proporcio de difektaj linioj kompare kun la tutaj senerara.

Estas nur juste, permesi margeneton da eraroj en laboro tia, precipe kiam la taskon faradas unusola homo, ofte okullaca kaj ĉiam prodeve premata. "Laŭnature la homo eraras". — Red.

Aktorino kun vinagra lango mokete gratulis aŭtorinon pri ties romano: "Mi ja ĝin ĝuis; kiu verkis ĝin por vi?"

Respondis la verkistino: "Bone, karulo! Mi ĝojas, ke vi ĝin ĝuis. Kiu legis ĝin por vi?"

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: Mrs. M. Chaldecott, 16 Grosvenor Road, Lindfield, N.S.W. 2070

Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 116 (196)

MELBURNO

Aprilo, 1973

19th AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

2-9 Jan. 1974 — Brisbane

Mail your Congress Fee to Mrs. S. Martin, 48 Launceston Street, Salisbury, 4107. Fee for AEA members \$6.00, for others \$7.00 (until 1/7/73) Add \$10 deposit for accommodation at International House of Brisbane University (Enclose stamped addressed envelope for receipt and further Congress Information).

Third List of Congress Members:

16. Miss E. Carrick, Brisbane, Q'ld.
17. Mrs. P. Neale, Highgate Hill, Q'ld.
18. Mrs. E. M. Jullie, Fairfield, Q'ld.
19. Mr. E. W. Chandler, Crow's Nest, NSW.
20. Mrs. E. Giles, Collaroy, NSW
21. Mrs. K. Morrison, Manly, NSW.
22. Mrs. J. Elvidge, The Gap, Q'ld.
23. Miss B. Allatt, Wilston, Q'ld.
24. Mr. F. Acs, Orange, NSW.
25. Mr. G. E. Browne, Mosman, NSW.
26. Mrs. A. G. Browne, Mosman, NSW.
27. Mr. Ralph Harry, Bonn, Germany.
28. Mrs. J. Clarke, Richmond, Surrey, England.

State Distribution: Q'ld 12, NSW 8, Vic. 6, Overseas 2.

Drama Competition: It is hoped that as many clubs as possible will prepare a play for the Drama Competition. There will be two prizes: First prize will be the "A.E.A. Drama Shield", at present held by the Manly Esperanto Club. A second prize will be donated by the Brisbane Esperanto Society for the best short sketch.

Travel Group formed: A Travel Group is now being formed to go from Melbourne to Brisbane. Esperantists from Perth or Adelaide may join this group. You will save considerably. Fares are: Second Class \$34.37 (You save \$11.53) First Class \$45.30 (You save \$15.30). Sleeper (Sydney-Brisbane) \$52.70 (You save \$15.30).

This will be the Time Table: Leave Melbourne Monday 31 Dec. 1973 at 8.40 a.m. Arrive Sydney: Monday 31 Dec. 1973 at 9.22 p.m. Stay over night at the "Canberra-Oriental" Hotel on Kings Cross. Leave Sydney Tuesday, 1 Jan. 1974 at 6.30 p.m. Arrive Brisbane: Wednesday 2 Jan. 1974 at 11.55 a.m. You may celebrate New Year's Eve with Sydney Esperantists and have a leisurely day in Sydney. You may return to Melbourne, Adelaide or Perth **independently** within 2 months.

If you wish to join the group, mail a stamped addressed Envelope to "ESPERANTO", Box 2122 T, G.P.O. Melbourne, 3001 and state whether you wish to travel first or second class and whether you need accommodation in Sydney on Dec. 31. Write **before April 30**, as bookings are very heavy during New Year's Season.

HAILEYBURY COLLEGE

Mr. Keith White, of Haileybury College, Keysborough, 3175, has asked for full information on the Esperanto movement here and abroad. Our secretary, Mr. Russ Baxter, has replied in some detail. Mr. White is teaching Esperanto as a language model to 100 boys at Form I level (11-12 years). We await further development.

AUSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO OFICIALA INFORMILO

NOVAJ ANOJ.

Meehan, S-ro F. M. Darwin NT
 Daniel, S-ro D., Dickson, ACT
 John, S-ino U., Blackburn, Vic.
 Tate, Graham, Bexley, NSW
 Cross, Ge-oj, A. F., Gympie Bay, NSW.
 Grant, S-ro W. L., Gordon, NSW.
 Deal, S-ro F., Manly, NSW.
 Krimmer, S-ro S., Dubbo, NSW
 Wilson, Timothy, Tamworth, NSW.
 De Gneef, S-ro J., Albert Park, Vic.
 Angel, S-ro J. W., Hawkesdale, Vic.
 Ansell, S-ino A., Nhulunbuy, NT.
 Bell, S-ro W. J., Young, NSW.
 Bruton, S-ro S., Nambour, Qld.
 Bisdee, S-ro R., Armidale, NSW.
 Blomfield, F-ino B. E., Warwick, WA.
 Bozinovic, S-ino M., Brighton, Vic.
 Burnam F-ino V., Werribee, Vic.
 Campbell, S-ino M. J., Taree, NSW.
 Cowan, S-ro D. J., Frankston, Vic.
 Dettman, S-ro G. C., Mentone, Vic.
 Egan, S-ro D. P., Kewdale, WA.
 Elliott, S-ro R. T., Darwin, NT.
 Errey, S-ro E. G., Belmont, Vic.
 Fletcher, S-ro J. S., Shelford, Vic.
 Foster, S-ino J., Mt. Eliza, Vic.
 Graham, S-ro R. D., Reservoir, Vic.
 Hack, S-ro N. F., Chermerside, Qld.
 Harding, S-ro C. P., Rockhampton, Qld.
 Hartvigsen, S-ino V. D., Blackburn,
 Vic.
 Hearn, S-ino E. M., Applecross, WA.
 Hooper, S-ino I. F., Wongan Hill, WA
 Jones, S-ino P. G., Sunbury, Vic.
 Key, S-ro P., Melbourne, Vic.
 Lewincamp, S-ro. W. J., Rosetta, Tas
 Lynch, S-ino H., Sebastopol, Vic.
 Moody, S-ro K. J., Canterbury, Vic.
 Moran, S-ino E. A., Maroubra, NSW.
 Perrin, S-ino P. C., Blackburn, Vic.
 Quays, S-ro, J. B., Fremantle, WA.
 Rawlingson, S-ro C. A., Fern Tree
 Gully, Vic.
 Rix Waever, S-ino M. N., Applecross
 WA.
 Spelko, S-ro A., Perth, WA.
 Spillane, S-ino C., Strathmore, Vic.
 Stoodley, S-ino B., Wavell Heights, Qld.
 Tatterson, S-ro A. E., Essendon, Vic.
 Thomson, S-ino M. R., Waverley, Vic.
 Trommels, S-ro. H. J., Kingston, Qld.
 Watson, S-ino M. K., Tatyoon, Vic.

TGMF

Morrison, S-ino K., Manly, NSW \$2.00
 Greenhalgh, S-ino W., St. Lucia
 Qld. \$10.00
 —Russ Baxter, Sek. 2 marto

AUSTRALIA KRONIKO

PERTH: Ni kunvenis 24/1 por la unua fojo de la jaro kaj la lasta ĉe South Perth. Ni ĝojis revidi kelkajn anojn, kiuj ne povis ĉeesti kunvenojn dum iom da tempo — F-inoj Stempel kaj Longson, kaj S-roj Miller, McKnight kaj Poole-Johnson.

Nia prez-o, S-ro Hawks, vigligis nin per demandoj al kiuj ni vice respondis. Sekvis kantado, kiun estris J. Poole-Johnson. S-ino Payne voĉlegis demandojn de enigmo, kaj ni cerbumis trovi ĝustajn respondojn. F-ino Hunt estris amuzan vortludon, per kiu F-ino Stempel gajnis la premion. S-ro McKnight voĉlegis leteron de E-isto Irlanda. F-ino Gray direktis etan loterion, kaj S-ro Howard gajnis la premion.

Ni kunvenis 14/2 la unuan fojon ĉe la nova kunvenejo, 4 Ventnor Av., West Perth. Ĉeestis 19 anoj. Ni facile eniris la konstruaĵon kaj atingis la trian etaĝon, kie D-ro kaj S-ino Einihovici vane provis, per kelkaj ŝlosiloj, malfermi la pordon de la konsultejo de la doktoro, kie ni devus kunveni. Fine ni sidigis sur la ŝtupara, kiu estis tapiŝita — kaj la kunveno komenciĝis! Post iom da tempo ni ricevis permeson uzi alian ĉamburon, en kiu ni daŭrigis la kunvenon.

S-ro Hawks voĉlegis leteron de S-ino Pollard, kiu ne povis ĉeesti. S-ro Poole-Johnson estris iom da kantado, kaj S-inoj McGrath kaj Einihovici diskutis pri la nova Koncertejo de Perth. Ni aŭskultis sonbendon, kiun S-ino Payne alportis, kaj F-ino Hunt estris amuzan vortludon. F-ino Longson gajnis la loterian premion. Ni ja ĝuis neordinaran vesperon! — V. Egan.

CANBERRA: La 6-an de marto, en la Federacia Parlamento, David McKenzie, pri kies elekto ni raportis en nia lasta eldono, faris sian unuan paroladon, en kiu li ankaŭ emfazis la utilecon de la internacia lingvo Esperanto por internaciaj kontaktoj inter la popoloj de la tuta mondo. E. (Ted) McKenzie, multjara prezidanto de la Melburna E-Societo kaj patro de David, ĉeestis la eventon (kun edzino) kiel gasto de la parlamenta prezidanto.

MELBOURNE: Je 19-a de Feb. S-ino Fay Koppel rakontis pri Catherine Helen Spence, sudaŭstralia pionira verkistino kaj fervora subtenanto de proporcia reprezentado en la Parlamento. Dek naŭ personoj ĉeestis kiam Ken Linton (26/2) parolis denove pri Hindujo; per kolorplenaj lumbildoj kaj

informriĉa, atentotena rakonto li kondukis nin tra la valo Kulu ĝis la montaro Himalaja.

Nia Jarkunveno okazis 5/3. Laŭ la raporto de la kasisto (Brigadestro J. Munro) ni havis profiton en 1972 de \$419.30, sed ĉar \$291.06 venis el la profito de la Kongreso, la vera profito por la jaro estis \$128.24. La kunveno decidis investi \$300 en "Building Society" (? ĉu "hipoteka societo") por akiri pli altan interezon. La banka bilanco je la jarfino estis \$739.31. La Sekretario (Herbert Koppel) raportis ke la M.E.S. havis en 1972 entute 40 membrojn, el kiuj 11 estis novaj studentoj kaj 29 malnovaj membroj. (En 1971: 8 studentoj kaj 29 malnovaj membroj) La nova estraro: Prez: H. Beechey; Vic-Prez: A. Baldwin & H. M. Cohen; Kasisto: Brig. J. Munro; Sekr: H. Koppel; Biblioteko: S-ino Fay Koppel.

Klubanoj bonvenigis, 19/3, Kim Bastin, revenintan el Finnlando, kaj tiu poste parolis iomete pri renkontiĝoj kun finnaj E-istoj. Ted McKenzie rakontis pri vizito al Canberra por aŭskulti iniciatan paroladon de la filo en la Parlamento. Fine, H. Koppel raportis pri novaĵoj el Esperantujo.

BORONIA, Vik: Nia grupo nun kunvenas ĉiujauĉe ĉe 7 Marville Court, Boronia. Ni komencis la jaron kontentige kun pluraj novaj membroj kaj atendas sukcesan jaron en Esperantujo. Gratulojn al niaj amikoj Bob kaj Sue Brooks pro la alveno de 10-funta filo Christopher, je 14-e da marto, 1973.

TOOWOOMBA: La ĝenerala kunveno elektis novan estraron: Prez: H. V. Petley; Vic-Prez: F-ino E. Heath; Sekr: F-ino M. O'Mara (218 South St., Tel: 35-1514) Kasisto: S-ino Carney; Biblioteko/Libro-Servo: S-ino J. Lehane.

Progresantoj kunvenas mardon vespere kaj komencantoj ĉiujauĉe en la "Adult Education Centre" en la urbdomo. Dudek komencantoj vizitis la unuan lecionon kaj dudek du la duan. Nia unua semajfina seminario okazis kun granda sukceso je 25/2 en la hejmo de S-ino Lehane.

Nia ĝisnuna prezidanto, S-ino Lena Buchan, devis rezigni, ĉar ŝi translokiĝis al St. George, kie ŝi nun instruas.

BRISBANE: Ralph Dearnley, Vic-Prez. de la nov-Zelanda E-Asocio, gastis en la hejmo de Mal kaj Val Robinson. Ralph estas la "Kviz-Reĝo" de Nov-Zelando kaj vizitis nian urbon por konkursi en televida "Kviz-Konkurso". Dum la vespero li renkontis 15 Brisbanajn

geesperantistojn. Tage, li gastis ĉe Win kaj Jack Greenhalgh en ilia hejmo, kie li renkontis la St. Lucia Senliman Grupon. Je 9/2 Karl kaj Erika Guenster gastigis Ralph en sia hejmo, kaj je la 4/3 li partoprenis en festvespero ĉe la hejmo de Gwen kaj Arthur Bayliss. Kompreneble, ni ĉiuj deziras sukceson al Ralph je la televida konkurso, kies unua premio estas \$10,000.

Je 7/2 komenciĝis nia duonjara kurso por komencantoj. 32 registris la unuan vesperon, kaj poste dek pluaj aliĝis. Unuafoje ekzistas speciala klaso por komencantoj por tiuj, kiuj kone konas 1-4 lingvojn krom la anglan. La lernolibro estas "Teach Yourself" (Cresswell & Hartley). Ni esperas ke devenos el ĉi tiu grupo ĝeinstruistoj de la estonteco. Ralph Dearnley vizitis niajn klubkunvenojn kelkfoje, ĉiam partoprenante en la aktivajoj, kaj li parolis al ni pri la Portlanda Kongreso kaj pri la Emovado en Nov-Zelando.—V. Robinson

SIDNEJO: 19/2: Dek kvin minutojn antaŭ la oka horo ptm. "Esperanto Domo" estis abelujo aktivega. Tri klasoj fervore laboris — unu kun "birdida" (A. fledgling) instruisto, nome diplomito el la klaso de Wre. Poste la nova prez-o, Tom Elliott, ludis buŝharmonikon ĉe-kante de "La Espero". Al la 19 ĉestantoj Margaret Chaldecott montris "Pecoj kaj Pecetoj" el sia bildkolekto, inter ili mokasenoj faritaj de ŝi mem. Wre, laŭpete, takte kritikis la paroladojn de la kunvenintoj kaj rimarkis pri diversaj eraroj, i.a. kompreneble — manko de akuzativo.

26/2: Wre Chandler parolis pri "Epilepsio kaj Epilepsiuoj" iam antaŭe li estis sek-io kaj prez-o de societo por elipsiuoj, do havas scion pri sia temo. Li emfazis, ke nun estas multe pli da medicinaj kuraciloj por suferantoj ol antaŭe. Poste, la estraro diskutis klubaferojn: programoj, libroj por biblioteko, ideoj por reklamoj eble en nacia ĵurnalo, se la aliaj kluboj dezirus partopreni.

5/3: S-ro Verlinde, reveninta de Nov-Zelando, afable ludis pianon ĉe-kante de "La Espero". Poste ni ludis "Domo", kiun aliaj homoj nomas "Bingo".

12/3: Wre Chandler raportis, ke la altlernejo de Oak Flats, ĉe Wollongong, nun instruas E-on dum 4 semajnoj kiel enkondukon al lernado de la Franca kaj Germana lingvoj. Frank Dunn flue, saĝe parolis pri la multaj lingvoj de Suda Azio kaj ĉefe pri la lingvoj de Hindujo. Estas grandaj problemoj de interkomuniko inter homoj eĉ samurbaj

aŭ -vilaĝaj; ankaŭ ĉe la instruado de teknikaj objektoj. Sekvas el tio, ke la Angla lingvo ankoraŭ devas esti uzata.

ROCKHAMPTON: La Turisma Oficejo (Qsld. Govt. Tourist Bureau) montradis dum jan. ĝis marto la grandan afiŝon "Vizitu Kanberon" en E-o kun bildo de la granda fontano en la lago Burley Griffin. Tion faris la Turisma Oficejo de Kanbero pro instigo de Noel Gamble. Ĝi vidigis ĉirkaŭita de turismaj folioj en E-o el transmaraj landoj. Ĝi estis en montra ŝranko fronte de la oficejo en la ĉefa strato. Kiel tio povis okazi? Ni simple petis al la estro, ke li montru ĝin por helpi publikigi nian kurson. Post pripenso, li jesis nian proponon.

La ĉefa librovendejo en la urbo disponigis al ni tutan montrofenestron, ankaŭ en la ĉefstrato, dum ses monatoj en jan.-feb. Ni ŝanĝis la eron ĉiusemajne, kaj multaj rigardis. La ABC-radio menciis nian kurson en la loka novaĵprogramo; kaj aperis ero en la ĵurnalo "Morning Bulletin" pri la turisma montraĵo. (Ni kontribuis ĝin.)

Rezulte: Niaj kursoj daŭras. Nia ĉiujatida vespera kurso estas denove oficiala kurso de Maturula Eduko (fako de la Eduka Departamento); kiel ankaŭ nova "tagluma" kurso je 10.30 atm ĉiulunde. Ambaŭ enhavas po ĉ. 12 anoj. Ankaŭ daŭras niaj ĉiusemajn kunvenoj por PAROLI Esperanton, en la hejmo de kvin el ni laŭvice, kun teo kaj biskvitoj. Ni nun povis paroli en E-o dum unu horo (lastjare, duono).

Lunĉhoraj kursoj okazas en la Rockhampton High School kaj la Yeppoon High School sub Neil Russell (lerneja lingvoinstruisto) kaj (Yeppoon) S-ino Doreen Caseleyr, diplomito de BEA. Meznombro 6 lernantoj en unu kaj la alia kurso.—John Moore.

K.E.K. RAPORTAS

Nia 21-a K.E.K. Jara Raporto pri 1971-72 enhavas ĝojon kaj malĝojon. Ni "perdis" Ges-rojn Torr, originajn anojn, kiuj transloĝiĝis al la Ora Marbordo; ni esperas vidi Joyce-on (ĝoisoj) ĉe Kongresoj. Ges-roj Kane iris al Tajvano (Taiwan) — al tiulanda universitato. D-ro Ross Robbins iris al transmara universitato. Ni esperas vidi ilin denove tie ĉi.

Multaj membroj novaj nun studas aŭ A.E.A., aŭ B.E.A., aŭ ĉe la Aŭtonoma Universitato de Aŭstralio (kun rabato al E-klubmembroj) fondita de Ivan Maddern.

La Ora Libro enhavas interesajn notojn: kunveno de A.N.U. kun F-ino

Fumiko Kamaĉi kaj aliaj membroj de la Japana Junulara Bonvola Krozo; karto de eksprez-o Ralph Harry, la Aŭstralio ambasadoro en Bonno; raporto de eksprez-o Noel Gamble pri la bezono de E-o en Dilio, kaj la entuziasmo de la E-Klubo en Rockhampton; la semajnfina konferenco de N.S.K.-a E-a Federacio ĉe Bathurst, kaj donaco de Ora Libro por memorigi la valorajn kontribuojn de "Tiny" Goldsmith al E-o. La E-a grupo ĉe Narrabundah-a Altlernejo prosperas (prez-o, Johano Harvey). La Zamenhofa Festo estis eĉ pli bona ol la lasta. Ĝi komenciĝis en Telopea Parko, kie parolis pri E-a filozofio Danny Kane. Poste ni iris al Woden Valo ĉe Russell Backman por pasigi plezurajn vesperon.

Nova estraro: Prez-o, P. Grabham; vicprez-oj, D-ro Ross Robbins kaj Mitzi Zagorskis; sek-io, Brenda Thomas; kasisto, Dennis Thomas, PRO. N. Gamble; Kontr. Colin Johns. — Apudstaranto, 23 marto.

HOW MANY ESPERANTISTS?

Page 274. Here's another guess. Emery Barcs in "Australian Women's Weekly" 10 Jan. 1973:—

"A universal language could eliminate at least one of the innumerable causes of friction between man and man, but attempts at de-Babelising the world haven't been very successful so far.

"Esperanto, invented by the good Dr. Ludovic Zamenhof, is now spoken by between (pessimistically) a million and (over-optimistically) 8,000,000 people in many parts of the world.

"Perhaps a fair estimate is 2,500,000, including not many more than 500 in Australia: And this is not quite 0.07 p.c. of the present estimated population of 3800 million".

The figure for Australia seems too low. The Australian Esperanto gazette prints 550 copies a month for distribution to members and world centres. Membership of the A.E.A. is something under 500. Based on experience in other countries, a reasonable assumption would be that there are no fewer than 1500 more or less competent Esperantists in Australia.—Editor.

STERKO AU RUBO ?

Sub "sterko" la Plena Ilus. Vortaro mise citas el Filipianoj 3/8: ". . . mi rigardas ĉion kiel sterkon". En la Londona Esperanto Biblio la vorto estas "rubon", ne "sterkon". La signo N en la P.I.V. signifas: la Nova Testamento de la Londona Biblio.

LA MONTOJ GLASSHOUSE

En 1770 Kapitano Cook (kuk) kun liaj ŝipanoj veturis laŭ la orienta marbordo de Aŭstralio en la velŝipeto "Endeavour" (endeavor). Iun tagon frumatene, vojaĝante tra golfo nun nomata Moreton (morten), ili rimarkis, ke la suno prilumas grupon da montoj starantaj reliefe apud la maro. Lau koloroj kaj formo la montoj pensigis al la Kapitano pri brilaj vitrogloboj sur tabloj en vitrofandoj kaj ofte en privata domoj. Li tial nomis la dek montojn Glasshouse (Glasshaus — domo en kiu oni fabrikas vitrojaĵojn.)

Pri ili jen ĉarma indiĝena legendo: En la pratempo tiu montogrupon estis homa familio. La patro sin nomis Tibrogargano, kaj la patrino Birvao. La paro havis ok infanojn. La plej juna estis Elimbao, la plej aĝa Kunurino. Inter tiuj du, en kreska ordo, troviĝis Birbarumo, la ĝemeloj Tunbubudlao, Kuĉino, Ngunguno, Tiborovolomo kaj Niketbumulgrajo.

La tuta familio vivis feliĉe ĝis unu tago, rigardante la maron, Tibrogargano ekrimarkis, ke la akvonivelo rapide altiĝadas. Ordoninte, ke Kunurino helpu la patrino kaj bebon, Tibrogargano kunigis la ceterajn infanojn kaj fuĝis kun ili en la okcidenton. Sed Kunurino malobeis sian patron kaj forkuris sola. Poste, kiam la akva nivelo preskaŭ normiĝis, Kunurino revenis al la familio. Tibrogargano forte koleriĝis kaj bategis sian filon, tiel severe, ke ties kolo estis elartikigita. Oni nun vulgare nomas la monton, kiu estis Kunurino — Crookneck (t.e. tordita kolo). Kiam la inundo tute malleviĝis la familio revenis al la apuda ebenaĵo. Tiam la plej aĝa filo petis pardonon de siaj gepatroj. La patrino ame tion donis, sed la patro, hontiginte pro la malkuraĝo de sia ido, turnis al li la dorson, jurante, ke li ne plu rigardos lin. Ankaŭ la dioj koleriĝis, ĉar ili ege malŝatas homajn kverelojn. Ili do pune ŝanĝis ĉiun familianon en monton.

Ankoraŭ ni vidas Tibrogarganon senĉese rigardantan la maron kaj, malantaŭe kaj flanke, Birvaon, Kunurino kaj la ceterajn ĝemfanojn. Ja mirinda spektaklo!—H. V. Petley (Toowoomba).

EL USONO

D-ro W. Solzbacher skribis: "Inter Kristnasko kaj Novjaro mi ĉeestis la jarkunvenon de Modern Language Association en New York. Unuafoje ĝi havis sekcion pri Esperanto, kiu sufiĉe bone sukcesis . . . Donald Broadribb havas bonan ŝancon esti inter la novaj Akademianoj.

LIBERA FORUMO

"Konservemulo" per sia leteron en The A.E., marto, montras, ke li ne komprenas la karakteron de radikoj. Antaŭ ol sesdek jaroj Rene de Saussure enkondukis tiun ideon kaj ricevis la plenan aprobon kaj laŭdon de la Doktoro mem. El tiu eseo ni ricevis la regulon pri la "necesoj kaj sufiĉoj" Car "liber", "egal", "alt" kaj "grand" estas adjektivaj radikoj, ili signifas econ sen ia ajn afikso, kiam ili aperas en la substantiva formo: "libero", "egalo", "alto", "grando", sed "frat" estas substantiva radiko, do devas ricevi la adjektivan sufikson pri kvalito, "ec", antaŭ ol ĝi povas signifi la kvaliton: esti frato. Do ni povas diri: "Libero, egalo, kaj frateco" — Ken Linton.

Legite la martan nron de A.E. mi pensas, ke membroj de A.E.A. devus kontribui pli da artikoloj al la gazeto. Mi estas certa, ke en aliaj kluboj estas anoj kiel S-ro Linton, kiu fidele verkas por ĝi. Ofte oni legas interesajn pri la kluboj, sed ofte tiuj aĵoj okupas eble nur unu linion. Ekz p. 284: "klaso por instruistoj komenciĝos en 5/2/73". La afero meritas pli da spaco; ĉu aliaj kluboj havas klasojn por instruistoj?

Skribu por Libera Forumo, kiel faris "Konservemulo" (p. 287), kiu sin amuzis, kritikante la stilon k.t.p. — Mary Fordham.

THIS TOO SHALL PASS . . .

When some great sorrow, like a mighty river,
Flows through your life with peace-destroying power,
And dearest things are swept from sight forever —
Say to your heart each trying hour:
"This too shall pass away."
—Lanta M. Smith (?)

ANKAŭ TIO ĈI FORPASO . . .

Kiam dolorego, kiel granda ond' rivera,
Sur vian vivon fluas kun pac-detrua forto,
Kaj ĉion karan rabas for afikto animŝira—
En ĉiu malspera hor' inspiru vin la vorto:
"Eĉ tio fine pasos!" — Tradukis Robo.

"Panjo, nia instruistino ankoraŭ neniam vidis ĉevalon".
"Kiel do?"
"Mi desegniĝis ĉevalon: ŝi venis kaj demandis min: Kio estas tio?"

LA PRESERARA DEMONO

("Lingvo kaj Vivo", p. 68).

La redaktoro sangas fundakore,
Kaj timosvit' perligas ĉe la brovo . . .
Eraron presan vidas lin dolore!
Sancelas lin teruro de l'eltrovo.
Sur lia sankta paĝo ĝi lin mokas,
Grimace pompas, fi-rikane ridas.
Por li ĝi kvazaŭ spite lin alvokas: . . .
"Rimarku, kiel lerte mi insidas!"

De vi, legantoj, petas mi pardonon;
Dornplena estas vojo redaktora.
Nur lasu min transdoni kelkan konon
Al vi pri tasko riska kaj dolora:

Jen, kiam prespruvajojn mi ricevas,
Mi ekkontrolas ilin senprokraste,
Kaj al presejo ilin sendi devas
Samtage per la poŝto urĝe, haste.
Vi pensu pri la fakto tekstokvanta:
Naŭ futoj — iom pli — laŭ la mezuro.
Perfekta kontrolisto? — dia hom' pedanta
En loko ja por li ne sinekuro.
Amikoj, do indulgu al neperfekta homo,
Kaj voĉu en la koro mem, anime, mut-
murmure,
La vortojn de l'antikva, ĉiamvera
aksiomo: . . .
"Erari estas home, ennaske,
laŭnature!"

—Farbo, 3/73.

PARLIAMENT AND ESPERANTO

The British Esperanto Assn. asked 100 parliamentarians what they thought of Esperanto. 45 favored it as the international language; 13 had nothing against it; 14 rejected it or thought that English should be the international language; 28 did not reply. Eight of the quizees, among them Harold Wilson, ex-Premier, had earlier studied Esperanto.—Trans. from "Heroldo de Esperanto", 16 Dec.

PRI PLUMERARO

Sur p. 282, kol. 1, linio 26., la vorto "siaj" devus esti "iliaj" (minacitaj infanoj). Jen klarigo pri tiu plumeraro. Jam antaŭe sendinte al mi la manuskripton, S-ro Linton per letero petis min ĝin korekti. Bedaŭre mi forgesis tion fari. Plumerarojn faras eĉ la plej malstraj E-istoj. Miakrede, neniu alia homo en Aŭstralio superus S-ron K. L., kiam temas pri scio pri la refleksivo — kaj multo alia en la lingva strukturo de Esperanto. — Red.

Kuracisto: Sciu, ke profunda spirado mortigas la mikrobojn.
Malsanulo: Jes. Sed kiel devigi tiujn bestetojn spiri profunde?

ZAMENHOF NE ESTIS POLO

P. 252, kol. 2, linio 25, oktobra nro. Tie Bulthuis asertas, ke "Zamenhof estis Polo". A. Holzhaus refutas tion, prave citante leteron de Zamenhof al la Loka Kongresa Komitato Krakovo, Aŭstrujo (14 feb. 1912): "Ne nomu min polo, por ke oni ne diru, ke mi — por akcepti honorojn — metis sur min maskon de popolo, al kiu mi ne apartenas . . . Laŭ mia deveno mi alkalkulas min al la gento hebrea". Vidu: "Doktoro kaj Lingvo Esperanto", p. 491.

Lia naskigatesto estis skribita en la juda kaj rusa lingvoj kaj subskribita de rabeno. En letero al Michaux (21 feb., 1905) li naŭfoje diras: "mi estas hebreo" kaj sepfoje: "mia hebreeco". Sur poŝtkarto al Th. Cejka 28.2.1906 li nomis sin: nacio — Ruslanda hebreo. Li edziĝis kun hebreno; neniu polo edziĝas kun hebreno. Li estis enterigita en juda tombejo; la diservon (16.4.1917) faris rabeno. (Resumo el letero de A. Holzhaus, 29.2.73).

En letero al Bourlet 3.7.09 (presita en "Nica Literatura Revuo", sept.-okt., 1959), Zamenhof skribis: "Hispanujo estas fervora katolika kaj mi estas . . . hebreo. Tial mi tre timas, ke grandaj honoroj, farataj al hebreo, faros en tiu lando malbonan impreson".

Sekve la supra aserto de Bulthuis estas erara.

EL HANOJO

"Skizoj por la Usono Novkoloniismo": Fremdlingva Eldonejo, Hanojo. 189 paĝoj. Havebla ĉe Nguyen van Kinh, 68 Ly Thuong Kiet, Hanoi (via Hong-kong).

Detale kaj dokumentita analizo de la monda situacio en kiu grandega potenco jam vastigis sian ekonomian imperion ĝis timige signifa grado. La materialoj kaj rimedoj de la tuta mondo ĉiam pli kaj pli fariĝas sub la monopolema mano de naci-giganto, kaj kun ili ankaŭ la popoloj.

La streĉe interesa kaj bonorde kompilita verko estas studenda de ĉiu, kiu timas pri la danĝera evoluado de la homa socio sur la tuta tero.

Estas al ni mirige, ke homoj sub inferaj laborkondiĉoj povas produkti tiel multe da gravaj kaj ampleksaj verkoj en Esperanto — dum E-istoj en Usono **tiurilate** stagnas, eldonante preskaŭ nenion.

LINGVOJ DE ZAMENHOF

Aldonu la vorton "Rusa" post "Pola" sur p. 247, kol. I, linio 8, en la septembra nro 1972.

PLEASE WRITE PLAINLY

E-ists who use the Latin script complain at times that they have received no reply. They should remember that to many millions of people this form of writing is unfamiliar, and they find illegible the often carelessly written missives of their correspondents. So they drop the tedious business of deciphering and let it rest at that.

Chinese and Japanese use an ideographic script among themselves; other peoples use Arabic, Slav (Cyrillic) &c. These folk, then, are using a system foreign to their ordinary usage when they write to you, and, admittedly, their efforts also are not always clearly read here. This we must, of course, leave to them, but for our part let us write as clearly as we can: calligraphically, not cacographically. Yes, the Greeks had a word for that too.

In this, we have trouble even among ourselves. Letters are laid aside in busy moments because the text resembles the trail of an ink-sodden spider.

Zamenhof himself was not the best of penmen, and his mss. have given head aches to bibliographers. Here are a few of them in "Originala Verkaro". Alter them if you have the book:—

231/-2: ekspedinta (ne: esperantista); 225/last line: niaj francaj (niaj financaj); 36/-8: deponas (deprenas); 31/10: donas (donos); 382-12; faroj (jaroj); 365-4: staras inter miaj internaj okuloj (. . . antaŭ miaj . . .) 343/9: samgenta (sengenta). 459/6: deci (decidi), 291/-13: vidadis (gvidadis) may be press errors. And so it goes.

A.E.A. EXAMINATIONS

To raise the standard of the examinations, the system of adjudging points has been revised. This will add to the value and significance of both diplomas, the Elementa and the Supera.

Points for the translation of English into Esperanto are raised, and those for the inverse are lowered. Close attention will be given to the ability of candidates in the active use of Esperanto rather than in a passive reading of an Esperanto text. A good translation into Esperanto may merit 40 points.

Henceforth in the three categories: Elementa, Supera and Klereca, 60 points = a pass; 85 honors.

Please do not send exam. money to me, but to Box 415, Manly.—Editor.

NUN HAVEBLAJ

WINNIE-LA-PU: Milne-Shepard. 160b 3.85. I. Reed kaj R. Lewin E-igis la ĉarman vivon de aminda, stulteta, miel-avara Pu-Urso.

PRI SENTEMO POR ĈIES SITUACIO. R 90b 1.40. Marjorie Boulton prezentas la Kvakeran filozofion de Charles Carter.

POEMOJ KANTOJ KAJ SATIROJ P 39b 1.10. Dua reviziita eldono de "Bobby" Burns. Elskotigis Reto Rossetti.

SUB LA VERDA STANDARDO. Vol. 1 95. Vol. 2 1.15. Gvidlibro 1.25.

Tute nova eldono de la fama Csehkurso kun E-lingva gvidlibro. — Tom Elliott, Libroservo.

DU KNABOJ

Johano estis leciono lerta; Karlo ne —sed sperte praktika knabo. Johano ne povis fari permanan taskon, sed Karlo povis fidiinde plenumi tian. Ili fariĝis maturaj viroj. Finance, Karlo multe superis al Johano. Karlo posedis grandajn transportilojn kaj multe komercis sur la ŝoseoj. Johano sin okupis en oficejo de iu firma kaj ricevis la simplan salajron de librotenisto. Inteltekto estas Dia donaco. Ni uzu ĝin laŭ nia kapablo. — G. Pollard. (Por "intelekto" servus ankaŭ la vorto: inteligenteco, ĉu ne vere?—Red.)

LONGA DOMSERVADO

En feb. 1939 mortis Elizabeth Hind post servado en unu familio 80 jaron. Ŝi maskiĝis en Caldbeck, graflando Cumberland, la vilaĝo kiu famiĝis popolkante pri la vulpcasisto John Peel (1776-1854), kiu mortis kiam ŝi estis sepjara. Vi konas la arion?

Konas vi Gon Pil kun la ruĝa jak?
Konas vi Gon Pil ĉe veniĝa tag?
Konas vi Gon Pil for ĉe l'ĉas-atak?
Kun hundaro kaj korn' frumatene?

E. PRIVAT; R. ROLLAND.

En 1920 Privat sendis al Romain Rolland, fama aŭtoro de la granda: "Jean Christophe" sian: "Vivo de Zamenhof". Laŭ "Svisa Espero", 7-10, 1972, Rolland legis ĝin kaj skribis al Privat tre laŭdan leteron pri la genio de Zamenhof. En ĝi Rolland tamen konfesas, ke li ne parolas lian lingvon . . . "Mi apartenas al la maljuna stulta franca generacio, kiu tiel malvolonte lernis alian lingvon ol la propran. Mia pigremo sukcesis nur legi du aŭ tri . . ." Privat konatiĝis kun Rolland ĉ. 1909-10 kaj restis kun li en firma amikeco ĝis ties morto en 1945.

LIBROVENDADO ESPERANTA

Se ni kalkulas la nombron de aktivaj E-istoj je unu miliono (kion mi opinias troigo), tio signifas, ke disvendado de nur 500 ekzempleroj de iu verko estas jam relative furora sukceso; kaj tamen ne malofte eĉ altnivelaj beletraĵoj atingas duoblon de tiu cifero, kaj foje eĉ pli. Komparu tion, ekzemple, kun la Angla-lingva libromarkato: Brita eldoninto disponas pri 60 milionoj da elblaj aĉetontoj en la Brita insularo mem (plus 250 milionoj en aliaj Anglalingvaj landoj), kaj cetera pri vasta reto da vendejoj kaj aĉetemaj bibliotekoj — sed eĉ en tiaj tre favoraj cirkonstancoj eldonkvantoj malofte superas 2500, dum iom esotera poemaro ofte aperas en nur milo da ekzempleroj, aŭ eĉ malpli.

Ni rajtas do fieri pri la preteco de la E-a publiko amase aĉetadi literaturaĵojn; kredeble ni estas la plej libro-aĉetema komunumo en la mondo, nome proporcie al nia nombro . . . (Desmond J. F. Quirke, "Esperanto", 12/72).

PROFESORO G. WARINGHIEN

Pri la noto sur p. 264 li skribis al ni: "Mi vidis kun plezuro, ke vi falis en la malgrandan kaptilon, kiun mi kaŝis en angulon de mia prelego pri: La Stilo de Zamenhof. La rakontoj, kiujn tradukis el Charles Perrault, el Andersen kaj el la Biblio" (la pluralo rilatas al la tri aŭtoroj!) entenas aludon al 'La Feino' de Ch. Perrault, tradukita de Zamenhof kaj enmetita en la 'Fundamentan Ekzercaron' . . .

(Atentigite de nia bonkora profesoro, mi esprimas bedaŭron pri mia trosupraĵa leg-impreso kaj la sekva plumeraro. — Red.)

ESPERANTO KLUB-VIVO

En multegaj urboj kaj vilaĝoj ekzistas E-societoj. En la tempo, kiam la homoj ankoraŭ ne ĝuis la "benojn" de nia moderna epoko, vigle prosperis la klubvivo. La radio-ricivilo, la televidilo nuntempe katenas ĉiuvespere centojn da milionoj da homoj al iliaj seĝoj en la familia ĉambro. Sekve la klubvivo fariĝis multe malpli viqla. Ankaŭ la E-societoj spertis tion kaj suferas pro ĝi. Tamen la klubo prezentas al ni la ununuran okazon buŝe ekzerci la lingvon, interkonsiliĝi kun samklubanoj pri lingvaj demandoj, pligrandigi la vortrezoron kaj lertiĝi en la praktika uzo de la lingvo. Vizitu do la kunvenojn de

via loka klubo, helpu, se eble, en preparo de la programo, zorgu, ke la klubvesperoj estu interesaj kaj lernigaj. Kaj plej grave: parolu Esperanton!

Oksimoro.

Stilfiguro, konsistanta en la kunigo de du vortoj, kies sencoj ŝajnas kontraŭdiraj unu al la alia, por reliefigi neatenditan penson: ekz.: "lia silento estis elokventa". (P.I.V.)

Jen kelkaj ekzemploj:
Gazed with sightless eyes = fiksrigardis per senvidaj okuloj.

A healthy morbidity = sana malsaneco. Melancholy glee = gajeco melankolia. Harmonious discord = harmonia misagordo. Cheerful pessimist = gaja pesimisto. Innocent wickedness = senkulpa malvirteco.

Sekspiro riĉe efike uzis tiun tropon ĉe "All's Well That Ends Well", Akto 1, sc. 1, 185, kaj ĉe "Romeo and Juliet", Akto 3, sc. 2, 75.

Ekzemploj el la Nova Testamento: "Se la lumo . . . estas malluma"; "Kiam mi estas malforta, tiam mi estas forta"; "Mi, kiu estas malpli ol la malplej granda"; "Scii la amon, kiu superas scion"; "Ankoraŭ vivante, malvivis".

En la Jakoba Biblio ĉe Ijob 22/6: ". . . stripped the naked of their clothing"; Zamenhof forigis la oksimoron per: ". . . de preskaŭ-nuduloj vi deprenis la vestojn"

Butler en sia bonega "Klasifiko de Esperantaj Tomoj" 144 p. (eld. 1950) difinas oksimoron per: "Saĝmalsaĝo. — Saĝa diro aspekte malsaĝa: (kuniĝo de ŝajnaj maloj)". Havebla ĉe B.E.A. aŭ per nia Libroservo.

GABRIEL CHAVET

Mortis 23 okt. la plej aĝa veterano E-a 91-jara. Li E-iĝis en 1896; fondis la unuan E-klubon en Francujo en 1897. Vidu: Encik. de E. kaj "Esperanto", 1/73.

"COPY"

"I sent a copy of a gazette" = Mi sendis ekzempleron . . . Ne: "Mi sendis kopion . . ." La radiko tiusenca estas komuna al almenaŭ ses Eŭropaj lingvoj. "Kopio" = ajo kopiita.

PAR'HANOJA

El letero Nederlanda: "Oni ĉi tie parolis, celante la bombadon sur Hanojo, pri "par'Hanoja" (paranojo = speco de frenezego)."

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: Mrs. M. Chaldecott, 16 Grosvenor Road, Lindfield, N.S.W. 2070

Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 117 (197)

MELBURNO

Majo, 1973

AUTHORITATIVE DATA ON THE INTERNATIONAL LANGUAGE

Two Pamphlets Every Activist Should Have.

"Basic Facts about the International Language (Esperanto). Third English edition. Edited by Dr. I. Lapenna, director of the Centre for Research and Documentation on the Language Problem. 8 pages (10 x 8 in.) About 25 cents.

It is a necessity for every Esperanto publicist, who must base his assertions on the sure ground of fact. Here is a rich, yet compact compilation that contains the elements wherewith to form telling, impressive talks on the character and history of Esperanto and its situation in the world today.

Thoughts of early pioneers in the field of a common language; Formation, beginning and evolution of the I.L.; Social Basis of Esperanto; Its International Character; Opinions of scientists, authors and political figures on the value and significance of Esperanto; The Teaching of Esperanto; Its Literature, dictionaries gazettes, etc.; Its Organisations; The Various Applications of Esperanto; Its Official Recognition by International Bodies; Its Relation with UNESCO.

"The World Communication Problem": Dr. G. F. Makkink. Same price, format and size as above.

The author deeply yet lucidly probes the problem. We cite briefly from interesting contexts:

"We must not be deceived by the prevailing position which English now holds . . . as used by foreigners it is often far from ideal, while the same is

true when it is spoken even by those for whom a form of English is their mother tongue . . . The use of English has increased, but so has the use of Russian and other tongues . . . It is inevitable that finally language will become part of the development in society towards standardisation, rationalisation and planned solutions".

Makkink lists five methods now tried, of which we quote from the fourth and fifth:

"A national language as international? It is doubtful if this will ever be realised. French is too difficult for active use by everyone. This is true to a lesser degree also of English; the gulf between pronunciation and spelling makes it less suitable for foreigners. With acceptance of a national language there is danger that its culture would gradually over-ride other national cultures.

"Constructed languages must not be overlooked. Esperanto is the only planned language which is used every day with ever-growing frequency on a relatively large scale in the whole world, being both spoken and written. The Universal Esperanto Assn. has 34,000 members in 86 countries, but there are many people unable to join for currency or other reasons. At least 12,000 people attend Esperanto congresses, camps, courses, etc. a year. That number represents the most enthusiastic members. The whole body of organised supporters therefore consists of many times that number . . . many have learned Esper-

anto at some time in their lives, but are no longer members of an Esperanto organisation. The total number can therefore be estimated at several millions".

He gives eight reasons why a constructed language has not yet been accepted. From 4 and 6 we quote:

"To reject a constructed language on the ground of artificiality is not scientifically sound, all the more so as many national languages in the past, or recently, have been rationalised on combined by one or more persons (Sanskrit, High German, Norwegian, Hebrew, Bahasa Indonesia and others.)

"Those who refuse a constructed language on the ground that a national language is richer are usually those who know nothing about it. The complexity, irregularity and extensive historical idiom of national languages prevent foreigners from managing them in clear and purposeful ways. The vocabulary is often too rich, and too unwieldy for their memory. It is better to have available a small number of root-words if derivatives can be made from them by a system of affixes, as in Esperanto.

Under School Syllabuses: "A number of well-planned experiments and the experience of hundreds of Esperanto teachers have shown that the study of Esperanto favourably influences the learning of other languages, including that of the mother tongue. . . Skill in using Esperanto encourages students to speak more difficult languages. Again, by its structure and regularity it develops objective thinking and clear definition to a high degree. For these reasons it is a suitable subject for intermediate schools".

Makkink then treats of three ways of introducing Esperanto into the schools:

"Esperanto as a compulsory subject would enable school syllabuses to be relieved of the excessively time-consuming study of languages. . . and thereby make time available for new subjects required by present-day life".

The language problem in Europe:

"To create a living European community a common language is essential . . . the absence of a common tongue makes interchange of culture and goods more difficult. It limits commercial representatives travelling in Europe and thus causes loss of opportunities. Progress is slowed down; interchange of ideas hampered . . . (These factors) cause Europe to lag increasingly behind the U.S. and Russia . . . If a common language for Europe should at the same time open the door to the whole world, the advantages would be even greater".

On future prospects, the author says: "Since Esperanto is considerably easier than national languages it should not be beyond the ability of any translator, lecturer or teacher to learn it up to the standard required for teaching the first stage. It will certainly be possible by special courses to impart sufficient knowledge from them to help in establishing a course of instruction in the international language".

"The structure of Esperanto enables those of more advanced years to learn it in much less time than is necessary for any other language.

"Only experts who have a profound knowledge of Esperanto can linguistically and sociologically appraise its value. There are linguists throughout the world who favor the use of Esperanto (See M. Pei: "One Language for the World", p. 291). What they say should be heeded".

This paper supplements "Basic Facts"; both are well worth getting through our Book Service.

DATINDIKOJ

En Usono oni skribas: unue la monaton, poste la tagon, fine la jaron. Se Anglo datumas ion ekz. per 2/6/73, volante esprimi la 2-an de junio, 1973, al Usonano tiu dato signifas: la 6-an de februaro, 1973. Rusoj kaj aliaj Slavlingvanoj ĝenerale uzas: 2.vi.73 ekzemple. Dum mankas universala normo, estas preferinde skribi: 2 junio 1973. Tiel estas en "La Revuo" (1908), kaj Zamenhof plene aprobis tiun formon. ("La Rondo", 9/50, 1/51, 3/62).

Tute klara ankaŭ estas ekz. 2 jun. 73, ĉu ne vere? .

TELEVIDO KAJ INFANOJ

D-ro G. Looney, pediatra prof-o ĉe la Univ. de Arizona, asertas, ke Usonaj infanoj rigardas televidon pli longatempe ol en ĉiu alia aktiveco, kun escepto de dormado, nome, po 54 horoj en ĉiu semajno: preskaŭ 64 p.c. de ilia veka tempo.

La Nacia Komisiono pri Kaŭzo kaj Prevento de Perforto raportas: Usonaj infanoj elseszas jam de kvarono ĝis duono de sia veka stato, rigardante televidon. Jam 14-jaraĝa kaj en la oka klaso lerneja, infano jam rigardis kruele perfortajn atakojn kontraŭ 18.000 homoj. Dum meza jaro, pliaĝaj gejunuloj ĉeestas lernejon 980 horojn, kaj rigardas televidon 1340; do, abituro el altlernejo jam elseszis 11.000 horojn en klasĉambroj kaj pli ol 22.000 antaŭ televido. El tiu cifero eble 5000 horoj estis okupitaj de 350.000 komercaj reklamoj. — "Age", 27/1/73.

ĈU TELEVIDO LARGIGAS VIAN MENSON AŬ VIAJN SIDVANGOJN?

Generale la homoj ne sufiĉe sin korp-ekzercas vespere, kaj multe da ili longe aŭtadas en la tagoj. El tio rezultas, ke iliaj sidvangoj ĉiam pli larĝiĝas. Heroa enketisto ekzamenis 7710 geviroj inter la aĝoj 18-79 kaj trovis, ke la meza mezuro de la sidvanga areo estas 14.4 (virinoj) kaj 14 (viroj).

Homoj manĝas vespermanĝon, tiam kuras al sidĉambro televida. Ĉe multaj tio estas preskaŭ ilia sola korp-ekzerco en la tuta tago. Baldaŭ la seĝoj en teatroj estos jam tro mallarĝaj por komforte ricevi la sidvangojn; kaj seĝoj kaj sofoj en televidaj ĉambroj estos tiel tre grandaj, ke mankos loko por la televid-aparato! — "Prevention", 12/72.

Sidvangoj, postajo = glutejo, pugo.

"EL POPOLA ĈINIO"

Beautiful Esperanto calendars have been received from Cina Esperanto Ligo, P.O. Box 313, Pekin. Their monthly gazette "El Popola Ĉinio", illustrated in fine color and full of general interest, ranks as the finest production of its kind regularly appearing in Esperanto month by month. Agent: Fritz Mueller-Sorau, 11/242 Albany Rd., Petersham, 2049. The subscription is indeed modest = 50 English pence yearly, and much lower for two and three years.

THE CONGRESS IN BELGRADE

To Australians attending it, there is a "postkongreso" 5-12 Aug. in Athens. Please note this. Those interested, please ask me for details.—Editor.

PRI LA ANALIZO LINGVA

Estis kaj estas en Aŭstralio E-istoj lingvoscie elstaraj. Tamen pri iliaj gramatikaj esploroj diredas, ke restas preskaŭ nenia postlasitajo presita. Sekve do ni devas nin turni al Eŭropo kaj, feliĉe, ankaŭ al Japanujo, por nomi homojn, kies verkoj estas je nia dispono.

La sekvantaj estas majstroj en la kampo, ne nur de la literaturo, sed ankaŭ de la analizo struktura de Esperanto.

Eŭropo: De Saussure, Waringhien, Kalocsay, Faulhaber, De Hoog, Kruit, Jung, Setala, Lapenna, Pumpr, Drezén, Bovet, Privat, Schwartz, Perez, La Colla, Sonnenfeld. Japanujo: Nakamura, Mijake, Ossaka, Mikami. Britujo: Collinson, Butler, Rossetti, Gregor.

Estas aldoninde aliaj. Vi mem aldonu ilin.

19-A AŬSTRALIA ESPERANTO- KONGRESO

42 aliĝintoj jam por la kongreso! Sajnas al la Loka Kongresa Komitato ke la ĉambroj en la Internacia Domo de la Universitata Kolegio pleniĝos rapide. St. Lucia estas bona antaŭurbo pro la someraj ventetoj kaj la rivero sur 3 flankoj ankaŭ helpas. Ofte en Januaro ni havas tre bonan veteron — la humida varmeco kutime ne venas ĝis la fino de januaro kaj en februaro —. Do, ne timu pri la varmeco! La kongresa halo kaj la drama-teatro estas klimatizitaj. Post la subiro de la suno la subtropikaj noktoj estas belaj. Venu! Venu! Venu!

Kiel kongresa sekretariino mi ĉeestis la Manly-datrevenon je invito de S-ino Lily Goldsmith. Estis por mi ŝanco renkonti la AEA-Prezidanton (S-ro Robbie Robertson) kaj la Sekretarion (S-ro Russ Baxter).

Kvara Listo de Kongresanoj:

29. S-ino E. Cooney, Yeronga, Q'ld.
 30. S-ro E. E. Thompson, Melbourne
 31. S-ino A. Elmeades, Geebung, Q'ld.
 32. S-ro T. Steele, Yeronga, Q'ld.
 33. S-ro E. J. Lawson, Upper Hutt, N.Z.
 34. F-ino A. Lawson, Upper Hutt, N.Z.
 35. F-ino B. Lawson, Upper Hutt, N.Z.
 36. S-ino M. Wybenga, Morwell, Vic.
 37. F-ino S. Wybenga, Morwell, Vic.
 38. S-ro W. Wybenga, Morwell, Vic.
 39. S-ro A. Baldwin, Melbourne
 40. F-ino A. Godfrey, Melbourne
 41. S-ro R. Ross, Sunnybank, Q'ld.
 42. S-ino M. E. Ross, Sunnybank, Q'ld.
- F-ino Amy Godfrey gajnis libro-premion kiel N-ro 40. Ni gratulas ŝin. Laŭŝta distribuo: Kvinlando 17, Viktorio 12, N.S.W. 8, transmare 5—Win-some Greenhalgh, L.K.K. Sekretariino.

A.E.A.: OFICIALA INFORMILO

NOVAJ ANOJ:

- Toole, S-ro C. J., Cairns, Q'ld.
Torr, F-ino J., Southport, Q'ld.
Lewis, S-ro W. E., Concord, NSW
Carney, S-ino J., Toowoomba, Q'ld.
O'Mara, F-ino M. A., Toowoomba, Q'ld.
Ryan, S-ino S., Welshpool, Vic.
Rzezniczek, S-ro A., Benalla, Vic.
Taylor, S-ino G., Redfern, NSW.
Green, S-ino S., Redfern, NSW.
Smith, S-ino T. K., Punchbowl, NSW.
Keena, F-ino F., Port Macquarie, NSW.
Wickendon, Ges. S., Manly, NSW.
Harvest, S-ino I., Brighton, Vic.

T.G.M.F.

- Fordham, S-ino M., Chadstone, Vic. \$5.00
Dean, S-ro C. W., Freemantle, W.A. 7.00

—Russ Baxter, Sek. 30 marto.

A.E.A. EXAMINATIONS

Les Scott, Manly: Supera (Advanced);
Mrs. D. M. Sinclair, Caloundra (Elementary), honors.

BONVOLI RIDETI . . .

Gardisto al vagantaj ciganoj: "Ĉi tie vi ne rajtas kampadi".

— "Sed ni havas parolan permeson de la urbestro".

— "Nu bone, montru ĝin".

Patro kaj filo promenas surstrate. La filo demandas: "Kiel oni scias, ke viro estas ebria?"

— "Tre facile. La ebruloj ĉiam vidas la objektojn duoblaj. Atentu praktikan ekzemplon: Ĉu vi vidas tiujn kvar sinjorojn, kiuj venas renkonte al ni? Jen, anstataŭ kvar, ebrulo vidis ok".
— Sed, paĉjo, ili estas nur du . . ."

Li: "Mi ne komprenas, ke estas ĉapelo tiu fuŝajo, kiun vi portas sur la kapo".

Ŝi: "Ankaŭ mi ne komprenas, ke vi nomas kapo tiun fuŝajon, kiun vi portas sub la ĉapelo."

KROKODILOJ K.A.

Pure slanga en Esperanto estas la vorto "krokodilo"; la originon de tia stranga uzajo ni ne scias!

"Krokodilo" estas tiu, kiu esprimas sin nacilingve en E-medio. Pli specifaj estas tri aliaj tipoj renkonteblaj . . .

"Kajmanoj" uzas alian nacilingvon ol tiun de la enlandanoj, ekz-e la Anglan inter Francaj E-istoj.

"Aligatoroj" dialogas en nacilingvo negepatra por ambaŭ parolantoj, ekz-e Dano kaj Ruso konversacias Hispane ĉe E-kongreso.

"Gavialoj" parolas lingvon nekomprentatan de la ĉeestantoj, ekz-e Esperanton inter . . . (nu, ni nenium ofendul!). — Laŭ la Hispana "Boletín".

VORTORDO EN ESPERANTO

Vortordo: La sinsekvo de la diversaj elementoj, el kiuj konsistas frazo. Malgraŭ diro en lernolibroj, ke en E-o la vortordo estas libera, ekzistas principo, ke vortoj rilatantaj unu al la alia estu kunapudaj. Jen ekzemploj de malĝusta vortordo:

Li metis manon en la retikulon de sia fianĉino, kiu estis pendigita sur hoko.

Li legis, ke oni sukcesis kapti la tigron en gazeto.

Li riproĉis al sia edzino, ke ŝi ne kontentigis lin sekse en la ĉeesto de atestantoj.

Li donis pomon al sia amiko, kiu estis putrinta.

(Korektu la frazojn, ŝanĝante ilin laŭ la plej bona vort-ordo kaj fraza ekvilibro.)

PIPSONĜOJ

La kara pip' dolĉ-humorigas min
En tempo de la griza vivo-ĝeno.
Kun arto ama mi plenigas ĝin
El tabakujo per du-fingra premo.

Jam brule, levigadas kirla fumo,
Kaj forigadas kun ĝi la enuo.
En revan regnon de bril-ora lumo,
Mi paŝas por tempet' de pura ĝuo.

Kun kara mia pipo en la buŝo,
Mi sente ne plu loĝas sur la Tero.
Al mia laca kor' angela tuŝo
Kondukas min tra rozkolora sfero.

Ho ve, finfine la revado mortas,
Kaj ĉia iluzio efemera.
Per pip' malvarma mi ne plu komfortas—
Jam pasis horkvaron' je zorg' libera.
—Farbo.

PRI "MAL".

W. Auld en "Norda Prismo", 1/69: "Ŝajnas al mi bedaŭrinde, ke Waringhien ankoraŭ trovas neelvokivaj la mal-vortojn". Li citas vortojn de la profesoro (p.9, "Parnasa Gvidlibro", dua eld.):— "(La tago) malvarma, malĝaja, sensuna": "Vole-nevole, malvarma, malĝaja, sensuna' elvokas por la orelo kaj la imago la bildojn entenatajn en iliaj kernoj 'varm' ĝaj 'sun'".

Auld komentas, ke Waringhien estas en tio tro subjektiva. Por la Skota poeto 'malĝaja' estas "ege melankolia vorto" . . . La skribis: "Se oni rigardas min malvarme, mi nepre sentas frostotremon. Povas esti, ke Waringhien vere havas ankoraŭ malfacilaĵojn pri tiu genia prefikso; kun amuzo mi legas (p. 49, "Parnasa Gvidlibro"): Estas ankoraŭ tro malfrue, por scii, kian akcepton ĝuos tiu nova verso" . . . Humile mi demandas: Post kiam da tempo estos jam sufiĉe frue por tio?"

(Signifa plumeraro, kiu atestas la lingvosenton de W. pri mal-?)

PROGRESO ĈE LINGVISTOJ

La redaktoro de la plej grava fakgazeto pri Angl-Usona lingvo "American Speech", Prof-o J. Algeo, regule korespondas en Esperanto kaj multe interesigas en Esperantologio. Li estas grava lingvisto kaj estro de la Fakultato por la Angla lingvo kaj lingvistiko ĉe la Universitato Georgia.

Esperanto multe progresis kaj gajnis gravajn amikojn en la Usonaj universitatoj, ĉefe inter lingvistoj. — Laŭ "H. de E.", 16 jan.

AUSTRALIA KRONIKO

PERTH: S-inoj Einihovici kaj Payne, aŭmitaj per informa letero de la Sekretario, ricevis aŭdiencon ĉe Kim Beazley, Federacia Ministro pri Edukado. La Ministro aŭskultis atente kaj kun simpatio al la pledo por Esperanto en la lernejoj, sed emfazis ke edukado estas ĉefe ŝtata kaj ne federacia afero. S-ino Payne trafte atentigis pri la pasintjara federacia subvencio de 1.5 milionoj da dolaroj por la aziaj lingvoj. Ĉu venos pozitivaj rezultoj post tiu iniciato?

Dum pluraj monatoj ni fervore laboris por sukcesigi proponitan kurson de Esperanto ĉe la Teknika Kolegio en St George's Terrace, Perth. Tiucele ni klopodegis pri informado kaj, sentante bezonon por pli moderna instrutekniko, importis rekte de Usono la novan kurson de William Auld.

Ho ve! Ŝajnis ke lastmomente ĉio fiaskos pro fuŝitaj aranĝoj, sed danke al lerta kaj kuraĝa interveno fare de Vera Payne, instruoto de la klaso, ni ne nur evitis katastrofon, sed povis translokigi la kurson al pli oportuna lernejo (Centro de Teknika Instruado en Subiaco). Ankaŭ aliaj detaloj—horoj; kosto, k.t.p. estas pli kontentigaj. — R. McGrath.

28/2: Ĉeestis 15 anoj. "Demandoj kaj Respondoj" donis al ni bonan ekzercon. S-ino Payne alportis senbendon de voĉoj parolantaj E-on per diversaj naciaj akcentoj, kaj ni konstatis, ke malgraŭ nacia akcento E-o restas tute komprenebla por homoj ĉie en la mondo.

MELBOURNE: Ken Linton daŭrigis sian informriĉan, kolorplenan serion da prelegoj, 26/3., ĉifoje parolante pri la insulo Bali (Indonezio) kaj Singapuro. Kim Bastin, 2/4., parolis pri sia vivo en Finnlando, kie lia studado estis duflanka—lingva kaj kultura. Pro sveda minoritato, kiu estas tamen egalrajta kun la finnoj, Finnlando estas durasa kaj oficiale dulingva.

H. Beechey, ĉiama esploranto de profundpensaj verkoj, atentigis nin pri ekzisto de ankoraŭ unu alia universala lingvo, kiun ni ĉiuj silente kaj subkonscie uzas kaj komprenas—la lingvo de la korpo. Kvankam universala, tiu lingvo estas tamen "dialekta" kaj varias de popolo al popolo kaj de loko al loko. Kiel studtemo ĝi havas specialan nomon—Kinesiko.

MORWELL, Vic. Je 26/3, en la hejmo de nia Prezidanto, Ivan Maddern, ĉiuj partoprenis en studprogramo aranĝita de nia sekretario, S-ino Mabel Wybenga

Tre sukcesa pikniko okazis dimanĉon, 1/4 ĉe farmbieno de Ges-roj Schepers en Won Wron. Dekkvar membroj ĝuis belegan veteron kaj la gastamecon de niaj nederlandaj geamikoj.

SYDNEY: 19/3: Volo Gueltling legis el Germana E-jurnalo favoran recenzon de broŝuro preparita de Ambasadoro Ralph Harry de Aŭstralio. Ĝi enhavas (Germana-Esperanta-Angla) sportan terminaron por uzado ĉe la Olimpikoj k.t.p. Bonege estus havi E-on kiel oficialan lingvon de Olimpikoj! Volo demandis la ĉeestantojn, ekz., "Ĉu vi ĝuis la kunvenon ĉe Vision Valley?" Se la respondo estis "Jes", li rimarkis: "Jes kaj Ne, mi ne konas". Tiam la ano devis respondi: "Mi ĝuis ĝin ĉar" Per tio ĉiuj parolis E-e kaj ofte faris ĝajgajn respondojn. Poste membroj pridemandis Volon!

26/3: Antaŭ 20 ĉeestantoj Fritz Mueller-Sorau legis jen serioze, jen ridige, el div. libroj kaj gazetoj; li havas grandan kolekton da E-verkoj.

2/4: Ni ĝojis vidi du junajn lernantojn en nova klaso. La kunveno komenciĝis—kiel kutime nuntempe—per kantado de La Espero. S-ro Verlinde portempe pianludis. Por ludo, la anoj solvis aŭ penis solvi enigmojn en la nov. 1972 "Esperanto". Poste ĉiu devis fari bruon de besto nomita sur papero donita al li; la aliaj anoj devis diveni la beston. Nur amuzo, sed kiel diris poeto: "Iomete da sensencaĵo de tempo al tempo estas ĝua por eĉ la plej saĝaj (E-istoj)".

9/4 H. Verlinde informis, ke en sia lando estas Nederlanda Societo de Blindaj E-intoj. Li parolis pri "Zelando—Malnova kaj Nova". Li havas notojn en Brajlo, kiun li legis rapidege per fingroj. Li naskiĝis en Terneuzen, en parto de Nederlando nomata "Zelando" (Marlando). Li vizitis Nov-Zelandon, kiun li vidis per la okuloj de sia fratino, kiu vojaĝis kun li.

MANLY: La unua studotempo komenciĝis en la Vespera Lernejo. Tri klasoj: Les Scott instruas la komencan; Marjorie Duncan la progresan, kaj Robbie Robertson la diskutatan. Kutime la komenca klaso okazis tute aparte, je alia tempo, sed ni decidis havi la tri klasojn samtempe—de 7 ĝis 8.30. Poste la tri klasoj kuniĝas kaj ĝuas mallongan programon. Tiu ideo estis bonega, ĉar ĉiam estas io por la komencantoj. Ni havas nun pli bonan ĉeestantaron. Je 8.30 pm okazis la jenaj programoj: 6/2: la prez-o Kevin Smith bonvenigis novajn studentojn kaj donis instruan konsilon. 13/2:

montrado, vendado de novaj libroj fare de S-ino K. Morrison kaj vizitanto Tom Elliott (AEA-libroservo). 20/2: Robbie Robertson parolis pri la "Organizo de la E-Movado", kaj S-ino Edna Giles pri "Pordoj kiujn malfermas Esperanto".

ST. LUCIA (Brisbane) La "Esperanto Senlima Klubo" ankoraŭ kunvenas ĉiun merkredon. Ĉi-jare ni jam aŭdis paroladetojn de la sekvantaj membroj: Dawn Degn: "Kupro-Emajlado"; Pearl Wade: "Brajlo kaj alia sistemo "Luno"; Joycelyn Munro: "Nov-Zelando"; Margaret Jones: "Flank-okupoj"; Ethel Cooney: "Fiĝio"; Win Greenhalgh "Vizito al Zuerich". En aprilo Ivy McElwee revenas al la klubo.

Lastan monaton, Ralph Dearnley, Vic-Prez. de Nov-Zelanda E-Asocio, vizitis nian klubon kaj poste luncis kun ni. Sekve, ni rigardis la televidan "Kviz-Programon", aklamis lian sukceson kaj gratulis lin pri liaj multaj mencioj de Esperanto.

Ni ricevis leteron de Ges-roj Oliver, kiuj esperas ĉeesti Brizbanon en julio. La patro de Eileen Oliver, la mortinta "Tiny" Goldsmith, helpis nin starigi nian klubon. Je 22/3 dank' al invito de S-ino Lily Goldsmith, nia gvidanto, Win Greenhalgh, povis ĉeesti je la Manly-datreveno. Si rakontis multon pri la feliĉa vespero en la Muzik-halo de Cremorne kaj sia renkonto kun anoj de la Manly-klubo. 28/3 ni adiaŭis Joycelyn Munro, kiu iris al sia filino en Nov-Zelando. Ankaŭ ni aŭdis ke F-ino Bessie Carrick, kara esperantista amikino de nia klubo, estis en la hospital St. Andrew's. (Vidu nekrologon.—Red.)

Esperanto-Federacio de Viktorio

La Federacio organizis aŭtomobilan konkurson 24/2, bone organizitan de Arnold Baldwin kaj Ivan Heldzingen kun Len McLochlan, kiel kontrolfiscisto. De Chadstone Komerca Centro konkurstantoj veturis laŭ vojo trovebla nur konsulte al listo de solvendaj, lerte kaj E-lingve kaŝitaj indikoj. Dudek membroj kaj amikoj fine kunvenis ĉe la mistera loko, kiu estis la strando ĉe Chelsea, kie ili ĝuis agrablan posttagmezon dum sunbrila vetero. Gratulojn al Margaret Sanders kaj Carlos Amat, kiuj gajnis la plej altajn nombrojn da poentoj.

La Federacio aranĝos Esperanto-seminaron sabaton la 3-an de novembro en la domo de la "Societoj de Amikoj" (Kvakeroj) ĉe 133 Orrong Rd., Toorak. Esperantistoj el provincaj urboj kaj interŝtataj gastoj estos bonvenaj. Kontakto la Sekretarion, Arnold Baldwin, 45 Earl St., Kew, 3101. La programo enhavos

i.a. raporton de Ivan Maddern pri Univ. Kongreso en Beograd kaj eble raporton de partoprenanto en la SAT-kongreso en Kanado, teatrajn skeĉojn de la Oakleigh-Klubo kaj prilingvajn prelegetojn.

NEKROLOGO

Mortis en 13 aprilo F-ino Elizabeth Barlow Carrick, East Brisbane. Si estis Esperantisto ĝis sia vivfino. Dum la milito ŝi valore servis la movadon, katalogante la bibliotekon de 400 libroj. Malsana dum la lastaj kvin jaroj, ŝi tamen daŭre sentis amon kaj intereson al Esperanto. Al ĉiuj koncernataj ni esprimas kondolencon.

LA NOVA TESTAMENTO

"(La Biblia Komitato) reviziis la Novan Testamenton (eld. de 1912) por altaŭgigi ĝin al la Malnova de Zamenhof". — George Rust, "Biblia Revuo", nov.-dec., 1969, p. 272.

"(La Biblia Komitato) deziris egaligi la stilon de la Nova Testamento kun tiu de la Malnova kaj doni al la tuto ian lingvan unukolorcon. Tiun taskon la Komitatoj ne povis sufiĉe funde plenumi, pro manko de tempo" (I). — "Lingvo kaj Vivo", p. 286. ". . . . bedaŭrinde nur la unua Evangelio estis stile adaptita al la Malnova". — Plena Ilus. Vortaro, p. xiv.

(I) "manko de tempo", nome pro urĝeco prezenti la tutan Biblion al la Univ. Kongreso en Edinburg (1926)..

DANKESPRIMO REDAKTORA.



Mi kore dankas al amikoj, kiuj sendis al mi esprimojn de estimo kaj bonvolo okaze de mia 75-a datreveno kaj/aŭ mia sukcesa operacio. Gustatempe taŭgas la versaĉoj:

Aĝe sepdekkvina jam mi estas;
Dank'al Dio sano al mi restas —
Korpo forta, cerbo mens-aktiva,
Sed, eble iom tro spekulativa.

Solena pens'—post kiam jardek' pasos,
Verŝajne mi ĉi mondon jam forlasos,
Por dormi, ĝis la releviĝ, sub tero,
Aŭ paŝi al labor' en nova sfero.
Ĉu dormi, ĉu plui en Vojaĝo?
La sorton fidus mi al Dia saĝo.

Intertempe estas denove preta por vin servi via Redaktoro.

PRI LA PIONIROJ

Kiomege multe da fido kaj espero devis bruli en la koroj de la frutempaj E-istoj! Bona verkisto de libro au artikolo elstara povas en la nuna tempo rajte kredi ke legos liajn vortojn almenaŭ kelkmiloj da homoj tra la tuta mondo. Ne tiel estis en la tempo, kiam la malnova jarcento donis lokon al la nova. Ni konsideru ekz-e: Joseph Rhodes E-igis en 1901. Li komencis kompili sian grandan vortaron Angla-Esperantan dekkvin monatojn poste! Ses jarojn li laboris super ĝi. Ĝi eldoniĝis en 1908, pli ol kvincent paĝojn ĝi havas. Entreprenante la taskegon, li jam sciis, ke laŭ la Adresaro de D-ro Zamenhof 1902, nur 77 Britaj nomoj troviĝas en ĝi.

Ankaŭ ni laŭdu Zamenhofon, Kabe kaj Grabowski en la traduka kampo; D-ron Vallienne en la originala literaturo. Vi konas la fruajn tradukojn de Zamenhof, la trivoluman romanon: La Faraono, la epopeon Sinjoro Tadeo (preskau dekmil-versa — 9755 versoj), la originalajn romanojn Kastelo de Prolongo kaj Ĉu Li? la dikajn fikciaĵojn de Vallienne.

Tamen mi parolas nun al vi ne pro verkistoj, sed pri simplaj antaŭenirantoj sur la vojo Esperanta. Aŭstraliaj ili estas. En 1889 — du jaroj post la eldono de la Unua Libro de E-o, J. L. COBBIN, St. Leonards, Sidnejo, skribis al "The Office", Londona perioda gazeto: "Mi pensas, ke la sistemo de D-ro Zamenhof superas ĉiujn liajn konkurantajn projektojn" Li tiam kritikis Volapuk kiel konfuzan miksaĵon kaj antaŭdiris ĝian morton pro inerteco. De la gazeto li petis informon pri havebleco de libroj en E-o kaj demandis: ĉu letero adresita al D-ro Esperanto, Varsovio, lin trafos per poŝto? "The Office" informis lin, ke libroj estas haveblaj ĉe Trubner & Co., Ludgate Hill, E. C.

En jan. 1890 li denove skribis: "Mi nun studas la Lingvon Internacian de D-ro Esperanto kaj esperatadas plene ĝin posedi post monato . . . ĝi nun estas unu el la plej grandaj inventoj de la jarcento, kaj mi intencas komunikigi kun ĝia klera aŭtoro pri iaj lingvaj aferoj" (1).

Ĉu COBBIN skribis al Zamenhof? Letero en "Originala Verkaro" p. 481 informas, ke Zamenhof ricevis leterojn el Melbourne kaj ankaŭ el urbeto apud Sidnejo. La letero de Zamenhof datiĝas iunion aŭ julion 1889, do supozinde tro frue por ke ĝi rilatu al iu letero de COBBIN, kiu anoncis sian intencon skribi kelkajn monatojn post tiu dato.

Charles BALLARD en aŭgusto, 1932, "British E-ist", informis, ke de 1887-1891 li korespondis kun COBBIN pri steno-

grafio; ili ne diskutis E-on. COBBIN estis arkitekto kaj ĵurnalisto, ankaŭ redaktoro de la N.S.W. Stenographic Gazette. Li mortis en Capetown (Kaborbo) en 1897.

Du aliaj viroj meritas mencioni. G. G. Reinitis kaj Herman Ritz. Ambaŭ loĝis en Mt. Victoria, N.S.W. Zamenhof eldonis 29 Adresarojn de 1889 ĝis 1909. Reinitis kaj Ritz estas la unusolaj Aŭstraliaj E-istoj registritaj en la Dua Adresaro, kiu kovras la periodon 1889-1892. Iliaj **registronumeroj** estas respektive 1394 kaj 1397. Ili do registriĝis iam inter 1889-1892. Sekve tial ili estas la plej frue registritaj Aŭstraliaj E-istoj.

Ni vivantoj havas ligiton kun Reinitis en tio, ke li speciale tradukis por "La Suda Kruco" fabelon el la Germana: La Sep Malliberuloj (aŭgusto, 1926). Li iufoje skribis al mi pri lingvaj aferoj. Plaĉas al mi la penso, ke tiu fruega pioniro povis ĝisvivi la tempon en kiu li vidis regulan aperadon de Aŭstralia Esperanta gazeto.

La plena listo de ĉiuj E-istoj Aŭstraliaj registritaj en la Adresaro troviĝas en "The Australian Esperantist", 12/67. Vidu ankaŭ: La Rondo, 9/51, 11/51; The A.E. 4/68, 12/72.—F.R.B.

- (1) Plena teksto en "The British E-ist" jan. 1932. kaj "Early Days" en la novembro nro 1931.

HIPERBOLO

Troigo uzata por literatura efekto.—

Torentojn da akvo elverŝas miaj okuloj (Psa. 119/136); De el la ventro de sia patrino la mensogantoj ekeraris (Psa. 58/3); Mi faros vian idaron kiel polvo de la tero; se iu povos kalkuli la polvon de la tero, li kalkulos ankaŭ vian idaron (Genezo 13/16); . . . ĉiu el ili povis ĵeti ŝtonon kontraŭ haron, kaj ne maltrafi (Juĝistoj 20/16); Al mi, kiu estas malpli ol la malplej granda el ĉiuj sanktuloj (Efesanoj 3/8); "more than all in Thee I find" . . . En Vi mi trovas pli ol ĉio (El konata himno). Vin mi fidis de la embrieco (Psa. 71/6).

Zamenhof en sia originala verkado foje uzis hiperbolon: ". . . vortoj, kiuj estas egale uzataj en ĉiuj lingvoj kaj per si mem konataj de ĉiuj". (Originala Verkaro, 41.); "La literaturo kreskas tiel senhalte kaj rapide, ke multaj malgrandaj nacioj jam nun povas nin envii" (Kvara Kongreso, 1908); "Preskaŭ ĉiutage vi legas en la gazetoj ke jen tie jen aliloke aperis ankoraŭ unu aŭ ankoraŭ kelkaj artingvoj" (Originala Verkaro, 300). Li ofte uzis "eterna, por (aŭ: je) eterne", en la senco: tre (eĝe) longa tempo. (O.V. 125, 128, 361, 363, 396.).

MILITA MIRAKLO

Kio estus la situacio, se Britujo estus kolapsinta en 1940? Se la Germana armeo estus okupinta Britujon, de kie venus liberigantoj? De la Brita Regno transmara? Ne Ĝiaj fortoj kaj helpmedoj estis tro vaste dislokita kaj tute maladekvata. De Usono? Ne. Usonanoj de ambaŭ partioj politikaj nun konfesas, ke en tiu tempo ilia nacio tute ne konsentis interveni en Eŭropon.

Tial ke Usono ne volis helpi al Britujo batalanta en 1940 por travivo, sekve ĝi ne estus pripensinta eĉ ideon helpi al Britujo firme okupita de la Nazioj. La forto de la neintervena sento en Usono estis ja tre granda. Britoj, ŝanceligantaj sub la batoj de la Naziaj aerflotoj, bone sciis, ke nur miraklo deĵigis Usonon ilin helpi per interveno.

Feliĉe tiu miraklo estiĝis. Kiu ĝin okazigis? — Hitler. Li savis Britujon per tio, ke li **deklaris militon kontraŭ Usono** samtempe, kiam Japanujo atakis Perl-Havenon en decembro 1941 — la evento, kiu deĵigis Usonon eniri la mondmiliton. — Laŭ "The Age", 4 marto.

LA LASTA MANUSKRIPTO DE

L.L.Z.

Zamenhof plej verŝajne verkis siajn lastajn vortojn en aprilo, 1917, sia mortmonato. Kvankam E. Privat havis la manuskripton sub la mano, li misprezentis tekstojn el ĝi en sia: "Vivo de Zamenhof" (1920). En "Esperanto", aprilo, 1967, in havas korektan represon de la originalo, faritan laŭ fotokopio ricevita de la E-Muzeo Viena en 1963. Restas neklare, kie troviĝas la originalo mem.

Jen du ekzemploj de misa cito:—"Dum en la mondo scienca mi perdos ĉian estimon . . ." (Privat) "Dum en la mondo scienca kaj **liberpensa** mi . . ." ("Esperanto" 4/67).

"Mi eksentis, ke eble morto ne estas malapero . . . ; ke ekzistas iaj leĝoj en la naturo . . . ; ke io min gardas al alta celo . . ." (Privat). "Mi eksentis ke eble ne malapero, eble la morto estas miraklo, ke ekzistas iaj leĝoj en la naturo ke io nin gvidas al ia celo . . ." (Esperanto", 4/67).

Iuloke la "Originala Verkaro" p. 358 eĉ pli malbonigas la tekston kaj ne estas finda.

Studentoj pri la demando sin turnu al "Esperanto", 4/67, 12/71; "The A.E.", 5/61, 1-2/62, 7/62, 11-12/62.

ANYONE INTERESTED

in both Scouting or Guiding and Esperanto please contact me, John Moore, 34 Hadgraft St., Rockhampton, Qsld. 4701.

"LA TEMPESTO"

Jen kelkminuta studeto.

Flat meads thatched with stover, them to keep;

Thy banks with pioned and twilled brims,

Which spongy April at thy hest betrim . . . (Akto 4, sc. 1).

(la -ed akcentata).

A. Quiller-Couch, prof-o de la Angla Literaturo, skribis en 1920: "Se oni demandus: Kion signifas 'pioned and twilled brims', vi devus respondi: Neniu scias".

Jen citoj el la du Esperantaj tradukoj: ebenaj

Kampoj, el kie la furag' abundas;

Kun bordoj, kie peonioj buntas

Inter lilioj, kaj kiujn Aprilo

Humida akvas laŭ via konsilo . . .

(Kalocsay, 1970).

(Kial "lilioj" ?)

. . . herbejo kiu donas fojnon,

Brutaran nutron, — Bordoj ornamataj

Per peonioj, verda kunplektaĵo

Sur kiuj sprucis la Aprila spongo

(Motteau, 1905).

Mem komparu la du tradukojn. Kalocsay sukcesis rimi, kaj entute superas la frutempan provon de Motteau, cetere ne bonan. Post intertempo de 65 jaroj, oni rimarkas la mirindan evoluon de Esperanto, lingvo ĉiel taŭga por uzado de stilmajstro.

LA PLEJ GRAVA LINGVO?

La Instituto de Modernaj Lingvoj de la Brisbana Universitato demandis al libertempaj studentoj de fremdaj lingvoj: "Kiu estas la plej grava lingvo studinda por Aŭstralianoj?" Jen la enketa rezulto: 57% Japana, 11% Indonezia, 7% Itala, 4% Franca, 3% Cina, Germana, 2% Malaja, 1% Rusa. Tamen nur 16% de la partoprenintoj studas la Japanan. — "E." 5/72.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: Mrs. M. Chaldecott, 16 Grosvenor Road, Lindfield, N.S.W. 2070

Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 118 (1968)

MELBURNO

Junio, 1973

ĈU ESTAS IA SUROGATO POR DIO?

Estas malfacile diri kie ĝi komenciĝis. Ĉu ĉe Gutenberg, kiam li prezentis al la okcidenta mondo la presadon? Ĉu ĉe Galileo, kiam li faris tiujn revoluciajn eltrovojn? Ĉu pro la industria revolucio? Ĉu pro darvinismo? Ie survoje la okcidenta homo komencis perdi sian kredon pri Dio kiel persona potenco, kiel direktanto je lia sorto, kiel fina juĝisto je liaj agoj. La ideo, ke Dio kreis la mondon fariĝis eksmoda; ni evoluis. La koncepto pri infero estis pitoreska, sed jam ne deviga. Oni komencis vidi la vivon kiel pli-malpli hazardan; peko fariĝis relativa sociologia afero, kaj por multaj ĝi estis pura fikcio. Post jarmiloj da vivado sub la regado de dioj, la homo komencis konsideri tiajn kredojn kiel arkaikajn kaj supersticiajn. Simile al filo, kiu decidas, ke jam ne necesas dependi de la patro, kaj ke estonte li gvidos sian propran vivon.

Estas teruraj konsekvencaj rezultoj de la misaŭgura salto de la homo en la materialismon. Liberiginte sin de la infero, li perdis sian esperon pri la ĉielo. Vi vivas, vi mortas, li diris, kaj fino! Via avo posedis grandan ekspekton pri vivo eterna; vi, tipe dusenca, esperas, ke tio estas ankoraŭ vera, sed viaj idoj estas tute senesperaj, krom por tio, kion ili materialisme povas akiri el ĉi tiu vivo.

Plue, se la homo estas sia propra morala juĝisto, kaj registaroj derivas sian potencon el la konsento de la regatoj, efektive ekzistas do nenia reala aŭtoritato: Malantaŭ vi kaj mi staras la registaro, kiun ni kreis, kaj malantaŭ

la registaro estas nur la pafilo. Infanoj naskiĝas al gepatroj ne kiel parto de ia dia plano, sed pro biologia akcidento. Ĉu tiu akcidento investas la gepatrojn per ia aŭtoritato? La instruisto scias pli ol la lernanto, sed ĉu tio fakte donas al li ian privilegion? La policianojn, kiuj devus reprezenti aŭtoritaton, oni nomas "porkoj". La junuloj rikanas al siaj politikaj gvidantoj, bruligas la flagon de sia propra nacio, kaj flirtigas tiun de la malamiko, kaj kial ne, se ekzistas nenia aŭtoritato?

Estas signifoze, ke la ideo, ke la homo morale responsas nur al si mem, estas la sama ideo, kiu naskis tutajn novajn sociojn: komunistan, faŝistan, socialistan, kaj tutan gamon da aliaj intergradaj — dum la pli malnovaj socioj estas skuataj kaj ŝangas sian naturon, malgraŭ tio, ke ili retenas la malnovajn nomojn kaj formojn.

En la novaj socioj speco de moraleco estas konstruita ĉirkaŭ la protekto je la ŝtato, en kiu ŝajnas esti konstanta krizo. Sed tio ne povas daŭri. Jam hipioj turmentas la aŭtoritatojn en landoj, kiel la libero jam malaperis, kaj malantaŭ la diversaj kurtenoj ni aŭdas protestojn pri la sensignifo de la vivo.

Eble neeviteble, kiam la homo jam ne bezonas peti Dion por sufiĉa manĝaĵo kaj protekto kontraŭ la elementoj, li ĉesas peti Dion.

Santempe kun satigo pri siaj materiaj bezonoj, ĉiuj popoloj ŝajnas atingi la stadion, en kiu la okcidenta socio nun sin trovas.

Tamen la demando ankoraŭ restas. Iu, kiu povas kontempli la okulon de muŝo, la meĥanikojn de la homa fingra manipulado, la kamufilon de la flano,

aŭ la konstruon je ĉiu speco de materio el la variaĵoj en la aranĝo de la fundamentaj protonoj kaj elektronoj, kaj ankoraŭ insisti, ke ĉi tiu universo simple okazis sen plano kaj sen planinto per absoluta akcidento — tia persono kredas miraklon milfoje pli konsternegan ol iu ajn miraklo raportita en la Biblio.

Konsideri la homon, kun liaj artoj kaj aspiroj, lia konscio pri li mem kaj la universo, liaj emocioj kaj liaj moraloj, kaj ĝuste lia kapablo koncepti ideon tiel grandiozan, kiel tiu pri Dio; konsideri la homon ne kiel kreitaĵon, sed nur kiel ian formon de vivo iom pli altan sur la evolua ŝtuparo ol la aliaj—tio estas krei demandojn pli profundajn ol tiuj jam responditaj.

Ĉu ne estas pli da utilo por la mirige kompleksa homa cerbo ol certigi la daŭran ekzistadon de la specio? Ĉu ni ne povas percepti en la kapabloj de la cerbo iun funkcion pli gravan ol la nura memkonservado?

Se ĉiuj specioj penas konservi sin, kiu sencerba senanima kemio kreis ĉi tiun mirindan impulson? Se la universo estas limigita, kio ekzistas trans tiu limo? Kio ekzistis antaŭ ol la universo komenciĝis? Se ĝi estas senlima kaj eterna, ĉu ne estas super nia kapablo iam ajn scii?

Elementaj lernejoj demandoj, ĉu ne? Jes, sed nia materialismo estas mem tiel malprofunda, bazita sur krudaj supozoj, kiuj estas apenaŭ pli ol simpla divenado, malalloga kaj nekontenta; malnobliga, flagre nekompleta, sed ankoraŭ aroganta en siaj premisoj.

La ideo pri Dio meritas pli bonan surogaton! — Tradukis el la angla Ken G. Linton.

BONVOLU RIDETI . . .

En malgranda hotelo franca sur la pordo pendas informo: "Oni parolas ĉiujn lingvojn". Hispana turisto, kiu malbone parolis france, demandis unue en sia gepatra lingvo — hispane — poste angle kaj germane. Sed al ĉiuj demandoj la hotelisto respondis france: "Mi ne komprenas".

"Sed kiu en via hotelo parolas ĉiujn lingvojn?" kolere demandis la Hispano. Respondis trankvile la hotelisto: "La gastoj".

Junulo eniris butikon por aĉeti porokazajn salutkartojn. Li longe fingrumis ilin, sed ne povis decidi, kion elekti. La vendisto, dezirante lin helpi, diris: "Ni havas belajn kartojn kun surskribo: 'Por mia sola amatino'".

"Tre bone: mi aĉetos dekduon da ili", diris la junulo.

19th AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

2-9 Jan., 1974 — Brisbane

Mail your Congress Fee to Mrs. S. Martin, 48 Launceston St., Salisbury, 4107. Fee: AEA members \$6.00, others \$7.00. (After 1/7/73 Fee will increase by \$1.00). Add \$10 deposit for accommodation at International House of Brisbane University (Enclose stamped addressed envelope for receipt and further Congress Information).

Fifth List of Congress Members

43. Mrs. M. Liston, Manly NSW.
44. Miss D. Davies, Bouldercombe, Qld.
45. Mrs. M. Judd, Malvern, Vic.
46. Mrs. D. O'Brien, Caulfield, Vic.
47. R. Rathjens, Camberwell, Vic.
48. Mr. A. Cocking, Dee Why, NSW.
49. Mr. T. Elliott, Matraville, NSW.
50. Mrs. J. Peters, Stafford, Qld.
51. Mrs. G. Bayliss, Holland Park., Qld.
52. S-ro F. R. Banham, Melbourne
53. S-ino H. Banham, Melbourne.

State Distribution: Q'ld., 20; Vic., 17; N.S.W., 11; Overseas, 5.

A.E.A. OFICIALA INFORMILO NOVAJ ANOJ:

Drabsch, S-ino R. H., Holland Pk, Qld.
Onn, S-ro G., Toorak Gardens, S.A.
Peters, S-ino J., Stafford, Qld.
Lighthart, Marta, Grafton, NSW.

T.G.M.F.

Meeham, S-ro F. M., Da. win, NT. \$1.00
—Russ Baxter, S-zk., 4 majo.

AUSTRALIA KRONIKO

PERTH: Dekses anoj ĉeestis nian kunvenon de 14/3. F-ino Hunt prezentis konkurson, kaj S-ro Poole Johnson estris kantadon. Vere elstara estis programero prezentita de S-ro Illingworth, kiu priskribis sian multjaran plumamikecon kun nederlanda E-isto.

Kelkaj anoj estis feliĉaj gastigi japanan E-istinon Shoko Haskizumi, kiu kun filino, 4-jara Waka, alvenis per ŝipo Marco Polo survoje al Tokio. (22/3).

Dimancon, 1/4 ni ĝuis piknikon ĉe Roleystone, bela loko 18 mejlojn de Perth; 17 anoj kaj amikoj partoprenis. Ĝi okazis ekster la domo de S-ro David Miller, kiu kuŝas sur supro de monteto en bela ĉirkaŭaĵo. Post bonega manĝo ĉirkaŭ fajro, ni pasigis la posttagmezon per interparolado kaj aŭskultado de muziko. S-ro Miller regalas nin per rava pianludado, kaj F-ino Shilkin per gitarludo kaj kantado.

Ges-roj Payne kaj Einihovici partoprenis la Univ. Kongreson en Belgrado.

kaj ni senpacience atendas ilian revenon kaj raportojn.

MELBOURNE: S-ro Ken Linton, 30/4, daŭrigis sian serion da prelegoj. Lia informriĉa komentario kaj kolorplenaj bildoj gvidis nin tra Bangkok. Spaco ne permesas detalan priskribon pri la delikata kaj gem-ornamita manlaboro ĉe tiaj temploj kaj domegoj.

Je 7/5, post legado de dankeprimoj de S-ino P. Hanks pro floroj kaj kondolencoj rilate al la enterigo de S-ro E. Hanks, la klubanoj faris honoron al S-ro Banham por 75-jariĝo kaj por multjara laboro por AEA. S-ro H. Koppel, AEA-Vicsekretario, legis specialan gratuletieron de AEA. Prez. Prof. R. Robertson, kaj S-ro K. Linton skizis la E-istan vivon kaj laboron de S-ro Banham kaj transdonis, nome de AEA, belan legolampon, tre utila por la multuzitaj redaktoraĵoj. S-ro Banham danke respondis kaj poste prezentis sian kutiman pensinstigan kaj informriĉan mikspoton de artikoloj: "La nekonata Zamenhof", "Unuaj aŭstraliaj pioniroj", "Ni konigu Esperanton".

Dank al interesa rakonto kaj neordinaraj bildoj fotografitaj de Vic-Prez. Arnold Baldwin, klubanoj faris kun li, 14/5, flugvojaĝon ĝis Luxor, spektante aviadprezentadon ĉe Farnborough, vizitante E-centrojn en Parizo kaj Roterdamo, renkontante E-istojn en Parizo kaj Vieno kaj fine grimpante piramidon en Egiptujo.

BORONIA (Vic.) Nia Generala Kunveno okazis 22/3, kaj elektigis la jena estraro: Harold Marshall, Prez.; George Kuhlman, Vic-Prez.; Ivan Heldzingen, Sekr.; Brigitta Wustermann, Kasisto; Heather Heldzingen, Libro-Servo.

MALVERN (Vic.) Ni vojaĝis ĉirkaŭ la mondo per diapositivaj, kiam je 31/3 ni kunvenis en la hejmo de Lydie Hooper, por aŭskulti al Don kaj Beryl Pescod, kiuj ĵus revenis de vojaĝo al Romo, Jugoslavio, Britujo kaj Usono. Amuzvespero okazis 28/4 en la hejmo de Isabel Gale. Ni ĝuis ludojn kaj konkursojn en Esperanto.

MORWELL (Vic.) Nia Generala Kunveno okazis je 1/5 kaj elektigis la jenaj: Prez: S-ro Ivan Maddern; Vic-Prez: S-ro Noel Brown; Sekr/Kasisto: S-ino Mabel Wybenga; Komitatanoj: Ges-roj Henk Schepers.

SYDNEY: 16/4: Formala debato:— "Kiu estas pli bona — la kato au la hundo?". Wre Chandler estis la "Prezid-

danto". Shirley defende parolis por katoj — kun du subtenantoj — kaj Margaret por hundoj — kun la sama helpo. Poste la aliaj membroj partoprenis. Wre insistis, ke la korekta procedo debata estu sekvata. Fine li decidis, ke la "katoj" pli bone prezentis sian argumenton. La debato estis amuza kaj donis oportunon al membroj uzi la lingvon.

30/4: Pri la Konferenco: la membroj de nia Klubo, kiuj ĉeestis ĝin, opinias, ke ĝi estis ĝua kaj ke la elektita loko estis bela kaj interesa — krome, ke konferencoj en diversaj urboj bone informas la publikon pri E-o. Ili sugestis al la estraro, ke estonteke seka vetero estu aranĝita! La Konferenco estis ĉe Kiama, 28-29/4, organizita de la Federacio de N.S.K.; preskau 30 ĉeestis. Inter la distraĵoj niaj membroj ripetis la debaton — Kato aŭ Hundo — tre aplombe!

7/5: "Kien iris for ĉiuj floroj?" Pri tio, prelegante antaŭ 21 ĉeestantoj, Wre Chandler klarigis, ke la homa "progreso" jam rezultigis malabundon de sovaĝaj floroj, sed ankoraŭ oni povas trovi maloftajn florojn eĉ en la ĉirkaŭaĵo de Sidnejo. Pruvis tion liaj belaj lumbildoj.

Niaj membroj certe profitis de la instruado, kiun donis al ili Prof-o "Robbie" Robertson (gast-parolanto) en sia "Profesora Prelego". Li klarigis la teknikon de publika parolo, interese kaj ofte amuze. Menciante, ke eĉ spertuloj iufoje suferas "scenejan panikon", li konsilis pri tio. Li emfazis la tri imponajn partojn de paroladpreparo — "Elekti, Kolekti kaj Prezenti". Se niaj paroladoj de nun ne estas bonegaj, la aŭskultantoj ne pardonos nin!

BRISBANO: Bedaŭrinde Ralph Dearnley, la kvizreĝo nov-Zelanda, perdis la televidan konkurson. Ĉiu E-isto en Brisbano deziris, ke Ralph estu la gajninto. Verda sango estas ja pli forta ol ruĝa! 8/4: Ges-roj Jullie gastigis Brisbanajn E-istojn ĉe Currumbin dum ilia libertempo.

15/4: Societa tago precipe por komencantoj ĉe la hejmo de Ges-roj Robinson. Dum nia libertempo sur la Rivero Hawkesbury ni pasigis iom da tempo kun E-aj geamikoj.

6/5: surboate, kaj dum la semajnfino 11/12 ni renkontis anojn de la kluboj de Sidnejo kaj Manly. Ili ne nur bonkore gastigis nin en la hejmo, sed ankaŭ en la Bluaj Montoj. Sinceran dankon pro tiaj interŝtataj bonrilatoj.

16/4: Tre ĉarma vizitanto el Usono, S-ino Marta Evans, parolis al ni pri

sia laboro en Aŭstralio: "Retaksa Konsilado". Eblas, ke Marta restos en Brisbano dum longa tempo. Certe ni esperas tion. — V. Robinson.

MANLY: 6/3: Russ Baxter parolis pri la A.E.A. 13/3: "Robbie" Robertson, Betty Cleminson kaj Kay Morrison parolis pri korespondadoj k.a. 20/3: Kay Morrison montris librojn kaj instigis prunteprenon. 22/3: Anoj de la E-a Klubo Manly celebris la 12-an naskiĝdaton de la Klubo ĉe la Muzika Halo; 32 anoj ĝuis la bongustan manĝaĵon. 27/3: Arthur Cocking parolis pri la Nov-Zelanda Kongreso, kaj poste ni gratulis lin pri lia enoficiĝo kiel estro de la Alternejo en Mosman. Al Thora Richmond ni varme bonvojaĝis; ŝi libertempis en Nov-Gvineo.

Speciala anonco: La Klubanoj de Manly plezure gratulis sian prez-on, Kevin Smith, je okazo de lia diplomitiĝo kiel Doktoro de Filozofio. Li gajnis sian diplomon ĉe la Independent University of Australia per tezo: "Specialaj Aspektoj de Lingvistiko".

Nekrologo

Ciuj, kiuj konis S-ron Ernest Hanks, legos kun bedaŭro pri ties forpaso, 12-an de aprilo, 1973. Li naskiĝis la 5-an de aprilo, 1891, varbiĝis al Esperanto en 1919, kaj dum multaj jaroj aktive partoprenis la agadon de la Melburna E-Klubo, servante ankaŭ kiel Prezidanto (1948-1949). En 1938, kune kun sia edzino, li ĉeestis Universalan Kongreson en Londono. En la klubo kaj tra mult-jara ĉeesto ĉe kunvenoj de la Melburna Rendevuo, li faris gravan kaj ĝuindan kontribuon al ties programoj per altnivelaj, informoplenaj prelegoj kun vastgama temaro, rilate la naturan mondon. Precipe lin okupis la studado pri birdoj.

Li estis sperta fotografisto, kies kolororiĉaj, ofte unikaj bildoj, pri ĉiu flanko de la naturo provizis feston por la okuloj samtempe kun la regalo por la menso. Aŭskultantoj konsideris privilegio ĉeesti, dum multnombraj vizitantoj eksterlandaj ĝuinte lian gastamon, foriris agrable informite pri aŭstraliaj flaŭro kaj faŭno.

Li estis aktiva kaj sperta membro de multaj societoj kaj organizoj. Post pli ol 45 jaroj kun la "Field Naturalists Club of Victoria", li fariĝis honora dumviva membro. Li estis ankaŭ dumviva membro de la "Ornithological Society", membro de la "Henry Lawson Society", honora dumviva membro de "Australian Poetry Lovers", membro de la "Literature Society" kaj de la "Bird Observers", en kiuj li enoficiĝis kiel Prezidanto. Dum

2 jaroj li estis ano de la Administra Komitato de "Wyperfeld National Park" kaj ano de "Royal Australasian Ornithological Union", servante en ties konsilantaro dum pli ol 20 jaroj, inkluzive unu jaron kiel Prezidanto. — Fay Koppel.

K.E.K. ESTRARO SANGIGAS

Danny Price (eksmembro de la Sidneja E-Klubo, c/o British Paints P/L, 21 Isa St., Fyshwick, A.C.T. iĝas Prezidanto de K.E.K. anstataŭ Phillip Grabham, kiu estos alia Vic-Prezidanto. Jam la elementa klaso komeniciĝis, kaj ni pripensas starigi mezan klason pro granda nombro da studentoj. — Noel Gamble, K.E.K. Publicisto.

ALEXANDER ZILBERNIK

Bopatro de L. L. Zamenhof.

Zamenhof en 1885 finis sian kreadon de Esperanto kaj dum du jaroj vane serĉis eldoniston. Neniu volis ion aŭdi pri Esperanto, ĉar tiam ekzistis Volapuk; neniu volis riski eĉ sumeton da mono, por eldoni la unuajn broŝurojn pri Esperanto en rusa, pola, franca, germana, angla lingvoj. Tio ĉi estis farita per helpo de A. Zilbernik. Li donis la necesan monon; li donis monon ankaŭ por la propagando de Esperanto; dum 15 jaroj li donis monon por vivteni sian boflon, kies profesiaj enspezoj estis tiel malgrandaj, ke ili kovradis nur parton de liaj modestaj elspezoj. Zilbernik ne nur subtenis lin materiale, sed ankaŭ morale. Tiu post la apero de Esperanto (26 julio, 1887) li ellernis ĝin perfekte, malgraŭ sia maljuna aĝo, kaj animfortigis sian boflon, kiam ties esperoj komencis malfortiĝadi.

Zilbernik ĉiam havis grandan amon al Esperanto, kaj la lastaj libroj kaj gazetoj trovitaj sur la skribtablo antaŭ lia morto estis Esperantaj. En Kovno, Rusujo, Zilbernik havis sap-fabrikejon, en kiu li laboris ĝis la 74-a vivjaro. Li mortis en 25 marto, 1906. Al li, la unua mecenato de Esperanto, ni ŝuldas, ke Esperanto aperis en la mondo kaj povis trapasi la plej malfacilajn unuajn jarojn de sia ekzisto. — A. Holzhaus.

En "Zamenhof" (1962) M. Boulton skribis: "Aleksandro Zilbernik kaj Klara (lia filino kaj la edzino de Ludoviko) jam estis pretaj elspezi grandan parton de la doto de Klara por eldoni la unuan libron . . . kaj disponigi al Ludoviko tiun ĉi kapitalon eĉ antaŭ la geedziga ceremonio".

En ĉapitro 5: "Vivo de Zamenhof" (Privat) oni legas, ke la libretoj presiĝis je la kosto de Zilbernik. — Red.

ESPERANTO DICTIONARIES

The first English-Esperanto was that of **Hayes and O'Connor** in 1904. Pocket size, 200 pages. Now unobtainable and of little value to the few who still possess it.

Rhodes began his 547-page work after only 15 months of Esperanto study. He had been an E-ist seven years when it was published in 1908, its only edition. Few indeed are the E-ists who would use it today.

Millidge in 1912 issued his dictionary. For 40 years it served the movement well, gaining unwritten authority by reason of its trustworthiness and helpful phrase-examples. An index to the English words in the dictionary was published by George Gordon in 1924, but this supplement is a bibliographical rarity. Ms. of an expanded and revised edition of Millidge's dictionary was destroyed by bomb in 1940.

The **Fulcher and Long** dictionary was published in 1921. The third edition in 1963 is enlarged by some thousand new terms. It lacks, however, great numbers of modern words. Ockey ("British E-ist", July 1963) reckons that 6000 new words on 65 pages (20%) would be necessary to meet the reasonable needs of the present-day English-speaker. It includes such curios as quitch, gvillaia, niobium, apteryx, satio, dido, antidorko, but not everyday words such as: drive-in, barbeque, ballpoint, apartheid, call-girl, commuter, tape-recorder, stop light, gadget, gimmick, form (for telegram &c.), filling (for cake, sandwich) and many others.

The **Wells** dictionary, 419 pages, appeared in 1969, as the most up-to-date register of current English usage, listing many a colloquialism but, alas, omitting many others. Giving only the plainest and most obvious definitions, it covers nothing like the number of meanings applicable to a given English word. E.g. the following could be added, with much else:

I've switched my job (mi ŝanĝis mian okupon, oficon.); strait way (mallarĝa vojo); stock (one of many definitions in the Oxford Eng. Dict. — strikta koltuko vira); in good shape (vigle sana); fug (aero fetora); fall (prez-malleviĝo); tap dance (klakŝua danco); offset (kompensi, kontraŭefiki, -agi.)

At this stage one cannot hope for an Eng.-Esp. dictionary that could cover even a small fraction of the columns given to thousands of words and the countless examples of usage found in the O.E. Dict. The best that one may envisage is the compilation of a dictionary

so enlarged as to cover in greater detail the field of nuance and expression.

For Esp.-English dictionaries this was done in some useful measure by **Butler** (1967), the best hitherto obtainable. The *Plena Vortaro* (1934) and the *Plena Ilustrita Vortaro* (1970) are indispensable for the literary elite, indeed for every E-ist wishing to scrape the bottom of the lexicographical barrel.

"The Edinburgh Pocket Dictionary" (Mann, Baird, Warden, Harvey: 1915) reached its 14th edition in 1931. It was influenced by the foreword of Boirac in his 'Plena Vortaro' (1909) and eliminated the so-called pseudo-suffixes '-aci', '-ari', '-ator', '-enc', '-aci' and others.

The "Nixon", third edition in 1967, in principle gives only the basic everyday words. Used with intelligence it is a useful pocket companion, though less so than the more compendious "Edinburgh".

Finally, it is not the word, but the sense, that the writer, the translator, has to convey. He sifts the true meaning of an idiom, a colloquialism, a figurative or extended usage, and then renders it in words carefully studied by him in Butler and the two large all-Esperanto lexicons. These, together with his own indexed note-books of reference, citations &c. drawn from his extensive reading, are the authorities for the conscientious contributor to good composition in the language Esperanto.

See page 263, *The A.E.*, October, 1968.

MONSTROJ EL LA MARCO ?

Vidita sur Melburna strato: la malplena ŝelo, kiu servis al li kiel kapo, estis kovrita de firtetanta fibraĵo, kio helpis aspektigi lin paviano mallerte farita.

Surhavante paligintan kolorhavan veston, tiu misformita satiruso sandal-klake trenpaŝis ĉe flanko de ulino, kies seksa simpatio jam evidente igis ŝin serĉi kunulon inter koboldoj de la sub-mondo.

Kiel nome tia mizera klaŭno gajnas al si vivrimedojn? Mi ne scias, sed konjektas, ke li fantomas domojn kontraŭ modesta rekompenco. Li estas nur unu el multaj naŭzaj "originaluloj", kiuj oni povas observi, en varma vespero ĉe strato Swanston, King's Cross aŭ ĉe la maldekstra bordo de la rivero Sejno — povas esti, ke tiu franca loko imitige inspiris al niaj afektaĉe "artismaj" parazitaj.

VIA REDAKTORO VIN DANKAS!

Mi esprimas mian varman dankon pro la fido kaj estimo, kiujn montras al mi la membroj de la A.E.A. okaze de mia 75-a datreveno. Mi estas riĉe honorata per via bonkora rekonno de mia modesta laboro. Per viaj sincere kuraĝigaj vortoj kaj via kara gesto sub formo de via bela donaco, mi ricevis instigon ankoraŭ plu pacience persisti en laŭpova servado al vi kaj ĉiuj Esperantistoj.

Tiun servadon mi plezure, tutkapable, daŭrigos, tiel longe, kiel mensa kaj korpa forto restos al mi. Humile mi esperas, ke almenaŭ dum ankoraŭ jardeko mia menso kaj manoj sin trovos okupitaj per tiu ama laboro, kiun mi jam faradis pli ol duonjarcenton. Kiel redaktoro de la Aŭstralia Esperanto gazette mi konatiĝis al vi ekde la jaro 1929.

Via donacita lampo nun sidas sur mia skribtablo, faciligante miajn verkajn, serĉajn taskojn en horoj de mallumo. Gaj klarbrilaj radioj, vaste verŝataj, simbolas por mi la helpon, la partoprenon, de ĉiuj el vi en nia komuna laborado. Elkoran dankon al vi! — Frank R. Banham, 9 majo.

PIONIRA PAROLO

Cirkaŭ 1907-8 mi vagis en butikon de libro-brokantisto. Post foliumado de pluraj libroj mi hazarde trovis Volapukan lernolibron kun vortareto. Tiu trovajo estis mia unua kontakto kun la internacia lingvo-ideo. Mi komencis diligente studi ĉi tiun lingvon, sed baldaŭ eltrovis, ke ĝi estas neparolebla. Mi ne povis prononci la vokalojn a, o kaj u (kun umlauto . . .).

Poste en 1909 mi malkovris Esperanton en la "Sydney Sun", kiu tage aperigis lecionojn dum iom da tempo. Mi ne tute certas, ĉu la lernolibro de Maurice Hyde estis mia unua; mi posedis ankaŭ tiun de O'Connor. Sed, ho ve, post kelkaj jaroj mi scivolis pri Ido, forlasis Esperanton kaj studis la lernolibron de Max Talmeijer. Tamen, ial Ido ne kontentigis min. Ŝajnis al mi, ke la lingvo ne posedas la esencajn ecojn de Esperanto, tial mi ŝanĝis mian herezon en ĉiaman entuziasmon por Esperanto. — H. V. Timmins.

ĈU OPTIMISME...

"While it is impossible to tell accurately . . . perhaps some 15 million people speak some Esperanto, and about

a million speak it fluently". — Wm. Auld: "About Esperanto, the International 'Second Language'" (1972), p. 5. See The A.E., 1 and 4/73.

EL LETERO DE RALPH HARRY

Krom eldono de "Sporta Terminaro" jen eventoj de la pasinta jaro: Apero de nova filmo pri Aŭstralio, kiun nia ambasadoro dissendas en Eŭropo. Tion ni stimulis pere de mia inform-ataŝeo!

Registro kaj dissendado de oficialaj sonbendoj (Aŭstralio por la Turisto); nova eldono estas preparata.

Prelegoj en Nov-Jorko, Silkeborg (Danlando), Rosenheim, Munkeno, Hagen, Braunschweig, Zweibrücken, Eschweiler, Bonn, Duisburg, Offenbach.

Preparo de 32-paĝa broŝuro pri Aŭstralio (tradukita de D-ro J. C. Wells) eldonata espereble en junio — eldonkvanto almenaŭ 5000.

Alia afero, kiu min tre kontentigas, estas la decido de la Aŭstralia Departamento pri Eksteraj Aferoj, ke Aŭstraliaj diplomatoj povas elekti por lernado la Internacian Lingvon, je la sama bazo kiel fremdan lingvon. Mi sendis lernolibrojn, dokumentojn k.t.p., kaj B.E.A. promesis sendi ekzemplerojn de "Esperanto Programita" al la Departamento. La Kanbera Klubo nun havas pli bonan ŝancon persvadi kelkajn junajn diplomatojn lerni nian lingvon.

PREZIDENTO KAJ AMBASADORO PAROLIS ESPERANTE

En vizito de la Federacia Respubliko Germanio en majo, 1973, la Prezidento de Aŭstrio, Franz Jonas, parolis al la Aŭstralia Ambasadoro, S-ro Ralph Harry, en la Internacia Lingvo, Esperanto.

Unu ero de la programo de Prezidento Jonas en Bonno estis solena festakcepto, kiam la diplomataro povis esti prezentita al la Ŝtatestro. La Aŭstralia Ambasadoro kiu estas membro de la Patrona Komitato de la Universala Esperanto Asocio, kaj sciis ke Prezidento Jonas scipovas Esperanton, portis kiel kutime la verdan stelon. Kiam oni anoncis lin, kaj la Prezidento salutis, S-ro Harry diris: "Ĉu mi povas diri Esperante, 'Estas granda honoro saluti vin, S-ro Prezidento?'"

La Prezidento hezitis nur momenton kaj respondis en Esperanto: "Tio eblas. Post kiom da jaroj vi parolis Esperanton, S-ro Ambasadoro?" "Jam de longe!" diris la ambasadoro. "Mi mem dum kvindek jaroj", fieris la Prezidento.

"Estis vere granda honoro", denove diris la Ambasadoro, kaj oni prezentis la sekvantan ambasadoron laŭ la vicordo. —Ralph Harry.

RECENZOJ

"**Kun Sopira Koro**": Gustavo Adolfo Becquer. Poemaro tradukita de Fernando de Diego. Eldonis: Hispana Esperanto Federacio, Zaragoza. 94 paĝoj. 120 pesetoj. (5 pes. = ĉ. 7c.)

Becquer naskiĝis en Sevilo en 1836; mortis 1871. Romantikisma lirikisto, li akiris famkonatecon en la Hispanparolaj landoj kaj ankaŭ plifore en Eŭropo. Jose Ciordia klarkonture enkondukas la poemokolekton per biografieto kaj komentoj pri la anhavo.

Kiel ofte, eĉ kutime, ĉe la Hispana poezio, Becquer (aŭ lia tradukinto) uzas asonancojn en preskau ĉiu poemo (esceptajo estas IX); kapablo rimi malmulte montriĝas. Kalocsay en "Lingvo Stilo Formo" atentigas, ke al iuj tielonomataj asonancoj mankas ne nur rimefekto, sed ankaŭ la asonanca afekto mem.

Asonanco estas kvazaŭrimo, en kiu sonas nur la akcenta kaj postakcenta vokaloj; ekz. faros, baron; fervore, korten; trista, brila; ritmo, himno; enigmo, virino. Multo en la libro ne konformas kun tiu difino, ekz. vapore, ĉielo; brilaj, kiso

Liriko estas poezio, kiu esprimas la proprajn sentojn kaj emociojn de la poeto mem. Becquer subjektive esploras sian konscion, plejgrandparte kun sentoj melankoliaj:

Jam laca de la lukto
senĉesa de la vivo,
al tiu ombra kaj kaŝita tomo
mi turnas mian penson kun envio.

Per lia belproza beno al la poemoj, pli ol per la poemoj mem, legantoj pli klare sciigos pri la pensoj kaj sentoj de tiu anime febra homo, kiu penegis priskribi siajn ekzaltojn kaj deprimojn, kaj sian ardan deziron, ke lia verko, sendota al la mondo, transvivos lian morton.

Ne havante komprenon de la originalo, ĉi recenzanto ne povas prijuĝi la fideindecon de la formo kaj senco de la tradukajo. Sciante pri la belliteratura gusto de Aŭstraliaj E-istoj, li rekomendas la libron nur al la optimisme kalkulita 5 procentoj da pasiaj poeziemuloj inter ili.

"**Biblia Revuo**", nro 4, okt.-dec. 1972. Ĉe Anĝelo Duranti, Piazza Duomo 4, Ravenna, Italy 48100.

Ankoraŭ kajero de temoj detale analizitaj. Gertrude Spencer, psikiatron de Melbourne, funde pritraktas kun ilustraĵoj la Taŭron en Antikvaj Mitoj kaj Religioj. J. Kohen-Cedek provas pravigi la ateston de la Biblio per artikolo arkeologia; du fotoj. Bibliografio

de religiaj gazetoj, recenzoj kaj 14 Psalmoj tradukitaj de D. Broadribb.

Unika revuo rekomendinda por specialistoj, kaj por simplaj homoj aspirantaj fariĝi tiaj.

"**The Language Problem in International Relations**": Ivo Lapenna. A 12-page lecture delivered at the First International Conference on the Language Problem in Science and Learning. Illustrated and documented. Single copy: 0.70 gulden. Order through Book Service.

"**Norda Prismo**", nro 3, 1972. Kvaronjare. 3½ Usonaj dol. aŭ egalvaloro. Ĉe Ken Linton, peranto.

Cefaj enhaveroj: Intervjuo kun Kalocsay per kiu R. Hauptenthal esploras la sintenon de la versmajstro al siaj propraj verkoj kaj al la E-a literaturo ĝenerala, krom liaj aspiroj kaj esperoj pri venonta plumagado.

Marjorie Boulton per sakre saturita satiro traktas la arton insulti en E-o. Si sugestas elekton de taŭge trafaj terminoj per kio oni povas lerni, ne blasfemante, vortdraŝi sen timo pri fulmo de la dia venĝo. Lumdone ŝi prezentas sektion pri seks-aludaj malbenoj, dividante kun ni siajn saĝajn observojn el psikologia vidpunkto. Admirinda stilstilo, per la artikolo ŝi elcerbigis kaskadon da sukaj esprimoj, juvelece glimantaj.

Van Themaat elektis dediĉi al ŝi sian: La Embrio — skizo pri la mensostato de virino antaŭ kaj post aborto.

Peco el "Frato Kuniklo" (Brer Babbit: J. C. Harris) tradukita konforme al la simplalingva Angla teksto. Novelo de Szathmari — La Barbaro — temas pri religio kaj moralo fronte al murdado dum milito. Prozaĵoj kaj poemoj, krom 4 recenzoj kompletigas la enhavon de la 58-paĝa numero. "Norda Prismo" estas la nura E-gazeto pure literatura. Ĝi meritas pli vastan subtenon.

"**La Naciaj Malplimulto en la Vjetnama Demokratia Respubliko**": Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1973. 137 paĝoj. Prezo ne indikita.

Pli ol 60 etnaj grupoj, en du lingvo-familioj, nome la Ĉin-Tibeta, kaj la Aŭstral-Azia. La kredoj: praulokulto, fetiĉismo, Buddismo, Hinduismo, Islamismo, kaj, nur sensignife, Kristanismo. La 4-a ĉapitro traktas la formadon de skribataj lingvoj ĉe la diversaj etnoj.

La "tegmenta" lingvo, la Vjetnama, parolata de 87 p.c. de la loĝantaro, estas detale priskribita en "La Vjetnama kaj ĝia utilo por la supera instruado en N.D.R." (1969).

La kulturaj libroj eldonataj en Hanojo estas tiel dense kaj riĉe plenaj de faktoj, statistiko, historiaj okazoj kun datoj k.c., ke estas neeble ilin taŭge indiki. Devus ricevi ilin ĉiu studento pri tiu landeto, fokuspunkto de monda intereso. Estas mirakle mirinde, ke eta popolo, meze de masmasakro, povis, jaron post jaro, produkti tiel longan serion de valoraj verkoj. Tiu ekzemplo devus hontigi koncernatojn en kelkaj bonstataj landoj, al kiuj ankoraŭ mankas Esperanta landorgano.

WHY YOUR BOOKS ARE DEAR

U.K. price: 40 pence; Australian recommended retail price: \$1.35. That is typical of paperbacks sold in Australia. It makes expensive reading. Pan Books "Future Shock" is 50 pence in U.K. We pay \$1.65.

The higher price here is caused by high freight and insurance charges; steep warehouse charges (Penguin tries to hold in stock 4500 titles); small orders from bookshops because of lower population density; vast-area distribution from the capitals to remote mining camps.

There is little profit in book-retailing, as is seen from the closing down of many such outlets. Penguin in 1971 made only \$139,274 with stock in hand or in transit of over a million. The blame for the average mark-up of about 90 p.c. lies first for learning to read, and then for choosing to live 12,000 miles out of reach of cheaper books.

PRI LA GREKA

"Homo, kiu scias nur la Grekan lingvon de la Nova Testamento, kaj eĉ krome la Grekan de la Septuaginto, ne efektive scias la Grekan lingvon — certe ne sufiĉe bone por kompetente traduki la Novan Testamenton". — Prof. F. F. Bruce (Manĉestra Univ.) en "The English Bible: Lutterworth Press 1961".

"Kiu min ĉiame vibre movas" ?

Leganto demandas: ĉu tiu uzo de "movi" estas korekta? En tiu versa esprimo la senco estas: "emocie movas min" (= mian animon). La uzo estas figura. La Plena Ilus. Vortaro ekzempligas per: "La festo . . . ne sufiĉe ekmoviĝis"; "La malbonaj pensoj povas ekmoviĝi en nia koro" (ambaŭ laŭ Zamenhof.) Plena Vortaro: ". . . tio movus lin ion fari por nia afero" (Z.); ". . . homoj estas movataj de sentoj kaj antaŭjuĝoj".

GLORA PAGO HISTORIA . . .

Dum feb.-aprilo, 1973, Usono faligis 145.000 tunojn da bomboj sur Kamboĝon kaj Laoson kontraŭ kosto de pluraj milionoj da dolaroj en ĉiu tago. La loĝantaro de la du landetoj estas proks. 10 Milionoj; t.e. 29 funtoj da bombajo por ĉiu feliĉulo por savi ties animon.

Dume sur Usonaj stratoj miele mienaj skatol-skuantoj petas almozon por tiu aŭ alia bonfara instituto, kaj mizeras milmiloj en aĉaj kvartaloj.

KIAL MULTEKOSTAS VIAJ LIBROJ

Prezo en Britujo: 40 pence; en Aŭstralio, rekomendata prezo: \$1.35. Tio estas tipa pri broŝuritaĵoj poŝlibroj vendataj en Aŭstralio. "Venonta Soko" (Pan Books) Kostas 50 pence en Britujo; ni pagas \$1.65.

La altajn prezojn ĉi tie kaŭzas altkostaj frajtoj kaj asekuraj prezoj; multekosta stokado en vartenejoj (la kompanio Penguin klopodas stoke tenadi 4500 verkojn); malgrandaj mendoj de podetalistoj, pro la relative maldensa populacio en Aŭstralio; vastarea distribuado jam de la ĉefurboj ĝis plej malproksimaj minurbetoj.

Nur malmulte oni profitas per libro-vendado podetala. Tion evidentigas la finfermo de multaj tiaj butikoj. Pogrande? En 1971 Penguin profitis nur je \$139,274 malgraŭ kapitalo de 1.1 milionoj da dolaroj en varo stokata aŭ traveturanta.

La kulpo pri la meza je 90 p.c. pli-granda prezo estas nia. Unue, ĉar ni lernis legi; due, ĉar ni elektis loĝadi 12,000 mejlojn for de malpli kostaj libroj.

LA HIROŝIMA HORORO

Eraro traduka en mesaĝo sendita de la Japana registaro en la finaj tagoj de Hiroŝimo. Se la tradukinto estus uzinta alia(j)n vorto(j)n, estas dubinde, ke la atombombo estus tiam faligita. La vorto: mokusatsu, uzita de la Japana Kabineto responde al la Potsdama ultimato. La novajaĝentejo Domei tradukis ĝin per "ignore" (ignori) anstataŭ la korekta "withholding comment (pending decision) = retenante komenton (ĝis fina decido)". Ne sciante, ke la Japanoj ankoraŭ konsideras la ultimaton kaj kredante, ke ili jam ĝin rifuzis, la Alianculoj procedis eniri la epokon de la Atomo. — W. J. Coughlin, "Harper's Magazine". 3/53.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: Mrs. M. Chaldecott, 16 Grosvenor Road, Lindfield, N.S.W. 2070

Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 119 (197)

MELBURNO

Julio, 1973



JAN. 2-8
1974.



LA 19A
AŬSTRALIA
ESPERANTO-
KONGRESO
BRIZBANO

69. Mr. K. Gunster, Ekibin, Qld.
70. Mrs. G. Phillips, Rainworth, Qld.
71. Mrs. R. Carruthers, Balgowlah,
NSW
72. Mr. H. Gilbert, Melbourne, Vic.
73. Mr. H. M. Cohen, Melbourne, Vic.
State Distribution: Qld, 30; Vic. 20;
NSW, 18; Overseas, 5.

OFICIALA INFORMILO

NOVAJ ANOJ:

- Price, S-ro A. M., Lyons, A.C.T.
Thomas, S-ro D. G., Ainslie, A.C.T.
Wright, S-ro N. G., Woodstock, N.S.W.
Harwood, S-ro J., Epping, N.S.W.
Caulfield Grammar School, St. Kilda,
Vic.
Reader, F-ino, J. M., Braeside, Vic.
Le Conte, S-ro F., Boronia, Vic.
Bridgeman, D-ro P., Kingaroy, Qld.

T.G.M.F.:

- Linton, S-ro. L., Sth. Caulfield,
Vic. \$25.00
Howard, S-ro W. H., Floreat
Park, W.A. 2.00
O'Brien, F-ino D., Caulfield, Vic. 1.00
Williams, F-ino B. C.,
Camberwell, Vic. 10.00
—R. W. Baxter, 1 junio.

FIA FARO EN KORTUMO

Pri bona stilo ni E-istoj povas lerni ankaŭ per legado de jurnalaj. Jen frazo ("Age" 14/6): "A (woman) teacher was acquitted on a charge of outraging public decency in the County Court". Si certe ne tiel kondukis en la loka kortumo. Traduko: Instruistino estis absolvita el la loka kortumo pri akuzo de ofendejo kontraŭ la komuna decosento. Mankas al multaj la arto kunigi frazpartojn unu ĉe la alia laŭ la senco.

Mail your Congress Fee to Mrs. S. Martin, 48 Launceston St., Salisbury, 4107.

Fee: AEA Members \$7.00, Others \$8.00. Add \$10 deposit for accommodation at International House of Brisbane University (Enclose stamped addressed envelope for receipt and further Congress Information).

Sixth List of Congress Members:

54. Mrs. B. Drabsch, Holland Park, Qld.
55. Miss D. Hasluck, Cheltenham, NSW
56. Miss V. Cox, Melbourne, Vic.
57. Mrs. J. Torr, Southport, Qld.
58. Mr. F. Mueller-Sorau, Petersham,
NSW.
59. Miss H. Mueller, Petersham,
60. Mrs. A. M. Callaghan, Norman Pk.,
Qld.
61. Mrs. J. Turner, Rockhampton, Qld.
62. Mr. R. Baxter, Manly, NSW
63. Mrs. M. Baxter, Manly, NSW
64. Mr. V. Gueltling, Ashfield, NSW
65. Mrs. D. Degen, St. Lucia, Qld.
66. Miss A. Curtis, Nth. Tambourine,
Qld.
67. Mr. S. Kunze, Burpengary, Qld.
68. Mrs. M. Poelstra, Caloundra, Qld.

AUSTRALIA KRONIKO

PERTH: La meza nombro de ĉeestantoj en niaj kunvenoj dum Aprilo kaj Majo estis 15. Ni adiaŭis niajn feliĉajn reprezentantojn ĉe la mondkongreso en Beograd, D-ron kaj S-inon Einihovici kaj S-inon V. Payne. La unuaj foriris la 12-an de Aprilo kaj la familio Payne je la 21-a de Majo.

La dom-konstrua kaso daŭre kreskas laŭ raporto de ĝia administranto Jessie Gray, kiu ankaŭ informis ĉe la kunveno de 23/5, ke multaj loteriaj biletoj restas ankoraŭ ne venditaj.

Kantado, konkursoj kaj demandaroj vigligis kaj kelkfoje gajigis la ĉeestantaron. S-ino R. McGrath laŭtlegis interesan leteron de Walter Sonderegger, svisa E-isto, kiu vizitis nin antaŭ kelka tempo. Paroladetoj temis pri "Kie, kiam kaj kiel mi Esperantiĝis (Edith Palmer), "Mia Hobio" (Owen Loneragan), "Vizito al Tennant Creek" (Olive Larter); Vera Payne prezentis, 9/5, belajn lumbildojn pri Tasmanio, Bill Howard, 23/5, denove partopreniĝis nin en ridiga "Interrompota Rakonto" pri azeno kiu maĉis kaĉon.

Kun bedaŭro ni devas raporti la morton en Darwin de S-ino Caroline Hitch, antaŭe el Bassendean. Si estis membro de nia Ligo dum multaj jaroj. Kun ĝojo ni povas raporti ke F-ino O. Stempel kaj S-ino G. Pollard revenis hejmen el hospitalo.

MELBOURNE: S-ino Fay Koppel, 21/5, informis pri nova aldono en la kluba biblioteko, donante detalojn pri la verko "Infanoj de la Malriculoj" kaj ties aŭtoro, Novzelandia eksparlamentano, John H. Lee. Mencio pri la tradukinto, Bertram Potts, elvokis rememorojn pri rentkontigoj kun tiu samideano.

Nekutima vizitejo estas Nepalo, temo de plua esplorado sub gvidado de Ken Linton. Lia fidela fotoaparato kaptis multajn scenojn ĉirkaŭ Katmanduo, sed mankis la bela eleganteco de Bankoko. Sekvis vizito ankaŭ al vivoplena kaj pitoreska Hongkongo.

Je 11/6 Herbert Koppel prelegis pri "Novajoj el Esperantujo". Li raportis pri la bedaŭrinda morto de Raymond Schwartz, kiu forpasis en Parizo je 14-a de Majo. Tiu bonekonata Esperanto-verkisto, humoristo kaj poeto atingis sian 79-an jaron.

MORWELL, Vik. La unua kunveno de nia klubo okazis en "Morwell High School" je 25-a de Junio 1969. Tiam ĉeestis S-inoj Love, McLaren, McNeil, Spencer kaj Wybenga, F-ino Gledhill, S-roj Wybenga kaj Maddern. Pasis do

4 jaroj, kaj ni festos nian 4-an naskiĝtagon je la fino de Junio.

Nia Prezidanto, Ivan Maddern, estis la gastparolanto je 29/5 ĉe la "Juna U.N. Asocio" en Melbourne. Neniu el niaj membroj povis ĉeesti, sed kelkaj reprezentantoj el la Melburnaj kluboj partoprenis la prelegon.

Ges-roj Henk Schepers komencis malgrandan studgrupon ĉe Yarram.

Esperanto-Federacio de Viktorio

La Federacio aranĝis elstaran kunvenon je 23-a de Majo en "Friends Meeting House" en Toorak. Anoj de 3 grupoj (Melbourne, Malvern kaj Oakleigh), entute kvardek personoj, pasigis agrablajn amikiĝhorojn kaj partoprenis komunan bufedmanĝon. Ĉi tiu finiĝis per gratulesprimoj al Jack Fallu, kies naskiĝdato koincidis kun la kunveno kaj al kies sano oni bondeziris, manĝante malsanige riĉan torton. La manĝon sekvis spektado de kolorbildoj pri la Montaro Flinders en Centra Aŭstralio, kie S-ino Mary Halliday feris kun familianoj. Kelkajn aliajn montris S-ino Walters, ĵus reveninta post vizito al Anglujo kaj Eŭropo. F.K.

SYDNEY: 21/5: Gratulon al Wre Chandler, kiu ricevis la Premion Simondetti, la ĉiujaran donacon de la Ornitologia Rondo Esperantlingva. Wre estas la dua laŭreato de la Premio Simondetti en Aŭstralio. (S-ino Grace Kirkwood gajnis ĝin en 1971). Tom Elliott nomis sian temon: "La Regno de Dioj", sed fakte ĝi estis saĝa kaj serioza diskuto pri la kreado de la mondo, krome pri la vivo sur la tero kaj la grandeco de la universo.

26/5: Nia Vic-prezidanto, Shirley Fanos, havis tablon kun E-aj libroj ktp. en la antaŭkorto de la Urbdomo ĉe Ashfield (Sidejo). Aliaj membroj helpis ŝin. Nur sep homoj petis informon pri E-klasoj ktp., sed ni disdonis multe da reklamaj invite al "Enkonduka Vespero" ĉe Esperanto-Domo en la sekvanta lundo. Ankaŭ estis reklamo en "Sydney Morning Herald" (3 x ¾). Kelkaj vizitantoj alestis la "Vesperon", kaj malgraŭ, ke ĝi estis Anglalingva (pro la vizitantoj), ankaŭ la membroj ĝuis ĝin. Wre Chandler klarigis la utilecon de E-o; Margaret Chaldecott parolis pri ĝia historio, kaj Kevin Smith, per bildoj, donis elementan lecionon en E-o. Ernest Veis, Jugoslavo, praktike atestis la utilecon de E-o, parolante en tiu lingvo pri siaj spertoj kiel uzanto de E-o en fremdaj landoj. Ĉar Ernesto ne tre bone povis paroli Angle, Wre tradukis. Kvankam la videbla rezulto ne multe

kompensis nin por la elspezo de peno kaj mono, ni sentas la nepran neceson disdonadi publikan informadon pri E-o.

3/6: En unu dimanĉo monate nia vic-prezidanto invitas membrojn viziti sian hejmon por E-e babiladi. Naŭ homoj ĉeestis kaj vere parolis E-e. Shirley baldaŭ ferios en la "Nova Mondo", kaj aliaj anoj proponis sian hejmon por daŭrigi la kunvenojn dum ŝia foresto.

4/6: Ni ĝuis vidi lumbildojn de Nov-Jorko, kiujn montris John Matasin:—Cambroj de Unuigintaj Nacioj, Vaŝingtono, Miami, San Ludoviko kaj la terura Granda Kanjono. Montriĝis ankaŭ vidaĵoj de Meksikio kaj bildoj de E-istoj, kiujn li renkontis tie.

MANLY: 1/5 La lasta vespero en trim-estro. Mallonga amuz-vespero; ĉiu klaso partoprenis. Poste, ĉe May kaj Russ Baxter, ni ĝuis vespermanĝon kaj babiladon.

Sociata vespero okazis ĉe Edna Giles; 21 kunvenintoj aŭskultis bonan paroladon de Robbie Robertson kaj poste vespermanĝis kaj babilis.

29/5: La unua vespero de studperiodo. Prez-o Kevin Smith venigis vizitanton, Ernesto Veis, el Novi Sad, kiu kuniĝis kun diskutada grupo kaj poste paroladis al la tuta klubo.

SIMONDETTI PRIZE AGAIN TO AUSTRALIAN

It is with great pleasure that we announce that our enthusiastic bird-observing Esperantist Wreford Chandler (Ray to you!) has won the Simondetti Prize for 1973. No one deserves it more. He adds to his encyclopaedic knowledge of birds a high quality of competence in using the International Language, and missionary zeal in recruiting people to the movement and Esperantists to Ornitologia Rondo Esperantlingva. His winning entry was "The Australian Mallee Fowl: (*Leipoa ocellata*)" which will certainly cause great interest in at least 21 countries, where members of ORE are to be found.

The Simondetti Prize is awarded annually for the best article submitted on a nature theme and written with high quality Esperanto style. The Committee which handles the competition consists of the following outstanding Esperantists: Manuel Halvelik, W de Smet, G. F. Makkink, C. Stop-Bowitz and Luc Laga.

The prize has been offered in five successive years and this is the second time it has been won by Australians—Grace Kirkwood, Perantino for ORE in Australia.

DORMI KUN VIRINO ESTAS MALKOMFORTE . . .

Pli-malpli frue la viroj trovas, ke dormi kun virino estas unu el la Artoj — la arto de sindefendo. Ili eniras la batalon de la litĉambro armita per nenio, aŭ preskaŭ nenio, antaŭa sperto.

Ĉi artikolo temas ne pri la erotika, sed pri la dormserĉa aspekto de la afero. Jam ĝisnaŭze oni verkis pri la amkaprioloj de la homoj, sed ĝis nun neniu verkisto prenis sur sin la taskon trovi panaceon, ĉiokuracilon, por la kompatindaj viroj, kiuj konstante krias: "Dio mia, donu al mi la benon de dormo, longa kaj revigliga dormado!"

Tial mi faris enketon — bedaŭre nur suprajn — pri la afero. Mi ekzamenis la plendojn de diversaj viktimoj, kiuj volonte donis detalojn pri siaj febraj horoj en la laŭleĝe edziĝa lito.

UNUE: Estas la spacoĉielantinoj, precipe tiuj, kies granda bust-mezuro faciligas al ili la prempuŝadon. Ni prenu specimemon de tia speco. Pro sia belkorpa pezo, ŝi estas aparte sukcesa en la lukto gajni por si litospacon. Viro povas uzi la kubuton, la genuon, la piedon, sed ŝi tamen persiste iom-post-iom puŝas lin for ĝis lia litorando. Fine li devas aŭ kriegi al ŝi, aŭ silente lasi la liton kaj eniri ĉe ŝia alia flanko. Je tio, ŝi sentas maleston de lia korpo, do mankon de celo. Tial, aŭtomate, senkonscie, instinkte ŝi sin turnas, kaj la batalo denove komenciĝas. Kelkaj viroj dum unu nokto vojaĝas kelkajn jardojn, colo post colo.

Ni ne parolu pri virinoj, kiuj pasigas ŝajne senfinan tempon, aplikante al sia vizaĝo fluidojn, ŝmirajojn, purigajn tukojn k.t.p., fiksante fibolojn en la haroj kaj manipolante har-retojn . . . dum elektra lumo lacigas la okulojn de la viro jam de longe kuŝanta en lito. Li, kompatinda, murmuris ion pri la tagoj, kiam sufiĉis la bona, simpla, sufiĉe efika ŝapo-akvo.

DUE: Tiuj virinoj, kiuj ne povas sin kuŝigi komforte, kiel birdo en nesto. Kiam ili jam tiris la litukojn sur sin, ili streĉas la korpon je plej-longo dum momento. Tiam subite la haoso eksplodas. Ili jeteĝas sin de flanko al flanko, turnante sin en formo de litero S-o; ili prancas, tordiĝas, pugnobatas la litkusenon, eligante gruntojn kaj oscedojn. Tia virino volvas la tukojn ĉirkaŭ siaj ŝultroj lau deko da diversaj manieroj. El dorsa pozicio ŝi povas sin svingi renverse al sur-stomaka pozicio, kun la lerteco de salmo en rivero, aŭ stern-etendi la kruojn kvazaŭ ŝi estus polpo. La viro penas sin teni al la lito, simile al maristo en boateto sur furioza maro.

TRIE: La ronkantinoj, sibilantinoj kaj fajfe-spirantinoj. Foje la sonoj venantaj el ŝia buŝo similas al la bulbulbulado de bolanta poto plena de vekzanta kaĉo. Se la zumzuma aŭ kraketa sonado tenas sin al regula ritmo, la viktimo povas peni rigardi ĝin kiel ne tre kontentigan luli-sonon. Sed se la ritmo fariĝas malregula kaj enkondukas novajn, nervoskujajn sonvariantojn, tiam li estas plene vigle veka, kaj en si sakras, blasfemas —kompreneble vane!

KVARE: La ekspasmulinoj. Necesas paso de jaroj antaŭ ol viro povas alkutimiĝi al la nerve-konvulsiaj virinoj. Ili povas esti tute sanaj, korpe kaj mense, dum la tagoj, sed nokte ili kvazaŭ elektre ekvibras pro kiu ajn moveto aŭ eta sono. Kaj eĉ sen tiuj stimuloj. Tinto de lakto-botelo ekstere, aŭ falo de rosguto de sur defluilo ĉe fenestro, kaj jen ili konvulsietas, foje donante al la viroj genubaton en la vertebron aŭ la ventron.

KVINE: La litlegantinoj. Post enlitigo: ĉu havi lumon aŭ ne? Jen demando. Dum li sopiras fermi la okulojn en bendona mallumo, ŝi daŭrade legadas. Siaj revuoj kaj libroj kuŝas peze sur lia flanko. Eble, malgraŭ ĉio, li fine sentas sin endormiĝanta, jen kraksonas la falo de libro sur la plankon; aŭ, li konscias pri la kelkfuntoj de legmaterialo premananta lian korpon kaj devas sin movi por ilin forigi.

SESE: La observantinoj de dormantaj viroj. Ĉu por viro povas esti io pli perturba ol la ekscio, ke en la frumatena lumo la virino estas plene veka kaj kritike, penseme observanta lian pro dormo malbelan vizaĝaspekton? Kial ŝi tiel fikse kaj enpense rigardas al li? Mil malbelaj demandoj afliktas lin, kaj mil malagrablaj respondoj brulas lian menson. Kiom longe ŝi tiel vidadis al li? Kian bildon ŝi formas pri tio? Ĉu lia buŝo estis malferma, kiel tiu de kreteno, idioto? Ĉu li aspektis kiel ebria gorilo? Estas frakasitaj lia egoismo, lia memfido, lia persona prezento, belaspekta kaj impresa publika figuro, kiujn li tiel zorge kultivas dum la horoj de la tagoj. Kaptas lin ia paralizo, el kiu li ne povas eltiri sin per afekta facilanimeco en babilo ĉe la matenmanĝa tablo.

La supra skribo estas nur skiza, limhava bildo pri la maldormiĝaj virinoj. Povas esti, ke iam studanto de la dormĉambraj interrilatoj, helpate de centoj da suferantaj atestantoj, faros pli detalan pritrakton pri tiu ĉi dolora situacio inter litkunuloj.

En "La Ekzerkaro" Zamenhof avertas nin, ke "resti kun leono estas danĝere". Ni dankas lin pri tiu informo. Egale trafe oni povus lin atentigi ankaŭ pri tio: ke "dormi kun virino estas malkom-

forte". Sed, ĉar li estis edzo, tre supozinde li jam bone sciis pri tio.—
F.R.B.

SCHOOL MOTTOS



In "The Sydney Morning Herald", May 24, is an article: "Drifting away from Latin". One paragraph mentions Walgett High School. It says: "The newly established Walgett High School understands that it is the first and only school in

Australia with a motto in Esperanto, the language invented in 1887 for universal use. Walgett's motto: Nenio sen Laboro, is Esperanto for the Latin: Nil sine labore, literally, Nothing without labor.

The principal, Mr. Jock Campbell, an old boy of Brisbane Grammar (Nil sine labore) and a member of the Esperanto Society of Australia, decided against Latin ("the universal language of the past") in the hope that the school's sentiments would be better expressed in what he sees as 'the universal language of the future'. The school Parents and Citizens' Association voted its approval'. A block of the motto appears with the article.

S-ro S. J. Campbell, la lernejestro, E-iĝis en 1972. Li skribis: "Post cent jaroj ni ankoraŭ havos la alternejojn en Walgett, kaj esperinde ankaŭ E-o estos jam instruata en ĉiuj Aŭstraliaj lernejoj. Se tio efektiviĝos, la alternejo Walgett povos fieri pro sia iniciato por la movado. Mi skribis al la Estraro de la Stud-objektoj Lernejoj (N.S.K.) petante, ke ĝi konsideru baldaŭan enkondukon de E-o en la instru-planon. Pri la devizo: la gepatroj de la lernantoj, per negranda plimulto, voĉdonis favore al elekto de Esperanto, kontraŭ Latino. Tio multe min plaĉis".

Miss Robertson, John Flynn College, James Cook Univ., Townsville, is writing a curriculum for Esperanto teaching as part of her degree in the Education Course there. She is in her 4th Univ. year. On its completion she will forward it to the Queensland Dept. of Education.

FILATELO

Mi estas 30-jara filatelisto, ankaŭ kolektas bildkartojn kaj dez. korespondi kun Aŭstralian(in)o tiufaka. B. Poprawa, 65-182 Zielona Goras 5, skr. poczt 1, Poland.

RIDETE MOKETE

Verda stelo sur la brusto
Iom palas pro la rusto . . .

Kuŝas ie sub tegmento
"Netuŝebla Fundamento" . . .

Polv-kovrite sur bretaro
Putras mia SAT-Vortaro

Gramatikon mi ne konas
Kaj gazeton ne abonas

Por la venko mi esperas,
Sed neniom mi oferas . . .

Nekrologos gazetisto:
"Estis li Esperantisto".
—J. Baghy.

MALE! IDEALE

Verda stelo sur la veste
Firme mia fid-atesto . . .

Ofte mi kun tut-atento
Studas per la "Fundamento" . . .

Multuzata sur bretaro
Prete staras SAT-Vortaro

Strebas mi al lingvaj konoj,
Spezas por gazet-abonoj . . .

Al la venko mi esperas
Kaj laŭeble mi oferas . . .

Sur tomba mia estu vorto:
"Fidindis li ĝis venis morto".
—Farbo.

HINT FOR CONGRESS

Writing on the British Esperanto Congress at Felixtowe (April), Dr. B. Cavanagh suggests that the following should be adopted.

Some E-ists who will attend are, while more or less good at reading and writing Esperanto, only at the "hopeful" stage as regards speaking the language. All such should make for themselves a badge in fairly large and thick lettering to be read easily at say six feet: **MALRAPIDE**. Seeing this, the more expert will gladly slow down. After all, they too were once beginners. — "News Letter", Feb.

MANKO DE RIMOJ

En "British E-ist" aŭg. 1922, iu rimarkis, ke mankas kunrimo al "bulb", "saŭc", "ŝuld", "fremd", "pingl", "film", kaj "simpl". Multaj radikoj havas nur unu-du kunrimaĵojn. Nun, post 51 jaroj, nur "muld" aldoniĝis por helpi al poetoj.

PETO AL GAZETOJ

Ce nia matena manĝotabla ni jurnale legas nur pri malbonaĵoj — murdoj, seksperfortoj, ŝteloj, trafikaj akcidentoj, incendioj, domraboĵ k.c. Prefere ni legu nur pri feliĉaj aferoj, ekz., ke kelk-milionoj da Usonanoj veturis hejmen sendangere en tiu ĉi semajnfino; tri viroj piediris tra la negra kvartalo Harlem sen suferi rabobatadon; multaj publik-oficistoj estas rigardataj kiel tute senkul-paj pri ia krimo aŭ malleĝa faro; neniu el niaj politikistoj estas akuzita pri satirusa voluptaĵo; miloj da domoj ne incendiigis — kaj ankoraŭ vivas grandega nombro da homoj.

Jen pozitiva, esperiga novaĵo. Tiel la ĵurnalistoj prezentu nian ĉiutagan legmaterialon!

"KEEPING UP WITH ENGLISH"

To understand American English one must keep up with the in-words — the vogue, or nonce words. A new one is "clout". It means: graft exercised for political ends, hidden favors from those in authority. But even the locals get confused over its meaning. Although the euphemism had origin in Chicago, the "Chicago Sun-Times" equated "clout" with a "just yet ruthless exercise of authority (against crime)". Wrongly using the word "clout", it accused a rising politician of something he rigorously strives to suppress, such as the dirty elements in the following examples:

"I don't need a building permit. I got clout in City Hall".

"Hey Charlie, I see you made foreman. Who's clouting for you?"

"You ain't firing me; I got clout".

Here is an sample sentence from that city: "So this beef comes in from a goo-goo that I asked him to make the drop, but just when it looked like I was gonna be vided, my Chinaman clouted for me downtown and it was all squared"

Here are two translations:

A complaint was made by a do-gooder that I solicited a bribe from him, but just when it appeared that I would be fired, my sponsor intervened in my behalf, and the complaint was suppressed in City Hall.

Iu moralaĉisto registris plendon kontraŭ mi, asertante, ke mi kaŝe postulis de li ŝmirmonon. Guste en la tempo, kiam minacis min maldungo el mia ofico, mia protektanto intervenis favore al mi, kaj la Urba Estraro nuligis la plendon.

Foreigners learning "Standard" English should widen their knowledge of the language by taking a supplementary course in "Evolving" English. This course has no time limit.

RALPH HARRY ANEKDOTAS

William Morris Hughes la ĉefministro de Aŭstralio dum la Unua Mondmilito, vojaĝis plurfoje al Eŭropo por viziti la Aŭstralian armeon, kiu batalis je la okcidenta fronto en Francio kaj Belgio. Dum unu tia vizito soldato en la unua vico tiris el sia poŝo foton, iome ĉifitan, kaj diris al la ĉefministro: "S-ro Hughes, okaze de via pasinta vizito mi prenis ĉi tiun foton. Mi ŝatus prezenti ĝin al vi, kvankam certe ĝi ne traktas vin kun justeco".

Hughes, prenante la foton, diris al la soldato: "Mi dankas vin, mia amiko, sed mia vizaĝo bezonas ne justecon, sed kompaton!"

KREDO (Masefield)

Mi kredas, ke, kiam la homoj mortas,
Anim' ilia al ĉi ter' revenas,
Kaj novan karnoveston ĝi surportas;
El naskofont' alia ĝi devenas.
Kun freŝa forto, klara mensa povo,
Gi iras for al nova vivoprovo.

Originalo: A CREED

I hold that when a person dies,
His soul returns again to earth;
Arrayed in some new flesh-disguise,
Another mother gives him birth.
With sturdier limbs and brighter brain,
The old soul takes the road again.

LA SUDA KRUCO; LA RONDO;**The Australian Esperantist**

La Suda Krucio: July, 1920-Oct. 1934 = 165 numbers.

La Rondo: June 1947 - Dec. 1957 = 80 numbers.

The Australian Esperantist: Jan. 1958 until now = 119 numbers.. The figure in parentheses: 119 (198), indicates the combined issues of La Rondo and The A.E. With those of La Suda Krucio the combined issues total 363.

In the period Oct. 1940 — first quarter 1947 La Rondo was issued monthly in mimeograph. These 76 numbers are not included in the above.

P. 280, Sept., 1969, correct thus:

La Rondo (mimeografe) — okt. 1940 ĝis Unua Jarkvarono 1947, 76 nroj.

La Rondo: jan. 1947 - dec. 1957, 80 nroj.

The three gazettes are of the same format and similar in content, except for the October 1942 - October 1944 issues: 8½ x 10½ in. They present one and the same Australian Esperanto publication. Only the titles were changed.

EPITAFIO DE AVARULO

Li adiciis kaj multiplikis, sed neniam subtrahis. Liaj dankplenaj heredintoj — dividis.

RECENZOJ

POPIDO (=Popola Idiomo): La Verda Dialekto. Projekto de Manuel Halvelik. Eld. Sonorilo, Kirklaan 61, B8000, Brugge. 56 grandaj mimeografitaj paĝoj. 200 Belg. fr.

En la "A.E.", junio, 1970, aperis recenzo pri verko de la aŭtoro: "Arkaika Esperanto". Per eldono de "Popido" li prezentas pluan pritrakton de sia "verda dialekto". Li citas dirojn de T. Pump: "Mi rompis al mi la kapon pri la demando kiel esprimi dialekthan parolon de la salamandroj," en la verko de Karel Capek: Milito kontraŭ la salamandroj," ankaŭ vortojn de F. Faulhaber: "La traduko de dialekto en Esperanto ne tro deflankiĝu de la korekta Esperanto kaj ĉiukaze estu simila al ĝi kaj facile rekonebla".

Strebante elpensi solvon al la problemo de Pump, li ne sekvas la konsilon de Faulhaber.

En dialogo, Pravigo, uzante Esperanton, Halvelik defendas sian projekton, kvazaŭ ventroparole uzante pajlohomon, kies demandojn kaj kritikojn li kompreneble disbatas. Harditaj E-istoj eble povus trovi en tiu ĉapitro iom da prilingva intereso, sed verŝajne ne multe da praktika profito.

La aŭtoro asertas sian projekton rezulto de almenaŭ seso da revizioj kaj dekomencaj reverkoj kaj avertas, ke "nova versio de donita projekto malvalidigas ĉiujn antaŭajn versiojn". Per tio li sekvas la vojon al fiasko, laŭ kiu pene paŝis ĉiu ĝisnuna projekto de internacia lingvo. Ĉiam ŝanĝigante, ili senstabile mortis. Male, pro sia roka fundamento, Esperanto ankoraŭ vivas, post preskaŭ jarcento.

La cetero estas plejparte verkita en lia "idiomo"; ĝin konsistas el krestomatario de literaturaj, gramatikaj kaj glosario. Nur homoj obsede reformismaj longe lasus la okulojn lacigi super tiu stranga galimatio.

La kritiko en la recenzo antaŭa principe aplikigas ankaŭ ol la nuna verko. Unu virton de Havelevik oni povas senrezerve admiri: lian intensan fervoron serĉi solvon al unu aparta aspekto de la homa interkomunikado, nome la problemoj pri dialekto, kripligita kaj vulgaraĉa parolo — kaj lian sinoferon planmane elspezi lian monon, tamen vee en maniero danĝera por la sola venkova planlingvo: Esperanto. Por ĉiu firmida E-isto restus firma konvinko, ke li serĉe stumblas, vane sekvante himeron, anstataŭ dediĉi siajn cerbon kaj rimedojn kun homoj celantaj ĝeneralan akcepton de la jam elpruvita Lingvo Internacia.

Pri la supra: Eksperimentis pri parolo de ebrulo H. Wilson tradukinto de "Tatterley" (1912); M.C. Butler, pri infana Esperantajo ("Literaturo", nro 12); T. Morariu en "Niĉjo Mensogulo" pri singultanto kaj infano; Cezar Rossetti en "Kredu min, Sinjorino" pri misprononco de Esp-istoj; J. Baghy en "Viktimoj" kaj "Dancu, marionetoj" simile faris. Zamenhof en "Lingvaj Respondoj", indekse: Stilo (Esperanto), prituŝas la demandon en tio, kio koncernas lian tradukon "La Revizoro". Vidu ankaŭ: "Originala Verkaro", p. 92.

Aperos en THE A.E. artikolo pri "Sonimita Kripligo".

"**Junularo**": magazino el la Germana Demokratia Respubliko. Forte ilustrita. 64 paĝoj el glatpapiro, forte broŝuritaĵ. Eldonis "Zeit im Bild", Dresdeno.

Per ĝi oni informiĝas pri la stato de gejunuloj en G.D.R. kaj ilia ĉiufanka rolo en tiu jam suverena ŝtato. Aviza folio invitas petojn pri senpaga sendo de la broŝuro, kaj posteaj komentoj pri ĝi enhavo.

Kelkaj paĝoj aperas per nigra inko sur blua fono. Tio estas presteknike nebona, pro neklara legebleco. La plej bona estas: nigra inko sur **flava** papero.

Edition Leipzig., 701 Leipzig, P.F. 340, eldonos fine de 1973 "Nuda inter Vulpoj" ("Nackt unter Woelfen"), romanon de Bruno Apitz, tradukitan de Karl Schulze. Ĝi jam aperis en 20 lingvoj kaj estas prezentita ankaŭ filme kaj radie. Temas pri la lastaj semajnoj de la koncentrejo Buchenwald, ĉe la fino de la Tria Regno. Sensacia verko, kiu apartenas al la plej multe aĉetataj libroj en G.D.R. C. 400 paĝoj; ĉ. 3-4 dolaroj.

"TELOPEO"

estas la organo de la E-Fed. de Nova Sud-Kimrujo. La maja nro enhavas raporton pri la konferenco en Kiama; alvokon al naturistoj, t.e. naturesplorantoj; artikoletojn de membroj kaj utilajn informojn. Havebla ĉe Wre Chandler.

KATOJ SEN MUSOJ

Sur p. 425, Plena Gramatiko (2-a eld.) ni legas, ke "Se foriras la ratoj, festenas la katoj". Strange nova informo. Pro kio do ili festenis? Jam en 1578 John Florio proverbe kaj prave skribis: "When the cat is abroad the mice play".

Por ĝvi plensate okazon festenan, oni devas ja havi la ventron plenplenan. Sen karvo de ratoj, malsatas la katoj.

INSTRUISTOJ

Pri letero sub Libera Forumo (aprilo nro): Komence en la Sidneja Klubo estis nur du lernantoj en la porinstruista klaso. Ili jam sufiĉe bone progresis por instrui aliajn. Wre Chandler (emerita profesora instruisto) konsilis al ili: kiel elekti lernlibrojn, aranĝi lecionojn, uzi nigran tabulon, klarigi gramatikajn k.a. problemojn, fervorigi kaj E-e paroligi lernantojn, E-aj instruistoj estas urĝe bezonataj; tial tiuj du personoj (viro kaj virino) ne ricevis multajn lecionojn, sed ili jam instruas klasojn por komencantoj kaj, tiel farante, ili mem sendube progresas. — Laŭ raporto de S.E.S.

MEMBRECO DE B.E.A.

Membro de la Brita Esperantista Asocio: 1967 (1498); 1968 (1441); 1969 (1485); 1970 (1470); 1971 (1395); 1972 (1396). — Laŭ Jara Raporto, "B.E." 4/73.

Vide al tiuj ciferoj, ni forte petas al ĉiuj fari-povaj Aŭstraliaj E-istoj, ke ili konsideru aligon al tiu grava asocio. Ken Linton estas peranto.

Those not willing or able to become full members of the B.E.A. may become Associates for a nominal subscription of 50 English pence. They would receive a Certificate of Associateship, a copy of the "British Esperantist" with the annual report once a year, and a Handbook with the "Newsletter" intermittently. In addition, local representatives will try to keep them informed of Esperanto activities. Tangible proof of the good will towards Esperanto on the part of so many in the community would give both moral and financial support to the Association. So, failing your acceptance of full membership, express your willingness to help through a modest outlay. — Ken G. Linton is agent.

POŝTO KAJ METRA SISTEMO

En oktobro la Poŝto laŭmetre pesados poŝtobjektojn. La tabelo prikosta montras gravajn malpliigojn ĉe leteraj kaj gazetaj pezaj. Duonunco (14.2 gramoj) estos reduktita ĝis nur 10 gramoj. Unu unco (28.3 gr.) ĝis nur 20 gr. Du uncoj (56.7 gr.) ĝis nur 50 gr.

Mi forte sentas, ke per tiu ago la Poŝto — institucio sub registara kontrolo — donas malbonan ekzemplon al la komercistoj, varvendistoj k.s. Al tiuj ĉi homoj la publiko daŭre elvoĉas sian suspekton, ke ili iel ekspluatas por sia profito la ŝanĝon de la mezursistemo. Per la Poŝta ekzemplo, oni vidas nude klaran ateston, ke la ŝanĝo estas nenio alia ol malkaŝa rabago kontraŭ la

publiko.

Pro ĝia ekzemplo, mankas al la registaro firme morala bazo por akuzi komercistojn k.s. pri ekspluato. Mem evidente kulpa, ĝi staras sur kaĉa marĉo. — Kulo.

(En sia gazeto la Poŝto klarigas jene: Kvankam 20 gr. estas malpli ol unco, enketistoj konstatis, ke preskaŭ 90% de ĉiuj Aŭstraliaj leteroj en kategorio unuonca pezas ne pli ol 20 gr. Sekvas, ke tiuj leteroj aŭtomate estos konformaj kun la nova pes-sistemo, alivorte sendantaj ne sentos diferencon.

Pri flugleteroj: La pezo estas signifa kost-elemento pro alta porto-kosto, sed, kiam la pezaj estos reduktitaj sub la metra sistemo, ankaŭ la pagpostulo estos ĝuste modifita.

Bedaŭre, mi, kun aliaj — precipe gazet-ekspedantoj — troviĝos en la 10% de homoj, kiuj forte sentos la reduktojn sub la nova sistemo. La nova tarifo estas bato al homoj multe kaj ofte sendantaj leterojn kaj gazetojn. Mi mem sendas minimume 360 leterojn ĉiujare por traduka kurso, krom centoj kaj gazetoj en ĝenerala korespondado. — Red.)

DIO HELPAS HOMOJN KIUJ SIN HELPAS

En la tempo kiam Johano kaj mi estis malriĉaj junaj raportistoj, ni suferis teruran mankon de mono. En iu tago ni nepre devis havigi al ni tri dolarojn. Johano elspiris konvinkon, ke la bona Dio certe ĝin provizos.

Ni vagis en hotelan promensalonon, pensante pri tiu problemo, kiel akiri la monon. Ni sidigis sur sofon. Venis belega hundo, kiu fine restigis la kapon sur mian genuon. Bonstate aspektanta ĝeneralo paŝis apud mi kaj haltis por karesi la hundon. "Jen bonega besto; ĉu vi vendus ĝin al mi?"

Mi sentis emocijon. Jen mirakle la antaŭdiro de Johano — Dio provizos! — fakte prenas realan plenumiĝon. "Jes", mi respondis; "ĝia prezo estas tri dolaroj."

La ĝeneralo miris. "Nur tri dolaroj! Mi mem ne vendus ĝin kontraŭ 100 dolaroj."

"Ne. Tri dolaroj, nur tio," mi firme diris. La ĝeneralo formarsiis kun la hundo.

Post kelke da minutoj aliris nin malgaje-vizaĝa viro, maltrankvile ĉirkaŭrigardante ĉiudirekten. Mi demandis: "Ĉu vi serĉas hundon?"

Lia vizaĝo eklumiĝis. "Jes ja. Ĉu vi ĝin vidis?"

Nur malofte mi vidis homon tiele tre feliĉa. Mi varme esprimis esperon, ke li pagos al mi tri dolarojn por la informo-helpo. Ho certe! La kosto tute ne gravas al mi. Volonte mi pagus al vi dek!"

Mi diris: "Ne! La kosto al vi estas nepre nur tri". Rimarku bone, ke Johano jam diris, ke la tri dolaroj estas la monkvanto, kiun provizos la bona Dio. Estus do pekpeke postuli pli.

Mi paŝis al la ĉambro de la ĝeneralo kaj klarigis al li, ke kun ega bedaŭro mi devas postuli redonon de la hundo; ke mi vendis ĝin al li en momento de psika malforto. La grandanima viro ofereme redonis la hundon, kaj mi pagis al li liajn tri dolarojn.

Tiam kun bona konscienco mi foriris lin. Mi ja estis aginta tute honeste. Sciu, ke mi neniam povus esti uzinta la tri dolarojn, kontraŭ kio mi vendis la hundon, ĉar la hundon mi ne rajte posedis, do ne rajtis vendi ĝin. Sed la tri dolaroj, kiujn mi ricevis por la feliĉiga informo estis rajte mia. Supozinde tiu homo ne estus ricevinta sian hundon, se mi ne donus al li la informon. — Mark Twain.

LA BULGARA E-ASOCIO

Ĝi estas la plej granda kaj forta land-asocio E-a en la mondo. Ĝi havas 5,100 membrojn, kio, same kiel en aliaj landoj, estas nur parto de ĉiuj personoj posedantaj la lingvon en pli-malpli alta grado. La loĝantaro Bulgarujo estas nur ĉ. 8½ milionoj. Organizitaj E-istoj en la Brita, Germana kaj Franca landasocioj kune nombras ĉ. 4,500 entute. En la kvin Skandinaviaj landasocioj kune—ĉ. 3,800, el kiuj nur la Sveda ĉ. 1,800. Bulgarujo estas la sola lando en kiu la E-movado estas jam preskaŭ amasa. — "E". 4/73.

BELGRADE CONGRESS

Will atend: Prof. and Mrs. R. Robertson; Dr. and Mrs. Einihoviĉi; Mesd. V. Payne, Betty Cleminson and Eunice Graham; Carlos Amat.

IĜIGI ?

Ĉu i-ĝigi estas uzebla? Jes. Marko 1/17: "Mi iĝos vin fariĝi fiŝistoj". Tial, "Mi fariĝigos vin" Apokalipso 3/9: "Mi iĝos vin adorkliniĝi" = adorkliniĝigos vin.

TIU SPIRODORO !

Jen granda sekreto por konservi la sanon: manĝi krudajn bulbojn.

Tre interese; sed rimarku, ke tio estas tre malfacila por konservi la sekreton.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: Mrs. M. Chaldecott, 16 Grosvenor Road, Lindfield, N.S.W. 2070

Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 120 (199)

MELBURNO

Aŭgusto, 1973



JAN. 2-8
1974.



LA 19A AŬSTRALIA ESPERANTO- KONGRESO BRIZBANO

Mail your Congress Fee to **Mrs. S. Martin, 41 Launceston St, Salisbury 4107**
Fee for A.E.A. members \$7.00, others \$8.00. Add \$10 deposit for accommodation at International House of Brisbane University. (Enclose stamped addressed envelope for receipt and further Congress Information).

Seventh List of Congress Members

74. Mr. O. Behncken, Camp Hill, Qld.
75. Mr. N. Gamble, Canberra
76. Miss J. Reader, Braeside, Vic.
77. Mr. V. Bourlin, Turramurra, NSW
78. Miss I. Gale, Glen Waverley, Vic.
79. Prof. R. G. Robertson, Northbridge, NSW.
80. Mrs. M. Robertson, Northbridge, NSW.
81. Mr. D. Wright, Camp Hill, Qld.
82. Mr. E. Thatcher, Fairlight, NSW.
83. Mrs. M. Jones, St. Lucia, Qld.
84. Mrs. L. Goldsmith, Manly, NSW.
85. Mrs. T. Smith, Punchbowl, NSW
86. Mr. N. Collier, Bowen, Qld.
87. Mrs. A. Strang, Redcliffe, Qld.
88. Mrs. V. Clarke, Scarborough, Qld.
89. Mrs. D. Styles, Clontarf, Qld.
90. Mr. C. Lanyon, Parkdale, Vic.
91. Mr. E. Tronerud, Melbourne.

92. Mrs. M. Tronerud, Melbourne.
 93. Mr. U. Talbott, Ferny Grove, Qld.
 94. Mrs. E. Mathers, Groveley, Qld.
 95. Mrs. H. Andrew, Coorparoo, Qld.
 96. Miss C. Sullivan, Hamilton, Qld.
 97. Mr. R. Clayton, Kelvin Grove, Qld.
 98. Miss D. Dean, Tusmore, S.A.
 99. Miss P. Dean, Tusmore, S.A.
 100. Mrs. B. M. Chester, City Beach, W.A. (Winner of second Book Prize).
 101. Mr. J. McBride, Gaythorne, Qld.
 102. Mrs. G. Grant, Stafford, Qld.
 103. Mr. A. Grant, Stafford, Qld.
 104. Mr. V. Timmins, Waitara, NSW
 105. Mrs. N. Moore, Nth. Rockhampton, Qld.
 106. Mr. J. Moore, Nth. Rockhampton, Qld.
 107. Mrs. J. Roth, Annerley, Qld.
 108. Mr. L. Scott, Manly, NSW.
 109. Mrs. E. Taylor, Palm Beach, Qld.
 110. Mrs. O. Bliesner, Narrabeen, NSW
 111. Mrs. L. Buchan, St. George, Qld.
 112. Miss A. Hearn, Malvern, Vic.
 113. Miss C. Lamont, Manly, NSW
 114. Mrs. D. Neddrie, Rockhampton, Qld.
 115. Mrs. D. Buckingham, Nedlands, W.A.
- State Distribution: Qld., 51; NSW, 28; Vic., 26; S.A., 2; W.A., 2 A.C.T., 1; Overseas, 5.

Drama Konkurso

Urĝa Peto: Car la lupagon por la Schonell Teatro ĉe la Universitato oni devas pagi antaŭ la 1-a de Oktobro, la Loka Kongresa Komitato devas scii kiu intencos partopreni en la Drama Konkurso. Bonvole sendu — antaŭ la 30-a de Sept. — tiun necesan informon al: S-ino W. Greenhalgh, 39 Ryan Rd., St.

Lucia, 4067. (Atentu teatraj grupoj en Mahly kaj Oakleigh!).

OFICIALA INFORMILO

NOVAJ ANOJ:

Leereveld, Ges-roj M. Belgrave, Vic.
Pescod, S-ro D., Balwyn, Vic.

T.G.M.F.:

Bennett, S-ino B. Maroubra, NSW \$0.50
Addis, S-ino W. Adelaide, S.A. 2.20
McGrath, S-ino R., Mt. Pleasant
W.A. 2.00
Simpson, S-ro A. R., Kew, Vic 10.00
Fayer, S-ro L. Muswellbrook NSW 3.00
Macias, S-ro J., Gove, N.T. 2.00

La ordinara Generala Kunveno okazos Vendredon la 4an de januaro 1974 ĝis Lundo la 7a de januaro 1974 je la Universitato de Kvinslando en Brisbano.

Proponoj prezentotaj je la Brisbana Kongreso povas esti ekspedataj pere de la sekretario A.E.A. — Russ Baxter, Sek.

PROPONOJ POR KONSIDERADO JE LA A.E. KONGRESO 1974

La subskribintoj estraranoj de A.E.A. deziras prezenti al vi Proponojn sekvantajn:—

1. ke ni plialtigu la kotizon ĝis ses dolaroj.
2. ke ni plialtigu la kostojn de la korespondaj kursoj tiel sube:
Populara Kurso — \$8.
Mezgrada Kurso — \$12.
Altgrada Kurso — \$16.
minus sumo por librojn nebezonaĵojn kiel nuntempe.
3. ke la 1976-a Kongreso estu en Sidnejo N.S.K.
4. ke ni diskutu la eblecon de Tutpacifika Kongreso.

La sube nomataj estraranoj volas sin prezenti por reelekto al la A.E.A. estraro.

R. G. Robertson, Prez.
R. W. Baxter, Sek.
Les Scott, Kas. — 29 junio.

A.E.A. EXAMINATIONS

Elementary, Advanced, Final (Elementa, Supera, Klereca.) They are open to all, and have no relation to the Correspondence Courses mentioned above. It is, however, a good idea to do one or more of the Courses before entering for the Examinations. Ask for details from Russ Baxter, secretary, to whom all fees should be sent.

FILATELO

Mi interŝanĝas poŝmarkojn. Lutz Deuter, 532 Apolda, H-Rau-Str-16, G. D. R.

AUSTRALIA KRONIKO

PERTH: Je 14-a de Junio la urbo Perth oficiale bonvenigis la ambasadoron de Brazilo. Nia Ligo ricevis inviton al tiu akcepto, kaj Chris kaj Dolly Dean reprezentis nin.

MELBOURNE: 28/5: Ken Linton prezentis lumbildojn pri Nepalo, Katmanduo, Hongkongo (Vidu nian raporton en la julia nro.)

Je 18/6 Kim Bastin, kiu antaŭ ne longe revenis el Finnlando, faris interesan prelegon pri Matias Castrén, finna esploristo, sciencisto kaj lingvisto, kiu studis 13 lingvojn kaj dialektojn, el kiuj kelkaj jam formortis. Li speciale interesiĝis pri la Samojedoj.

Kiel gasto de Herbert Koppel, kiu festis (25/6) la 25-an datrevenon de alveno en la Melburna E-Societo, la anoj partoprenis en diversflanka programo de konkursoj kun premioj, post parolado de H. K. pri la klubhistorio dum la pasintaj 25 jaroj. Ĉiu ĉestanto ricevis donacon kaj luksa vespermanĝeto finis la vesperon.

"Novajoj el la Aŭstralia Poŝtoficejo" estis prezentitaj popece de pluraj klubanoj (9/7).

MORWELL: Por festi la 4-an datrevenon de nia fondiĝo, klubanoj ĉestis koncerton de la "Yallourn Madrigal Singers". Ni finis la vesperon per vespermanĝeto en la hejmo de Ges-roj W. Wybenga. Malfeliĉe, niaj membroj el Yarram kaj Won Wron ne povis ĉeesti pro densa nebulo.

OAKLEIGH, Vic.: Je 13-a de Junio, dudek du el niaj anoj estis bonvenigitaj ĉe la hejmo de S-ino Silva, klubano kiu devenis el Litovujo. Traplektitaj en la programo estis parolado kaj kantado, plejparte Esperante, kaj manĝado, multe da manĝado! de manĝaĵo preparita laŭ litova maniero. Tre bongusta. Dank' al la gastamo de S-ino Silva, ni ĉiuj multe ĝuis feliĉan kaj interesan okazon.

SYDNEY: 18/6: Nia gastparolantino, Kay Morrison, informis nin, ke estas eble vivi ĝis granda aĝo, se oni obeas la regulojn de la Natura Sano Asocio. Per oboe ŝi regajnis sanon kaj ankoraŭ restas sana. Cefgravaj estas dieto, korpa ekzerco, pura aero, sunbrilo, ripozo kaj plezura mensokupo. Si diris, ke, por ŝi mem, Esperanto, ĝardenado kaj pentrado sufiĉas por tiu lasta. Si studis la metodon kaj poste laboris kiel "Natura" flegistino. Do, se vi deziras longan sanan vivon, lernu Esperanton!

25/6: Sub gvido de Joan Green, ni antaŭprovis teatraĵojn por posta prezento ĉe kunvenoj.

1/7: Laŭ invito de Dorothy Hasluck, kvin anoj alestis ŝian hejmon por E-babilo kaj teo.

2/7: E. Veis, vizitanto Jugoslava, rakontis en flua E-o "Kiel Mi Farigis Idisto". (Wre Chandler klarigis pri Ido — ĝia penpena vivo kaj fina malapero). Kiam junio, S-ro Veis estis en Svislando. Tie li partoprenis publikan debaton pri la meritoj de Ido kontraŭ Esperanto. Li informis la debatantojn, ke li lernis Idon seninstruiste en du monatoj. La E-a grupo dubis tiun lian diron. Li informis la kunvenon, ke tion li povis fari, ĉar li jam antaŭe sciis kaj parolis Esperanton. Rezulto: Esperanto venkis ĉe la debato.

9/7: Roger Springer, gastparolanto, diskutis la translokigon de registaraj departamentoj al Bathurst. Li devas fondi novan hejmon tie, kontraŭ sia volo, ĉar li jam havas "radikojn" en Sidnejo. Kiel ĉe aliaj "samideanoj" li devas akcepti la situacion, kaj la oficon, ĉar estas malfacile trovi alian laboron sen perdo de privilegioj pro longa servo. Li "faligis bombon", kiam li asertis, ke "viroj devas esti liberigitaj" ĉar la viroj sin ellaciigas, laborante por la hejmo kaj en milito devas batali kaj eble mortfali. La virinoj ne suferas tiunmaniere; do, li diris, la viroj estas viktimoj de diskriminacio. Viglega diskuto sekvis!

ROCKHAMPTON: La bona novaĵo pri niaj kursoj estas ke ili ĉiuj ankoraŭ daŭras, kun bonaj, entuziasmaj lernantoj. Gratulon al Joyce Taylor, nova Fakdelegito pri Eduko.

Esperanto-Federacio de Kvinlando

La kvara kunveno de la E.F.K. okazis en Bundaberg je la 2-a kaj 3-a de Junio. Estis la unua okazo por E-istoj el Rockhampton partopreni kunvenon de E.F.K. La vetero estis perfekta, la kongresejo taŭga kaj komforta kaj la programo interesa. La loka gazeto "Bundaberg News-Mail" intervjuis John Moore, kaj la A.B.C. radio anoncis la kunvenon.

Sabate (2/6) dudek ok membroj ĉeestis la vespermanĝon, sekvanta de amuzvespero. Lumbildoj pri Bundaberg, skeĉoj kaj kantoj alternis. Dimanĉmatene okazis kunveno de la E.F.K. en kiu partoprenis reprezentantoj de 7 Kvinlandaj E-Grupoj. Laŭ la kasista raporto la financo estas tre sana. \$172.64 certe estas bona bilanco por tiel juna organizaĵo. Oni decidis organizi la 5-an Konferencon je 1-2a de Sept. en Buderim.

Post la oficiala kunveno, membroj veturis al la marbordo ĉe Bargara kaj

piknikis en agrabla ĉirkaŭaĵo. Vespere okazis ludoj, kantoj kaj interesa prelego de Val Robinson pri Japanujo. Koran dankon al la Rockhamptona Grupo, kiu respondecis pri la konferenco.

LA UNUA KONGRESO . . .

Oni nomas la Unua Esperanto-Kongreso tiun, kiu okazis en Boulogne (Bulonjo) en 1905, sed verdire la Unua E-Kongreso Internacia okazis en Calais-Dover en aŭgusto, 1904 ("Lingvo Internacia", nro 9 (105)). 200 E-istoj ĝin vizitis, el diversaj landoj. D-ro Zamenhof ne ĉeestis ĝin ĉar tiutempe li kaj liaj fratoj atendis alvokon al la Manĉuria batalkampo. Poste, D-ro Zamenhof liberigis de tiu postulo, pro sia aĝo kaj farto, kaj li promesis alesti la kongreson en Boulogne-sur-Mer.

Iom pri tiu unua Kongreso E-a: 7-8 aŭgusto, 1904. — Kapitano Cape estis ĝia prez-o. S-ro Kuhn, Mudie kaj Michaux flue alparolis ĉeestantojn; S-ro Pourcines sugestis pri unu komuna signo E-ista. Fonografie oni aŭdis himnon "En la Mondon . . ." kantitan de Bohemo, Anglo, Franco, sen rimarkebla elparola diferenco.

La duan tago kongresanoj alveturis per vaporŝipo "Le Nord" al Dover. La prez-o, S-ro Walmisley, kaj Anglaj amikoj ĝoje akceptis la vizitantojn, kiuj antaŭ la hotelo "Lord Warden" kantis: "Dio Savu la Reĝon" publike en Esperanto, poste "La Marseljezon" en kafejo. S-ro Walmisley, eksurbestro kaj prez-o de la loka E-grupo, legis varman saluton de S-ro W. Crundall, la tiama urbestro.

Shirley Fanos sendis al ni raporton pri la afero kompilitan de A. v. d. Hoeven (Den Haag). Estas interese ĝin kompari kun la pli plena de H. B. Mudie en "The Esperantist", sept-o, 1905, sed, ho ve, nur mi posedas la solan kompletan kolekton de tiu gazeto en la Suda Hemisfero. — Red.

KIOM DA LINGVOJ ?

Estas neeble ekscii la precizan nombron de la lingvoj parolataj en la mondo, ĉar ekzistas multaj lingvoj, kiuj ne havas alfabeton kaj fiksitajn gramatikajn regulojn. Tial estas malfacile diferencigi la lingvojn mem disde iliaj dialektoj. Tamen ni povas diri, ke la homoj parolas per proksimume du mil lingvoj. Krome, multaj lingvoj formortis en la kurado de la pasintaj jarmiloj.

En "International Language", Feb. 1928, estas recenzo pri Katalogo de Lingvoj. eld. de UEA. "Les Langues du Monde", de Meillet (1924) donas liston de 3600 lingvoj.

Artikoloj pri la problemoj sin trovas en la Jarlibroj de UEA (1925 kaj 1927).

CLANCY DE LA ELFFUEJ' (A. B. Paterson)

Mi forsendis la leteron ĉar mi vartis la esperon,
Ke mi trafos lin en Laklan, la antaŭa laborej'
La laboro — ŝafotondo. Eble venos la respondo,
Kvankam kurta la adreso: Clancy de la Elfluej'.

La respondon iu sendis, kaj la formon mi komentis:
Sajne skribis ĝin kolego per polekso kaj la peĉ'.
Saftondist' por skribi ŝvitis; jen laŭvorte mi ĝin citis:
"Clancy en Kvinŝtato" vakeras, kaj adreso mankas eĉ'.

En la kapon venas danci stranga fantazi' pri Clancy,
La vakero kiu gvidas brutojn lau la ŭesta voj'.
La brutaro migras lante, kaj ĝin sekvas Clancy kante;
La urban' nenion scias pri vakera vivoĝoj'.

Sovaĝej' bonvenon montras, kaj amike lin renkontas
La murmuroj de ventetoj kaj river' sur roka bar'.
Kaj li vidas la ebenon kiel vastan sunan scenon,
Kaj dumnokte la eternan ĝlorobrilon de l'stelar'.

Sed en oficeja fumo, kie lumradi' de suno
Feble luktas por eniri tra domegoj de la strat',
La fetoro de l'civito kun odor' de polva ŝvito
Tra l'fenestro ĉiun kozon (I) malpurigas sen kompat'.

Kaj anstataŭ bleko bruta min agacas bru' akuta
De la tramoj kaj la busoj en senfina rapidem';
Kaj la batalemaj vortoj de la strat-Infanaj hordoj
Min atingas tra l'paŝado de l'ĉiama homoprem'.

La hastemo de la homoj kun vizaĝoj de fantomoj
Min timigas kiam ili sin ŝancelas en konfuz';
La okuloj tro avidaj, kaj la korpoj kuroŝvitaj;
Por urban' ne estas ĝojo, nek la temp' por sinamuz'

Fantazie povas ŝanci: mian lokon prenos Clancy,
Ke fariĝu mi vakero en la vasta sovaĝej';
Li al kontoj sin dediĉu: sed tre forte dubas mi ĉu
Al la oficejo taŭĝus Clancy de la Elfluej'.
— Tradukis el la Angla: L. N. M. Newell.

Clancy (elp. klansi). (I) kozo = aĵo. The A. E. 12/67, 12/72.
La originalon oni povas legi en ĉiu bona antologio de la Aŭŝtralia poezio.

WENN ICH AN . . . (Heine)

Matene, kiam mi iras
pretere, estas festo
por mia kor', knabinjo,
ekvidi vin ĉe l'fenestro.

La nigrebrunaj okuloj
riĝarde min esploras:
"Fremdul' suferanta, kiu
vi estas, kio doloras?"

"Mi estas Germana poeto
konata en Germanuj',
se citi nomojn plej famajn,
oni citas la mian tuj.

Kaj mia dolor', ho knabinjo,
jam ofta en Germanuj';
se citi suferojn plej akrajn,
oni citas la miajn tuj."
—G. Waringhien.

Kiame pasas mi je via hejmo
promene en la freŝo de l'mateno,
ekĝojas mi, amata virineto,
vin vidi ĉe fenestro. Kia beno!

Okuloj nigre-brunaj al mi vidas
penetre. Aŭde venas al mi diro:
"Ho, kiu vi? Kaj kio dolorigas
al vi, strangeta kaj malsana viro?"

"Poet' Germana, mi al vi atestas,
tra tuta Germanlando famkonata;
kaj inter la plej ĉefaj poetnomoj
la mia estas kun honor' nomata.

Kaj tio, kio min ja dolorigas,
afliktas multajn en la land' Germana;
sed, oni nomu eĉ la plej-malbonon —
en koro mia mordas tiu sama".
—F.R.B.

LA NOMO DE ZAMENHOF

Estas embarase rimarki, ke verkistoj ne konsentas inter si pri la ĝusta nomordo de la Doktoro. Mallonga serĉo elmontras jenon:—

Ludoviko Lazaro: Zakrzewski (Historio de Esp., 1913); Enciklopedio de E.; Privat (Vivo de Z., BEA-eldono, 1920); Ludwig Lazarus (Clark, International Language, 1907); Ludovic Lazarus (Durrant, The Language Problem, 1943).

Lazaro Ludoviko: Privat (Historio de E.); Lapenna (Memorlibro, p. 33); Marjorie Boulton (Zamenhof: 1962); Waringhien (Memorlibro); la unua, provizora, tomoŝtono en Varsovio: Ludwik Zamenhof; la dua 1918: Lazaro Ludoviko Zamenhof.

La konfuzo estas komprenebla. Jen klariga provo de N.Z. Maimon en "Nica Lit. Revuo" 9-11, 1959: (Lia nomo) "estis notita kaj registrita per la ŝtata aŭtoritato . . . Restis oficiala dokumento, la enskribo en la naskregistro (kopiita kaj presita en "Esperanto Triumfonta", 1922, n-ro 15), kiu donas informon pri la nomo. Ĝi diras: Lejzer. Tiu do estas la nomo de la infaneto, oficialigita en la naskregistro. Sed ĉi tiu nomon la postaj dokumentoj ne montras. En ili, li estas nomata; Lazar. Pli poste tiu nomo estas anstataŭigita per Ludoviko. Dum la jarcent-turniĝo la nomo Lazar denove aperas, sed kunigita kun Ludoviko: Lazaro-Ludoviko".

Zamenhof definitive parolas por si mem: "**Mia plena nomo estas Ludoviko Lazaro**" (Originala Verkaro, 482).

En "Memorlibro pri la Zamenhofs Jaro" sin trovas du fotoj: letero de Z. kaj vizit-karto lia. Sur la letero (26.11.07): Dro L. Zamenhof (preslittere); sur la karto: Dr. Ludwik Samenhof. Li loĝis ĉe str. Dzika 9 de Nov. 1897 ĝis 1914. Notu, ke en 1904 li jam skribis al Berlinaj E-istoj: ". . . mi skribas mian nomon per Z., kvankam ĝi havas devenon germanan" (O.V., 428).

RALPH HARRY ANEKDOTAS.

Duvizaĝa Fripono.

Sir George Reid, antaŭ multaj jaroj ĉefministro de la Aŭstralia federala ŝtato Novsudkimrio, havis famon kiel sprita oratoro. Super ĉio li povis respondi tuj al homoj kiuj interrompis liajn politikajn paroladojn.

Unu vesperon estis en la kunveno virino kiu konstante interrompis per nekomplicitaj krioj. Fine, klopodante embarasi Sir George, ŝi laŭte kriis: "Vi estas duvizaĝa fripono, Reid".

Sir George paŭzis momenton, tiam komentis al la ĉeestantaro: "Mia amikino diras, ke mi estas duvizaĝa. Almenaŭ ni scias, ke ŝi mem ne havas du vizaĝojn, alie ŝi estus lasinta en la domo tiun, kiun ŝi nun partas!"

(Simile oni rakontas pri Abraham Lincoln. Stephen Douglas nomis lin "duvizaĝa viro". Respondis Lincoln: "Ĉu vere vi kredas, ke mi portus ĉi tiun vizaĝon, se mi posedus alian?" "Reader's Digest", 3/63. — Red.)

HOMARA FRATECO

Jen homo fiksradika en la patra tero— Ignoras li mirindojn de la mond-cetero; Li pensas nur pri bono de la propra lando,

Malŝatas fremdajn homojn jam de vert' ĝis plando.

Se vi amikon alilandan ne deziras,
Malmulte pacon interhoman vi sopiras.

—Traduko de skribo en la Junulargastejo (Landeck, Aŭstrio).

CERTA

Jam en 1911 (Respondo 57) Zamenhof skribis: "Krom sia ĉefa senco, la vorto 'certa' havas ankoraŭ la sencoj de 'iu' (ne en la senco de 'kiu ajn', sed en la senco de 'iu difinita'); la uzado de 'certa' en la senco de 'iu' tute ne estas franclingvaĵo, ĉar tiel same oni uzas tiun vorton en la lingvoj germana, rusa, pola kaj aliaj".

Malgraŭ tio, la Plena Vortaro konsilas, ne uzi 'certa' en tiu senco, por eviti konfuzon kun la sencoj: nedubanta; nedubebla.

KONAT(U)L O ?

P.V. and P.I.V. do not include: konatulo. Butler warns against it. But it is a useful form on occasion, as witness Karl Minor, "Esp.-Deutsches Handwoerterbuch", p. 49:— Translation: The form "konatulo" is fitting only when one speaks of a person whose **characteristic quality** is to be **widely known**; a well-known figure in this or that medium. When one speaks of a person whom one "knows", i.e. is acquainted with, one uses simply: "konato".

So, "Mia bona konato" — with whom I am in more or less close relations. "Lia ambicio estas fariĝi jazbanda konatulo" — to become **widely known** as . . .

Similarly: instruito = one having been taught. Instruitulo = One noted for, characterised by, his profound learning.

LA MIRAKLO DE LA UNIVERSO

Pere de astronomio ni povas observi la moviĝojn de la astroj, ni povas mezuri iliajn distancojn, kaj kalkuli iliajn periodojn kaj eklipsojn, sed niaj limigitaj mensoj ne povas eĉ esperi kompreni la grandecon de la kreaĵo de Dio. En la vortoj de la poeto, Dryden: "Kiel povas la eta la eĝan kompreni, aŭ limigita racio atingi la senfinan?"

Atingi la senfinan! Ni ne povas ĝin eĉ mediti! Do ni estu kontentaj nur mediti la grandecon de la dia kreaĵo, kaj konstati ĝuste kiom la homa menso povas atingi. Por trairi la enorman distancon de miliono da mejloj estus necese, ke ni komplete ĉirkaŭiri la Terglobon kvardekfoje, kaj eĉ se ni povus daŭrigi konstantan rapidecon de cent dek kvar mejloj pohore, ni bezonus tutan jaron por fini la vojaĝon, sed la rapideco de la lumo estas tiel granda, ke ĝi povas trairi milionon da mejloj en ono pli ol kvin sekundoj. Se ni povus veturi laŭ tiu neebala rapideco dum nur ok minutoj, ni atingus la Sunon, kiu distancas je 96 milionoj da mejloj; sed por atingi la eksteran randon de nia galaksio, la Lakta Vojo, estus necese, ke ni daŭrigu tiun fantazian rapidecon dum okdek mil jaroj. Estas vere neeble, ke ni komprenu la amplekson de okdek mil jaroj, havante nenian sperton, per kiu fari komparon; sufiĉas diri, ke nur dekonfo de tiu periodo reportus nin al la jaro 6029 antaŭ Kristo, antaŭ ol la Nila Valo estis enloĝata far la popolo, kiu poste konstruis la piramidojn. Kiam ni konsideras, ke ĉi tiu galaksio, kies grandeco estas tiel multe preter nia kapablo kompreni, estas nur eta punkto en la konata universo, nia limigita menso estas tute konsternita.

Kaj preter ĉi tiu konata universo etendiĝas la pli vasta nekonata, pri kiu ni estas nur nebule konsciaj pro tio, ke niaj plej potencaj modernaj teleskopoj ricevas lumon, kiu komencis sian vojaĝon, antaŭ ol nia planeteto naskiĝis. La tuta ĉi tiu vaste pli ol vasta universo, kun siaj nekalkuleblaj bilionoj da steloj, ĉiu de kiuj estas multmilionfoje pli granda ol nia Terglobo, orbitas kaj turniĝas sub la tuta reĝo de iu nevidebla potenco laŭ precizeco, kiu estas perfekta.

Ne! Ni neniam povas kompreni; kaj tiu, kiu kredas, ke ĉio ĉi nur hazarde estiĝis, kredas je miraklo milionfoje malpli akceptebla ol iu ajn miraklo rakontita en la Biblio. — Eseo originale verkita far Ken G. Linton.

VETERANOJ ELVOĈU!

Ĉu troviĝas inter ni tre malnovaj E-istoj, precipe homoj, kiuj E-iĝis antaŭ 1923 — aŭ homoj, kiuj povas anekdoti pri ili? Se jes, ĉu ili bonvolus skribi artikolon pri la tiamaj samideanoj kaj ties por-Esperanta agado? Atestaĵo pri frutempaj okazoj, aferoj, certe utilis al verkontoj pri nia E-a historio. Dum ankoraŭ restas ebleco, ni kaptu okazon revoki en memoron la nomojn kaj agojn de pioniroj, kiuj laboris por E-o en la aŭrora tempo de la movado en Aŭstralio. En "The Courier-Mail" (Brisbana jurnalo), 18 julio, Mal Robinson aperigis leteron, celante ricevi informojn pri frutempaj E-istoj Kvinlandaj.

LA "VENUSO" DE TICIANO

En la artgalerio de Ufizzi vi povas ĝissate rigardi la plej malĉastan, flavoluptan, obscenan pentraĵon el la mondo, nome la Venuso de Ticiano. Ne temas pri ŝia nudeco, tute ne! sed pri ŝia korpa pozo, la sinteno de ŝiaj brakoj kaj mano. Mi vidis junulinon kaŝrigardeti al ŝi; junajn virojn gapi al ŝi longe, absorbe; aĝe kriplajn maljunulojn droni en ŝiaj ĉarmoj kun kompatinde malsaneca intereso.

Se mi kuraĝus priskribi la pozon de Venuso, homoj hurlus kontraŭ mi. Tamen plaĉus al mi tiel priskribi nur por aŭdi kiel tre granda estus la indignaj krioj kontraŭ mi pro tio.

Mi ja scias, ke pri nudaj virinoj estas pentraĵoj, kiuj neniel estigas malpurajn pensojn. Tiajn mi ne kontraŭas; mi nur volas emfazi, ke la Venuso estas de speco tute alia. Mi povas kredi, ke Ticiano pentris ĝin laŭ mendo de iu bordelo, kiu forrifuzis ĝin, ĉar ĝi estas iom tro fie seks-alloga; fakte, ĝi estas tro tia, por troviĝi en kiu ajn loko — krom nur en publika artgalerio. — Mark Twain.

(Estas ankaŭ evidente, ke la komentoj de Mark Twain devenis de funda studado pri la objekto de lia kondamno.)

MODERNA MONDMINACO

Fariĝas ĉiam pli kaj pli klare evidenta, ke estas ne malsato, nek mikroboj, nek kancero, sed la homo mem, kiu plej danĝere minacas la homaron, tial ĉar la homo ne havas adekvatan defendon kontraŭ psikaj epidemioj. Tiu epidemioj estas nekalkuleble pli detruogaj en siaj efikoj ol la plej grandaj naturaj katastrofoj.—C.G. Jung, Aŭstria psikologo ("La Moderna Homo serĉas Animon").

PERSONA SPERTO

Kiam junulo, mi akiris oficon en Sidneja pogranda magazeno, kaj lokigis en la ĉapel-fako. Unu el miaj devoj estis senpolvigi la skatolojn da ĉapeloj surbretaj, kaj alia estis helpi kunmeti la mendojn de la podetalistoj. La laboro estis facila, sed malfeliĉe la fakestro estis malbonhumora kaj amis trovi misfarojn de siaj subuloj kiel pretekston sakri. Li estis kvazatia vokto kun lango kiel vipo.

Iun tagon li sendis min kun skatolo da makulitaj ĉapeloj al firmo en Kent-strato, nro 202. Tiu firmo purigis kaj renovigis ĉapelojn por la magazeno. Kiam mi alvenis al la adreso, oni informis min, ke tia firmo ne ekzistas tie; do, pensante, ke mia estro eraris pri la adreso, mi revenis kun la ĉapeloj. Kiam la estro vidis min kun la skatolo, li diris: "Kia rapida laboro; oni purigis la ĉapelojn dum vi atendis". Mi respondis: "Tute ne, sinjoro. Oni informis min, ke vi eraris pri la adreso; tiu firmo ne ekzistas tie". La fakestro koleregis kaj ordonis: "Reiru tujege kaj ne revenu kun la ĉapeloj, alie mi . . ." Mi rapidis for de lia akra lango, ne aŭdante la finvortojn, kaj kun peza koro reiris, timante la rezulton.

Kiam mia informinto revidis min, li moke diris: "Ho, jen vi denove". "Jes", mi diris, "mia estro S-ro Brown emfaze insistas, ke via firmo troviĝas tie ĉi". Li respondis: "Nu, mi ne konas vian S-ron Brown. Reiru kaj diru al li, ke li estas idioto!"

Do, duafoje mi revenis kun la ĉapeloj. Kiam mi alfrontis la fakestron li furiozis kontraŭ mi kvazaŭ berserke. "Stultulo, idioto!" li kriaĉis, "devas esti, ke vi havas okulojn en la postajo; dum multe da jaroj mi havas komercajn rilatojn kun 202 Kent-strato. Reiru, kaj se vi revenos kun la ĉapeloj, mi vin eksigos!" Tremante, mi aliris la saman lokon. Post eniro en la oficejon de mia informinto, tiu diris incite: "Jen la fantoma vizitanto kun la feaj ĉapeloj". Tiuj vortoj larmigis miajn okulojn, kaj mi balbutis: "Mia estro diris, ke dum multe da jaroj li havas komercajn rilatojn kun 202 Kent-strato." "Kio!" ekkriis mia turmentanto; "ĉi tie estas nro 202 Clarence-strato."

Pro tio, ke la du stratoj estas sinsekvaj paralelaj, mi mistrakis la adreson — tri fojojn! Mi ĉiam memoros la ĝojan revenon sen la ĉapeloj. Sed la fakestro neniam min pardonis.—V. J. Timmins.

SUDANO: AFRIKA ZONO

Sudanano = Sudana virino. Sudananidino = Sudana infanino.

Prelegistoj, lertigu vian langon ankaŭ per: tendaranaro Juĝistoj 7/21; nema-lobebla (Ester 1/19); makulokululo (Levido 21/20); penetrigintaĵo (Levido 13/55).

NE MERITINDA

Virino, al ebri-aspekta vagaĉulo ĉe dompordo: "Vi devus trinki nur akvon. Tio estas por vi la plej bona".

Vagulo: "Kian rajton havas mi, neni-gravulo, por ricevi nur la plej bonan?"

PLAĜO AŬ STRANDO ?

En "Sennaciulo", aprilo, 1973, D-ro A. Albault, L. A., rebatas skribon de W. Kruit, ke troviĝas en P. I. V. tro Franca influo kaj prefero. Li pritraktas la lukton inter la variantoj: plaĝo kaj strando. P.I.V. donas preferon al "plaĝo" = bordo de maro, lago aŭ rivero sufiĉe ebena kaj sabloriĉa por sun- kaj akvobanoj; loko aranĝita por feriantoj, ekz., la mundumaj plaĝoj de Suda Anglujo, Lazura Marbordo, Krimeo. P. I. V. difinas "strando" per: plaĝo 1.

D-ro A. argumentas, ke "plaĝo" ne estas ekzemplo de "Francismo". Ĝi devenas de Latina pere de la Itala (s)piaggia. Ĝi, kaj ne "strando", internaciigis. Ĝi troviĝas parence en Hisp. kaj verŝajne en Port., ankaŭ en la Slavaj lingvoj, eĉ en la Turka.

"Strando" estas Ger., Ang., Sv. kaj supozinde aliaj Skandinavaj lingvoj, plus la Hungara. Tamen ĉu tio estas sufiĉe internacia? D-ro A. diras: Ne. De la Latina "plagia", "plaga", la radiko invadis vaste diversajn lingvojn.

En "British E-ist", 11/50, Butler rimarkis, ke "plaĝo" povas signifi: "strando por banado". Lia tre valora serio de "Etimologiaj Studoj" aperis en "B. E." de julio, 1950 ĝis januaro, 1952. Ĝi meritas eldonon en libra formo, kompreneble post revizio.

En sia artikoleto D-ro A. informas, ke Zamenhof konsilis referenci al la Franca lingvo, laŭ li "duon-internacia" lingvo. De kie D-ro A. prenis tiun aserton? Ĉu iu povas indiki paĝlokton sur kiu aperas la vortoj de Zamenhof?

SIRANTA SARKASMO

La monumento honore al Prezidento George Washington alte staras 555 futojn direkte al la ĉielo. Ĝi simbolas la grandecon de la kontribuo, kiun li serve donis al sia lando.

Monumento al Calvin Coolidge taŭge estus truo en la tero, por rememorigi pri tio, kion li faris por sia. Tiuokaze oni devus konstrui ŝirm-palisaron, por protekti rigardantojn kontraŭ vertigo.—Irving Stone.

SONIMITA KRIPLIGO DE VORTOJ

En "Tatterley" (Tom Gallon), 1912 A. Wilson provis redoni la obtuzan parolon de ebrulo: "Mi dejiris vidi vi"; "ne permesu, ke tio okaju. Li ŝcias kiel ĝin elŝpeji. Jus 'ĉetis bi'neton — vivos kiel grafo. Sarma dolŝlino".

Lingvajero de Tomi Butler, dujara infano (filo de M. C. Butler):— "Oni omi anto" (Donu al Tomi ganton). "Literaturo", nro 12. En "Niĉjo Mensogulo" T. Morariu uzetis la artifikon, ĉe singultanto (p. 39) kaj ĉe infano (53). En "Kredu min, Sinjorino" (ĉ. 13) Cezar Rossetti ridindigas la misprononcadon de E-istoj ĉe klubo: "Ĉi tijun vesperon paroulas . . . neĵaadounebla . . . pe'fektan, kva'dek . . . estas doumoj, le'nejoj . . . kaj ĉiujvespere venas lante . . . (Je tiu punkto ili ŝokite kriis: "lante" ne estas permesata! Fi, vi diracas neologismon!" La parolinto klarigas, ke ne. "Mi celis diri: 'venas lanternisto . . . !"

En "Dancu Marionetoj", p. 107, Baghy eksperimentas indiki la malbonan prononcon Esperantan de Petroff.

Foje oni devas peni redoni per E-o la langajn paroldifektojn aŭ solecismojn de homoj malperfekte parolantaj la gepatran. Se homo kartavas aŭ lispas: "The thick man theth, Come thoon", kiel tion redoni? Mankas al E-o litero TH-sona (Greka, theta). Se E-o havus th-sonan literon, ni povus traduki per "La mal-thana viro dirath: Venu baldaŭ". Cetere, Zamenhof ("Originala Verkaro", p. 92) aludis al ebo uzi t(h) por la "th" en "think", kaj d(h) por la "th" en "father". Sed se homo prononcas V kiel W; "Wiolet, bring the weal and other wittles"; au R. kiel L: "Velly fine" (kiel Ĉinoj kutime prononcas la Anglan), tiam estas malfacile en tiuj okazoj indiki la naturon de la misprononco. Tradukantoj el la Angla devas fronti la problemon en verkoj kiaj: Wodehouse kun iliaj soci-klasa slango kaj voĉtono-prononcoj; la naive komikaj konvencioj de kamparanoj-vilaĝanoj de Thomas Hardy, Eden Phillpotts kaj aliaj, kiuj uzas dialekton aŭ apartan dirmanieron. Estas dube, ke kripligo de la E-aj vortoj helpus kompreni la dirojn de malkleraj aŭ province parolantaj homoj. Provoj indiki la precizajn formojn de la malkorektaĵoj de homoj misuzantaj la Anglan lingvon havus malmultan intereson por E-aj neanglalingvanoj. Se necesas indiki la fakton, oni povas uzi adverbos: ". . . li diris mal- aŭ misgramatike fuŝprononce, kriplalingve" aŭ simile.

Fino per anekdoto: "You'll hev ter pi

on thet piper, lidy" diris Londona strat-vendisto. Laŭsone: ju left (e) paj on d(h)et pajp(er). La sencoj laŭ kompreno: Vi devas pagi por tiu gazeto, sinjorino. Aŭ: Vi postlasis paŝtecon sur tiu gazeto, sinjorino.

Vidu: Lingvaj Respondoj de Zamenhof, indekse sub "Stilo (Esperanta)".

CALOUNDRA (kalaŭndra)

Ĝi troviĝas ĉ. 60 Anglajn mejlojn for de Brisbano. Indigene la nomo signifas: bela loko. Ĝia klimato estas milda, ĉar la loko kuŝas apud la maro. Vintre temperaturoj varias inter 55 kaj 75 gr. Fahr. Somere la varmeco malofte atingas super 85 gr. La sablejoj, promontoroj, montoj, akvofaloj, riveroj, lagoj k.c. estas tiel altiraj, ke multaj vizitantoj venas kaj revenas por loĝi en la ĉarma regiono, vera paradizo por natur- kaj sportamantoj — kaj precipe por surfistoj. Vizitu ĝin. Vi neniam forgesos Caloundra'n, la juvelon de la Sunbrila Marbordo.—

KVAZAŬDIALEKTOJ . . .

Delfi Dalmau en sia "Dialekto, Dialektiko" (1955) pritraktas la personajn esprimmanierojn de verkuloj en Esperanto aŭ ilia nacia lingvo. Li konkludas, ke "pura, perfekta, absoluta lingvo ne ekzistas". Komparu en la naciaj la prozo de Proust kaj Daudet; Lamb kaj Macaulay; Heine kaj Richter; Churchill kaj G. B. Shaw. En Esperanto: Bourlet kaj Lanti; Luyken kaj Forge; Kabe kaj Grabowski — kiaj esprimaj diferencoj! Tiasence ekzistas multaj Esperantoj laŭ stila kaj temperamenta personeco kaj esprim-elekta preferado. Ĉiu matura E-isto ja havas sian propran "dialekton" en tio, ke li uzas lingvajon, kiu spegulas lian memon, lian animon, alivorte lian personecon.

Per siaj parodioj en "Specimene" H. Baupierre trafe reliefigas la apartajn stilektojn kaj variecon de literatura esprimado en verkoj de kvardek E-aj aŭtoroj. En kio do konsistas la tiel-nomata) "internacia stilo?" Kiel ĝin difini?

POLA RADIO

For its Esperanto competition 1972 entries were received from 663 people. A German E-ist gained a ten-day visit to Poland. The next competition closed 15 June, 1973; we got notification of it on 13 June! Result of this "nova konkurso": 30 June.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: Mrs. M. Chaldecott, 16 Grosvenor Road, Lindfield, N.S.W. 2070

Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 121 (20f)

MELBOURNE

Septembro, 1973



JAN. 2-8
1974.



LA 19A
AŬSTRALIA
ESPERANTO-
KONGRESO
BRIZBANO

Mail your Congress Fee to Mrs. S. Martin, 48 Launceston Street, Salisbury, 4107. Fee for A.E.A. members \$7.00, others \$8.00. Add \$10.00 deposit for accommodation at International House of Brisbane University. (Enclose stamped addressed envelope for receipt and further Congress Information.)

Eighth List of Congress Members

116. Mr. T. Donnelly, South Brisbane, Qld.
117. Mrs. M. Shardlow, Nth Tambourine Qld.
118. Mr. S. Shardlow, Nth Tambourine, Qld.
119. Mrs. J. Lehane, Toowoomba, Qld.
120. Mr. T. O'Grady, Mt. Gravatt, Qld.
121. Mrs. E. Oliver, England.
122. Mr. A. Oliver, England.
123. Miss A. Barrow, Eumundi, Qld.

State Distribution: Qld., 57; NSW, 28; Vic., 26; S.A., 2; W.A. 2; A.C.T., 1; Overseas 7.

Drama Konkurso

Urĝa Peto: Ĉar la lupagon por la Schonell Teatro ĉe la Universitato oni devas pagi antaŭ la 1-a de Oktobro, la

Loka Kongresa Komitato devas scii kiuj intencos partopreni en la Drama Konkurso. Bonvole sendu - antaŭ la 30-a de Sept.—tiun necesan informon al: S-ino W. Greenhalgh, 39 Ryans Road, St. Lucia, 4067. (Atentu teatraĵ grupoj en Manly kaj Oakleigh!)

OFICIALA INFORMILO

NOVAJ ANOJ:

Andrews, S-ino H., Coorparoo, Qld.
Mathers, S-ino E., Grovely, Qld.
Talbot, S-ino U., Firmy Grove, Qld.
Simms, S-ro S., Indoorapilly, Qld.
Gibson, F-ino E. A., Launceston, Tas.
Bruce, S-ino J. Mona Vale, NSW.
Fletcher, S-ro J. E., Wembley, W.A.
Walker, F-ino C., Mackay, Qld.
Schutes, F-ino M., Brighton-Le-Sands NSW.

Dorwood, S-ino M. J., Ocean Grove, Vic.
Grant, S-ino H., Highton, Vic.
Thew, S-ro J. E., Perth, W.A.
Giarola, S-ro G. F., Innesfail, Qld.
Courtenay, F-ino M., Oakleigh, Vic.
Hamlin, S-ino J. Epping, NSW
Mackie, F-ino D., Mt. Waverley, Vic.
Raub, S-ro W., Cardiff, NSW.
Patrick, S-ro T. G., Beecroft, NSW.
Strochnetter, S-ro C. F., Pyenganta, Tas.
Safstrom, S-ino H., Hawthorn, Vic.

T.G.M.F.

Nacias, S-ro J., Gove, NT \$5.00
—Russ Baxter, Sek., 6 aŭgusto.

A.E.A. EXAMINATIONS

Elementa: Audrey M. Bruton, Nam-
bour, Q; Supera: George Clarke, Orroroo,
S.A.

AUSTRALIA KRONIKO

PERTH: Gratulon al S-ino McGrath. Dank' al ŝia persista agado, E-libroj, donacitaj de D-ro Caldera al la Stata Biblioteko kaj longatempе nur forkaŝitaj, lastatempе fariĝis pli facile haveblaj. Baldaŭ tiuj estos haveblaj ankaŭ laŭ peto al lokaj (filiaj) bibliotekoj.

Ce la **Societa Vespero** (29/6), plaĉe multnombra ĉeestantaro ĝuis programon de muziko, kantado kaj humuraĵoj, kiel ankaŭ alparolon de David Miller pri la instruado de lingvoj al enmigrintoj. Samvespere oni honoris al S-ino Gertrude Pollard, transdonante atestilon por "Dumviva Membro" dankeprime por ŝia multjara laborado por Esperanto.

Mikspotaj programoj distris la anojn ĉe **Klubvenoj** (13/6, 27/6 kaj 11/7). Demandaroj de la Prezidanto instruis terminojn ĉiufoje pri fiksita temo; per diversspecaj konkursoj, bonŝanculoj gajnis premiojn; kaj, i.a.. S-ro Smeets rakontis memorojn pri biciklado (13/6) kaj S-ro Poole-Johnson klarigis kial li eklernis Esperanton (11/7). Krome, plaĉis al la anoj revidi inter si S-inon Pollard kaj aŭskulti kartsalutojn de la familio Payne, nuntempe en Eŭropo. — (Cerpita el "La Nigra Cigno".)

MELBOURNE: Komence de la julia **Societa Vespero** (30/7), Prez. H. Beechey legis Raporton N-ron 1 de nia vojaĝanta Sek. H. Koppel el Honolulo, kie li renkontis U.E.A. Delegiton, radioamatoron Bunnie J. Chambers. Ankaŭ nia parolanto Ken Linton informis pri salutkarto de la sama fonto, antaŭ ol prezenti serion de diapozitivoj, kiuj vekis nostalgion kaj revivigis memorojn pri A.E.-kongresoj de 1966 ĝis 1970 kaj aliaj elstaraj okazajoj en la historio de nia Societo.

Por klubkunveno (6/8) Vic-Prez. Marshall Cohen ricevis ĝustatempе Raporton N-ron 2 de nia Sek., ĉi-foje el Montreal, kie li observis apenaŭ kredeblan progreson de kiam li antaŭe vizitis tiun metropolon - ĉie nubskrapuloj kaj ekspresŝoseoj, krom subtera fervojo. S-ro Koppel priskribis ankaŭ renkontiĝojn kun e-istoj en Vancouver, kie li prelegis, kun diapozitivoj, laŭ la temo "Aŭstralio konstruas novan Ĉefurbon". Deĵorante kiel parolanto, S-ro Cohen poste klarigis la signifon de multaj indigenaj nomoj, laŭ la enhavo de libreto ("La Lingvo de la Aŭstraliaj Indiĝenoj") verkita de onklo lia — Sidney James Endacott.

Kelkaj klubanoj kontribuis (13/8), sed poste kun intereso oni aŭskultis novzelandan vizitanton, S-ron Colhoun, kiu informis pri la maoria lingvo.—F. Koppel.

MORWELL: Ĉe la julia kunveno klubanoj diskutis kontribuon por la novembra seminario de la E-Federacio de Viktorio, sed decidis ne prezenti teatraĵojn pro la malfacilo regule ekzerci.

La klubo bonvenigis novan aliĝinton el Callignee, Garry Pratt, kiu nun partoprenas la studvesperojn.

Letero de membro, David Cafiso, intersanĝa studento en Novzelando, raportis, ke tiu pasigas ĝuplanan studtempo kaj partoprenas en Okcidentmarbordaj (Nordinsulaj) ĉampionkonkursoj de Novzelanda Translanda Asocio.

Alia novaĵo temas pri la establo de 2 novaj studroroj en la distrikto, Latrobe Valley: unu de knabinoj eksterprograme en loka gimnazio, kaj unu sub gvidado de Ges-roj Schepers, 33 kilometroj for de Morwell.—(El "Latrobe Valley Esperantist").

SYDNEY: 16/7: Ni bonvenigis Ges-rojn Taege, vizitantojn de Auckland (Aŭklando), kiuj ferias en Aŭstralio. Ni petis S-inon Daphne Taege doni nian bondeziron al la Klubo en Nov-Zelando, kiam ŝi reiras. Thelma Smith laŭinvite prelegis al la Klubo Penguin (Pingveno), kies celo estas Publika Parolado por Virinoj. Margaret Chaldecott aranĝis la ludon "Bingo", kompreneble en E-o.

23/7: Oni petis ĉiun membron alporti ses lumbildojn; ses fidelaj anoj faris tiun devon. Do ni vidis miksitajn bildojn, jam de la Capitol (Vaŝingtono), memora fenestro por la verkisto de "Alicio en Mirlando" ĝis geanasoj!

30/7: 20 ĉeestantoj. Oni menciis reklamojn "Progress" en Manufacturers' Mutual Insurance Co., kiuj aperis en la Sidneja "Sun Herald" kun bona informo pri E-o, kaj unu kun insigno de la Alternejo en Walgett kun moto en E-o: "Nenio sen Laboro". Oni petis de Wre skribi pri la reklamoj en "Telopeo".. Volo Guelting instrue nin amuzis per historietoj el diversaj libroj — unu pri dormanto, kiu vekiĝis en la jaro 2050 kaj trovis ŝanĝiĝintan mondon en kiu ĉiuj aferoj preskaŭ proksimiĝis al unueco. La popolo malgrandiĝis nombre, kaj grandaj urboj havis nur kelkajn civitanojn. Car oni ofte veturis al fremdaj landoj nur unu lingvo estis uzata (E-o sendube) kaj nur unu mond-registaro ktp. (Ĉu ankaŭ unu kalendaro, unu monstisemo? — Red.)

6/8: Al la Klubo ni bonvenigis Brian Phillips, kiu volonte kaj kapable (sen preparo) faris la gast-paroladon. Li estas membro de la E-a Societo en Ipswich kaj nun ĉeestas la Mondan Kvakeran Kunvenon en Sidnejo. Li

klariĝis kiel liaj Societanoj propagandis por konvinki sian deputiton de la Parlamento, ke E-o devus esti instruata en lernejoj, ankaŭ ke ĝi estas necesa por la Komuna Merkato. Brian parolis ankaŭ pri siaj spertoj dum nau jaroj en la Malagasa Respubliko kaj ankaŭ en Usono.

13/8: Ni ĝuis aŭskulti la unuan parton de la viv-historio de Les Scott, prez-o de la F.N.S.K. Li naskiĝis en Geelong. Liaj gepatroj estis malriĉaj bienistoj kaj dum longa tempo loĝis en tendoj; poste ili transiris al N.S.K. Kiam juna, Les multe suferis, ĉar necesis ke li laboru sur la bieno ofte en tre malbona vetero kaj li devis iri per ĉevalo al lernejo. Kiam poste ili havis bienon ĉe West Wyalong, li aĉetis radi-aparaton (kun "kristalo" kaj "vangharo de kato"). Li fiksas altan antenon kaj ĝojis kiam li "ricevis" programon. Nur 14-jara, li jam tiel interesiĝis pri radio ke li mem konstruis radiajn aparatojn en laborĉambro (sen fenestro), 7½ mejlojn for de la bieno. Per ĉevalo kun ĉaro li iris por vendi la aparaton al najbaroj, por malmulta mono. Mankis al li altlerneja eduko, sed poste, kiam la afero radia forte kreskis, li studis kaj gajnis la necesan teknikan informon. Jen interesa historio de malriĉa bienknabo kiu sukcesis. Antaŭĝue ni tendas aŭskulti la sekvantan parton.

MANLY: 5/6 Klubprogramoj: Vortengimoj. 12/6: S-ro Veis, vizitanto de Jugoslavio, montris diapozitivojn de Belgrado kaj Novi Sad. 19/6: Margaret Liston gvidis kantadon. 26/6: Wre. Chandler (Sidneja Klubo) parolis pri indigenaj floroj kaj montris belajn bildojn de ili. 23/6: Ĉe Ruth Carruthers, aferkunkeno kaj adiaŭo al Prof-o Robbie Robertson kaj lia edzino Margaret, kiuj estas nun en Skotlando survoje al Belgrado. —Kaj Morrison, 26/7.

5/7: Songs conducted by Margaret Liston. 12/7: Slides by members. 24/7: Marjorie Duncan organised amusements; an enjoyable evening with Les and Ben Scott, when Adrian Culey spoke on Esperanto as the Language of Freedom, from a philosophical viewpoint. Discussion followed. After supper we farewelled three members going abroad. Bettv Cleminson and Eunice Graham to the Belgrade Congress and Ann Gash to Nottingham to attend the course at the Summer School (Pipers' Guild) and later to visit E-ists.

BRIZBANO: 16/7: Gojaj ni estis, ke vizitis nian klubon Ges-roj Banham de Melburno kaj Ges-roj Oliver de Anglujo. S-ro Banham transdonis diplomojn al 8 klubanoj, kiuj atingis sufiĉan kompetentecon post almenaŭ unu jaro de studado. Ges-roj Greenhalgh gastigas en sia hejmo Ges-rojn Oliver, kiuj atendis alvenon de sia aŭto "Landrover" antaŭ ol veturi al Perto.

11/8: Arthur Deutscher aranĝis E-an vesperon ĉe Yopi art-laborejo, precipe por membroj de la religio Bahajismo.

La celo de sukcesa Kongreso en januaro 1974 inspiris nin en Brizbano labori pli forte ol kutime. Pro tio ni nuligis klasojn por komencantoj. Nur unu klaso komenciĝis, ĉar ni ne deziras okupi pli ol unu instruiston. La resto de ni en Kvinslando devos pliboniĝi per paroli kun vi, la spertuloj en la aliaj ŝtatoj. — V. Robinson.

Oni rimarkis pri la du datoj donitaj tie kaj tie en THE A.E. pri la Kongreso en Brisbano. Kaj la kliŝo kaj la teksteroj estas iasence korektaj. La efektiva Kongreso fermiĝos en la 8-a de januaro; post-kongreso okazos en la 9-a. En la 10-a la aliŝtataj kongresanoj foriros.

REKLAMA SERVO

Via libroperanto (ankaŭ prezidanto de la Sidneja Klubo) malkontentas pri senefikaj (kaj kostaj) reklamoj de individuaj grupoj por nova kursoj. Tial mi proponas kun konsento de A.E.A., Sydney, NSWEF kaj Brisbano provi informadan servon. Nome, ni komence metu 2-kolonan 3- aŭ 4-kolon reklamon (kun bildo) en "The Australian" sabate sur libropago malfrue en januaro kaj frue en februaro, tiom ofte kiom permesas la financo. Ciu reklamo kostos 60 ĝis 80 dol.

Ni serĉas aliajn klubojn kiuj kontribuos al tiu propono. La reklamo inkluzivas la adreson de A.E.A. kaj urbon kaj telefonnumeron de subtenantaj kluboj. Ni esperas, ke la subtenantaj konservos el la aliĝmono laŭ la nombro de aliĝintoj kontraŭ similaj estontaj reklamoj por ke la afero fariĝu memsubtena.

Interesatoj kontaktu la libroperanton kaj pretigu ideojn por diskuto ĉe la Kongreso. Ciu kluboj nepre kontrolu sian telefonnumeron kaj sciigu al la sekretario de A.E.A. la detalojn de siaj novaj kursoj. Se via numero ne estas sur "Esperanto at a Glance" aŭ ne estas korekta sur ĝi, vi kulpe jam fuŝiĝis reklamon en Youth Hostels Handbook. —T. Elliott.

(Kelkaj legantoj petis la Anglan version de "Junulaj Fantazioj" en la decembra nro, 1972, por ke ili povu komparu la du tekstojn. Se nove-aligintoj, aŭ aliaj, ne havas la Esperantajon, ĝi estas havebla kontraŭ afrankita koverto. — Red.)

YOUTHFUL FANTASIES

Before a sea of faces in Carnegie Hall
to stand
And charm the souls of everyone with
baton-waving hand;
In Music's blissful realm to live — a
real whose air is filled
With that which from my early youth
my heart and mind has thrilled.
Pavane and march, dance, overture,
fantasia and nocturne —
To such as these, when'er I can, my
ardent ears I turn.

To stand, gloves raised in victory, in
Madison's roped square
And greet the acclamation of ten
thousand voices there.
World champion be, at any weight,
unbeaten to retire
And leave on Boxiana's page my record
to inspire
Oncoming hopefuls striving hard the
Noble Art to learn,
And riches, honor, ring renown, in many
a land to earn.

To clarify intricacies of languages long
dead
From out the wealth of garnered lore
well-ordered in my head . . .
The Hebrew of the holy books, the
Romans' stately lines,
Hellenic Greek; its Vulgar form, through
which the Gospel shines —
Obscure scripts, moot particles, the
vagaries of tense:
What alimnt to feed the soul — joy,
gratify the sense!

When young, and in a pensive mood,
these visions I could see,
But fate ordained that none of them
should augur aught for me.
My life-work was prosaic; in such no
fame is won,
But worth is not in what one does, but
simply how it's done.

Note: "Its Vulgar form:—the Koinee, a dialect of Greek spoken in Palestine at the time of Christ. The language of the people, less elaborate than classical Greek.

NE KOMPENSEBLA

Mia aviadilo malfrue atingis la flughavenon, sekve do mi ne povis trafi la konektan aviadilon por pluveturi norden. Indigne mi riproĉis la komizon pri malbona servo, plendante, ke pro la prokrasto mi ne povos rehejmiĝi en tiu nokto. La komizo pacience klarigis, ke la flugkompanio volonte pripagas por mi hotel-ĉambron.

Mi tamen pluplendis, ke jam de horoj mi ne manĝis, ĉar mia jusa flugo estis senmanĝa. Li tiam donis al mi manĝibiletan validan por laŭmenda manĝo ĉe la finstacia restoracio.

Tio min iom moligis, sed ankoraŭ restis al mi kaŭzo por plendi: "Se via flugkompanio ne tiel fuŝus la veturon, mi estus kun mia edzino en ĉi tiu nokto!" Respondis la komizo: "Mi bedaŭras tion, sinjoro; sed la kompanio fiksas definitivan limon al la kompensoj."

MISKOMPRENO

Juna virino leĝe procesis kontraŭ viro, kiu faris al ŝi malĉastan proponon. La juĝisto petis ŝin elvoĉi la vortojn de la propono. Pro embaraso, ŝi ne volis tion fari, do ricevis permeson skribi ilin sur paperpeco. La juĝisto, la persekuta kaj defenda advokatoj, legis la vortojn; poste la paperpeco estis transdonita al la jurianoj, kiuj legis ĝin laŭvice. Post kiam beleta juriano legis ĝin, ŝi provis enmanigi ĝin al la sekvanta persono, sed vidis lin dormetanta. Ŝi plenkvis lin per kubutpuŝo kaj donis al li la paperon. Li eklegis la vortojn, amor-miene ridetis al ŝi, kapjesis, kaj premis la paperpecon en sian poŝon.

KIAN IDON NI PLANU ?

Esperable la jena anekdoto estas nur ŝerce kalumnia: Baletistino petis al G. B. Shaw, ke li ŝin gravedigu "Imagu do! Nia infano estus la plej perfekta en la mondo: kun mia beleco kaj via inteligento!"

Al tio li afable-acidete respondis: "Mi volonte kunlaborus, fraŭlino, sed mia konscienco tion bedaŭre malpermesas pro terura risko. Imagu nian situacion, se la infano naskiĝus kun via inteligento kaj mia beleco . . ."

Improve your style by reading
the cultural review
NORDA PRISMO

Annual subscription to this
literary magazine
\$3.20

Australian agent, Ken G. Linton.
Ask for specimen copy.

FARISTINOJ DE HOMOJ

Antaŭ jaroj, mia amikino studadis en altlernejo. Ŝi diris al mi: "Kaj nun mi estas nur simpla dommastrino. Kiam iu demandas al mi: 'Kio estas via okupo?' mi embarasate respondas: 'Dommastrino' malgraŭ ke mi finis kolegian edukadon".

Ridetante, mi diris al ŝi: "La taskoj de dommastrino estas multaj. Ŝi estas instruanto, artisto, patrino, helpisto, kuiristo, tajloro ktp.

Komentis ŝi: "Ja vere, tamen, pri-pensante, mi sentas, ke mia edukado estas vana. Mi neniel povis ĝin utiligi por servi aliajn homojn; Cetere, mi povis ludi pianon pli bone antaŭ jaroj ol nun".

Mi respondis: "Vi ne pravas. Vi ĝis nun bone utiligis vian scion. Vi helpis vian edzon kaj ebligis al li sukcesan karieron. Per via ekzemplo vi transdonis al viaj gefiloj noblajn kvalitojn de persona karaktero. Neniu estas pli granda ol sagaca patrino, la faristino de grandaj homoj. Kiam ni rigardas viron de bona karaktero, eble ankaŭ eminentan en la socio, ni povas prave diri: 'Li havas grandan patrinon'; La patrinoj kreas en viroj ambicion, kuraĝon kaj laboremon; ili kondukas la ŝipon de ĉiu sana, honesta, virta civilizacio" — Laŭ "Omnibuso", Japanujo.

MAKERS OF MEN

Years ago my friend was a student at high school. She said to me: And now I am nothing more than a mere housewife. When I am asked what I do, I am embarrassed to answer 'housewife', although I finished college'.

Smiling, I answered her: "The tasks of a housewife are many. She is a teacher, artist, mother, helper, cook, tailoress and so on.

She then said: "That's true, but when I think of it, I feel that my education has been in vain. I have done no-one any good by it. And I could play the piano better years ago than I can now".

I protested: "You are wrong. You have put your knowledge to great use. You have helped your husband and have enabled him to achieve success in his career. By your example you have transmitted fine qualities of personal character to your children. Nobody is greater than a wise mother, the maker of good and great men. When we look at a man of fine character and perchance of high standing in our society, one may say with truth: 'He has a fine mother!' Mothers create in men ambition, courage and will to labor. They steer the ship of all sane, honest and virtuous civilisations".

POST 44 JAROJ

Jen citoj el letero, kiun mi ĵus ricevis el Bulgario: "Jen jam 45 jaroj de kiam mi komencis korespondi en Esperanto. Unuan leteron mi ricevis de vi el Aŭstralio je 11 nov. 1928 kaj la lastan je 17 aprilo, 1929. Tiam mi estis 20-jara lernanto kaj nun estas 65-jara. Mi ĝis nun gardas viajn du leterojn, kiuj donis al mi grandan kuraĝon lerni Esperanton. Mi nun estas delegito medicina por UEA. en Bulgario.

"En 18 marto 1972 mi skribis leteron al via malnova adreso en Station St., Carlton N4, sed ne ricevis respondon, nek la letero revenis. Ĉe la Kongreso en Belgrado mi ricevis vian nunan adreson per via samlandano D-ro Einihovici, delegito medicina por Aŭstralio . . ." — D-ro Stojan Moraresku.

Jen fidela amiko pluma, ĉu ne? Kiu dirus, ke la korespondado estas afero vana? — Red.

LA LASTA MANUSKRIPTO

Vidu paĝon 314 The A.E. "Kie troviĝas la originalo?" Jen respondo: ĝi estas jam en la Viena Esperanta Muzeo (IEMW). Represo de la teksto kaj informoj pri ĝi estas sur la paĝoj 420-423

de "Doktoro kaj lingvo Esperanto" (Adolf Holzhaus) 1969. Tiu 524-paĝa libro estas havenda por ĉiu funda fakisto E-a.

ĈE VIA LIBROSERVO!

KRISTNASKAJ KARTOJ, 20 desegnoj kun 4 Esperantaj Tekstoj de "Australian Foot & Mouth Society" (kun Koverto) 16 cendoj.

SEVEN-DAY ESPERANTO COURSE.
L. Tanaka 6.00
FLOROJ SEN KOMPAR', M. HILL.
W. Auld; Vortoj kaj Muziko 1.25
KRISTO EL BRONZO, Nagayo Josio.
N 106b 1.55
STATO KAJ REVOLUCIO, M. Lenin/
G. Demidjuk 1.60
LA OBSTINO, Nakazima Atusi. 1.20

OPERATION SURVIVAL

Our earth as a habitable place is today menaced by subtle and sinister developments. Learn what they are through Q, which is an international movement operating in over a 100 countries. Its sole object is to ensure human survival; nothing else matters now. It has no officials and no subscription. Free booklets and news letters from Q, Artesian Rd., London W2.

NI KONIGU ESPERANTON:

En "Travivaĵoj de Ro-So" de Richard Sharpe (1914) troviĝas lia foto. Li surhavas ĉapelon kun elstare videbla verda stelo sur rubando. Ankaŭ sur lia brusta jakpoŝo estas tiu stelo, pli granda.

La Principaro de Frostvallen (Jarlibro de UEA, 1965, p.38) prave avertas kontraŭ danĝero de "sekteco" — inter kie: "strangaĵoj en la vestoj" — sed tio ne kontraŭas efikajn metodojn de informado ankaŭ pere de vest-insignoj. Oficistoj en aliaj serv-medioj uzas tiujn insignojn survestajn por tiri atenton al sia aparta funkcio. Ĉu ne ankaŭ fervora E-isto ne utile kaj rajte povas tion fari?

Estas en la mondo lokoj, kie ĉiutage svarmas turistoj kaj aliaj vizitantoj, ekzemple Londono, Hongkongo, Parizo k.m.a Inter ili certe troviĝas ankaŭ E-parolantoj. Tiuj vane serĉus kontaktojn kun aliaj E-istoj sur stratoj, ĉe hoteloj k.t.p. Malgranda steleto — ofte sur similokolora vesto — ne tiras tujan atenton. Estas bezonata pli frape videbla insigno.

Dufoje iu homo vizitis Hongkongon, Tokion kaj aliajn Aziajn centrojn, kie milmiloj da turistoj vage cirkuladas en ĉiu tago. Tiu observinto ne rimarkis ateston pri ekzisto de E-istoj en tiuj lokoj, kvankam tie E-istoj certe estis troveblaj.

Se homoj veste kondukis, kiel faris Sharpe, sendube oni akirus milojn da reciproke plezuraj kaj utilaj kontaktoj kun samcelanoj en diversaj lokoj en tiuj turiste vizitataj mondcentroj — kaj eĉ en malpli dense homplenaj lokoj

Bedaŭre, ne ĉiu E-isto saĝe portas la Jarlibron de UEA. Tamen, eĉ kun tiu informilo en poŝo, homo povas perdi bonokazonj hazarde saluti ĝis tiam nekonatajn E-istojn sur strato, en hotela vestiblo k.s. Tial la movado bezonas homojn, kiuj estas pretaj servadi kiel vivantaj reklamiloj — homoj, kiuj prezentas per sia personeco eksteran, frapan ateston, ke ili estas E-istoj, dezirantaj renkonti samlingvanojn kaj ĉiumaniere manifesti la mondvastan utilon de la Internacia Lingvo.

Ne miskomprenu! Tia informa elmontrado pere de elstaraj insignoj, kiel jam priskribita, ne taŭgas por la ĉiutaga homo de aferoj en lia koncerna laborloko. Oni facile konstatas, ke tio estus nefarebla por komizo, kompania oficisto aŭ laboristo ĉe ties vivrimeda okupado. Richard Sharpe estis mondvojaĝanto, homo sendependa, libera, kaj pro tio li rajtis uzi sian frapan, impresan formon de personeca reklamado.

La ĝustaj lokoj por tiu utila kaj efika

elmontrado estas tie, kie oni estas, kiel li, libera de servuleco pagata, nome en urboj eksterlandaj, kie oni ferias, plezure veturas — ekzemple en konataj turismaj centroj de la mondo — aŭ en Aŭstraliaj kongresurboj. Tiu propono estas aparte konsiderinda, kiam ĉe kongresoj oni prezentas al la publiko oportunon ĉeesti Anglalingvan kunvenon malferman al ĉiuj homoj.

Ĉu ne estus bone, ke oni klopodu aranĝi tian kunvenon por altiri simpatian, sed ankoraŭ ne Esperantan publikon? — Robo.

ALIGU GRUPON !

Ĉiuj E-istoj, kaj ĉiuj homoj kiuj simpatias kun la E-a movado, devus anĝi al la plej proksima E-a grupo, eĉ kvankam ilia persona alesto ĉe grupkunvenoj estus malofaŭta aŭ neebla pro malportuneco. Per tio ili havus vivan kontakton kun sampensuloj, senton de solidareco kaj fortikigon de fido en nia afero. Krome, per nombra kreskigo, ilia aliĝo statistike prezentus por la publiko pli impresan bildon de la movado kiel socia elemento. Konjekteble ekzistas en Aŭstralio almenaŭ 1500 E-istoj pli-malpli bone sciantaj la lingvon. Per ilia fideleco, atestata per registriĝo kiel membroj, la ano-nombro de nia Asocio verŝajne triobliĝus.

PRI VIV-LONGECO

En la Biblio oni legas, ke la vivlongo difinita al la homoj estas cent dudek jaroj (Genezo 6.3). Tamen ĉe Psalmo 90/10 nombro estas sepdek, sed estas aldonitaj ankoraŭ dek jaroj, kiel kvazaŭa krombeno al tiuj de aparta forteco.

Plu legante, oni trovas impresan esprimon de la psalmisto: "Ni forflugas", alivorte "ni mortas". Tio bone servus kiel bonvena eŭfemismo anstataŭ la grize-ombra vorto, kiun ĉiuj homoj klopodas eviti, almenaŭ ĝis tempopaso jam mildigis la doloron.

"Ho ve, nia kara frato jam forflugis?" — li kvazaŭ forsaltis de la (viv) branĉeto ("hopped the twig") — kiel maljunulino kutimis diri, kun enviinda facilanimeco. Sia esprimo estis bone bazita sur la Sankta Skribo, ĉar per ĝi ŝi parole similis al la sankta David, kiu kreis la birdecan metaforon.

Estas strange, ke la viv-atendebleco de la antikvaj Hebreoj estas taksata tiel tre alte. Post paso de tridek jarcentoj ĝi estas verŝajne nun malpli ol en tiu tempo. Angloj en pasintaj jarcentoj havis vivon mezan proksimume tiel same mallongan kiel nun havas la Hindoj hodiaŭ, t.e. ĉirkaŭ 40-50 jaroj. En 1940

en Usono la viv-atendebleco estis nur 62.8 paroj por viroj.

La Bibliaj Hebreoj devis havi fortan vin-daŭremon, malgraŭ naturaj malhelpiloj kontraŭ multe-naskado, manko de kuracaj institucioj kaj saniga higieno, se ne paroli pri la ĝenerala mortigemo de ili mem kaj iliaj malagrablaj najbaroj.

RECENZOJ

“Savo el la Neĝo”: Originalo de P. Korte. Eld. Dansk Esperanto-Forlag, Aabyhoj, Denmark. 77 paĝoj. 9 Danaj Kr. Taŭge ilustrita de W. Stroeve.

Simple rakonto pri sperto de Ĉeĥa knabo, sola transvivinto de aviadila rompiĝo sur alp-deklivo, kaj pri feliĉa hazardo, kiu ebligis lian savon. La celo de la aŭtoro estas: provizi utilan legmaterialon por junaj studentoj, ankaŭ por aliaj homoj al kiuj plaĉas la facile distra prefere ol la pure artisma. Mankas al la rakonto elementoj sensaciaj, tamen pro lerte enplektitaj detalajoj, oni image dividas kun la malfeliĉa orfo la teruron de izoleco post katastrofo sur montamaso.

La libro konsistas el saĝe elektitaj vortoj, konformaj kun la lerno-nivelo de junaj E-istoj . . . Tio spegulas la lingvosperton de veterana E-isto. Korte, Nederlandano, naskiĝis en 1894, instruis la Ce-metodon. Li aktivadis en pedagogiaj aferoj E-aj kaj en 1933 sukcesis transirigi el Germanujo en Nederlando la funkci-rimedojn de la E-a instruista movado.

Nur unu flanko de ĉiu paĝo portas tekston; la dua estas blanka, por ricevi notojn de studentoj. Jen utila novaĵo ĉe porjunulaj leglibroj.

Eldonejoj saĝe uzas la stelsistemon; tamen la lasta listo aperis en la Jarlibro 1968. Oni bezonas represon. Kalkulado per fremdaj valutoj estas malfacila.

“La Juna Penso”, internacia gazeto kompilata de junaj homoj. Ĝi aperas 7-foje en jaro kun aldonado de unu aŭ du broŝuroj. Abono: 2 dol. (3.20 por du jaroj). Oni pagu per internacia monmandato (30c.), al Bert de Wit, Leidsevaart 52, Vogelenzang 1556, Netherlands.

Estas iom strange ke junuloj aperigas ankaŭ artikolojn por homoj mense maturaj, funde penskapablaj. Nur plene evoluintaj cerboj flue komprene legadus kiel: Homo . . . estas sociema estaĵo; Psikoanaliza valoro de koloroj kaj vortoj; Dek manieroj por strangoli Ĉilion; Hierarkio kaj Klasbatalo; Interparolo kun Kriŝnamurti . . .

La gazeto estas mimeografita, kio altkostiĝas afrankon. Se presita kiel The A.E., la kosto forte falus.

VERKOJ DE HEINRICH HEINE

Kompilata de Adolf Holzhaus. 329 poemoj, 198 paĝoj da prozo.

Ĉio kun paralela Germana originalo. Entute 317 paĝoj. Tri Aŭstralianoj kontribuis. Havebla per lia adreso: 2748 Orchard Lane, Columbus Indiana U.S.A. 47201. Recenzo aperos.

Jarlibro de U.E.A. 1973, Unua Parto. 368 paĝoj. En 1972 la vendoj de la Libroservo UEA kreskis je pli ol 5 p.c. kompare kun 1971. Tio estas des pli signifa, ĉar en 1971 la aĉetado de E-libroj jam estis kreskinta je 50 p.c. kompare kun 1970.

La nombro de la membroj altiĝis de 32070 en 1971 al 32135 en 1972. En 1971 U.E.A. havis 3501 delegitojn de ĉiuj kategorioj en 66 landoj.

Fariĝu membro de U.E.A. kaj ricevu tiun valoregan gvidilon tra Esperantujo. Peranto: K. Linton.

PROSPEKTOJ

Stirio Steiermark — Feria Revuo. Belaj fotoj kaj informa teksto pri tiu paradiza regiono. Petu delegiton en Graz.

Motociklotoj Jawa kaj Babetta kun aŭtomata klucilo. Tri detalaj folioj riĉe ilustritaj. Maŝinfabrika, OTS, 017 34 Povazska Bystrica, C.S.

NE PLAĈE . . .

Iam en la lasta milito, Aŭstralia soldato, sentante sin soleca kaj dezirante amikecon, eniris klubejon por ardeanoj. En la salono li rimarkis Anglan sinjoron, kiu sidis en brakseĝo. Post kelke da minutoj la du viroj jam babilis inter si, ĝentile sed iom formale. Fine la Aŭstraliano proponis mendi alkoholaĵon por la Anglo, Tiu respondis, ke li provis ĝin unufoje, sed ne volis plu provi ĝin, ĉar ĝi ne plaĉis al li.

Post iom plua babilo la Aŭstraliano amike tendis skatolon da cigaretoj. Ankaŭ tio ne plaĉis al la Anglo, kiu jam antaŭe provis fumi, sed ne volis provi duan fojon.

Ankoraŭ post iom da tempo la Aŭstraliano sugestis, ke ili ludu bilardon en apuda ĉambro, sed denove li ricevis la saman respondon. La Anglo jam antaŭe ludis bilardon unu fojon, sed ne volis ludi plu.

La Aŭstraliano, embarasate, penadis daŭrigi la konvencion, ĝis fine juna viro paŝis en la salondon. “Ha”, kritis la Anglo, “jen venas mia filo”. Je tio, la Aŭstraliano faris konjektan komenton: “Mi supozas, ke li estas via ununura sola infano, ĉu ne?”

"BRAVA" k.a.

In French "un brave homme" = a worthy man. "Un homme brave" = a brave man. These two meanings have been imported into Esperanto, as is seen by:

P.V.: (1) kuraĝa; (2) devopreta, honesta, senartifika, lojala; (3) bonkora, preta fari komplezon al aliaj.

P.I.V. reverses the order of definitions: (1) Brile lerta en sia arto, sperta en sia metio, kapabla en sia rolo; (2) (speciale) Brile sentima antaŭ danĝero.

Butler: = capable, fine, grand, gallant, worthy, valiant. (Ne "brave", which = kuraĝa, sentima). But, having set down "valiant", Butler may well confuse students with his negative note in parentheses, for "valiant" = kuraĝa. Wells, too, gives the two senses.

In Esperanto the order of the noun and its adjective has no bearing of the sense. Inversion, departure from the normal word order, in such cases is used in Esperanto (1) for metrical reasons;

(2) to avoid collision of two "a"s, as in "brava aktoro";

(c) to somewhat heighten the force of the epithet by drawing attention to the inversion.

It seems well to limit "brava:" to those definitions separating it from "kuraĝa" and so avoid a useless synonym. Ponder its use in Eliro 18/21,25; Jesaja 5/22; I. Reĝoj 1/42,52; Sentencoj 31/29; Rut 3/11; 2 Fabeloj de Andersen 131/3.

Similarly, two senses have been given to the Esperanto "granda":— Fr. un grand homme = a great man; un homme grand = a tall man. P.I.V. gives in definition 2: alte kreskinta (homo); "tall". In definition 4: (homo) superanta la ordinaran kvaliton, gravecon, ŝatecon; "great".

In French "un pauvre auteur" = a worthless author; "un auteur pauvre" = a needy author". Happily in Esperanto the word "povra" means simply: pitiable, pitiful.

This and similar subtle aspects of Esperanto lexicology merit attentive study.

"... LA ABELOJ BEDAŬRIS ..."

Usonano Albert Tibbets, elstara fakulo kaj aŭtoro pri abelkulturado, ricevis alvokon de tombeja sekretario, ke li venu tuj al enterigejo.

Farmisto, nomata Zachary, havis abelujojn apud sia biendomo. Li mortis. Kiam la ĉerk-veturilo kun la funebrantoj

estis sin preparantaj por ekiro al la tombejo, la abeloj perturbigis kaj ronde flugadis siajn ujojn. Tiam, post kiam la lasta aŭtoro kun funebrantoj jam foriris, la abeloj ekflugis direkte al la tombejo.

Tre stranga aspekto de tio estas, ke la abeloj ne sekvis la irvojon sur la ŝoseo, sur kiu veturis la aŭtoro. Ili flugis rektlinie al la tombejo, kredigante, ke ili bone scias ĝuste kie ĝi situas.

Kiam la aŭtoro kun funebrantoj alvenis ĝis la tombejo, miloj da abeloj jam estis tie. Iuj el ili prenis lokon en saliko apud la enteriga loko. Aliaj estis kunarigintaj sur apuda tombŝtono. Unu granda svarmo estis en tendo kaj pendis kunige de sur la supro de tendofosto.

La abeloj neniel ĝenis la funebrantojn. Ili restis trankvile samloke dum la diservo, ankaŭ dum la ĉerko estis malle-vata en la teron. Tuj poste ili leviĝis kaj flugis for en rekta linio revene al sia abelujaro.

La afero ne estas unika. La morto de John Lepka revokas en memoron similan okazon. En la Novjorka ĵurnalo TIMES Aprilo 28, 1956, oni legas: "Estas stranga tradicio el la malnova kampara tempo, kiam preskau ĉiu kampulo kulturis abelojn. Nome, ke abeloj havas apartan amsenton al sia kulturisto. Kiam mortas abelisto, aŭ iu lia familiano, iu devas meti strion da tolo nigra ĉirkaŭ ĉiun abelujon. Se oni ne faras tion, abeloj perturbigas, sin formas en svarmon kaj flugas al la tombloko por tie funebradi. Tiun tradicion mencias du Usonaj poetoj: Eugen Field kaj John Whittier.

Pri tiu mirinda fenomeno eĉ la tre funda scianto pri abela vivo, S-ro Tibbets, nur povas humile diri: "mi ne povas ĝin klarigi, nek kredus ĝin, se mi ne vere vidis ĝin per miaj propraj okuloj".

STREET POLL

The group secretary and his daughter polled the main street in Glasgow on several Saturday afternoons. They asked passers-by: (1) Have you heard of Esperanto? (2) Do you know that it is the easiest language to learn? (3) Do you agree that it be taught by radio and TV? (4) Are you yourself interested in it?

Replies per cent: (1) 74 Yes. 26 No. (2) 34 Yes. 66 No. (3) 90 Yes. 10 No. (4) 49 Yes. 51 No.

To those interested were given the folio: "Why Learn Esperanto?" In an hour and a half 20 copies of "Esperanto for Beginners (Butler)" were sold. — "Esperanto en Skotlando".

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: Mrs. M. Chaldecott, 16 Grosvenor Road, Lindfield, N.S.W. 2070

Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W., 2036

N-ro 122 (202)

MELBURNO

Oktobero, 1973



JAN. 2-8
1974.



LA 19A
AŬSTRALIA
ESPERANTO-
KONGRESO
BRIZBANO

Mail your Congress Fee to Mrs. S. Martin, 48 Launceston Street, Salisbury, 4107. Fee for A.E.A. members \$7.00, others \$8.00. Add \$10.00 deposit for accommodation at International House of Brisbane University. (Enclose stamped addressed envelope for receipt and further Congress Information.)

Ninth List of Congress Members

124. Miss B. Williams, Camberwell, Vic.
 125. Mrs. A. Kimberley, Mullabro, W.A.
 126. Mr. D. Eising, Moorooka, Q'ld.
 127. Miss M. O'Mara, Toowoomba, Q'ld.
 128. Mrs. R. McGrath, Mt. Pleasant, W.A.
 129. Mr. H. McGrath, Mt. Pleasant, W.A.
 130. Mrs. R. Ferguson, Dee Why, NSW
 131. Mr. R. Ferguson, Dee Why, NSW
 132. Miss S. Boston, Sydney
 133. Mr. Hiroyuki Nagai, Osaka, Japan.
- State Distribution: Q'ld. 59; NSW, 31; Vic., 27; W.A. 5; S.A., 2; A.C.T., 1; Overseas, 8.

Urgent Request

Will all those who have not yet indicated whether they intend to participate in Bus Excursions, please do so at the earliest convenience. The following tours are planned: 1. City Tour and Mt. Cootha (Wed. 2/1). 2. Lone Pine Sanctuary (Fri. 4/1) 3. River and Bus Tour to Bishop Island (Sun. 6/1). 4. Tour of Golden Circle Cannery (Mon. 7/1) and continuation to Redcliffe for Civic Reception by Mayor. 5. Post Congress Tour to Sunshine Coast (Wed. 9/1). Anybody wishing to stay at International House, after Thursday, Jan. 10, please communicate immediately with Mrs. S. Martin (see above).

The rate for International House has been fixed by that College at \$9 a day full board (3 meals and supper).

OFICIALA INFORMILO

NOVAJ ANOJ:

- Zomca, S-ro G., Marayong, N.S.W.
Boston, F-ino S. L., Sydney, N.S.W.
Lorenzin, S-ro D., Wickham, W.A.
Strawbridge, S-ino E., Victor Harbor, S.A.
Pearson, S-ro R. H., Smithton, Tas.
Cavel, S-ro K., Hornsby, N.S.W.
Pettit, F-ino E. A., Glen Waverley, Vic.
Morgan, F-ino G., Toowoomba, Qld.
Sims, S-ino S., Craigie, W.A.

T.G.M.F.

- Marshall, S-ro H., Monbulk, Vic. \$3.00
—Russ Baxter, Sek., 7 Sept.

WINDSOR, KVINDSLANDO

Laŭ loka gazeto en Redcliffe, okazas klaso de Esperanto ĉiulande ĉe la ŝtatlernejo (Lutwyche Road): Tel. S-ino Whitehead, 57 5637. Ĉu iu povos sendi al ni raporton pri la afero?

AUSTRALIA KRONIKO

PERTH: La Urbestro kaj Konsilantaro de la Urbo Perth invitis la Esperanto-Ligon partopreni en la Urbo Adiaño al la eksiganta Guberniestro Sir Douglas Kendrew kaj Lady Kendrew. La Urba Adiaño okazis (22/8) en la Koncertejo kaj Ges-roj Larter, S-ino R. McGrath kaj S-ino A. B. Sedgley ĉeestis en la nomo de nia Ligo.

PETERBOROUGH, S.A.: Nia tre aktiva membro, George Clarke el Orroroo, prelegis (8/8) al la Rotaria Klubo de Peterborough pri la internacia lingvo. Post lia prelego pluraj Rotarianoj montris intereson pri Esperanto kaj ĝiaj idealoj. S-ro Clarke esperas fondi tie Esperantan rondeton. (Gratulon kaj sukceson al li!).

MELBOURNE: H. Beechey, 20/8, recenzis novan anglalingvan libron "Future Shock" de Alvin Toffler, kiu pritraktas la ŝokostaton (mensan kaj korpan) de la homoj pro ŝanĝigo en la vivkondiĉoj. Tiu ŝokostato, li emfazis, fariĝos vera kaj daŭra problemo de la estonteco pro la nuntempa rapidege ŝanĝiganta mondo.

Nia vojaĝinta Sekretario, Herbert Koppel, prelegis ĉe la Societa Vespero (27/8) pri sia kvarsemajna flugvojaĝo. En Honolulu li renkontis UEA-Del. Bunnie Chambers kaj vizitis ties amatoran radiostacion. En Vancouver li prelegis en la loka E-Societo pri la temo "Aŭstralio konstruas novan Cefurbon" (kun diapozitivaj), prelegon kiun li ripetis kelkajn tagojn poste en Toronto antaŭ 200 delegitoj de la 46-a S.A.T.-Kongreso. Revne al Aŭstralio, S-ro Koppel vizitis belegan Victoria, ĉefurbon de Brita Kolumbio, kaj denove prelegis por la loka E-Societo.

"Pecoj" estis la titolo de parolado de Arnold Baldwin (3/9), kiu rilatis al la komplikaj lingvoj de la modernaj komputeroj, por kiuj la programado postulas lingvojn konsistantajn el taŭgaj frazsimboloj aŭ "pecoj". Ekzistas pluraj tiaj lingvoj. S-ro Baldwin ankaŭ testis nian kapablon ellabori programojn.

F. R. Banham donis pluran programon (10/9). En "La lastaj tagoj de Zamenhof" li montris kian grandan kvanton de literatura laboro la Majstro sukcesis fari spite de kreskanta malsano. La 2-a ero temis pri la "Psikologio de la Esperantistoj" kaj emfazis la neceson por positiva sinteno kontraŭ la publiko. Li finis per 2 humuraĵoj por ridigi nin.

OAKLEIGH, Vic: Arnold Baldwin vizitis nian grupon (5/9) kaj montris interesajn lumbildojn pri sia transmara vojaĝo. Nia prezidanto, S-ro Fordham,

dankis la preleginton pri ties interesa prelego, kaj poste membroj estis gastigitaj en la hejmo de F-ino A. Hearn por vespermanĝeto.

MORWELL, Vic: Nia prezidanto, Ivan Maddern, prelegis pri Esperanto ĉe la Rotaria Klubo de Heyfield kaj por la Apex Klubo de Traralgon. Viglaj diskutoj sekvis ambaŭ prelegojn, dum kiuj novenmigrintoj subtenis la aserton de S-ro Maddern ke Esperanto estas la solvo al multaj problemoj de komunikado.

SYDNEY: 20/8: Ni jam antaŭe vidis la bildojn: "Grimacoj de la Mondo" de Victor Bourlin, tamen ni ĝuis vivi ĝin denove, pro ilia bonhumoro kaj morda satiro pri registaroj, amo, mono, arto k.c. Kelkaj novaj bildoj estas sambone, altkvalitaj kiel la unuaj, kaj la prezenta maniero estas eĉ pli bona. Eble vi vidosis ilin en Brisbano.

27/8: La Esperanto Domo ŝajne estis plena de lernantoj: tri malgrandaj klasoj. Ni bonvenigis al Marta Lighthouse de Usono kaj petis ŝin gast-paroli antaŭ ol ŝi foriros. Nian ĉambron ni aliformis al teatro per tirebla kurteno. Sub Joan Green, membroj montris latentan talenton per du skizetoj. Margaret Chaldecott reĝisoris marionetajn teatraĵojn. La vortojn por la marionetoj ni antaŭe registris sonbende, ĉe kio membroj partoprenis. Guinda vespero; kaj ni proponas havi teatraĵ-vesperon trimonate.

3/9: Kevin Smith (prez-o de la Manly Societo) gastparolis pri la evoluo de la Homo, ku helpo de bildoj. Image ni retroiris en la praaĵn mult-milionojn da jaroj — en tiu tempo, kiam nia planedo estis dezerto, sen maro aŭ vivo. Poste, dum kelk-milionoj da jaroj evolue aperis strangaj estaĵoj en la maroj aŭ sur tero — fiŝoj, reptiloj, dinosaŭroj, simioj, bestoj kapablaj uzi ilojn, kaj fine la plej alta estulo: "homo sapiens". Kevin finis sian paroladon, demandante: "Ĉu estas alia klarigo?"

10/9: Wre Chandler ludis sonbendon de intervjuo inter Bruce Webster kaj li: "Today Show", Kanalo 7, kiu okazis: 6 septembro. Kvankam Wre ne antaŭ-preparis siajn respondojn, li bonege argumentis por Esperanto, trafe klarigante ĝian utilecon Impresega publikeco! Poste, Margaret Chaldecott kun aliaj antaŭprovis marionetajn teatraĵojn por prezento ĉe la Jarkunveno de la Federacio de N.S.K.—G.

MANLY: 7/8: La membroj, inkluzive la komencanto'n, parolis pri diversaj temoj.

14/8: La lasta kunveno antaŭ liber-tempo. Nia prez-o, Kevin Smith, prelegis: "La Evoluo de la Homo". Unu

membro kuraĝe protestis; ke sciencistoj troe supozas sen fakta bazo. Certe iuj el la bildoj de Kevin estas apenaŭ kredeblaj. La prelegon ĉiuj forte ĝuis kaj esperas, ke li denove parolos, por plivaste pritrakti la allogan temon.

BRISBANE: Pro la alproksimiĝo de la Nacia Kongreso en nia urbo mi volas klarigi iomete pri nia klubo, niaj agoj, metodoj kaj esperoj. La lernejo por komencantoj estas tute aparta de la klubo. Unu kialo estas por altigi la grandojn de tiuj, kiuj jam finis la studadon de "Secondary School" Esperanto" Vol. 1 kaj 2.

Komencantoj, kiuj vizitas la lernejon estas instruataj per "Sec. School Esperanto" Vol. 1 dum periodo de proks. 22 lecionoj. La mezgraduloj per libro 2 en la sama periodo. Tiuj lernantoj pagas po \$10 por ĉiu kurso, plus la kosto por la lernolibro. Se ili ĝajnas sufiĉan kompetentecon ili rajtas anĝeli la klubon.

La ĉefaj kialoj por la 2 lokoj estas: (a) pli bona havebleco de instruistoj por komencantaj klasoj. (b) Stimuli studentojn por labori al pli altaj gradoj. (c) Permesi al altgradanoj ŝancon progresi pluen. (d) Ni kredas, ke tiu metodo forigas la problemon, spertitan en la pasinteco, ke personoj forlasis la klubon, ĉar, en miksitaj klasoj, la emfazo ŝajnas esti pri instruado de komencantoj, samtempe neglektante tiujn, kiuj deziras daŭrigi la studadon kaj uzi la lingvon je pli alta grado. Nia plej grava espero pri la estonteco estas ke Esperanto estu instruata en ĉiu lernejo. Jam ekzistas ĉi tie 3 E-klasoj en malsamaj lernejoj, unu kiel oficiala lerneja temo.

Pro la alveno de la printempo ni antaŭĝuas denove pluajn subĉielajn aktivecojn; samtempe ni povas plibonigi nian paroladon de la internacia lingvo. La unua semajnfino okazos ĉe Coolum je la 6-7/10, kiam 17 geprogresintoj loĝos en 2 luitaj domoj. Ĉe la hejmo de Sybil Martin okazos (4/11) E-tago. Ĉiuj grupoj partoprenos. Pro la venonta kongreso ni, la Brizbanaj E-istoj, certe kaj sincere antaŭĝuas la interŝanĝon de ideoj kaj, plej grave, renkonti vin el la aliaj diversaj kluboj kaj la individuajn Esperantistojn.—V. Robinson.

REDCLIFFE, Q'ld. La Estraro de nia grupo estas en la nuna jaro: Prez: S-ino Beth Strang; Vic-Prez: S-ino Veronica Clarke; Sekretario: S-ino Dorris Styles; Kasisto: S-ino Ellie Chester.

En Julio ni aranĝis Societan Vesperon por adiaŭi membron kiu vizitos sian naskiĝlandon Germanujon. Dum tiu vespero ni ĝojis bonvenigi Ges-rojn R. Banham, kiuj libertempis en Redcliffe.

Nia ĝenerala kunveno okazos (2/10) Planoj estas pretaj por la Zamenhof-Festo. Ankaŭ per helpo de la urbestro de Redcliffe, S-ro C. Kroll, kaj membroj de la Konsilantaro, civita akcepto kaj antaŭtagmeza teo estos aranĝotaj por la vizitantoj al la tutaŭstralia kongreso en Januaro.

Antaŭ ol mi malsaniĝis en Julio, mi gvidis dumtagan klason por komencantoj kaj vesperan klason por progresintoj; krome S-ino E. Chester gvidis vesperan klason por komencantoj. Mi devas danki al S-ino V. Clark, kiu nun gvidas ĉiun mardon klason ĝis mi denove povos rekomenci la instruadon.—Meg. Pritchard

HOBART: "The Mercury" 28 aŭg. kaj 18 sept. raportas pri vizito de du Japanoj al Hobarto. Ili estas E-istoj: S-roj Hiroŝi Domen kaj Nagai Hiroyuki. Ili gastis ĉe S-ro E. Loorits kaj lia edzino. Universitataj studentoj, ili restos en la urbo du semajnojn. S-ro Loorits sendis al ni kopion de letero en bonega E-o verkita de S-ro Nagai Hiroyuki. La ĵurnalo mencias, ke la ligilo inter ili kaj nia amiko Eini estas Esperanto kaj frontpaĝe, ĉefartikole, bildas la tri virojn, kiuj studas Esperanton vortaron.

La Japanoj alvenis Hobarton 17 sept. kaj loĝas ĉe Jane Franklin Hall (Univ.), kiel gastoj alestante la instru-prelegojn.

Lektoro Jack Gibson instruas Esperanton, Francan kaj Japanan en Launceston; H. Nagai Esperanton kaj Japanan.

Esperanto-Federacio de Viktorio

La 3-a ĝenerala kunveno de la Federacio okazis (29/8) en la biblioteko de Oakleigh La Estraro por la venonta jaro estas: Prez S-ino A. Paling (Malvern-Grupo); Vic-Prez: F-ino M. Sanders (Oakleigh-Grupo); Sekretario: S-ro A. Baldwin (Melburna Societo); Kasisto: S-ro W. Worth (Oakleigh); Bulteno-Redaktoro: S-ro H. Koppel (Melburna Societo).

La Federacio aranĝas tuttagan Seminarion (3/11) en la Kvakera Domo (631 Orrong Rd., Toorak) kun treege varia programo. Gastoj el aliaj ŝtatoj estas bonvenaj kaj NE pagas kotizon. Aliaj pagas \$1, kiu inkluzivas posttagmezan kaj vesperan teojn. Sendu vian aliĝon al Arnold Baldwin, 45 Earl St., Kew, 3101.

Esperanto-Federacio de Kvinslando

La 5-a kunveno de E.F.K. okazis 1-2-an de Sept. ĉe Monto Buderim. 30 anoj partoprenis kaj tre ĝuis la semajnfiron. La prezidantino, S-ino Doris Sinclair, estris la aferkunvenon sabate. Oni decidis ke la Jarkunveno okazu en Feb-

rauro ĉe Redcliffe (Sutton House). Oni decidis fari donacon al la "T. Goldsmith Fonduso". La kasisto raportis bilancon de \$130 kaj ke la Federacio nun havas 70 membrojn. Post vespermanĝo okazis amuzvespero en kiu partoprenis la grupoj el Nambour, Brisbane, Caloundra kaj Toowoomba. S-ino Sinclair prelegis pri Buderim kaj S-ino Bruton kaj F-ino M. O'Mara gvidis la komunan kantadon.

Dimance, post viglaj diskutoj, membroj disiĝis por viziti plurajn turista'n allogaĵojn de Buderim. Poste ĉiuj kuniĝis en bela piknikejo Foote Parko por fiŝui agrablan semajnfino.

PROFESORO R. ROBERTSON

Ni ricevis riĉan leteron de li el Winstead, Nicholson Lane, Penrith, CA117UL Cumberland. Dato: sept. 12. Jen resumo:

Unue, li dankas por ilia gastemeco Usonajn E-istojn: Ges-rojn W. Schulze (San Francisco); S-inon Anne Whitaker, Ges-rojn J. Deere kaj aliajn (Portland); S-inon M. Hammersmith (Olimpia, Washington, D.C.).

Lace alveninte Londonon, li kaj lia edzino, post vizito al parencoj, flugis al Belgrado anstataŭ aŭtoveturi tien. En Belgrado ili trafis en lingvan malfacilon, Bonŝance la vortoj "biero" kaj "omeleto" estas similaj en la lingvo Serb-Kroata, kaj per tiuj nutraĵoj ili travivis ĝis alveno de Ges-roj Issobe el Tokio (antaŭe anoj de la klubo en Manly.) La kvar amikoj jam de tiam uzetis iom da Germanaj vortoj por faciligi aferojn. Oni diris, ke la akvo en Belgrado estas "trinkebla", sed ili ne observis tiurbandojn mem ĝin trinki.

Ho, nenia lingva miskompreno ĉe la Kongreso! 1600 homoj el 40 landoj facile komprenis unu la alian; en Esperanto ili diskutis eĉ gravajn aferojn politikajn kaj sciencajn. Tie alestis: D-ro kaj S-ino Einihovici, S-inoj V. Payne, B. Clemenson, E. Graham; S-roj N. Gamble, C. Amat. "Robbie" salutis la Kongreson nome de la A.E.A. Modeste dubante sian meriton tiel alparoli la Kongreson, kaj samtempe fieri pri la A.E.A. kies reprezentanto li estis, li estis tre korduŝata, stari antaŭ tiu granda homamaso, parolante en la Internacia Lingvo. Tiun minuton li memoros dum sia tuta estonta vivo.

Ges-roj Robertson ĉeestis multajn prelegojn de la Internacia Somera Universitato faritajn de profesoroj, docentoj kaj aliaj.

Antaŭ plena halo S-ro R. Harry kiel unua prelegis pri: La Evoluo de la Internacia Juro pri la Maro, kaj sagace,

bonhumore respondis demandojn post la parolo.

Invitite de la urbestro, D-ro A. Einihovici kaj lia edzino akompanis Prof-on Robertson kaj ties edzinon al la Urbdomo kiel reprezentantojn de la A.E.A. Inter aliaj ĉeestantoj ili renkontis Pastron Ciccanti (Italujo), kiu vizitis Aŭstralion en 1970 kaj parolis al klubanoj en N.S.K.

"Robbie" laboros en Anglujo ĝis Kristnasko. Li vizitis la patrujojn de siaj prauloj en Skotlando, haltis ĉe Dollar por kunparoli kun la konata poeto Esperanta, Wm. Auld, kiu regalis lin kaj la edzinon per brila konversacio, trinkante viskion kaj rakontante. La Skota versmajstro certigis, ke li alte estimas la gazeton: "The A.E." kaj tralegas ĝin kun granda intereso kaj abrego.

"Robbie" revenos Aŭstralion ĝustatempe por ĉeesti la Kongreson en Brisbane.

VETERANO PAROLAS

Mi naskiĝis en 1895 en Surrey kaj rememoras la Ĥuran militon kaj la morton de la Reĝino Viktoria. Mi E-iĝis en 1912 kaj ankoraŭ havus mian membro-karton de la Londona Esperanto Club kune kun tiun frutempau, de la U.E.A. Kun Mudie kaj Butler mi interkonatiĝis. Poste, en la Unua Milito mi kontaktis E-istojn.

Mi venis Aŭstralion en 1920 sur la ŝipo "Ormonde", laboris ĉe bovin-bieno en Gippsland kaj edziĝis tie; konstru-laboris en Geelong, kaj dum la ekonomia krizo iris al Chinchilla, en Kvinslando, kun infanetoj veture per malnova aŭto Modelo-T.; kulturis mian piksel-piran bieneton ĉe Millmerran (Darling Downs) dum 1932. Finfine mi ekŝiĝis el la laborvivo kaj ripoze hejmiĝis en Buderim, poste Bowen.

En 1961 mi bone uzis E-on kiel turisto en Eŭropo kaj ankoraŭ korespondas kun iuj E-istoj, kiujn mi tie renkontis: Nuntempe mi nur modestagrade parolas E-on, sed ankoraŭ sentas intereson en la movado.—N. A. Collier.

(Ni kore petas kontribuojn de aliaj veteranoj.—Red.)

"MI VOLAS PEZI MIN"

En P.I.V. sub "pez/i" (ne-transitiva verbo) troviĝas tiu ekzempla frazo. Ĉu erare mislokita, anstataŭ sub "pes/i"? Pesi: transitiva verbo. Ekzemple: "Mi mane pesis la brasikon". Sed: "Homo povas pli **pezigi** sin (= iĝi sin pli peza) per troa manĝado aŭ alia faro.

Havantoj de P.I.V. notu la supran.

La Miraklo de la Universo

S-ano Ken G. Linton trafis la najlon sur la kapo kiam li elektis la supran titolon por sia artikolo en la aŭgusta AE. La universo vere estas miraklo. Sed eĉ kiam ni restas nur en la najbareco de nia propra sunsistemo, nia galaksio, la miraklo ne malgrandiĝas. Nia galaksio havas diametron de proksimume 100 000 lum-jarojn. Ĝi entenas miliardojn da sunsistemoj, miliardojn da Teroj, same bonaj kiel la nia kaj same loĝata de homoj kaj bestoj kiel la nia. Estus stultajo kredi, ke ni estas la solaj homoj en nia galaksio.

Sed ĝuste tio komplikas la aferon en tre alta grado. Religiemaj homoj asertas, ke Dio ne nur kreis nian galaksion, sed la tutan universon. Se tio estas vera, kaj religiuoj ne dubas pri tio, Dio devas esti tre altstatura personeco por ne perdi la superrigardon. Oni facile povus imagi, ke li povus stari per la piedoj sur la rando de nia galaksio kaj per la kapo tuŝi la kontraŭan randon. Se nun iu preĝus el Dio en la proksimeco de liaj piedoj, la preĝo bezonus 100 000 jarojn por atingi Lian cerbon kaj denove 100 000 jarojn por respondo de la Dia cerbo por reiri al la piedoj.

Se Dio intencas viziti nian plej proksiman najbaran galaksion, nomata Andromeda, Li bezonus 2 milionojn da jaroj por atingi ĝin, ĉar laŭ Albert Einstein la absoluta rapideco estas tiu de la lumo. Nenio povas esti pli rapida ol la lumo! Ĉu ni imagas Dion en la grandeco de homo aŭ en la grandeco de kelkaj milionoj da lumjaroj, Li ne povus movi sin pli rapide ol per la rapideco de la lumo. Ju pli grande ni imagas Dion, des pli longe la signalo de Lia cerbo bezonus por atingi Liajn manojn aŭ piedojn por sin movi. ((Ĉu mi devas memori vin pri Genezo I, verso 26: . . . Ni kreu homon laŭ Nia bildo, similan al Ni . . . kaj verso 27: Kaj Dio kreis la homon laŭ Sia bildo, laŭ la bildo de Dio Li kreis lin.)

Sed ni devas supozi, ke ankaŭ la Andromeda Galaksio enhavas miliardojn da sunoj kun Teroj, loĝataj de homoj. Dio, vizitante la Andromedan Galaksion, devas lasi nian galaksion ne prizorgata por kvar milionoj da jaroj minimume! Se Li nun kreas nian teron kaj tuj poste forlasas nian galaksion por viziti eble kelkajn cent aliajn galaksiojn, Li certe ne plu trovos nian teron post reveno, ĉar ĝi estus mortinta kaj forŝrumpinta, same kiel la lumo.

Sajnas al mi, ke kredi pri UNU persona Dio, estas kredi je miraklo milionfoje pli granda ol kredi je hazarda estiĝo de ĉio. La unu sola Dio estas fizike aŭ spirite ne ebla. Laŭ la hebrea originalo,

la biblia teksto de Genezo I, verso 1 diras jenon: "B'rashith bar Elohim"—"En la komenco, la Dioj kreis ĉielojn kaj teron." Sed oni ankaŭ povas legi la tekston tiel: "B'rash ithbara Elohim", kaj tio signifas: "En la komenco kreiĝis Dioj, ĉieloj kaj tero." (Laŭ G. Hodson, *The Hidden Wisdom in the Holy Bible*, volume II, paĝo 93, citita el: *The Cabalah Masonic Review*, Sept. 1885) Mi ne scias, kial la eklezioj ankoraŭ insistas paroli pri unu sola Dio, kiam la Biblio tute klare montras pluralon.—VOLO.

(Per juste egala prezento de la du vidpunktoj, la redakcio fermas la diskuton. Ambaŭ amikoj interkonsentu daŭrigi la aferon inter si koresponde—Red.)

LA HUNDO SENVOSTA

Karlo, la hundo, estis tre malfeliĉa, ĉar li ne havis voston. Homoj rigardis lin kaj ridis; infanoj ne ludis kun li. Li deziris havi voston; li pensis, ke vosto feliĉigus lin.

Karlo ŝatis naĝi en akvo. Li pensis, ke en akvo neniu vidus, ke li ne havas voston. Unu tagon li promenis apud la maro kaj aŭdis infanojn krii laŭte. Ili estis terurataj. Karlo, la hundo, vidis infanon en la akvo. La infano ne naĝis. La hundo saltis en la maron kaj tiris la infanon el ĝi.

Nun Karlo estas feliĉa, ke li ne havas voston — ĉar homoj diradas pri li: "Tiu senvosta hundo estas ja kuragega". —Lilian Memmott.

NOVA LIVERA POŝT-TENUJO

En Estonlingva gazeto Kanada Eino Loorits legis, ke lia frato Rudolf en Toronto inventis ujon "Mini-pouch" por leterportistoj. Eino montris la ilustritan artikolon al sia poŝtfaka ĉefo, kiu faris fotokopion kaj sendis ĝin al la Poŝta Ministro. Poste venis el Kanado tiu mini-poŝtajportilo, kaj Eino povis peranti foto-artikolon en "The Mercury" (Hobarto). Ankaŭ "Australian Post Office News" aperigos la artikolon, kaj la Aŭstralia Poŝta Ministerio nun intertraktas pri patenta permesilo kun la Kanada Poŝta Administracio. Baldaŭ oni uzos la inventaĵon ankaŭ en Aŭstralio.

ERROR IN NUMBERING

Would those of the faithful who carefully conserve their copies, please alter the numbering thus:

Aprilo, 1973: N-ro 116 (196); Majo, 117 (197); Junio, 118 (198); Julio, 119 (199); Augusto, 120 (200); Septembro, 121 (201).

RALPH HARRY ANEKDOTAS

Sperta diplomato klarigis al juna sekretario la distingon inter ĝentileco kaj takto, du ecoj tre necesaj en la diplomatia profesio. "Imagu, ke servisto en hotelo hazarde eniras cambron en kiu troviĝas ĝastino tute nuda. Se li diras, fermante la pordon, 'Senkulpigu min, sinjorino', tio estas ĝentileco. Se tamen li diras, fermante la pordon, 'Senkulpigu min, sinjoro,' tio estas takto.

Jan Masaryk, vizitante Parizon, rimarkis, ke la ĉeha ambasadoro tie estis tre maldika kaj ŝajnis malsana. Li demandis al li la kialon. Tiu klarigis, ke li devas ĉeesti ĉiun vesperon diplomatian bankedon kaj, ĉar la francaj virinoj estas tiel tre babilemaj, li neniam sukcesis ion manĝi.

"Ho", diris Masaryk, "mi estis mi mem ambasadoro. Mi komprenas vian problemon kaj kiel ĝin solvi. De nun, kiam vi sidigas por bankedo, demandu tuj al la sinjorino dekstre: ĉu ŝi estas edzino? Se ŝi neas, demandu al ŝi: ĉu ŝi havas infanojn? Certes ŝi ne daŭrigos la konversacion, kaj vi povos vin turni al via maldekstra najbarino. Demandu al ŝi same: ĉu ŝi estas edzino? Se ŝi jesas, demandu: ĉu ŝi havas infanojn? Se ŝi jesas denove, vi devas demandi: kiu estas la patro? Tio estos fino de tiu konversacio. Fine, parolu al la virino trans la tablo. Se ŝi estas edzino kaj se ŝi ne havas infanojn, vi demandu: kiel ŝi evitas la gravecon? Tio finos tiun interparoladon, kaj vi povos senĝene manĝi kaj trinki ĝissate".

(Parolo taktika, sed ne takta!—Red.)

BRISBANE GRAMMAR SCHOOL

Mr. M. A. Howell, headmaster of the school, in a letter to Mr. C. M. Smith thanks him for his information about Walgett High School and its Esperanto emblem ('A.E. July). He feels it to be of interest to a number of Old Boys and has passed the letter on to the editors of the School Magazine for inclusion in the 1973 issue.

He adds that from time to time consideration has been given to the teaching of Esperanto at the School, but it is difficult at present to provide for an additional language, as French, German, Latin and Japanese are already taught there, and it is planned to introduce Indonesian next year.

Mr. Howell, however, is "sure that there would be a place for the teaching of Esperanto as an additional subject for those who have a particular interest in languages" and he will certainly give the matter his consideration.

RECENZOJ

"Internacia Kuirlibro", kompilita de Johanna Shorter-Eyck: eld. de la Brita Esperantista Asocio; presita de The Blackburn Times, presistoj de la Plena Ilustrita Vortaro. 193 paĝoj, prezo \$1.50. En La Enkonduko de Nora Holmes ŝi pensas kun granda danko pri la avantaĝoj kiujn ŝi ĝuis ĉar ŝi lernis Esperanton. "Unu el ili estas ke mi manĝis bongustajn nekonatajn pladojn ne nur en restoracioj sed, ankaŭ, en la hejmoj de ĝemikoj alilande".

Ne ĉiu el ni E-istoj, pro tio aŭ alio, povis, nek povos, dividi kun ŝi la volupe frandan sperton. Tamen, bonaj kuirist(in)o; inter ni povas per ĉi libro ĝin ĝui sen la kosto kaj komplikoj de transmara vojaĝado.

La libro estas fortike broŝurita, sur glacea papero, kaj enhavas 500 receptojn el 100 landoj. Lingve kontrolis la tekston S-roj C.D.A. Capp, D. B. Gregor, H. W. Holmes; F-inoj M. Boulton kaj D. Crick. Pro ilia konsila kaj korekta kribrado rezultigis klara kaj detala priskribado de ĉiu manĝaĵo.

Ĉiu variaĵo jam de supo ĝis deserto estas inkludita. Krome valora estas la Kuireja Terminaro inter kiu troviĝas "glacei" (kovri ion per tavolo de sirupo aŭ glaceo). Tiu difino estas ne trovebla sub "glace/a" en la PIV. "Kustardo" ka' "brezi" estas en PIV, sed ne en PV. "Pomkorilo" estas utila formo por: ilo por forigi pomkorojn. Sed "klamo"? Tiu molusko (clam, scallop) havas Esperantan nomon: pekteno. "Clam Chowder" (p.7) ricevas la strangan nomon: Klamĉovdero. Kio nome estas "ĉovdero"?

Alfabeto listo de la 15 manĝajaj kategorioj certigas facilan uzon de la bone aranĝita libro.

Se preni nur unu sektion — Supoj — Aŭstraliano; povus provi la de ili malmulte konatajn, ekz., artiŝoka, barĉa (rugbeta), florbrasika, hepata . . . La ceteraj sekcioj estas egale 'provigemaj' por ĉiu kuirad-amanto, kiu povus modifi la konsistojn ka' metodojn laŭ gusto kaj cirkonstancoj.

"La Paperoj de D-ro Ante Ramljak", 80 paĝoj. Prologo de Marinko-Givoje. Mendebila ĉe tiu: P.p. 5025, Zagrebicka Dubrava 41040, Jugoslavio. 2.50 U.s. dol.

Li naskiĝis en 1893, mortis en 1972. Li farigis aktiva E-isto en 1950 kaj en E-o verkadis manuskripte multe da rimarkinda materialo, krom poemoj en sia nacia lingvo, el kiuj Emilija Lapenna tradukis, kelkajn en ĉi-libreto.

Post nur 55-taga lernado de E-o li tradukis en 31/XI/49 poemon de Zamenhof—"La Vojo" en sian gepatran.

Tiu teksto estas sur p. 22-23. Pri la facileco de E-a lernado li komentis: "Mi konas intelektulon, kiu provis lerni la anglan, kaj li ekriis: 'Povraj Angloj, tiu granda kaj civilizita popolo, kiu ankoraŭ ciam devas skribi kaj paroli tiel primitivan, komplikan kaj nekontroleblan lingvon kreatan senplane dum jarcentoj. La sama homo jaron poste vane penadis lerni la rusan; post kvarmonata lernado de Esperanto li pli korekte povis skribi leteron eksterlanden ol en la germana post 44 jaroj da lernado kaj legado'".

Tridekpaĝa pritrakto temas pri Urbplanado en kiu li riceve projektas planojn por tiel konstrui urbojn, ke civitanoj povus iradi tra ili sen risko de trafik-akcidentoj, kaj sen fumo, polvo kaj ceteraj aer-venenoj. Estas signife, ke pli kaj pli urbkonstruaj ekspertoj sin okupas per planoj similaj al liaj, kiel montritaj en li verko: "Nova Konstruo kaj Organizo de Urboj kaj Statoj".

Li pledas por universala monsiŝtemo kaj eterne preciza mond-kalendaro. Li proponas dividon de la jaro je 13 monatoj po 28 tagoj, aŭ 4 semajnoj po 7 tagoj. Tio similas al propono de Unesko, laŭ kiu la jaro havas 364 tagojn plus unu tago sen nomo kaj dato inter du jaroj.

Interese bona libreto, sed bedaŭre altkosta.

PRIKONGRESA KONSILIO

"Grave estas la eduka signifo de la esperantistaj kongresoj. Izolitaj esperantistoj, kiuj neniam havas la eblon praktike apliki tion, kion ili lernis, ofte dubas, ĉu efektive per Esperanto oni povas tute bone interkompreniĝi. Eĉ interne de la esperantistaj grupoj oni ofte ne kuraĝas paroli esperante; oni balbutas, oni preferas paroli en sia nacia lingvo, kaj proporcie al la nekuraĝeco de la parolado aperas ankaŭ nekuraĝeco de propagando, ĉar la esperantistoj-balbutantoj malgraŭvole ne povas liberigi sin de la timo, keble Esperanto estas afero pli teoria, ol praktika. Sed kiam la balbutanto venas al kongreso, li havas la eblon aŭdi bona'n kaj spertajn esperantistajn oratorojn; kiam li per siaj propraj okuloj kaj oreloj konvinkiga, kiel bele kaj flue oni povas paroli en Esperanto, li entuziasmiga; li vidas, ke li laboras por io viva kaj vivoplena; li revenas hejmen kun nova kun nova kuraĝo kaj energio . . .

"Tio estas la ĉefaj motivoj, pro kiuj ni en ĉiuj niaj kongresoj, ne sole en la universalaj, sed ankaŭ en la naciaj aŭ regionaj, nepre devas paroli ne sole pri Esperanto, sed ankaŭ per Esperanto".

—"British Esperantist", 9/1910. Represe: "Originala Verkaro", p. 401-2.

REPORTERS

We aim to get the paper issued by the 15th of each month, so please send your reports to Mr. H. Koppel as early as possible before the 18th of the preceding month; this would give him time to prepare the material to send on to me not later than the 23rd of that month. I then immediately send it, together with my matter, to the linotyper, who likes to have the last week of each month free to do our work. He sends the proofs to me after about 8 days from his receipt of my "copy". Then time must be given for the printer to run off the copies and enable the issue to appear by the 15th of each month.

Those sending to me direct may continue to do so.—Editor.

PRI NEŬTRALECO

"The A.E." estas neŭtrala pri la religio kaj la politiko landa kaj alinacia en tio, ke ĝi sin limigas al laŭfakta prezentado de Esperanta aktiveco en tiuj sferoj. Tamen, ĝi ni evitas temojn de ĝenerala intereso, cetere iom polemikaj, kondiĉe kaj estu liberaj je ofende drasta lingvaĵo kaj esprimataj per ofende drasta lingvaĵo. Estu sciante, ke esprimoj de opinioj estas nur tiuj de la aŭtoroj mem kaj ne de la Asocio.

Atakoj kontraŭ Esperanto estus rebatataj, negrave de kia ideologia fonto ili devenus, kaj rasismom, soviniŝm, diskriminacion kaj kruelecon la gazeto rajte kondamnas.

Humuraĵoj, pikkritikoj, pri kurantaj aferoj supozinde ofendas neniu.

LIBRO RECENZOTAJ

"**Ne Plu Ludo . . .**": N. Barthelmess. Eld. S.A.T. Kvin Noveloj. 128 paĝoj 11 x 20.5 cm. Prezo 2 Us dol. plus sendkosto

"**Wilhelm Heinrich Trompeter**": Adolf Holzhaus. Dua pilgrandigita eldono. 152 paĝoj. Prezo ne indikita.

"**La Bambu-ŭto**": Novelaro el Sud-Vjetnamio. 208 paĝoj. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo — 1973.

POLA RADIO

Por ĝia Konkurso alvenis 4098 respondoj — inter ili 323 de E-istoj laŭ adreso de Pola Radio; nekalkulitaj estas la E-aj respondoj kiuj alvenis laŭ adreso de aliaj nacilingvaj redakcioj de la Poreksterlanda Programo de la Pola Radio.

Inter la ĉefaj dislotitaj premioj: gajnis objekton Ruth McGrath kaj Eini Loorits.

THE VOICE OF "REFORMISM"

From U.S.A. came a letter in which the writer says he has "discovered the excellent language, Esperanto" and is "especially impressed by its regularity". He then asks: Why don't Esperantists treat the grammatical endings as independent words? This is his first suggestion: The word *est-* may be omitted when the emphasis is not on existence but on simple connection, for example: *Si os bona. She'll be good.*

The second: If time is not essential or is otherwise indicated, the redundant tense-indicating word (*-is, -as, -os*) may be dropped. Ex. *Morgaŭ ni ir. Tomorrow we'll go.*

The third: An adjective may do without its accompanying suffix words (*a, -j, -n*) if it immediately precedes the noun it modifies. Ex. *Mi manĝis grand bel pomojn.*

The fourth: Word order may be used instead of grammatical-ending words to indicate subject, verb, and direct object in that order in a sentence. (This to abolish the accusative case-ending.—Ed.) Ex. *La virin ĵus invitis ni al vespermanĝo.*

We have answered our friend in some detail, reasonably and fittingly. We feel that such queries are typical of those we may expect from time to time from well-meaning critics of Esperanto. Zamenhof had patience to answer many such. Mature Esperantists, standing firmly on the basis of the language must be ready to give well-reasoned answers to them. There are those outside the movement or on its fringes who have given considerable attention to the problem of international language, and of Esperanto in particular. Let us not run from confrontation with these folk, but face them with the confidence born of patiently gained knowledge of our language in all its aspects.

To Jim Fiegenschue, 1408 El Campo Dr., Dallas, Texas, USA 75218, has been sent a detailed refutation of his theories, with reciprocal cordiality. He has "discovered" Esperanto. May he in future time come to understand its character more closely and so discover the genius of him who gave it being.

Attractive ESPERANTO CHRISTMAS CARDS: Only 5 cents, plus postage.

"Gojo kaj Espero" (Joy and Hope). Obtainable from Malvern Group, c/o L. Hooper, 1/13 Belmont Av., Glen Iris, 3146.

WHAT ESPERANTO GIVES YOU

What are the values and advantages of Esperanto for the really active E-ist?

1. It sharpens the intelligence and strengthens the spirit.
2. It enables one to understand one's mother tongue better.
3. It facilitates later learning of other languages.
4. It widens one's outlook on the world and its peoples.
5. It puts correspondence on a lingual equality.
6. It makes foreign travelling easier through forward contacts with E-ists abroad.
7. It makes friends for one in other countries.
8. It brings into friendly contact E-ists in their own country. The sense of isolation is often dispelled.
9. It gives added aim for living, a feeling of solidarity with countless others everywhere, having the same ideals.
10. It brings the pleasure of entry into the ever-growing area of Esperanto literature.

If these are not enough, think of others also. One thing Esperanto does not yet give you — money, a well-paid position in commerce, public service and so on. That will come when it is used on a far vaster scale than at present. Remember that the telephone was introduced when but few used it, and the profit was minimal. We believe that this analogy is valid for Esperanto also.

Improve your style by reading
the cultural review
NORDA PRISMO

Annual subscription to this
literary magazine

\$3.20

Australian agent, Ken G. Linton.
Ask for specimen copy.

KORESPONDADO

Mi deziras korespondi kun tuta mondo kaj kolektas ĉiujn esp-ajojn, precipe glumarkojn. Respondo ĝarantiata. Mi bone rekomenco je via deziro. Richard Wluka, D-3 Hannover-Leinhausen, Bremer Str. 8.

U.E.A. — KOTIZOJ

Kotizoj altiĝis por la venonta jaro:
MJ 5.40; MS 16.80; M.A. 10.80; J.M.-A 8.10. — Peranto, Ken Linton.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: Mrs. M. Chaldecott, 16 Grosvenor Road, Lindfield, N.S.W. 2070

Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 123 (203)

MELBURNO

Novembro, 1973



JAN. 2-8
1974.



LA 19A
AŬSTRALIA
ESPERANTO-
KONGRESO
BRIZBANO

OFICALA INFORMILO

NOVAJ ANOJ:

CHIFLEY, S-ro J., Bathurst, NSW

McMINN, Peter, Wyoming, NSW.

DWYER, S-ro B., Auchenflower, Qld.

DUNSTAN, S-ro C., Scarborough, Qld.

CETTINGE, S-ro V., New Norfolk,

Tas.

T.G.M.F.:

Esp. Fed. de Kvinlando \$30.00

Cettinge, S-ro V., New Norfolk,

Tas.

Pollard, S-ro C., Warrawong, NSW 2.50

—Russ Baxter, Sek., 5 okt.

A.E.A. EXAMINATIONS

Supera (Advanced): Rene August
Smeets, Mt. Hawthorn, W.A.

Elementa: Lester Bankston, S.A.

AUSTRALIA KRONIKO

PERTH: Du usonaj vizitantoj, Eleanor kaj Louis Stein, el San Diego, Kalifornio, estis niaj bonvenaj gastoj en Septembro. Je 5/9 okazis speciala kunveno por saluti ilin. Kelkaj klubanoj havis ankaŭ la plezuron persone gastigi Ges-rojn Stein aŭ montri al ili la ĉirkaŭaĵojn de nia urbo.

Nia iama Prezidanto, Norm Brodie, kiu nun loĝas en Sidnejo, vizitis denove nian Ligon kaj je 26/9 li prelegis, kun belaj kolor-diapozitivaj, pri sia lastatempa vojaĝo tra Sud-Ameriko.

Dimanĉon 16/9 ni sekvis inviton de Ken kaj Barbara McKnight kaj piknikis en Kalamunda. La vetero estis agrabla kaj niaj gastigantoj malavare regalas nin.

F-ino Jessie Gray raportas ke la "Konstru-Fonduso", kiun ŝi administras, nun havas \$210.

Mail your Congress Fee to Mrs. S. Martin, 48 Launceston Street, Salisbury, 4107. Fee for A.E.A. members \$7.00, others \$8.00. Add \$10.00 deposit for accommodation at International House of Brisbane University. (Enclose stamped addressed envelope for receipt and further Congress Information.)

Tenth List of Congress Members

134. Mrs. J. Munro, St. Lucia, Q'ld.
135. Mr. R. O. Pye, Canberra.
136. Mr. B. Dwyer, Auchenflower, Qld.
137. Dr. T. Einihovici, Perth.
138. Mrs. I. Einihovici, Perth.
139. Mrs. M. Chaldecott, Lindfield, NSW
140. Mr. E. W. Woodruff, Moree, NSW
141. Mrs. E. Woodruff, Moree, NSW

State Distribution: Q'ld. 61, NSW 34,
Vic. 27, W.A. 7, S.A. 2, ACT. 2, Overseas 8.

MELBOURNE: S-ro H. Koppel raportis pri la nunjara UEA-Kongreso en Belgrado, laŭ detaloj aerpoŝte ricevita el Eŭropo kaj ankaŭ pri la SAT-Kongreso en Toronto, kiun li persone partoprenis. I.a. li ankaŭ prelegis antaŭ 200 delegitoj de tiu kongreso, pri la temo "Aŭstralio konstruas novan ĉefurbon."

Je 24/9 okazis nia jara merkato-vespero, nomata "Amerika Teo". Ĉe-estis 29 personoj por marĉandi kaj poste interbabili kaj loterii super luksega vespermanĝo. La fina rezulto estis \$59.28, kio inkludis ankaŭ mondonacojn poŝte ricevitaĵojn de Ges-roj Banham, Fallu kaj Fordham, kiuj ne povis persone ĉeesti. (Lastjare 29 ĉeestantoj kontribuis \$63.44). Dankon ankaŭ al grupo da membroj de la Malvern-Klubo, kiu prizorgis vendotablon kaj grave kontribuis al la sukceso de la vespero.

Je 15/10 la programo estis "Novajoj el la Aŭstralio Poŝt-Oficejo". La ĉeestantoj laŭvice prezentis ĉerpajojn tradukitaĵojn el la gazeto "Australian Post Office News".

MORWELL, V.c.: Je 4/9 ni kunvenis en la hejmo de nia prezidanto, S-ro Maddern. Ges-roj Henk kaj Ada Schepers montris kolor-diapozitivojn, kiujn ili intencis montri ĉe la Seminario en Melbourne je 3/11. Ni nun havas tri diversajn kursojn: Por komencantoj ĉiumarde vespere ĉe "Presentation Convent" en Moe; "Revizian"-kurson ĉiumerkrede posttagmeze en la hejmoj de la membroj, kaj kurson por progresintoj ĉiulunde laŭvice en la hejmoj de Ges-roj Maddern kaj Wybenga.

TOOWOOMBA, Q'ld: En Septembro S-ro H. Petley prelegis antaŭ la membraro de la loka filio de la "Alliance Francaise". Ĉiuj aŭskultis atente, esprimis surprizon ke Esperanto estas fakte kompleta lingvo, kaj ne nur ia kodo, kaj dankis la preleginton. Kelkaj eĉ diris ke ili vizitos nian klason aŭ entreprenos korespondan kurson en la nova jaro. S-ro Petley ankaŭ parolis antaŭ la membraro de "Rotoract" kaj li esperas ke iuj el la membroj vizitos nian klason venontjare.

SYDNEY: 17/9: Plezure ni raportas bonan publikecon. En aŭgusto la gazeto "Hoover News" aperigis intervjuon kun Volo Gueltling pri E-o, kun lia fotografajo. Ni bonvenigis al Shirley Fanos, kiu revenis de Usono kaj Kanado. Kiel vicprezo k.t.p. multo da laboro ŝin atendis. Debata temo: "La Edziĝo estas Malmoda". John Matasin subtenis, kaj Fritz Mueller-Sorau kontraŭis. Tiu ne tre serioza diskuto elvokis ridojn, neniam transirinta la limojn de ĝentileco. Oni ne voĉdonis.

24/9: Phil Henderson informe paroladis pri La Kultivado de Orkideoj. Li montris belajn specimenojn de floroj, kiujn li mem kultivas, ankaŭ impresajn lumbildojn de orkideoj.

8/10: Wre Chandler antaŭ ne longe paroladis pri E-o ĉe la "Rotacia" Klubo de Balkham Hills. En ĉi tiu vespero li defendis kamparajn knabinojn en debato: "Ke Kamparaj Knabinoj farigaĵas pli bona edzino ol Urbaj Knabinoj". Tom Elliott forte lin kontraŭis. Multaj sagacaj "frapoj" estis donitaj, kaj anoj vigle partoprenis. En sencio figura, la knabinoj estis ĝisfunde analizitaj, sed la sola rezulto estis konfirmi la veron de la diraĵo: "Ioma sensecaĵo nun kaj tiam estas bono — saniga kaj ĝinda ja por eĉ plej klera homo". 19 anoj ĉeestis.

15/10: Estis aranĝite, ke David Gould montrus lumbildojn, sed lia firmao sendis lin al Nova Gvineo, feliĉe nur kelktempe. Tial Margaret Chaldecott organizis ludojn. Unu estis "vorta kateno". En rondo, iu komencas per iu ajn vorto; la najbaro devas daŭrigi per rilata vorto: ekzemple — ŝuoj — paro — piro — pomo — k.t.p. Do, ĝi iras runde kaj runde ĝis la vorto estas tute malsimila. Alia ludo estis historio al kiu ĉiu ĉeestanto devas aldoni iomete.

MANLY: 11/9 La unua kunveno post 3-semajna libertempo.

18/9: Ni bonvenigis Ann Gash post ŝia eksterlanda vojaĝo. Forlasinte la Salaman Lernejan Kunvenon, ŝi lu-prenis tegment-ĉaron, kun dormsako kaj kuirilo kaj veturis tra Anglujo, Skotlando kaj Sud-Kimrujo. Si vizitis la urbon Duns, en Skotlando, de kie ŝia prapatro elmigris al Suda Aŭstralio en 1850, kaj post serĉo trovis la bienon kie li antaŭe loĝis. Surprize por ŝi, la bieno ankoraŭ bone funkcias. En tiu urbo estas 16-a jarcenta landlima turo, gardloko kontraŭ la malamikaj Angloj. Ann veturis 4700 mejlojn en Britujo, vizitis amikojn, trinkis bieron en la Hotelo "Verda Stelo" ĉe urbo Stoke-on-Trent, dormis en motelo kie administras E-isto en Londono, vizitis la Londonan E-Klubon en la Halo "Fred Tallant" ĉe Euston kaj renkontiĝis kun Robbie kaj Margaret post ilia ĉeesto en la Belgrada Kongreso.—Kay Morrison.

AL MEMBROJ DE U.E.A.

En la I-a de nov. estis sendita al vi memorigilo pri la kotizoj por 1974. Se vi ne ĝin ricevis, bv. peti S-ron K. Linton, 11 Poplar St., S. Caulfield, 3162. Se eble, pagu antaŭ la fino de 1973, ĉar nepagintoj ricevos la revuon nur ĝis la marta nro.

SUR LA VOJ' AL GUNDAGAJ.

(A. B. Paterson)

Kondukadis mi bovregojn
sur montaro kaj dezerto.
La senpluvojn kaj pluvegojn
konkeradis mia lerto.
Mi ekpensas pri pasinta
vivosperto mia — kaj
aferaĉo memorinda
sur la voj' al Gundagaj.

Jam noktĝis; aks' vagona
en du pecojn dislokiĝis,
sed ankoraŭ pli malbone . . .
pipo kaj takak' perdiĝis.
Ekpluvegis, ventoblekis;
mi malsatis forte; kaj
en manĝskatolo hundo fekis
sur la voj' al Gundagaj.

Kelkaj viroj bonfortunas
tra la vivo ĝis la morto,
sed ĉiame mi imunus
al la feliĉiga sorto.
Neniu flam' te-poton lekis;
pantalon' malsekis, kaj
en manĝskatolo hundo fekis
sur la voj' al Gundagaj.

Mi suferas kun rezigno
akcidenton, pluvon, koton
kaj similajn ja kun digno;
sed neniam pardonota
restos tiu faro fia:
feko en manĝujo kaj
sur la tuta havo ĝia
sur la voj' al Gundagaj.

—Tradukis Farbo.

La poemo estas trovebla en pluraj antologioj. Por iuj legantoj ĝi estas nebulenca pro uzo de eŭfemismo por la verbo "sat". Per la E-a traduko la senco fariĝas klara. Paterson volis prezenti konatan situacion en kiu homoj povas bonhumore rideti pri la pli-malpli kurioza malfeliĉo de iu kunhomo. Li bildigis la sorton de bovpelito, kiu akceptis la riskojn de sia metio, nome la batojn de akcidentoj, suferojn klimatajn kaj similajn; sed li ne volis pardoni la pekon de sia cetera fidela hundo. Tio estis por li la decida finbato, la neelportebla kulmino al liaj suferoj. En sia tempo la poeto ne facile povis nudesprimi sian dirvolon per rekta uzo de neagrable verbo, tamen genie faris la rakonton per lingva artificio.

Jen do por la unua fojo vi ricevas — sen kia ajn maldeco — klarlingvan redonon de tiu lia dirvolvo. Aŭtoritato por la verb-ŝanĝo: "The Australian" (Bill Wannon, Seal Books, 1969); "Nine Miles to Gundagai" (poemoj), Jack Moss.

KIEL TROVI ĜOJON . . .

"Maltrafi la ĝojon estas maltrafi ĉion",
diris Robert Louis Stevenson.

La momentoj de ĝojo estas floroj en la paŝtejo de la vivo. Kiam ni ĝojas, la vivo pligrandiĝas, ni enspiras pli da aero, kaj porĵoj malfermiĝas interne de ni.

La malĝoja afero estas, ke ĝi okazas al ni tro malofte, sed ofte ni nur bezonas oportunon por vidi malnovan sperton laŭ nova maniero. Mi memoras tian okazon.

Mi jam laboris la tutan nokton pri manuskripto. Mi trafis malfacilaĵojn, kaj sentis, ke mi neniam ĝin finos, sed je la kvina matene mi skribis la lastajn vortojn, kaj demetis la plumon, malfermis la pordon, eliris kaj surpaŝis la razenon. La stelaro jam maldensiĝis, kaj la ĉielo alprenis tiun aspekton de lumo jam venanta. Kelkaj birdoj komencis kanti, eksperimente provante siajn voĉojn, ĉiu ŝajne vekante la alian. La arboj, obskuraj konturoj sur la horizonto, komencis vesti sin per formoj kaj aspektoj. Radio da lumo trafis la salikon trans la strato, kaj akre gravuris branĉon de nia propra arbo. La lumo intensiĝis laŭ la tuta horizonto. Pli da arboj aperis, unu post alia, kaj la pli grandaj fosforeskis kiel grandaj kandelabroj en la mallumo.

La suno subite aperis! Estis ora flamaro malantaŭ nigraj arboj, kaj akra freŝeco en la aero. Folion post folio, kaj branĉeton post branĉeto, la suno lumigis la tutan arbon. La birdoj nun kantis pli forte, kvazaŭ ili ĵus kreigis far la mateno mem, kaj ankaŭ mi sentis min nove kreita, kaj tiel plena de ĝojo, ke mi ne povis teni la tutan.

Multaj el ni devas lerni eskapi el la karcero de la memo, ĉar ĝojo venas ne nur el la kunfandiĝo kun la naturo, sed venas el amo kaj kreado, el kompreno kaj eltrovo.

Eble ĝojo venas, kiam ni forgesas nin mem por servi aliajn, aŭ en la efektivigo de granda revo. Tiamaniere ĝojo trovas nin; vane estas serĉi ĝojon; ĝi devas trovi nin.

—El la angla tradukis Ken G. Linton.

MI KORESPONDAS

Esperante, Angle kaj Germane pri lingvoj, moderna muziko kaj sporto: Karel Simek, poŝtkesto 18-I, CS-53701, Chrudim, Czechoslovakia.

Dez. korespondi F-ino Karen Brock, 31 Brownville Cres., Maori Hill, Dunedin, Nov-Zelando. Aĝo 18, kolektas pm., il.p.k., ludas gitaron kaj "Badminton".

PRI LA SUFIKSO -IN

Butler in "Step by Step" (7-a eld. p. 44): "In 'Fraulino B. estas sekretario' it is possible to say 'sekretariino', but seldom necessary, because the sex is shown by 'F-ino'. We do not often wish to specify that Miss B. is a good female secretary! Compare 'She is a famous author(ess)'."

En sia traduko de la romano "Petrolo", Bailey sekvas tiun principon, ankaŭ Bean en sia traduko de la novelaro "La Naiveco de Pastro Brown": "junulino, gardanto de rojoj"; "Joan, ŝia fratino kaj kunlaboranto"; "Si estas bon dancanto"; "La estro de la familio estas Sinjorino O." k.a.

La principo de sufiĉeco rajtigas tion. Estas preferinde ne uzi -in, se sen ĝi la frazo estas tute klara. "Laboranto" estas **homo** kiu laboras. "Katoliko" estas **homo** kiu estas katolika. Homo: A human being.

Tamen notu: Kompreneble oni diru, "Si estas egoisma virino" (aŭ, "homo"). La vorto "virino" en tiu frazo emfazas pri **virinspeca** egoismo. Simile komprenebla estas uzo de -in ankaŭ ĉe: "S-ino B. estas la patrino de sep infanoj"; "La vidvino fariĝis denove fiancino", — Sed, "Ĉe ni la virinoj povas fariĝi ofiistoj egale kiel la viroj".

Jen kromaj rimarkoj, cite el la P.I.V.: Kiam la radiko mem signas virinan individuon, oni ne uzas la sufikson: amazono, subreto, matrono, Madono k.s. malgraŭ kelkaj kontraŭaj ekzemploj de Zamenhof.

Oni renkontas en poezio formoj resumajn, en kiuj -in ligiĝas senpere al adjektiva radiko: belino, virgino, sed tio estas tolerabla nur se la radiko mem klare komprenigas ideon de persono.

Al propraj nomoj, por devenigi virinan nomon el vira: Paŭl(in)o, Johan(in)o, Ludovik(in)o. Oni nun preferas uzi aŭ la adjektivan formon substantive: Paŭla, Johana k.c. aŭ la nacilingvan formon.

PREPOZICIOJ KUN INFINITIVO

Oni uzas la sekvantajn prepoziciojn kun infinitivo: POR, KROM, ANSTAŬ OL kaj POST OL — malofte kun SEN kaj INTER ("Plena Gramatiko", par. 314, 2-a eld.)

Notu, ke "antaŭ ol" ne estas prepozicio, sed konjunkcio (laŭ Butler), aŭ "parto de kunmetita subjunkcio" (laŭ P.I.V.). Tamen iuj preferus nomi ĝin adverbo, ĉar ĝi = la Anglan adverbton: "before".

"Inter rigardi kaj trairi estas . . ." ("Originala Verkaro", p. 96). "Inter

voli kaj fari . . ." (p. 422). "Inter scii kaj fari . . ." (Fab. de Andersen, iv, p. 28). "Inter kompreni lingvon kaj ĝin mastri . . ." (P. Gram. para. 314).

Cetere oni trovas la strangan formon: ". . . nin deteni de enkonduki tiun ĉi . . ." ("Lingvaj Respondoj", p. 65, 6-a eld.; p. 19, 2-a eld. La "Plena Ilustrita Vortaro ne komentas pri la supraj ekzemploj.

ESPERANTO IN DENMARK

"Esperanto", June, reports that the Ministry of Commerce in Denmark has published a 23-language folder dealing with the change in the Danish monetary system. The translations from the Danish original into 22 languages were made with the help of Esperantists — at very low cost. As a result of this, the Director and the editor of the department concerned wished to learn Esperanto, and many others were interested. Of course, Esperanto was the 23rd language in the folder.

The cost? Probably that of postage.

The report does not tell how this was done. One may suppose that the Danish text was translated by a Dane into Esperanto. He then sent a copy of the Esperanto text to competent Esperantists in each of the 22 countries, or such as were deemed necessary. The recipients would then translate the Esperanto text into their own national language, a copy of which would be sent to the centre in Denmark.

This is a clear example of how Esperanto can serve, among many others, those public bodies alive to its capabilities.

KIAL?

Belega vi estas, sendube, fraŭlino,

Kun bluaj okuloj kaj haroj el or',

Kaj ĉiam ridetan mienon vi havas:

Do, kial ne amas vin iu sinjor'?

Reĝino vi estas, serena, majesta,

Altkreska, belforma, simila al flor',

Gracia, modesta, ĉarmega, ensorĉa:

Do, kial ne amas vin iu sinjor'?

Belege, laŭmode vestita vi estas

En silko de nepriskribebla kolor',

Juvelojn portadas vi tre multekostajn:

Do, kial ne amas vin iu sinjor'?

Figuro vi estas, butiko-fenestra,

Sen sento, sen movo, sen vivo, sen kor',

Modelo vi estas, el vakso farita:

Do, tial ne amas vin iu sinjor'.

—F. F. Etchells (1912)

A.E.A. EXAMINATIONS

Should a candidate fail in a written examination, he/she does not sit for an oral. Should a pass candidate fail in the oral, another attempt at this may be taken, without further fee, within 12 months from date of such failure.

Should a candidate fail in the written examination, he/she may sit again for half fee, within 12 months from the date of receipt by the examiners of the first written paper.

Those holding the Atestilo pri Kapableco (B.E.A.), if still active, competent and members of the A.E.A., may examine for the oral Part of the Elementary examination. The B.E.A. diploma is equivalent to the Advanced (Supera) A.E.A.

Only those with the Final (Klerea) diploma may examine for the Advanced (Supera) examination. They are Ken Linton, Dr. C. Caldera, Fay Koppel, F. R. Banham. The Examination Commissioners feel this limitation and hope that the number of those holding the Final diploma may be increased for wider service in the years ahead.

KONKURSO RAKONTADA

En Aŭstralio oni nomas troparolemajn homojn "ear-bashers" (orel-batantoj). Okazis en urbo Darwin konkurso pri eltenemo en la arto "longe rakontadi". Frank Hardy, internacie fama aŭtoro, konkursis kontraŭ T. Tyrell, kiu tenis la rekordon, venkinte S-ron Nelson en 1954 post tri-kaj-duonhora rakontado. La preferantoj de Tyrell asertis, ke ilia ĉampiono "nur komencis eniri la facilfluan de sia rakontemeco", kiam Nelson kolapsis.

Tamen, Hardy memfide pretendis, ke li mem estas la plej longedaŭra rakontanto en Aŭstralio, atentigante, ke lia lasta riva'lo rezignis la konkurson pro atako de makzeltrismo (lockjaw) post dekhora interlukto.

La busbatalo okazis. Post 3 horoj 15 minutoj Tyrell konfesis venkon de Hardy. Hardy kalkulas, ke li mem parolis 60 mil vortojn — egalan al ordinara romano. Modeste li aldonis, ke "se Bill Harney ankoraŭ vivus, mi ne kuraguŝus riski mian ĉampionecon. Li estis la plej granda — natura rakontisto kun senfina vortfluo".

REDAKCIOJ

Bv. sendi al la Redaktoro en Melbourne ĉion rilatan al ties fako, nome recenzotaĵojn, anoncojn, komentojn pri nia enhavo gazeta kaj similajn. Tio ŝparus al ni altan afrankon pro neceso poŝte plu-sendi misadresitan materialon.

EL MARK TWAIN

Bona ekzemplo de tio, kiel eĉ poligloto Esperanta eminentulo — ĉi-okaze la granda Kabe — povas mistraduki, vidigas en lia "Unua Legolibro" (5-a eld., 1922), p. 88. Komparu kun la originalo: ĉap. 25, "The Innocents Abroad".

Guide: "Ah, look, gentlemen! — beautiful, grand — bust Christopher Colombo! — beautiful bust, beautiful pedestal!"

Doctor: "Ah, which is the bust, and which is the pedestal?"

Guide: "Santa Maria! — zis ze bust! — zis ze pedestal!"

Doctor: "Ah, I see — happy combination — very happy combination indeed. Is — is this the first time this gentleman was ever on a bust?"

(That joke was lost on the foreigner — guides cannot master the subtleties of the American joke.)—M.T.

Traduko de Kabe: "Ho sinjoroj, rigardu! Belega, granda busto (I) de Kristoforo Kolumbo! Belega busto (I), belega pedestalalo!"

Doktoro: "Kie estas la busto (I), kaj kie la pedestalalo?"

Gvidisto: "Santa Maria! Jen estas la busto (I), jen la pedestalalo".

Doktoro: "Jes, mi vidas, mi vidas; tre sukcesa kombinaĵo, efektive. Ĉu la sinjoro la unuan fojon troviĝis sur busto (2)."

(Sed la spritajo estas perdita por la alilandano — la gvidistoj ne povas kompreni la amerikan spritecon.)

Ankaŭ por E-istoj perdiĝas la "spritajo", tiel erare tradukita. Jen la ŝlosilo: (1) Skulptaĵo pri kapo, ŝultroj kaj brusto de homa korpo. (2) Tie, triviala prononco de la Angla "burst"; uzata en senco: petola amuzekurso, diboĉ(et)a amuzvago: "go on a bust".

P. 85: Ankoraŭ eraro: "Michael Angelo, the eternal bore, designed the Eternal City". Kabe: "... ĉi tiu eterne enuiga segilo faris la planojn de . . ." (Legu: tiu eterna tedulo, enuigulo . . .)

Mirige, ke Kabe ne tradukis ĝin simile erare, per "borilo"!

INTERNACIA E-INSTITUTO

Founded in the 1930's under Mrs. Isbrucker and Mr. A. Cseh, who for many years edited "La Praktiko". Mrs. Isbrucker died and Mr. Cseh became ill. The gazette ceased to appear, and the Institute failed to function smoothly. It has now been revived together with its book service and other functions, under

direction of J. H. Vink, Riouwstraat 172, The Hague.

Any Cseh-students here who in the past wrote letters to the Institute and got no answer are invited to contact it, when all possible would be done to reverse the state of affairs that has hitherto ruled.

Cseh pioneered the Direct Method of teaching Esperanto. It differs from the Berlitz system in that no textbooks are used. Purely oral practice leads to fluency, as many Esperantists in several countries give witness.

MEASUREMENT OF "COPY"

To aid some future editor we point out that The A.E. = approx. 112 inches of text. How much typescript is needed to fill this? All kinds of typescript is measured up: wide spaced or dense, small or large type-face, long lines or short, in the belief that overall 10 inches of typescript = 7 of printed text. Rarely has this quantity been correctly calculated to the inch: it has generally been either over or under the estimated "copy" sent to printer.

The real content of typescript sent in month after month varies at times considerably, despite effort to average it out.

Here are a few figures of estimates made:

124 typescript	=	94 text.
166 "	=	104 "
186 "	=	104 "
196 "	=	117 "
193 "	=	110 "
191 "	=	113 "

Were the content of the script always the same — which it isn't — 170.1 inches would equal 114 printed.

PRESEARAROJ

P. 39, kol. 2: Legu, "Tamen, ĝi ne evitas temojn de ĝenerala intereso, cetere iom polemikajn, kondiĉe ke ili estu liberaj je ofende drasta lingvaĵo." Niaj inteligentaj legantoj certe komprenis nian dirvolon, malgraŭ la presteknika fuŝo.

Forstreku la 8-a linio en tiu paraĝrafo: sub Pri Neŭtraleco.

Oktobra numero: korektu per: N-ro 122 (202).

VETERANO A.R. COHEN

Sur la unua paĝo de "La Suda Kruco", aŭgusto, 1920, vi legus la nomon A. R. Cohen, tiama aktivulo por la AEA. Ni ricevis leteron de li (19 sept.) en kiu li promesas skribi al ni poste.

RECENZOJ

"Verkoj de Heinrich Heine en Esperanto": Adolf Holzhaus. 318 paĝoj 25 x 17.2 cm. Mimeografita de Esperanto-Ligo en Israelo je kosto de la aŭtoro. 5 Ŭs. dol. kaj 10 p.c. sendkosto. Havebla ĉe Fondumo Esperanto (Vilho Setala), Esperantotie 4, SF-02220, Iirislahti, Finland.

Li kolektis tradukojn el Heine el ĉiuj E-gazetoj por li disponeblaj. Tiucele li aĉetis ĉiujn nrojn de la gazetoj "La Esperantisto" kaj "Lingvo Internacia", krom multaj libroj, serĉante la poem-tradukojn. Li multe korespondis kun biblioteko, ek kiu nur IEMW (Vieno) kaj la B.E.A. (Londono) sendis materialon. Vasta, kosta leter-sendado lia ofte vanis: eĉ ne unu poemo venis el Germanujo; eĉ ne respondo li ricevis el Rusujo.

Tamen fine li kolektis jam 329 poem-tradukojn kaj 7 prozverkojn faritajn de 66 E-istoj. Li finis Enkondukon (19 p.) kiam jen aperis libro: "Kantoj kaj Romancoj: Heinrich Heine" fare de Kalocsay kaj Waringhien (265 tradukoj). Holzhaus tiam trovis, ke en sia manuskripto estas 45 tradukoj faritaj de K. kaj W. Post konsidero, tiuj aŭtoroj malakceptis lian peton, ke iliaj tradukoj restu en lia manuskripto. Li do devis ellasi la 45 tradukojn kaj fari duan Enkondukon: la unua (19 p.) montras ĉiujn 329 poemojn, kiujn li kolektis, kaj la dua (18 p.) montras 284 (t.e. minus la 45 de K. kaj W.)

Per tiuj notoj ni mencias nur parton de la timiga tasko, kiun la aŭtoro brave plenumis. Pensiulo, li malavare elspezis siajn magrajn monrimedojn kaj elverŝis sian mensan kaj manan energion super laboro tiel kolosa, ke oni rajtus rigardi ĝin kiel ekster la kapablo de unusola homo. Jen mirinda atesto pri la potenco de tute dediĉita spirito.

Ni havas fotostaton de letero el la Oficejo de la Israela Prezidento, en kiu li "dankas la kompilinton por lia valor-ega donaco — la volumon de Heine en Esperanto — kiun li produktis per tiomege da amo kaj saĝo. La Prezidento deziras al li ĉian bonon."

La libro enhavas 11 fotojn de Heine, monumento, murtabulo, manskribita paĝo de la poemo: "Schwarze Roecke" kaj du aliajn.

Estas notinde, ke ĝi estas kolekto el la verkoj de Heine — ne nur el lia poezio, sed ankaŭ el lia prozo kun Enkonduko de "Zanoni" (F. Pillath) 1928 kaj notoj de la kompilinto.

Prezentita en Esperanto kaj la originala lingvo, ĝi estas unika kaj utile valora por nia Esperanta literaturo. Meritas publicon kaj vastan vendadon ĉi-monumento al tiu "strangeta kaj mal-sana viro, poet' Germana, kies nomo estas nomata inter la plej ĉefaj . . ."

Versmagiisto Heine pasi-arda —
Kreadis ampoemojn sen komparo.
Traduki ilin? cerbostreĉa faro,
Pro lingvo subtilsensa, majstre arta.

"La Participa Problemo en la Akademio": dokumentaro kompilita kaj komentita de Ebbe Vilborg. Eld. Lingva Komisiono, Prastgardsangen 2, S-412, Gotenborg, Sweden.

138 paĝoj. Prezo ne indikita.

Post kelkjara paŭzo la disputo pri -ITA/ATA reflamiĝas. Iu verkis kelkcentpaĝan libron pri la Latina subjunktivo; aliaj simile faris, analizante fundetale ian solan subtilaĵon ĉe tiu aŭ alia vivanta lingvo. En E-o oni jam eldonis kelkajn eĉ grandajn verkojn pri la participa sistemo, ĝis nun tute senprofite.

Por lingvemaj harsplituloj materialo en E-o ekzistas. Atestas tion la komplika sespaĝa trakto pri PO en la Plena Gramatiko. Kelkaj vortoj sufiĉas. Ĝia uzo estas kristale klara: = at the rate of. Jen ankoraŭ por la funde-fosemuloj: La modo post "kvazaŭ", kaj post specifaj verboj ("Lingvo kaj Vivo", 206); la kazo post "kiel". Tiuj kaj aliaj demandoj havas siajn "partianojn".

S-ro Vilborg atakas la broŝuron: "Aktoj de la Akademio 1963-67" grandparte dediĉitan al tiu sistemo. Li antaŭparole asertas ĝin "nekompleta, unuflanka kaj polemika" kaj en la sekvantaĵaĵoj li defendas siajn dirojn. Ankaŭ la verkojn: "La Zamenhofa Esperanto" (Simpozio) kaj "Vojaĝo inter la Tempoj" (Kalocsay) li draste kritikis.

Adekvate recenzi ĉi-verkon postulus pritrakton laŭ amplekso simile granda. Juste kaj honeste ni indiku al interesatoj ideon pri ĝia signifo kiel zorge kompilita dokumentaro.

La malavara forofero de mono, tempo kaj energio fare de eminentaj antagonistoj evidentigas ilian aman fervoron al E-o kaj ilian deziron firmigi al ĝi ilia opinie funda irvojon. Ĉu estas necesa ĉi tiu longa, senfrukta kaj multekosta disputo, kiu jam elŭcis tiom da krea forto el homoj grandanimaj kaj foje eĉ riĉtalentaj? Multaj el ni preferus havi novan eldonon de la Zamenhofa verkaro, sur bona papero, prinotita kaj fortike bindita.

Kvankam korifeoj amas primoki participajn frazojn de la kontraŭa partio, la Esperanta literaturo atestas pri mal-

esto de efektiva problemo priparticipa. Leginte cent-ojn de recenzoj faritaj jam de 1905, ni ne rimarkis ĉikanajn pikvortojn pri aŭtoro misuzo pasiv-participa. Kun inteligenta kaj klara indiko pri la temp-elemento, bona E-isto ordinare atingas sence senduban esprimon ĉe la participoj. La rimedoj de E-o, precipe la uzo de taŭgaj adverboj, certigas klaran komprenon de tiuj formoj. Malmultaj sentas malfacilon pri la uzado, instinkte fidante al sia kapablo esprimi la ĝustan tempo-indikon de la pasiva verbo. La E-a Biblio estas bona kontrolo en tio.

Per ĉi tiu kaj la menciitaj libroj ni ne impresus ne-esperantistojn, nek la novevenintojn al nia movado. Unu ekrigardo al tiel cerbo-tordajoj fornaŭzus por ĉiam.

Cesu la polemiko, kiu, per lavango de partiecaj libroj, broŝuroj k.s. minacas necesigi apartan fakon en la Esperanta literaturo.

Ĉi-libro estas utila nur por tiuj, kiuj jam atente studis la disvolvigon de la disputo jam de la frua tempo, sekve sentante en si iom de tiu ardo, kiu flagras en la koro de la koncernatoj.

"Ne Plu Ludu": N. Barthelmess. Kvin noveloj. Eld. S.A.T. 128 paĝoj. Prezo 2 U.S. dol. plus sendkosto.

La aŭtoro, jam 76-jara, estas konata S.A.T.-gvidanto, kaj tradukinto de la Unua Parto de "Fausto" (Goethe). Penetranto de la infana animo, li preferas priskriki per simpatio kaj ĉarmo la ombran sorton de la junaj proletoj. "Diablidoj", verkita en 1927, revokas la venenan atmosferon de Berlino en tempo, kiam Nazioj kaj socialistoj grupe kolizis batalante sur stratoj kaj per la aventuroj de laboristaj knaboj bildigas la situacion en kiu ili tiam sin trovis.

En "Milito kaj Paco" (1928), 4-paĝa skizo, Barthelmess en Francujo, sur la iame sangosaturita tereno de la grandaj bataloj de 1914-18, meditas pri la geknaboj tie ludantaj, kiuj, nesciante, frontas la estontecon. En tiu jaro nek li, nek la junuloj, povis viziĝi la kataklismon, kiu post paso de jardeko frakasos la mondsocion.

"Ne Plu Ludu" (1940) temas pri Parizo sub la Nazia hufo en tiu jaro tiel terura por ĉiu Franco kaj morte minaca por Britujo.

"Eĉ la Pasero" kaj "La Flamo Revigliĝas" (1947) temas pri Germaniĝo tuj post la militfino en 1945. Estas evidenta lia simpatio por la frakasita Germana popolo, viktimo de ideologioj manipulantaj por superregi la centrojn de ŝtatpotenco. Kelkaj frazoj spegulas la spiriton de la tempo en kiu ili estis

verkitaj; malgraŭ lia nudvorta honesteco, la paso de la jaroj post 1947 supozinde necesigus modifojn de kelkaj liaj esprimoj.

En 1972 li skribis, ke li ne volas resti stagnanta en travivaĵoj de la pasinteco, kvankam ili emas ankrigi en la cerbo; li klopodas pluri kun la novaj generacioj, observante la "kontinuecon de la viv-procezo". Pri tiu "kontinueco", kiu povus ĝin interpreti kaj racie konjekteti pri ĝia fina celo, ĝia nedivenebla destino?

"William Auld Legas Poezion": unua eldono de Krea Sono, West Records, Falkirk, Stirlingshire, Scotland. sepcola E.P. disko 33 tpm. Prezo \$0.90 plus 15 pencoj, sendkosto.

Pli ol interesa por E-istoj estas sperto atskulti la voĉon de Movada eminentulo — precipe kiam temas pri verkisto, kies kontribuo al la E-literaturo jam lokigis lin inter la majstroj. Tion fari persone povas nur malmultaj, sed nun, dank'al la registrado, ĉiuj povas ĝui tiun sperton ripetite laŭplaĉe. Des pli ĝuinda por poeziamantoj estas ĉi tiu disko, per kiu li deklamas sian propran poezion. Kiu estus pli bona, por interpreti verkajon ol la verkisto mem?

Konantoj de "Ebrio" (el "Kvaropo" kaj "Esperanta Antologio") kun amuzo aŭ malaprobe, sed certe fascinite, spertos vivigon de la majstre manipulitaj lingvaĵoj kaj ŝanceliĝo de ebrulo. Jam for la amuzo, kaj naŭze-fascine aŭdiĝos "Incitnudiĝo" (el "Humoroj"). El lula trankvilo, tra tumulto de trombo, ĝis denova sereniĝo jetiĝas la animo dum la deklamado de "Vi estas maro" (el "Unufingraj Melodioj"). Al tio iom kontribuas son-fono.

Simile "La Gardantoj" (el "Humoroj") kaj versoj el "La Infana Raso" (ĉap. 14) surpronas pli klarajn, eĉ novajn kadencojn kaj signifojn per la voĉo de la verkisto. Aŭskultu mem, helpe de akompana teksto, se necesas. Vigla orelo rimarkos, ke "senkovaj" en la antaŭlasta verso (el La "Infana Raso") devus esti "senmovaj". — Fay Koppel.

"Telopeo", organo de la E.F.N.S.K. Sept. Litografie presata de la Libro-Servo (AEA), ĝi jam havas plaĉe novan aspekton. Enhavo: Opinioj de "Revanto"; Ventega Tago, de Noel Wright, kaj pli ol 4-paĝa letero sendita de "Robi" el Eŭropo. La redaktoro promesas enmeti ilustritajn artikoletojn, ankaŭ krucvortajn enigmojn. Havebla ĉe Wre Chandler, 57 Northcote str.,

Crows' Nest, 2065. (La sekvinta nro, ne numerita, estas egale informaj kaj atentotira.)

"The Latrobe Valley Esperantist": monata bulleto. Nro 31. 50c. plus afranko. Editor Ivan Maddern.

P.6: Nomoj de 49 anoj kiuj ĉeestis la Unuan Aŭstralian E-Kongreson Adelaido en 1911. Ankorau restas en la memoro de kelkaj vivantoj la personecoj de ekzemple: S-roj Drummond (1/65), Hyde (1/68), Pyke (12/30), 7/72), Ballard (3/54), Collingridge (1/68, 9/68) Edmanson (10/42); F-inoj Tilly Aston (12/47.) Rondkrampe: indiko pri nekrologo en The A.E.

"NUDA INTER LUPOJ"

is the first German novel about the Buchenwald camp. Its appearance in the German language in 1958 sold 865,000 copies; translations in 27 languages numbered 2 million copies. The story has been presented on theatre, radio and T.V. The author, Bruno Apitz, now an eminent figure in the art world of the G.D.R., was held in the camp for 8 years. Of some 500 pages, cloth bound, the book will appear in Esperanto before the end of 1973. — Price 42 marks G.D.R. at Edition Leipzig, German Democratic Republic, 701 Leipzig, PSF 340.

Improve your style by reading
the cultural review
NORDA PRISMO
Annual subscription to this
literary magazine
\$3.20

Australian agent, Ken G. Linton.
Ask for specimen copy.

PROVERBOJ

A little nonsense now and then
Is good for e'en the wisest men.
— Klivolo ŝerca, lud' sensenca,
Bonfaras eĉ al klera menso.

Much ado about nothing.
— Klopodado tro grava
Pri afer' senenhava.

O wad some Power the giftie gie us
To see oursels as ithers see us!!
— Se povus ni, pro doto rara,
Nin vidi per okul' najbara!

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.
Membership, including this periodical: \$3.
Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084
Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.
A.E.A. Press Officer: Mrs. M. Chaldecott, 16 Grosvenor Road, Lindfield, N.S.W. 2070
Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.
A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 124 (204)

MELBURNO

Decembro, 1973



JAN. 2-8
1974.



LA 19A
AŬSTRALIA
ESPERANTO-
KONGRESO
BRIZBANO

Eleventh List of Congress Members

142. Miss E. Minton, Darwin, N.T.
143. Mrs. M. Pearson, Harbord, NSW.
144. Miss T. Bowes, Malanda, Q'ld.
145. Mrs. M. Hodgson, Darwin, N.T.
146. Mrs. G. Reardon, Toowoomba, Q'ld.
147. Mr. F. McDonell, Salisbury, Q'ld.
148. Mrs. S. Blockley, Mosman Park, W.A.
149. Mr. T. Pisz, Melbourne.
150. Dr. J. Greenhalgh, St. Lucia, Q'ld.
State Distribution: Q'ld. 65; N.S.W. 35; Vic. 28; W.A. 8; N.T. 2; S.A. 2; A.C.T. 2; Overseas 8.

Kongres-Programo

Merkredon, 2-an Jan. 1974:

- 9-12: Akcepto de Alvenintoj, Disdono de Dokumentoj
2-4 p.t.m.: Aŭtobusa Ekskurso (1): La Urbo
8.15 p.t.m.: Interkonatiĝa Vespero

Ĵaŭdon, 3-an Jan. 1974:

- 10.00 a.t.m.: A.E.A. Komitat-Kunveno
10.30 a.t.m.: A.I.E.A. Komitat-Kunveno
11.00 a.t.m.: Gvidado tra la Universitato
2.00 p.t.m.: Oficiala Fotografado, Gazetara Konferenco.
3.00 p.t.m.: Inaŭguro de la Kongreso
8.00 p.t.m.: Prelegoj: Prof. R. Robertson, S-ro I. Maddern.
Distraĵo: S-ro V. Bourlin; Filmoj.

Vendredon, 4-an Jan. 1974

- 9.15 a.t.m. Konversacia Rondo
10-12: A.E.A. Generala Kunveno
2-4 p.t.m.: Aŭtobusa Konkurso (2) Lone Pine
8 p.t.m.: Drama Konkurso, Filmoj

Sabaton, 5-an. 1974

- 9.15 a.t.m.: Konversacia Rondo.
10-12: A.E.A. Generala Kunveno (2)
3 p.t.m.: A.I.E.A. Generala Kunveno.
8 p.t.m.: La kongresa prelego: Ambasadoro Ralph Harry, Herbert Koppel: Poemoj de Raymond Schwartz.

"Cindrulino", pantomimo

Dimanĉon, 6-an de Jan. 1974

- 9.30 a.t.m.: Aŭtobusa kaj Rivera Ekskurso (3) Insulo Bishop.
8 p.t.m.: Di-Servo.

Lundon, 7-an de Jan. 1974:

- 8.15 a.t.m.: Per aŭtobuso al Golden Circle Cannery.
10.20 a.t.m.: Per aŭtobuso al Civita Akcepto de la Urbestro de Redcliffe.
12.30-1.30: Senĝena Marborda Vagado laŭplaĉe ĉe Redcliffe.
1.30: Per aŭtobuso al la Universitato.
3.30: A.E.A. Generala Kunveno (3).
8 p.t.m.: Internacia Koncerto.
-

Mardon, 8-an Jan. 1974

- 10 a.t.m.: Konversacia Rondo.
 11 a.t.m.: U.E.A. Kunveno.
 2 p.t.m.: S.A.T. Kunveno.
 4 p.t.m.: Fermo de la Kongreso.
 6.30 p.t.m.: Per aŭtobuso al Queens-land Lawn Tennis Assn. Ball-room.
 7.00 p.t.m.: Bankedo kaj Dancado.

Merkrenon, 9-an Jan. 1974

- 9 a.t.m.: Post-Kongresa Ekskurso al Nambour, Buderim, Caloundra.

AUSTRALIA KRONIKO

SYDNEY: 22/10: Deksep membroj ĉestis la kunvenon, kiu kiel kutime sekvis la kursojn en la Esperanto Domo. Victor Bourlin sprite, amuze, kontraŭis al Tom Elliott en debato: "Kiu estas pli bona, Pentristo au Teknikisto?" Poste Victor montris maloftajn lumbildojn de 18-jarcentaj pentraĵoj. Inter ili oni vidis la tiam nomitan St. Petersburg, Rusajn gemoŝtulojn en malnovaj kostumoj, ankaŭ la malbonŝancan Icarus havantan flugilojn ligitajn al liaj brakoj.

29/10: Ni bonvenigis D-ron Bowing kaj lian E-grupon de la C.S.I.R.O., kie li gvidas lunchoran kurson. Norman Brodie montris lumbildojn de Sud-Ameriko, de kie li ĵus revenis. Unue li vojaĝis al Quito en Ekvadoro kaj poste vizitis Peruon, Bolivion kaj Ĉilion, plejparte per aŭtobuso. Ni vidis moderne belajn urbojn, ankaŭ la vivmanieron de la indiĝenoj kaj iliajn domojn; la Andojn, iujn kun neĝo; la plej altan lagon en la mondo; la nuntempe trovitan "Perditan Urbegon de la Inkaoj", kaj, kontraste, sekan dezerton. Plezure, membroj jam scias, ke Norman havas ankoraŭ pli da bildoj.

5/11: Victor Bourlin pentris novan portreton de D-ro Zamenhof, kiu en ĝi aspektas pli aĝa ol en la unua, kiun Victor pentris por nia Societo antaŭ kelke da jaroj. La nova estas tre bela kaj montras la Majstron kun blankaj haroj kaj barbo, formale vestitan. La membroj laŭdis kaj dankis al Victor por la donaco.

Volo Gueltling imagis tion, kio okazus "Se Zamenhof estus ankoraŭ vivanta". Li estus jam 116-jaraĝa, kaj lia koro estus rompita ree kaj ree pro la militoj okazintaj kaj -antaj de post lia vivtempo. Volo opinias, ke la Doktoro aprobus S.A.T.-on, kiu, laŭ Volo, pli proksimiĝas al la Zamenhofa idealo. Pro similaj motivoj, eble li aliĝus al la movado Bahaisma. Ja pens-incita parolado!

12/11: David Gould raportis, ke unupaĝa reklamo pri E-o troviĝas en "The Handbook of the Youth Hostel

Assn. of Australia for 1974". Estas 30.000 ekzempleroj; 1000 por Nov-Zelando. Fritz Mueller-Sorau diris, ke laŭ peto li sonbendigis informon pri E-o en intervjuo aranĝita de organizo, kiu zorgas pri ĉiuj blinduloj en Aŭstralio. Wre Chandler parolis pri sia lastatempa vojaĝo en N.S.K. kaj Viktorio kaj menciis, ke en "The Basin" kunvenis 360 membroj de lia familio, ĉiuj devenuloj de lia avo, kiu loĝiĝis tie antaŭ cent jaroj. Thelma Smith lerte organizis konversacion en kiu oni petis membrojn respondi al demando: "Kion mi farus se mi gajnus la unuan premion de loterio?" Membroj diverse sin esprimis, kaj de tempo al tempo Thelma montris karton kun eble la vorto "Aplaŭdo", "Ridu", "Ploru" aŭ "Silentu". Membroj kore sekvis la instrukcion.

MANLY: 5/10: Cefkonsilanto de Manly, ankaŭ ano de la E-klubo en Manly, Frank Preacher montris diapozitivajn kaj prelegis pri kelkaj landoj en St. Matthew's Hall, The Corso, Manly.

Belaj bildoj kaj informado pri landoj, kiujn Frank vizitis, faris la vesperon ĝuplena. Nia prez-o, Kevin Smith, prezentis la programon al plena halo de membroj kaj vizitantoj. Poste, Arthur Cocking dankesprimis per kelke da bone elektitaj vortoj, kaj fine ĉiuj ĝuis teon kaj biskvitojn.

Ni ne aranĝis programon post la lecionoj je la cetero de la monato; ni uzis la tempon por diskuti kaj aranĝi la ekspozicion en la Urbdomo de Manly. Tiu okazis en la Festivala Semajno en Manly por la malfermo de la Opera Domo, daŭris dum tuta semajno kaj estis granda sukceso. Multaj homoj interesiĝis. —K. Morrison.

PERTH: Nia mondvojaĝanto Walter Illingworth malsaniĝis dum vizito al Afriko. Dum la pasintaj 2 monatoj li kuŝas en hospitalo en Perth, kaj nia prezidanto regule vizitas lin en la hospitalo.

Nia Zamenhof-Festo okazos ĉi-jare vendrede, 14/12 en la oficejo de nia Sekretario (Transport Commission, Netherlands), kie proviantisto organizos bufed-stilan manĝon po \$4.50. Varia programo sekvos.

MELBOURNE: Prezidanto H. Beechey, 22/10, rakontis pri sia fuŝa ferio, dum kiu neniu plano efektiviĝis. Je 29/10 la planita lumbildprelego de S-ro H. Koppel ne povis okazi pro limigo de elektra povo, sed S-ro Koppel montris nur kelkajn diapozitivajn pri Honolulu kaj Vankuvero.

S-ro F. R. Banham prelegis je 5/11. "La Embaraso de Teodoro" estis amuza rakonto pri muso en vesto de sinjoro veturanta en trajnupeo kun sinjorino. Disertacio pri "La Tabako" inkludis personajn spertojn pri tiu malsaniga kutimo kaj ĝin sekvis 2 humuraĵoj.

S-ro Ken Linton prezentis kvaron de modelaj tradukadoj, kiujn li mem klasifis laŭ priskriboj sentimentala, eduka, komika kaj fantazia.

CANBERRA: S-ro N. Gamble raportas ke li ricevis leteron de S-ro Sindo (Osaka), pri vizito kaj prelego de Ges-roj Kane en la Osaka E-Societo je 13/9.

SUNSHINE COAST: Je 24/10 la Duko de Edinburgo prezentis orajn premiojn en Maryborough al studentoj. Du el ili, F-inoj Sylvia Ritchie kaj Kathryn Garrett, gajnis ilin pro uzo de Esperanto kiel tasko-temon. La kursprogramo de la "Adult Education" raportas pri E-klasoj en Caloundra (S-ino D. Sinclair) kaj en Nambour (S-ino A. Burton). — Doris M. Sinclair.

Esperanto-Federacio de Viktorio

Tre sukcesa tuttaga Seminario de la Federacio okazis 3/11 en la Kvakera Domo en Toorak. Kvindek kvar personoj el ĉiuj kvin E-grupoj de Viktorio ĉeestis, inter ili 9 el Morwell. La Melburna kaj la Oakleigh E-grupoj prezentis variajn programojn en kiuj partoprenis pluraj membroj per mallongaj prelegetoj. Krome okazis interesaj prelegoj de Ivan Heldzingen "La Komputero kaj vi", de S-ino Fay Koppel "Esperanto-Verkado", legado de S-ro I. Madder "La Tranĉeo" kaj bela kantado de la "Morwell Esperanto-Kantistoj". Kampara membro, S-ro A. Resnicek, venis el Benalla kaj rakontis pri siaj klopodoj pri Esperanto tie.

Membroj de la Malvern Esperanto-Societo respondecis pri la preparlaboroj, speciale la 4 manĝoj. Dankon al Adrienne Paling pro la klopodoj.

Vespere la Seminario finiĝis per 2 lumbild-paroladoj. Ges-roj H. Schepers montris interesajn lumbildojn pri la aŭstralia kamparo, kaj S-ro H. Koppel prelegis kun diapozitivaj pri sia flugvojaĝo al Honolulo kaj Kanado, kie li prelegis pri "Aŭstralia konstruas novan ĉefurbon" al la membroj de la E-societoj en Vankuvero kaj Viktorio (Brita Kolumbio) kaj antaŭ 200 delegitoj ĉe la 46-a S.A.T.-Kongreso en Toronto.

Raporto de la Vic-Sekretario

Denove finiĝas dujara periodo en la agado de A.E.A. kaj kiel Vic-Sekretario mi estis sufiĉe okupita dum tiu periodo.

En Aprilo/Majo 1972, kun la helpo de mia edzino, mi aranĝis, interkonsente kun s-ano Russ Baxter, la presadon kaj poste la dissendadon de la AEA-Adresaro.

Dum la tuta dujara periodo mi kolektis kaj aperigis la novaĵojn de la diversaj aŭstraliaj E-societoj kaj mi deziras speciale danki pro kunlaboro al S-inoj Ruth McGrath kaj E. Palmer (Perth), S-ro G. Clarke (Orroroo, S.A.), S-inoj M. Fordham, Fay Koppel, F-ino A. Hearn kaj I. Heldzingen (Melbourne), S-ro N. Gamble (Canberra), S-inoj Val Robinson kaj W. Greenhalgh (Brisbane), S-ino A. Pritchard (Redcliffe), S-ino Doris Sinclair (Caloundra) kaj S-ro H. Petley (Toowoomba).

Kiel kontakt-oficisto inter A.E.A. kaj la Nov-Zelanda E-Asocio, mi korespondis multe kun mia tiea kolego Ralph Dearnley (la "Kviz-Reĝo") kaj kun la N.Z.-Sekretario Majoro H. Petersen pri la plano eble aranĝi Sud-Pacifikan E-Kongreson. En Kanado mi havis la oportunon pritrakti tiun planon kun la redaktoro de la Kanada E-gazeto, kiu montris grandan intereson kaj planus partoprenon, se tia kongreso okazus en 1976. Ankaŭ la Nov-Zelanda Asocio montris intereson, kondiĉe ke simila kongreso okazus en 1980 en Wellington kun la partopreno de A.E.A.

Ni ne forgesu, kvankam mi mencias laste, tion kio okazis komence de la dujara periodo, nome la plendetalan kongresraporton, kiel dum la pasintaj du jardekoj. — Herbert Koppel, Melbourne.

OFICIALA INFORMILO

NOVA ANO: S-ro R. Eichelkraut, Bougainville Island, P.N.G. — Russ Baxter, 5 nov.

LIVING LINK WITH ZAMENHOF

"The Manly Daily" (1 Nov.) published a photo with text containing i.a. the following:

"While Manly Esperanto Club was holding its Opera House Festival display inside Manly Council Chambers, Andrew Szatow and his wife Cheryl of Fairlight were outside the building receiving their naturalisation certificates.

"The link between the two occasions is that Mr. Szatow, from Warsaw is a descendant of L. L. Zamenhof, the inventor of the international language".

"Kie estas via pupeto?" demandis patrino sian filineton dum vespera televida programo.

"Mi kuŝigis ĝin en la liton, ĉar ĉi filmo estas por infanoj malkonvena". — "E-isto Slovaka".

CHRISTMAS — 1908

When I was but a little boy, with pocket money meagre,
I watched, nigh Christmas, window-shops, tensed up and very eager
To have and hold "Puck", "Butterfly", "The Jester" — comic papers —
Rich-filled with wood-cuts, haunting tales, and schoolboy seasonal capers;
And "Comic Cuts", "Chips", "Lot o'Fun", to mention more of them;
"Boys' Friend", "Boys Realm", "The Marvel", "Pluck", "The Magnet"
and "The Gem"!

I'd ponder long with warm desire, the window's glowing store,
And at the paper racks that held yet other at the door.
Decision made, I'd amble in and walk out with my prize —
A Christmas Double", treasure packed, to joy my ardent eyes.
And now I'd take my pleasure full and drain the contents dry;
Then with my purchase in my hand back to the shop I'd fly,
There to report in accents bland that through mischance I'd bought
Some other paper in mistake — and not the one I ought —
And several times I did succeed — for now it must be said —
And through my eyes the fairy fuel my inner passion fed.
A trick not wholly honest, but I made my scanty store
Of weekly pence work "overtime", and with good luck I'd score
Off this or that newsagency, which in its ignorance gave
Increase of golden moments to one small yearning knave.

(Komparu kun la E-a tradukajo sur p. 129, The A.E., junio, 1971. — F.R.B.).

KOMIKA, SED PIKA KRITIKO

Nur kelke da tagoj restas al ni antaŭ Kristnasko. Vidu sur la ĉefstratoj la dolore streĉatajn vizaĝojn de patrinoj trenantaj plorplendajn infanojn. Vidu en direktorejoj la malserenan mienojn de membroj tie.

Nu do, ĉu vere kara paĉjo bezonas korktirilon (3.50), kravatringon (1.75), bierpokalon (2.85), raz-brosan (6.95), poŝtukon (pursilkan! 2.00), aŭ, je Dio! inksorbilon (7.50). Aŭtentaj prezoj.

Ĉu estas necese havi ĉiujaran Kristnaskon? Ni sentas, ke malpli ol ses monatoj jam pasis de post la lasta. Ĉu pro inflacio ankaŭ la jaroj mallongiĝas? Maturuloj, precipe multjaruloj, memoras la fruajn jarojn; ili estis multe pli longaj. Invitite ĉeesti tridek festvesperojn, homo tentiĝas sugesti trijaran Kristnaskon, kio permesus komenci festcelebrojn proksimume en majo.

Kelkaj cinikuloj jam minacas fondi Societon Scrooge, honore al tiu fama kreito de C. Dickens. Scrooge deziris forigi la dolorojn de Kristnasko kaj, kondamnante ĝin, riĉiĝis la atakparolan kapablon de la Angla lingvo. Tamen, pro malbona publiko, li ne okupas ĝustan niĉon en la memora monumento. Tio maljusto aplikigas ankaŭ al aliaj elstaraj figuroj en la historio. Vi jam devas scii, ke Lukrecia Borĝja nur malvolonte venenis tiun kaj tiun. Rasputin fakte estis vera bonegulo, nur iom pedike malpura. Kaj efektive ekzistas Societo por honori la Trian Rikardon, kiu ricevis kruele malveran prezenton fare de Sek-spiro. Ankaŭ oni legas en ĵurnalo memo- anoncon pri lia morto en 1483 sur

la batalkampoj Bosworth. Per tio li dividas honoron ankaŭ kun Rudolfo Valentino (mortis 1926) — riprolata de ankoraŭ sekse-sentemaj sinjorinoj.

Jes, ankaŭ Scrooge estas kalumniata. Por akceli sukceson de la Societo Scrooge oni bezonas trafe impresan sloganon, kiel ekz-e: "Returne sendu Kristnaskan karton hodiaŭ!" "Faru aĉetojn nur post-Kristnasko, ĉar en januaro varoj estos tre malpli karaj." "Pensiigu Sanktan Nikolaon, por ke li povu sin dediĉi al kreskigo de likenoj, tie en la plej fore izola regiono de la Nordo".

La Societo esperas varbi ĉefojn de la grandaj magazenoj, kiuj certe evidente ĝemadas pro la ulceriga aktiveco, la febra haoso, akcelanta ilian iron al la tombo. — Farbo.

KASNOMOJ

Fez: Felikso Zamenhof. Kabe: Kazimierz Bein. Lanti: Eugene Adam. Tojo, Zigago: Teo Jung. Jofebo: Jos. Ferd. Berger. Kopar: Kolomon Kalocsay ("Kopar" hungare signifas "kalva". Lia genia kranio estas kalva.)

La plunomojn de Zamenhof detale pritraktas A. Holzhaus en sia "Doktoro kaj Lingvo Esperanto": p. 318-334.

En Aŭstralio iom konataj estas Delsudo: Maurice Hyde, Karlo Madrigalo: C. W. Ballard, Kohero: Kurt Hirschel. Leti: D. Thomson. Geĝo: George Gordon. Ezoko: J. G. Pyke. Matildo Direktilo: Maud Helm. Ho Bo: Henry Byatt. Robo, Farbo: F. R. Banham.

Vidu: "British E-ist", 1/51, p. 12. "La Rondo", 11/49.



President
of
Australian
Esperanto
Association,
1940 - 1941

NEKROLOGO: ALLAN TURNER

Nia fidela membro mortis en 8 novembro ĉe hospitalo en Mooroopna, Viktorio. Esperantisto jam pli ol 40 jarojn, lia gaja personeco amindigis lin al ĉiu lin konanta. Dum multe da jaroj li profesis kiel okulisto en Shepparton.

Jen rememoraĵo fare de unu el liaj multaj amikoj, Ken Linton:—

"Mi unue renkontis lin en aŭgusto, 1931. Iom frue en tiu jaro mi legis artikolon pri Esperanto en "The Age", do aĉetis librojn pri tiu lingvo ĉe la butikoj de Roy Rawson, kiu min informis pri ekzisto de la Melburna Esperanto-Klubo. Tiutempe Allan loĝis proksime al mia hejmo, kaj ĉiun dimanĉon ni kune pomenis al la marbordo, nin ekzercante voĉe en la lingvo. Ni sukcesis ĉe la ekzameno Pyke-Memoriga kaj en junio 1932 gajnis la diplomon de la Brita Esperantista Asocio. En 1939 la milito kaŭzis nian disigon, ĉar je mia reveno Allan jam loĝis en Shepparton. Mi okaze vizitis lin tie, kaj li min, kiam li estis en Melburno. Li estis arda sonbendisto, kiu per sia magnetofono faradis sian plejeblon por diskonigi la lingvon tiele amatan de li".

PLENDINDA OFENDO

Al senciuloj donas ni mandaton

Per stultegeco regi nian ŝtaton.

"Rigardate kiel landoj, Danujo kaj Svedujo estas nuloj" (Sir Henry Bolte, tiam ĉefministro de Viktorio). Esperinde, ke iu poste informis la laŭtfrazan politikiston, ke Danujo, kun land-areo de 16,619 kvadrataj Anĝlaj mejloj kap 4½ milionoj da loĝantoj, produktas multe pli da butero kaj fromaĝo ol Aŭstralio (preskaŭ 3 milionoj da k.m. kaj ĉ. 13 milionoj da loĝantoj).

Svedujo, kies land-areo estas 173,624 k.m. kaj loĝantaro 7¼ milionoj, produktas pli ol Aŭstralio. La Sveda import-eksporta komerco superas la Aŭstralian per 25%. Krom nur Usono, ĝi ĝuas la plej altan vivnivelon en la mondo. Ĝia socia bonfaro estas sen egalo, kaj ĝia statistiko pri krimo kaj

trafikakcidentoj estas tre pli malalta ol la Aŭstralia. ("Sun", 27 aug. 70).

Komparu la stultan diron de Neville Chamberlain (Sept. 27, 1938). Li parolis pri "disputo en malproksima lando, pri kiu ni nenion scias", nome Ĉeĥoslovakio. Cetere, la Anĝla originalo estas dubesenca: "a quarrel in a far-away country of which we know nothing." Ĉu pri la disputo aŭ pri la lando "ni (?) scias nenion"?

"LA PLENA GRAMATIKO"

Criticism has been directed at the P.G. for its complexity and subtlety of detail. On this point, the authors, in the foreword to the first edition (1938) say in effect. Those who use Esperanto are not bodiless angels, but incarnate human beings, all of whom have, deeply engraved in their spirit, the customs, peculiarities and idioms of their mother tongue. It is not easy for them to "put off the old man with his deeds" and isolate from their thinking the well-worn ways and by-ways of their familiar speech forms. One must take into account these myriad modes of expression, sift them through, and accept only those generally used and widely understood. In this, logic and clarity form the yardstick. Judgment such as this cannot be made without profound analysis. It is fair to assert that in this grammar book **the difficulties derive not from Esperanto itself, but from the national languages.**

Language is a vast and complex mechanism; it would have been easy to systematise it by setting down the main traits and guide-lines, but, if one wishes to find satisfactory answers to the immense range of problems, great and small, inherent in the modes of expressing thought, a wide survey such as is given in this book is indispensable.

We have passed from the Liliputian 16-Rule booklet of 1888. The Esperantist of today may no longer don the little shirt of the one-year-old. The content of "La Plena Gramatiko" attests the growth and evolution of a living language during fifty years.

NOVA ANĜLA-ESPERANTA VORTARO

Peter J. Benson, Box 3271, Catonsville, Md. 21228, U.S.A., informas, ke esperable en 1974 aperos lia A.-Esp. vortaro. Ĝi estos plej ampleksa, kaj taŭga ne nur por komencantoj, sed ankaŭ por tradukistoj kaj verkistoj. Ĝi enhavos vortojn kaj esprimojn de ĝenerala kaj ĉiutaga

uzado kaj ankaŭ grandan nombron da teknikaj kaj sciencaj terminoj.

Verkita de Usonano ĝi estos la unua, kiu plene taŭgas ankaŭ por Usonanoj kaj Kanadanoj. Por Aŭstralianoj kaj aliaj, ĝi laŭeble inkludas la variaĵojn de literumado kaj signifo de Anglaj vortoj laŭ tiu aŭ alia branĉo de nia komuna lingvo.

CULTURAL UNDERSTANDING

The following is a paragraph from a letter to The Times Educational Supplement:

"The insight into a different cultural and sociological background offered by the study of a foreign language is, in Esperanto, speeded up and extended over a much wider area. French, for example, is so difficult that in spite of the fact that it is taught for five years in virtually every secondary school in the country, only some 1 per cent to 2 per cent of the population ever reach the stage of genuinely understanding the French people, the French way of life, or achieve more than an extremely superficial appreciation of French culture and civilisation. Correspondence with French students cannot profitably be begun much before the fourth year, because of the linguistic difficulties on both sides. In Esperanto, correspondence can be begun after approximately two terms, and then, of course, not merely with one country, but with any of 83 countries all over the world in which there are Esperanto organisations".

The writer is Grahame Leon-Smith, M.A., Loxford High School, Ilford Essex. He is engaged on a project designed to give students a reasonable fluency in Esperanto after only 24 hours of study. This was mentioned in the letter, which brought some 400 letters to him, applying for or inquiring about the course, Esperanto Programita. — From "Newsletter" (B.E.A., London).

ALMOZULA KANTO

Kristnasko proksimiĝas jam — sezon' por vi ĝu-franda;
En via hejmo: kukoj, tortoj, supoj kaj viando.
Ĉampano kaj viskio, kun vino kaj biero.
Ĉu vere vi domaĝus fordonon de monero?
Al vi, preterpasantoj, en ĉi-ĉapon ĵetu pencon.
Se jes — al Dio petos mi, ke havu vi kompenson.

—Robo

REDAKTORA REVUO

Dum 1973, krom klubraportoj kaj regulaj rubrikaj, aperis literaturaj kaj bibliografiaj artikoloj, versajoj kaj pipraĵoj. La teksta mezuro estis 1325 coloj, proks. 110 futoj. Kunlaboro kun la presistoj estis kaj estas agrable facila; fine ni atingis sufiĉe akuratan eldon-ritmon; nur pro elektra striko la julia n-ro prokrastiĝis.

Kompilado de enhavo, monato post monato, postulas ofte penigan serĉadon kaj preparadon por pri-fakta kontrolo de tekstoj. Kontribuantoj, raportantoj kaj verkantoj longe laboras super siaj skribaĵoj. Fine la manuskriptoj pasas en formon de presitaĵo . . . ĉu por viveto efemera aŭ por ŝata konservado? Ordinare oni rigardas gazetojn kiel legajon kun valoro nur portempe distra; pli-malpli baldaŭ ili iel pasas for en la neniecon. Tio bedaŭre aplikiga ankaŭ al cetera gravaj periodaĵoj E-aj, kaj ni ne kuragaŝ fidi, ke nia modeste-formata, liliputa legajo — The A.E. — malgraŭ sia merito, ĝenerale evitas tiun mizeran sorton.

Ni varme konsilas, ke ĉiu efektiva E-isto konservu siajn ekzemplerojn kaj — ideale — ilin mem bindu aŭ bindiku, por ke restu en Aŭstralio disponeblaj jarkolektoj por serĉantoj post nia forpaso de sur la tero. Kiom inter ni estas la proporcio de legantoj fidelaj al nia afero en ĉi-rilato, homoj konsciaj pri la neceso konservi kaj tiel disponi al siaj posteuloj la presitajn kronikojn, la esperojn kaj aspirojn, la provojn kaj atingojn de Aŭstraliaj E-istoj? La raite imagebla minimumo min timiĝas. Ĉu 10%? Pri bindado, mi definitive scias nur pri tri-kvar individuoj. Ĉiu grupo, klubo, societo nepre devus tion fari.

La kosto de eldonado dum 1/12/71 — 31/1/73 estis 1778.47 dol. = po ĉirkaŭ 162 dol. por ĉiu n-ro. Espereble la gazeto regule aperos ankaŭ dum 1974. Ni celas fari el ĝi organon utilan ne nur por ni mem, sed ankaŭ per ĝiaj komentoj kaj propraj kontribuoj fariĝi vera "voĉo" kiu konstrueme helpas al la movado tutmonda. Ĉe la gazetaro E-a ni strebas akiri prestiĝon, laŭ la ĝusta senco de tiu vorto, nome: influo akirita per efektiva merito.

Tio estu nia ideala tasko dum la sekvanta jaro kaj ankoraŭ plue. — Red.

KORESPONDADO

Mi korespondas kun la tuta mondo kaj kolektas ĉiujn Esperantaĵojn, precipe glumarkojn. Respondo garantata. Mi bone rekompencos je via deziro. Richard Wluka, D-3 Hannover-Leinhausen, Bremer Str. 8.

RECENZOJ

“**Wilhelm Heinrich Trompeter**”: Adolf Holzhaus. Dua pligrandigita eldono, 1973. Eldonis D-ro H. Schroeter, direktoro de la urba arĥivo en Essen. Prezo 3 U.S. dol.

Ĝi havas 152 paĝojn. La unua eldono en 1971, eldonita de la Esperanto-Ligo en Israelo, havas 62. La finrezulto de la pliampleksigo estas verko de granda bibliografia valoro. Plendetale dokumentita kaj riĉa je fotostatoj, ĝi donas bildon de la fama Germana Esperanta pioniro kaj lia tempo. Precipe studinda estas la aŭtobiografio — en Germana manuskripto ofseta, klarlitera Germana teksto kaj Esperanta traduko. Estas aliaj liaj skribaĵoj kaj diversfontaj informoj pri li kolektitaj de la aŭtoro el presaj trajtoj jaŭ jardekoj. Tri leteroj de Zamenhof al Trompeter; la ceteraj malaperis; leteroj de Trompeter al kolegoj, amikoj; leteroj de nuntempaj urbestroj en Germanujo al Holzhaus, kiuj cetere montras la malfacilon kaj elverŝon de rimedoj mensaj kaj monaj neeviteblajn por tia verko. Pacienco, persistemo, elpoŝa pagado.

Multon de la enhavo la aŭtoro kolektis per okulstreĉa kribrado tra la paĝoj de malnovaj gazetoj, precipe “La Esperantisto” (fondita 1889) kaj “Lingvo Internacia” (fondita 1895). Ilin li serĉis kaj aĉetis. Lia laboro jam kreis versaĵne la plej funde faritan biografion en la lingvo Esperanto.

“**Patroj kaj Filoj**”: I. Turgenjev. El la Rusa lingvo tradukis Kazimierz Bein (Kabe). Tria represo, 1973. Eld. Dansk Esperanto-Forlag, Aabyhøj, Denmark. 215 paĝoj. 25 D.kr.

Turgenjev, fama Rusa romanisto kaj poeto (1818-1883) estis politika liberalulo. Post 1855 li loĝis en Germanujo, post en Parizo, kie li mortis. La tradukinto elektigis “la plej bona Esperanta stilo post Zamenhof” (The A.E., sept. 1962).

Pri la rakonto: Bazarov kaj amiko Arkadio Kirsanov finis studojn en Peterburgo. Bazarov gastis ĉe ties provinca familio Kirsanov grandsinjora. Versaĵne la aŭtoro sin esprimis per la voĉo de la juna Bazarov, kiu per siaj nude malkaŝaj eldiroj ŝokis la socie elitajn familion. Paulo Petroviĉ, onklo de Arkadio, kolere indigna pro la nihilismo de Bazarov, provokas lin al duelo.

La dialogoj inter Bazarov kaj Petroviĉ estas brilaj ekzemploj de trafe lerta vortbato-rebato. Per ili oni ricevas ekvidon al la tiama Rusa socio servuteca kaj pensbilon pri la animstato de la

intelektula rondo. Por legantinoj ne tre soci-politikemaj troviĝas, kvazaŭ kompanse, ankaŭ atentoriraj amintrigoj. Tio grandparte kontribuis rangigi la romanon inter la ĉefverkoj de ĝia speco.

La E-a traduko aperis en 1909; represa de S.A.T. en 1939, kontrolita de la Literatura Komitato; tiu ĉi estas la 3-a represo — sur bona papero, fortike broŝurita. Ĝi estas ekzakta reprodukto de la 2-a eldono; eĉ preseraroj restas nekorektitaj. Tie kaj tie la Lingva Komitato dormetis, ĉar troviĝas lingvaj misaĵoj, ekz., 103: “Bazarov sekvis ŝin . . . kaptante per la oreloj la siblon de la silka vesto, glitante (glitanta!) antaŭ li”. 132: “Vi estas delikata animo, marmelado (?), kiel vi povus malami?”; 84,90: nigrkapa (neelparolebla); 78: cinismo (cinikismo); 56: ignorantoj (sensiuloj). Estas notinde, ke en Rimarko de la L. Komitato oni legas: “alies” (vidu: P.I.V.). Tiu formo ŝajnas logika, kaj preferinda ol “alies” k.c.

Post paso de 64 jaroj tiu traduko de 1909 bezonas pli drastan revizion, por pli klarigi kelkajn dubajn vortojn, esprimojn, kaj paraĝrafojn. Per ĉi tiu teksto homo sentus malfacilon fidele traduki tiun aŭ alian frazon en nacian lingvon. Tamen, por ĉiu funda studento de la lingva evoluo de Esperanto, kaj por ĉiu amanto de mondfamaj romanoj, la verko estas valora posedajo.

“**Biblia Revuo**”, jan.-mar. Trimonata gazeto pri Bibliaj kaj Orientaj Studoj. 79 paĝoj. 6 U.S. dol. jare. Angelo Duranti, Piazza Duomo, 4, Ravenna, Italy.

La kajero estas tutenhave: Terminaro por Bibliaj Studoj. En 1967 George Rust preparis ĝian malneton, por servi al komitato preparanta novan tradukon de la Esperanta Biblio. Li sendis kopiojn al multaj homoj elektitaj pro ilia kontribua kapablo. Rust mortis antaŭ preso de la manuskripto, kiu poste ne estis havebla ĉe liaj hereditoj. Sed kunlaborinto havigis kopion al la komitato, kaj post kompletigo kaj revizio ĝi aperas en ĉi numero de la revuo.

Enestas 851 terminoj pri Bibliaj, apokrifaj kaj nebibliaj libroj: nomoj, mezuroj (longoj, volumenoj, pezoj, kalendaro), tropoj, notoj pri la Greka, Hebrea lingvoj k.c.

Ĉiu paĝo portas utilajn sciojn al legantoj. Unu ekzemplo: sub Terminoj Literaturaj: la Greka **hapax legomenon** = unufojvorto = vorto nur unufoje uzita en teksto, do malfacile tradukebla pro sia necerta signifo, kiel ĉe Mateo 6/11, Luko 11/3: epiousion. Ĉu ĝi signifas: sufiĉa, necesa aŭ ĉiutaga? La

terminoj estas alfabete listitaj per referencaj numeroj pri ĉiu temo en la teksto.

La numero estas aparte rekomendinda pro siaj instruaj avande informaj por ĉiu homo inteligenta. Aĉetontoj de la nova Esperanta Biblio povos ekzameni ĝian principan bazon per ĉi tiu riĉe dokumentita kompilaĵo.

"La Bambufluto": novelaro el Sud-Vjetnamio, 207 paĝoj. Eld. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1973. Prezo ne indikita. Havebla ĉe Nguyen Minh Kinh, 68 Ly Thuong Kyet, Hanoi.

Nau-era fasko da vive impresaj skizoj, kiujn verkis viroj havantaj plumon en unu mano kaj fusilon en la alia. La dua novelo, kiu portas la titolon de la kolekto, priskribas kiel ankaŭ malforta instrumento — nome fluto — povis save servi soldatojn kontraŭ fortoj armitaj per la plej teruraj maŝinoj de l'masakro.

Ke tiel granda torento da Esperantaj libroj povis kaj povas elflui el landeto meze de ĉio-detrua milito, jen atesto frapa al la nevenkebleco de la homa spirito.

Riĉaj landoj, kun multmiliona homdenseco, nepre direktu viajn okulojn sur tiun mirindan fenomenon.

Stilo iom kruda, tamen vigla, rekta kaj tute klara. Frazoj, kiel ekzemple, "La veninta el Sajgono direktoro" neniel estas pridubindaj. Vidu nur: "La kun ŝi renkontiĝantaj kaj de ŝi dispuŝataj pasantoj . . ." (Marta 234); "La virino . . . ekaŭdis la ŝin pelantajn minacajn kriojn" (same); "Sed la malmulte sub la anĝeloj malaltigitan Jesuon ni vidas" (Hebreoj 2/9).

KONKORDANCO DE CRUDEN

Por studentaj do la Biblio la konkordanco estas baze necesa en tio, ke ĝi forte faciligas referencojn. Por E-isto deziranta scii, kiel ekzemple Zamenhof tradukis "prick", "shear", "charlot", li konkordance serĉas la vortojn en alfabeto aranĝo kaj poste sin turnas al la E-a Biblio ĉe la koncernaj lokoj. La eldono de 1930 enhavas pli ol 225 000 referencoj. Jen skizo pri la aŭtoro Alexander Cruden (1701-70):—

Edukita por pastra ofico, li devis tion rezigni pro malsanemo. Post jaroj de private instruisteco, li fondis en 1732 librovendejon en Londono kaj komencis kompili la konkordancan, kiu eldoniĝis en 1736. Dum 23 jaroj la verko trifoje eldoniĝis, sed lia enspezo per ĝi estis mizera: nur meze po ĉirkaŭ 40 sterlingoj ĉiujare.

Li estis iom strangmaniera kaj en siaj maljuniĝaj jaroj li afliktiĝis de amo senespera kaj atakoj de frenezo. En 1770 oni trovis lin mortinta en Londona antaŭurbo Islington. Liaj manoj estis interplektitaj, kaj lia kapo kuŝis sur malferma Biblio.

Farita de unusola homo, la verko estas miraklo de la menso. Cruden kompilis ĝin dum nur kvar jaroj — nelonga tempo por plenumi tiele tre grandan taskon. (Havebla ĉe ĉiu Bible House.)

RALPH HARRY ANEKDOTAS

Germana deputito vizitis min en mia oficejo ĉe la Ambasadego. Li klarigis, ke li revenis el vojaĝo al Aŭstralio kaj deziris informi min pri la mirinda evoluo kaj eblecoj en mia patrolando. Li tie! entuziasmiĝis pri la prospero kaj bela estonteco tie, ke preskaŭ mi ekiris serĉi mian fortunon en la suda lando.

Tiam mi rakontis al li anekdoton pri ambasadorino, kiu vizitis Lian Sanktan Moŝton la Papon. Ŝi parolis al li pri la eklezio kaj ties problemoj dum longa tempo. Fine Lia Sankta Moŝto diris al ŝi mallaŭte kaj trankvile: "Mi tute komprenas, Sinjorina Moŝto, ankaŭ mi estas Katoliko!"

AT FELIXTOWE

At the British Esperanto Congress there, Mr. Ernie Money, M.P., after a few well-pronounced words in Esperanto, warmly approved and recommended Esperanto in the luncheon speech. He is one of 32 Members of Parliament who have publicly supported Esperanto.

Mr. Leon-Smith said Mr. Money was the first of the M.P.'s to stand up and be counted. "It took courage for him to appear on television and say as he did that the arguments for the adoption of Esperanto are overwhelming. In political life it is considered important to avoid being labelled a crank, but Mr. Money accepted that risk and without hesitation expressed his private beliefs in public".

"NORDA PRISMO"

This cultural review, hitherto published by the Eldona Societo in Copenhagen, has been taken over by the Fondumo Esperanto in Iirislahti in Finland. All subscriptions for 1973 are valid for 1974.

Ken Linton, the agent, would give any further information.